
## Carlos Semprún-Maura

# REVOLUCIO KAJ KONTRAŬREVOLUCIO EN KATALUNUJO (1936-1937)




Esperantigis Jesús González

**Biblioteko Mateo Morral**

Ĝenerala Konfederacio de la Laboro

# REVOLUCIO KAJ KONTRAŬREVOLUCIO EN KATALUNUJO (1936-1937)

Carlos Semprún-Maura

Originala eldono en la franca: *Révolution et contre-révolution en Catalogne (1936-37)*
Esperantigis Jesús González el la hispana eldono: *Revolución y contrarrevolución en Cataluña (1936-37)*, Barcelono, *Tusquets*, 1978 (traduko de Julia Escobar)

2019 Biblioteko Mateo Morral
Ĝenerala Konfederacio de la Laboro
Urba Federacio de Viladekans'
Carrer de la Muntanya, 16
ES-08840 Viladecans

# ENKONDUKO DE LA TRADUKINTO

Unue mi volas danki al s-ano Jurgo Alkasoro, ke li sciigis min pri tiu leginda (kaj tradukinda) verko de Carlos Semprún-Maura. Krome li donacis al mi sian tradukon de la enkonduko de la aŭtoro kaj la du unuaj ĉapitroj kun la permeso modifi ilin laŭ mia tradukstilo kaj plaĉo. Kion mi faris kaj tial kiu ajn mistradukaĵo estas atribuenda nur al mi.

Jen la listo de tiutempaj politikaj kaj sindikataj organizaĵoj aperantaj en la teksto kun la nomo kaj la komencliteroj en la esperanta kaj en la hispana aŭ kataluna:

ACKKI - Aŭtonomisma Centro de Komizoj de la Komerco kaj la Industrio; katalune, CADCI - Centre Autonomista de Dependents del Comerç i de la Indústria.
GKEKI - Kataluna Federacio de Gildoj kaj Korporacioj de la Etaj Komercistoj kaj Industriuloj; hispane, GEPCI - Federación Catalana de Gremios y Entidades de Pequeños Comerciantes e Industriales.
ĜUL - Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj; hispane, UGT - Unión General de Trabajadores.
HKAD - Hispana Konfederacio de Aŭtonomaj Dekstro-partioj; hispane, CEDA - Confederación Española de Derechas Autónomas
HSLP - Hispana Laborista Socialista Partio; hispane, PSOE - Partido Socialista Obrero Español.
IAF - Ibera Anarĥiista Federacio; hispane, FAI - Federación Anarquista Ibérica.
IFJL - Ibera Federacio de Liberecanaj Junularoj; hispane, FIJL - Federación Ibérica de Juventudes Libertarias.

KI - Komunista Internacio; hispane, IC - Internacional Comunista.
KPH - Komunista Partio de Hispanujo; hispane, PCE - Partido Comunista de España.
LKB - Laborista kaj Kamparana Bloko; katalune, BOC - Bloc Obrer i Camperol.
LPMU - Laborista Partio de Marksista Unuiĝo; katalune, POUM - Partit Obrer d'Unificació Marxista.
NKL - Nacia Konfederacio de la Laboro; hispane, CNT - Confederación Nacional del Trabajo.
RKA - Respublikana Kataluna Agado; katalune, ACR - Acció Catalana Republicana.
RMK - Respublikana Maldekstro de Katalunujo; katalune, ERC - Esquerra Republicana de Catalunya.
USPK - Unuiĝinta Socialista Partio de Katalunujo; katalune, PSUC - Partit Socialista Unificat de Catalunya.

En la teksto, mi kutime uzis la esperantajn komencliterojn de ĉi tiuj organizaĵoj. La personnomoj ne estas esperantigitaj krom tiuj tre konataj (Hitlero, Lenino, ktp)

Jesús González
Septembro 2019

# ANTAŬPAROLO AL LA HISPANA ELDONO

Mi verkis ĉi tiun libron inter la jaroj 1969 kaj 1971, kiam ankoraŭ ne plentrankviliĝis la eksplodo de Majo-Junio 1968 en Francujo kaj, kiam temoserio, nova por multaj, nutris agojn, diskutadojn, projektojn, gazetojn kaj librojn. Inter tiuj temoj kompreneble estis tiu de la liberecanaj revolucioj kaj tiu tiom uzata kaj misuzata de la memmastrumado. Ŝajnis al mi logike kaj ankaŭ evidente partopreni laŭ mia plaĉo en tiuj diskutoj kaj en la kritiko kontraŭ la totalismo (tiel la «blanka», kiel la «ruĝa» faŝismo), verkante libron pri la «memmastrumaj» spertoj ĉe Katalunujo kaj Aragono je 1936-1939, pri kiuj oni tiam sciis preskaŭ nenion en Francujo. Mi mem estis malkovranta la gravecon de la afero, dum mi estis progresanta en la pretigado de la libro kaj la serĉo kaj kapto de donitaĵoj kaj dokumentoj.
Samtempe ĉe la Parizaj eldonejoj modiĝis havi «maldrekstran» anguleton por kontentigi novan junulan klientaron kaj tiel pligrandigi la monprofitojn de la respektivaj entreprenoj.
Tamen ĉi tiu libro vagis de eldonejo en eldonejon ne trovante rifuĝejon ĝis «mirakle» ĝi trafis respektindan kaj origine katolikan eldonejon (Mame), sed kiu, malprosperinte, ankaŭ klopodis por restrukturiĝi. Mi ne plifortunigis ĝin, ĉar ĝi nelonge poste malaperis pereante pro la plej absoluta bankroto.
Mi modifis nenion de la unua franca eldono, nur forigis la mallongan enkondukon, kiun la franca eldonanto petis al mi por iomete klarigi al la eblaj transpirineaj legontoj la katalunan nacian aferon. Enkonduko, kiu malmulte povus

alporti al la eblaj hispanaj legontoj, kiuj pri tiu temo povas informiĝi –se ili jam ne informiĝis– ĉiutage kaj pli bone per aliaj libroj aŭ simple legante sian kutiman ĵurnalon, des pli nun, kiam la kataluna aŭtonoma Registaro estas restarigita... Tamen mi profitis –kion mi deziras ripeti ĉi tie– tiun mallongan resumon pri la kataluna naciismo por manifesti mian plej firman rifuzon al ĉia naciismo.
Mi modifis nenion nursole pro mallaboremo, ĉar multo povus esti modifita kaj plibonigita, se oni ankaŭ konsideras, ke pri la kolektivigoj kaj aliaj ĉi-traktitaj temoj laste publikiĝis pluraj libroj. Ankaŭ mi lasis senŝanĝaj kelkajn –malmultajn- pli aktualajn rimarkaĵojn, ekzemple la lastajn alineojn, per kiuj mi supraĵe aludis la situacion en Hispanujo je la tempo verki tiun libron, tio estas, ankoraŭ sub la frankismo.
Kompreneble neniu tiam povis aserti, ke, mortinta Franco, la frankismo estis malaperonta tiel rapide kaj pace kaj, ke la ĵus debutinta demokratio estis kondukonta Hispanujon tutrapide kaj facilmaniere al la Banaleco. Banaleco preferinda, laŭ mi, al la faŝismo kun aŭ sen ties frankistaj karakterizaĵoj. Tamen tio ne ŝanĝas la fakton, kaj gravas substreki tion, ke la revoluciaj (oni povas aldoni citilojn laŭvole) revoj kaj deziregoj nuntempe restas flankenlasitaj.
Kaj evidente tio puŝas deflankigi tiun libron sur la plej senesperan breton de la bibliotekoj, en kiu kunpremiĝas la libroj pri historio, nome tio okazinta kaj neniam plu ree okazonta.
Mi diras tion, ĉar inter tiu libro kaj kelkaj legantoj povas estiĝi la miraĝo de la «ekzemplo» kaj la iluzio de la «ripeto». Io tiel, kiel kredi, ke tio, kion komencis la liberecanaj laboristoj je 1936, tiun sendube ĝisfundan socian revolución, hodiaŭ estas reentreprenebla kaj efektivigebla ĝis ties lastaj konsekvencoj. Nura miraĝo, mi ripetas.
Eble la teksto mem estas «kulpa» pri la naskiĝo de tiaj iluzioj, eble mia propra entuziasmo, kiam mi malkovris la gravecon de la tiama socia revolucio, povas konfuziĝi kun ia

«klara kaj simpla perspektivo por la hodiaŭo»: sufiĉus rekomenci la saman gloroplenan vojon. Do ne. Neniam mi kredis, ke la historio povas ripetiĝi kaj des malpli tiu konkreta historio.
Evidente neniu libro, malgraŭ kion kredas la marksistoj-leninistoj ĉiam serĉantajn la bonan programon, povas alporti la revoluciajn solvojn, ĉar ĉio, kio estis kaj estas revolucia en la mondo, estas ĉiam neantaŭvidebla kaj spontanea kaj sekve superas kaj tuj kadukigas ĉiajn programojn. Kvankam poste venos la marksistaj historiistoj por klarigi al ni, ke ĉio okazis, ĉar Lenino trinkis kafon ne tre malproksime de la fokuso de la okazintaĵoj.
Se la ripeto de tio okazinta en Katalunujo je 1936-1937 ŝajnas al mi absolute malebla, tio estas nur, ĉar la hodiaŭa hispana socio tre malsimilas tiun de la jaro 1936. Sekve la lukto kontraŭŝtata, kontraŭaŭtoritatema, liberecana, por la memmastrumado ktp (mi tute scias, ke tiu lukto ne ekzistas hodiaŭ en Hispanujo, tio estas nura hipotezo), se ĝi ekzistus, devus reelpensi ĉion de la komenco ĝis la fino.
Por detale klarigi la ŝanĝojn okazintajn ĉe la hispana socio (kaj ĉe la mondo), tiel ĉe la pensmanieroj kaj la kondutoj, kiel ĉe la industrio kaj la terkulturo, ĉe la sociaj klasoj kaj la rolo de la ŝtato ktp, tiel, kiel por taksi ilian gravecon, necesas libro kaj ne sufiĉas la linioj de antaŭparolo. Tamen estos facila afero por la leganto kompari tion, kio okazis en 1936 (kaj kion mi tie rakontas samkiel jam multaj aliaj verkistoj antaŭe faris), kun tio, kion li ĉiutage travivas. Nenio simila. Escepte de la «eternaj principoj» de la Libereco kaj la Justeco, kiuj, ĉar ili estas «eternaj», ne interesas min.
Kaj tamen oni klopodas por ripeti la historion, kaj ne nur ripeti ĝin, sed ke oni faras nenion alian ol tio. Ĉiuj antikvaj tombejoj estas renversitaj. Oni elterigas la malnovajn kadavrojn de la anarĥisindikatismo, la malnovajn glorulojn, la malnovajn mumiojn, la malnovajn standardojn, la

malnovegajn statutojn, kaj oni klopodas por daŭrigi la gloroplenan historion de NKL. Kaj tiel statas la aferoj.
La hodiaŭa NKL estas nenio pli ol malbona karikaturo de la hieraŭa NKL. Kaj tio estas ne nur logika, sed ke ĝi estis antaŭvidita. Mi opinias, ke mi montris per la sekvantaj paĝoj ĉion kontraŭdiran, kion enhavis la teorio kaj la praktiko de la anarĥisindikatismo je la 1930-aj jaroj. Sed hodiaŭ kaj ĝuste pro la ŝanĝoj okazintaj ĉe la hispana socio, la nocio mem de anarĥisindikatismo estas disrompita kaj neniigita, ĉar en la socioj, kiel la hispana, kiu ajn sindikato povas esti nenio pli ol speciala ilo por integri la laboristojn en la socion, ilo de kontrolo kaj administrado (kaj sekve de bremso) de la malkontento kaj la ribelo. Sekve ĝuste la malo de la anarĥiismo, se tiu vorto ankoraŭ havas ian sencon. Kio pridubeblas.
La «renaskiĝinta» NKL hodiaŭ ja estas konsistigita de homoj, kiuj sub la samaj komencliteroj havas celojn ne nur malsamajn sed ankaŭ kontraŭdirajn. Sed tio, kio elstariĝas dum la lastaj agadmonatoj –ĝi unue tolerata, laŭleĝa poste–, se oni atentas la faktojn kaj ne la bonvolajn deklarojn, estas, ke NKL ne scipovis distingiĝi de la ceteraj sindikataj centraloj per io minimume interesa: lukto por la heredaĵo de SNC*, poramnestiaj petoj, procesioj kun standardoj kaj krietoj, diskutoj pri la kolektivaj kontraktoj ktp, la sama fatraso de ĉiuj burokrataj organizaĵoj. Kaj ni ne parolu pri la karikaturo de la karikaturoj, la malluma spritaĵo de tiuj, kiuj pretendas restarigi IAF-on kaj tial unufoje ĉiu semajno dormas kun pistolo sub kapkuseno kaj sonĝas, ke ili estas Durruti! (gravulo tute sanktigita kaj pri kiu endus ekparoli per minimumo de kritika spirito).
Ĉiuj indignoj kaj pretekstoj povas nenion kontraŭ la fakto, ke en la konfliktoj, en kiuj okazis io nova, diferenca, moderna,

*NeT: Central Nacionalsindicalista: faŝista unika sindikato dum la diktatoreco de Franko. CNS – Central Nacional Sindicalista, hispane Sindikatista-Nacia Centralo.

liberecana (ekzemple en Vitorio aŭ *Roca**), NKL forestis. Ĝi «apogis» aŭ simbole aplaŭdis, tamen de ekstere. Ĉe tiuj kaj aliaj okazaĵoj estis la laboristoj mem, kiuj, rifuzante la porinteresan helpon kaj eĉ pli la gvidadon de ĉiuj partioj kaj sindikatoj, demokratie kondukis siajn luktojn per suverenaj asembleoj.
Ne, tio sola nova estas la festema spirito, la enkonduko de la nocio pri festo en kelkajn mitingojn kaj kunvenojn de NKL. Sed, kvankam estu tre simpatia kaj noveca afero rompi kun la rito de la mitingo-meso, nepras du rimarkaĵoj: 1-a) la enkonduko de festo en la mitingon, de la ĝoja «petolaĵo» en la meson, jam skandalis kaj baldaŭ estos forpelita de «la vicoj de serioza organizaĵo, kiel NKL»; kaj 2-a) tiuj, kiuj pensas, ke la menciitaj festemaj manifestacioj movos eĉ ne unu sola milimetro la seĝon reĝan aŭ de ties ĉefa ministro –ĉu Suárez ĉu González–, prepariĝas por la ĉefa elreviĝo de sia vivo. Kompreneble la plejmulto de la nunaj «diboĉuloj» nur celas pasigi plurajn amuzhorojn, kaj tio, kiel ne!, iom gravas, sed ĝi ne preterpasas tiun celon tiel gravan, kiel limigitan.
Resume: ĉi tiu libro estas neniu lernolibro, per kiu oni klarigas, kiel restarigi, surbaze de la estintaj travivaĵoj, hodiaŭ, morgaŭ aŭ iam la liberecanajn kolektivigojn en Katalunujo, Aragono –aŭ Ekstremaduro–, nek la barikadojn en Barcelono. Se ĝi enhavas iom da intereso, tio estas ĝuste, ĉar ĝi povas utili por montri la egan distancon kaj la

---

*NeT: La okazintaĵoj de Vitorio (ankaŭ konataj kiel la buĉado de Vitorio). Je januaro 1976, komencis en Vitorio grava striko postulanta plibonigojn de la laborkondiĉo. La 3-an de marto 1976, okazis ĝenerala striko kun masiva laborista partopreno. Ĉirkaŭ la 5a posttagmeze, la polico elpelis la laboristojn el preĝejo, kie estis okazanta asembleo, per larmigaj gasoj kaj pafado. Estis mortigitaj 5 personoj kaj pli ol 150 vunditaj. Tiuj faktoj ne estis enketitaj nek juĝitaj.
Striko de *Roca:* Trimonata striko okazinta je 1976-1977 en la fabriko de *Roca* en *Gavá* (Barcelono), organizita laŭ asamblea maniero sen partopreno de sindikatoj, kun stratаj bataloj inter la laboristoj kaj la polico, kaj grava kunlaborado de la edzinoj de la laboristoj dum la tuta striko.

sennombrajn malsimilaĵojn inter la 1936-a kaj la 1978-a Hispanujo kaj la maleblan ripeton de tio jam okazinta. Endos serĉi aliaĵon, konklude.

Eble ĝi ankaŭ enhavas kritikan intereson. Sendube plaĉus al mi, ke ĝi estu ŝtonfrapo sur la plenfalsan montrofenestron de la stalinista legendo pri tiu periodo. Post 40 jaroj de frankista cenzuro –kaj de postfrankista malbona konscienco– la hispanaj stalinistoj sukcesis trudi heroan kaj demokratian bildon pri sia agado –fakte tute kontraŭrevolucia kaj subprema– dum la enlanda milito. Pluraj libroj jam denoncis tiun mistifikon (probable la plej bona estas La granda trompo de B. Bolloten), tamen ne malutilas daŭrigi la ŝtonĵetadon kontraŭ la montrofenestron de la mensogo por eble, ni ĉiuj kune, atingi detrui ĝin.

Tamen mia kritiko ne limiĝas al la analizo pri la tiama stalinismo. Mi ankaŭ mallaŭdas la aktivecon kaj konduton de la gvidantaj rondoj de NKL. Ĝenerale la anarĥiistoj, kiuj kritikis la agadon de la gvidantoj de NKL (Peirats, V. Richards ktp), ĉiam faris tion el vidpunkto, oni povas diri, politika. Ekzemple, partoprenante en la Registaroj, la NKL-aj gvidantoj perfidis la anarĥiajn principojn; same akceptante la militistigon de la volontarmeoj. Ĉio tio veras, tamen la afero estas pli grava kaj profunda, kaj ŝajnis al mi grave komenci la kritikan analizon pri la burokratiĝo de NKL «sub la protekto de la potenco» tiel ĉe la politika, kiel ĉe la ekonomia kampo. Burokratiĝo, kiu, kiel mi opinias esti pruvinta, estis plena kaj ĉioma. Kaj tio ankaŭ hodiaŭ gravas. Ĉar, kion pretendas tiuj, kiuj estas rekonstruanta NKL-on? Ĉu la neeblan ekfunciigon de «revolucia» sindikato aŭ la organizon de sindikata burokrataro? La respondo evidentas. La modernaj socioj kapablas krei nekalkuleblan nombron de ŝirmiloj, baroj kaj miraĝoj, ĉirkaŭ kiuj kunvenas tiuj, kiuj pretendas ŝanĝi aŭ detrui ilin per «organizaĵo», kies tasko estas plani la malkonsenton kaj intertrakti ĝin kun la ŝtato kaj la mastraro per la eternaj interdebatoj kaj interkvereloj,

sur kiu baziĝas la konfliktoplena integriĝo de la laboristoj al la produktproceso.
Se ne okazis pli da anarĥiaj agoj kaj iniciatoj en Hispanujo dum la lastaj jaroj, estas, ĉar tro da grupoj kaj individuoj limiĝis je la tasko rekonstrui la Palacon de la Mil kaj Unu Noktoj de la anarĥisindikatismo, morta de la monato de majo 1937 (se oni volas doni mortodaton, kio ankaŭ ne necesas). Dediĉante tutan sian tempon kaj streĉon al tiu iluzia tasko, ili ne sciis nek povis elpensi la plej minimuman novan ideon. Tiu Palaco, kiu ankoraŭ multe similas Babeloturon, ne havas pli «konsekvencan sintenon» ol lokiĝi en la pasinteco.
La Registaro de Lia Reĝa Moŝto devus ne forgesi NKL-on je la tempo koncedi subvenciojn al la sindikatoj (eble ĝi gajnos ion el la disdono de la militakiraĵoj de SNC), ĉar, kio okazintus, se ĉiuj, kiuj hodiaŭ strebas por la konstruo de la palaco el la nura nostalgio, komencus pensi kaj agi ĉi tie kaj nun?

C. Semprún-Maura
Parizo, Novembron 1977

*«Nur kiam la historiistoj liberigos sin de siaj antaŭjuĝoj, povos entrepreni seriozan studadon pri la popola movado, kiu renversis la respublikanan Hispanujon kaj kaŭzis unu el la plej gravaj sociaj revolucioj de la historio.»*

*Noam Chomsky*

# 1-a ĈAPITRO: LA MILITISTA RIBELO KAJ LA REVOLUCIA REAGO

## LA MILITISTA RIBELO

En *Melilla* je la kvina posttagmeze de la 17-a de Julio 1936 la komplotantaj oficiroj ekagis: ili eksigis la respublikan oficiron, kiu komandis la garnizonon, okupis la publikajn konstruaĵojn kaj proklamis la sieĝan staton. La militista ribelo kontraŭ la hispana respubliko ekis. La aliaj garnizonoj (*Tetuán*, *Ceuta*, *Larache* ktp) sekvis ilin dumnokte, kaj la sekvantan tagon matene la tuta «hispana» Maroko estis en manoj de la ribelaj militistoj. La rezistklopodoj de la «fidelaj» militistoj kaj de la laboristaj sindikatoj estis rapide sufokitaj.
La generalo Franco, kiu flugveturis de sia garnizono en la Kanariaj Insuloj al Tetuano, kie li devis estri la ribelon, alparolis perradie tiujn, kiuj «konservas la sanktegan amon al Hispanujo»:

> «Estas tuta Hispanujo, kiu ribelas postulante pacon, fratecon kaj justecon; tutlande la militistaro, la armea ŝiparo kaj la fortoj de publika ordo ribelas por defendi la patrujon.
> La energio, kiun ili uzos por la subtenado de la ordo, estos proporcia al la rezisto per kiu oni kontraŭstaros ilin.»[1]

La respublika Registaro, tre malpli energioplena, limiĝis dissendi la 18-an matene komunikaĵon, kiu sengravigis la ribelon kaj asertis, ke ĝi estis limigata al Maroko kaj, ke

1«*ABC*», Andaluzia eldono (23-an de Julio 1936).

«neniu, absolute neniu en la duoninsulo, aliĝis al tiu absurda entrepreno.»[2] Dume la duoninsulaj garnizonoj, sekvante la ekzemplon de tiuj de la «hispana» Maroko kaj Kanario, siavice ribelis sukcese en pluraj regionoj: Navaro (Pamplono), Aragono (Zaragozo), Malnova Kastilio (Burgoso, Valadolido), Andaluzio (Sevilo) ktp.
Kiam la respublika Registaro estis devigata rekoni, ke Sevilo falis en manojn de la generalo Queipo de Llano, la socialista kaj komunista partioj kune publikigis la sekvantan komunikaĵon:

> «La momento estas malfacila, sed ne senespera. La Registaro certas posedi la sufiĉajn rimedojn por sufoki tiun kriman provon. Okaze ke ĉi tiu rimedoj estus nesufiĉaj, la Respubliko havas la solenan promeson de la Popola Fronto. Ĉi tiu estas decidita partopreni en la lukto ekde la momento, kiam la helpo estos petita al ĝi. La Registaro ordonas kaj la Popola Fronto obeas.»[3]

Tamen la Registaro hezitas. Ŝajnas kvazaŭ ĝi esperus, ke parto de la militistaro daŭre sin tenos Fidela al ĝi, parto sufiĉa por rezignigi la «ribelantojn» persisti en ties «absurda entrepreno». Samtempe ĝi rifuzis «armi la popolon», kompreneble timante la revolucion, sed sendube timante ankaŭ, ke tiuj hipoteze fidelaj, aŭ almenaŭ hezitaj, militistoj inklinus al la malamika tendaro. Per ĉi tiu malantaŭeniro la disponoj, kiujn ĝi decidis la 18-an de Julio, ŝajnas tute ridindaj, ĉar ĝi limiĝis eksigi la ribelantajn militistestrojn, kaj je la tria kaj kvarono posttagmeze ĝi publikigis novan deklaron:

> «La Registaro ree prenas la parolon por konfirmi la absolutan trankvilecon de la situacio ĉe la tuta

2«*Claridad*», Madrido (18-an de Julio 1936).
3PEIRATS, J.: *CNT en la revolución española* [NKL en la hispana revolucio], Parizo, *Ruedo Ibérico*, 1971, 1-a volumo, paĝo 139.

duoninsulo. La Registaro dankas la ricevitajn subtenproponojn kaj samtempe deklaras, ke la plej utila subteno, kiun oni povas doni al ĝi, estas garantii la normalecon de la ĉiutaga vivo por doni altan ekzemplon de sereneco kaj fido pri la rimedoj de la Potenco.»[4]

Sed kiaj rimedoj estis tiuj sed la armeo kaj la polico, kiuj preskaŭ tute inklinis al la ribelantoj? La respublika Registaro, kiu timis la revolucion, daŭre atendis revante, ke la armeo, aŭ grava parto de ĝi, «reakiru la bonsencon». Ĉar ĝi atendis tiun miraklon, rifuzis doni armilojn al la laboristaj organizaĵoj. Eĉ pli, la ĉefa ministro kaj ministro pri la milito Casares Quiroga proklamis, ke kiu ajn persono disdoninta armilojn sen lia permeso estos mortpafita.
La prezidanto de la Respubliko, Manuel Azaña, ĉiurimede klopodante por ke no okazu la alfronto, anstataŭigis la Registaron Casares Quiroga per alia prezidata de Martínez Barrio taskata intertrakti kun la ribelantaj militistoj. Ĉi tiu, por estigi Registaron de «nacia unuiĝo», proponis la ministerion pri la milito al la generalo Mola, kiu estis la ribelestro ĉe la norda landparto. La ĉefministro pertelefone kontaktis lin. Sed kompreneble Mola rifuzis. Ĉiel estis tro malfrue, la sorto jam estis neŝanĝebla. Al la Registaro Martínez Barrio restis nursole abdiki kaj ĝi faris tion. Ĝi daŭris nur kelkajn horojn, sed dum la ribelo disvastiĝis tra la tuta duoninsula teritorio, la premo de la laboristaj amasoj por akiri armilojn kaj komenci la lukton ĉiam pli fortiĝis. En kelkaj regionoj la laboristoj komencis sin armi proprarimede. Sekve, kiam la 19-an de Julio, prezidata de José Giral, enpotenciĝis nova Registaro, ĉi tiu devis akcepti la disdonadon de armiloj al la laboristaj organizaĵoj. Se ĝi ne farintus tion, estintus forbalaita de la militistoj, sed, armante la laboristajn

4«*Claridad*», Madrido (18-an de Julio 1936).

organizaĵojn, ĝi fordonis al ili ne nur armilojn sed ankaŭ la realan potencon.

## LA PREPAROJ POR LA LUKTO EN BARCELONO

En Barcelono, la Militista Estraro* (*), kiu estis fondita de antaŭ pluraj monatoj, ellaboris kune kun la Centra Stabo de la «ribeluloj» teorie perfektan planon. Temis pri la sukcesa plenumo de la tasko, kiun generalo Mola en sia ĝenerala plano pri la ribelo difinis tiel: «sendanĝerigi la katalunajn proletajn amasojn»[5]. Por atingi tion la trupoj devis kunflui de la antaŭurbaj kazernoj en la urbocentron kaj preni la pli gravajn administrejojn. La plano de Mola antaŭvidis «informi la trupon pri tio, ke oni estis preparanta movadon kontraŭ la Respubliko, kaj ke la Armeo, kiel garantianto de la ordo, devas surstratiĝi por defendi ĝin». Ĉi tiu milita ruzo klare pruvas, ke la konspirantaj oficiroj ne tro fidis je siaj trupoj. Rilate la oficirojn, kiuj estis konataj pro siaj porrespublikanaj ideoj, tiuj devis esti neutraligitaj de la komenco. Ĉar tiuj ne estis multnombraj, tiu planparto ne devis esti tro malfacila.
La militistoj esperis, ke oni ne kontraŭstaros ilin per grava rezisto. Unu el ili deklaris malmultajn tagojn antaŭ la ribelo: «Kiam tiu tuta kanajlaro aŭdos tondri la kanono, ĝi forkuros kiel leporaro.»[6] Ne ĝuste estis tio, kio okazis.
Lluís Companys, prezidanto de la kataluna Registaro, ŝajnas, ke li konsciis pri la «ŝtatrenversa» danĝero iom pli ol siaj kolegoj de la centra Registaro. Ĉiel la 16-an de Julio matene li volis interparoli kun la reprezentantoj de NKL, la povoplena anarĥisindikatista sindikato. La celo de ĉi tiu intervidiĝo estis kune studi la rimedojn por kontraŭstari la faŝistan danĝeron.

---

* NeT: Neleĝa oficira reakcia asocio.

5«*Solidaridad Obrera*», Barcelono (18-an de Julio 1936)
6PAZ, Abel: *Paradigma de una revolución* [hispane, Paradigmo de revolucio]. Parizo, *Editions de l'AIT*, 1967, paĝo 26

> «Por studi tiun demandon (pri kunlaborado [C. S.-M.]), la regionaj komitatoj de NKL kaj de IAF kunvenis kun pluraj gravaj aktivuloj de ambaŭ organizaĵoj. La decido, atingita dum ĉi tiu kunveno, estis tio, ke: "pro la faŝista minaco, NKL kaj IAF, forgesante ĉiujn ofendojn kaj neplenumatajn venĝojn, subtenas la opinion, ke nepras, aŭ almenaŭ dezirindas, starigi intiman kunlaboron inter ĉiuj liberalaj, progresemaj kaj proletaj fortoj, kiuj estas pretaj alfronti la malamikon". Estis tiam, kiam la laboristaj anarĥiistaj organizaĵoj de Barcelono estigis Komitaton de Interrilato kun la kataluna Registaro konsistigitan de kvin aktivuloj de la du organizaĵoj: Santillán, García Oliver, Francisco Ascaso de IAF kaj Durruti kaj Asens de NKL.»[7]

La plej efika dispono, kiun povintus decidi tiu Komitato de Interrilato, estintus la armildisdono al la laboristoj kaj la konkreta organizo de la kontraŭstaro al la ribelo. Tamen la kataluna Registaro ne povis fari tion, ĉar tiel en Barcelono, kiel en Madrido, «se la politikistoj timas la faŝismon, ankoraŭ pli timas la popolon armitan», kiel skribis la anarĥiisto Diego Abad de Santillán. Tiel do la kataluna Registaro ne nur ne konsentis doni al la Komitato de Interrilato la malmulton, kiun ĉi tiu petis –nome, mil pafilojn!–, sed ke krome la NKL-anoj, kiuj gvatis la kazernojn, estis arestitaj kaj senarmigitaj de la polico. Tiusence la tuta agado de la Komitato de Interrilato estis intertrakti, ke ne estu konfiskitaj la malmultaj armiloj, kiujn la anarĥiistoj sukcesis kaŝi pro la subpremado de Oktobro 1934[8].

---

7ABAD DE SANTILLAN, Diego: *La revolución y la guerra de España* [hispane, La revolucio kaj la milito de Hispanujo], Havano, eldonejo *El Libro*, 1938, paĝo 131.

8Pri la oktobraj okazintaĵoj vidu la 1-an aneksaĵon.

La 17-an de Julio, kiam jam estis konata la ribelo de Maroko, IAF disdonis manifeston ĉe la fabrikelirejoj:

> «Nuntempe la faŝista danĝero jam ne estas minaco, sed sangavida realaĵo... Ĉi tiu jam ne estas tempo por heziti. Endas efektivigi niajn decidojn. En ĉiu loĝloko la anarĥiistaj grupoj kaj la Liberecanaj Junularoj agadu en intima kontakto kun la respondecaj organoj de NKL. Ni evitu ekkonflikti kun la kontraŭfaŝismaj fortoj, kiuj ajn ili estu, ĉar la kategoria imperativo de la momento estas la detruo de la militista, klerikala kaj aristokrata faŝismo. Ne perdu la kontakton, kiu devas esti konstanta, kun la specifa organizaĵo (IAF) regiona kaj nacia. Vivu la revolucio! Mortu la faŝismo!»[9]

Dumnokte la laboristoj kunvenis en la sindikatejoj. Fakte tie ili pasigis tutan sian liberan tempon de la 12-a de Julio, ĉar ili sciis, kiel ĉiuj en Hispanujo –escepte de la centra Registaro, kiu ne volis scii–, ke la militistoj kaj la faŝistoj estis preparanta ŝtatrenverson. Tiun 12-an de Julio la aktivuloj de NKL kaj IAF decidis sendi armitajn grupojn por gvati la kazernojn, por ke la armeo ne trafu ilin neatendite, kaj por ke ili povu decidi la diversajn kuniĝpunktojn uzotajn, kiam komenciĝos la lukto. Ekde ĉi tiu momento komenciĝis la atendo. Sed la novaĵo pri la ribelo de Maroko klare komprenigis al ĉiuj la tujecon de la alfronto. La maltrankvileco estis tre granda: endis ĉiurimede trovi armilojn. Maristo, Juan Yagüe, proponis forpreni la armilojn, kiuj estis en la ĉambroj por oficiroj de la ŝarĝoŝipoj ankritaj ĉe la haveno. Grupo efektivigis la proponon: tiurimede oni kolektis 150 pafilojn kaj dekduon da pistoloj. Sed la policestro Escofet, kiu estis avizita, sendis taĉmenton de

9ABAD DE SANTILLAN, Diego: *Por qué perdimos la guerra* [hispane, Kial ni malvenkis la militon]. Madrido, *G. del Toro*, 1975.

Gvardianoj de Sturmo* al la Sindikato de la Transporto, kie NKL-anoj estis disdividantaj la akiraĵon. La gvardianoj ĉirkaŭis la sindikatejon kaj la okazaĵo finiĝintus per aŭtentika batalo, se ne aperintus Durruti kaj García Oliver, kiuj traktis interkonsenton: oni transdonos dekduon da pafiloj al la Gvardio de Sturmo kiel simbolan rezulton de la sukceso de ties komisiono[10]. (Rimarkindas, ke la Gvardio de Sturmo, kontraŭe al la Civilgvardio, estis policokorpuso kreita de la Respubliko kaj, ke multaj el ĝiaj anoj estis respublikanoj kaj eĉ socialistoj).
Post ĉi tiu nova nokto de atendo kaj preparado, daŭris la mobilizo en la sindikatejoj dum la tuta 18-a. La aktivuloj sin organizis laŭ kvartalaj Revoluciaj Komitatoj.
Tiuj ĉi komitatoj plenumos esencan rolon en la revolucia proceso kaj ekde ĉi tiu momento sin okupis pri la preparado de la bataloj. Interrilataj agentoj informadis ilin pri la situacio ĉe la kazernoj, tio estas, pri la pliiĝanta maltrankvileco de la oficiroj pro la alproksimiĝo de la horo H. Nokte la radio dissendis mesaĝon de la Nacia Komitato de NKL, kiu ĵetis la instrukcion pri la ĝenerala revolucia striko kaj rekomendis al ĉiuj komitatoj kaj aktivuloj, ke ili restu interkontakte kaj atente en la sindikatejoj kun la armiloj ĉemane. Tuje la Kataluna Regiona Komitato de NKL sekvis la instrukcion.
Je la naŭa vespere de tiu 18-a de Julio okazis lasta intervidiĝo inter la Komitato de Interrilato NKL-IAF kaj Companys. Ĉi tiu daŭre rifuzis disdoni armilojn. Tiu sinteno ŝajnis nekonsekvenco: la 16-an de Julio li mem prenis la iniciaton peti al NKL kaj IAF ties kunlaboron por la defendo de la Respubliko, kaj poste li ade rifuzis doni, eĉ kiam la «ŝtatrenverso» jam komenciĝis, la rimedojn por garantii tiun

*NeT: hispana polica organo, kreita dum la Dua Respubliko cele disponi policistaron por la subteno de la publika ordo, kiu estu tute fidela al la respublika reĝimo; hispane,Guardia de Asalto.
10KAMINSKI, E.H.: *Ceux de Barcelone* [france, Tiuj de Barcelono]. Parizo: eldonejo *Denoël*, 1937, paĝo 21. Reeldono en la kataluna kaj hispana, *Ediciones del Cotal*, Barcelono, 1977.

defendon: la armilojn. Kvankam Companys –male al la centra Registaro, kiu ankoraŭ revis, ke ĝi estis la sola potenco kaj la unika laŭleĝa (sed ne reala) aŭtoritato– alproksimiĝis al la ĉefa forto kapabla en Katalunujo bari la pason al la faŝismo –NKL–, tamen li ne fine decidiĝis armi la anarĥiistajn amasojn. Kiel li armos tiun ularon kapablan fari «kiun ajn frenezaĵon» –eĉ realigi la socian revolucion? Tamen ne armi ilin, ĉu tio ne signifus lasi senbarilan vojon al la faŝismo? Antaŭ ĉi tiu dilemo Lluís Companys, gvidanto de la aŭtonomisma kataluna movado, respublikano kaj liberalulo, nur povis heziti.
Kiam ili sciiĝis pri tiu nova rifuzo, la NKL-aj aktivuloj, kiuj ĝis la lasta momento esperis sintenoŝanĝon de la kataluna Registaro, decidis akiri armilojn per kiu ajn ebla rimedo: ili forrabis la armejojn, ŝtelis paketojn da dinamito en la ŝtonminejoj kaj, helpataj de kelkaj gvardianoj de sturmo, prenis kelkajn fuzilajn rezervojn de la Registaro. Ili konfiskis privatajn aŭtomobilojn por plifaciligi la rapidan kontakton inter la diversaj grupoj. Tuj kiam oni pentris la komencliterojn 'NKL-IAF' sur la aŭtomobilŝeloj, la veturiloj komencis trairi la barcelonajn stratojn. La grupoj de armitaj aktivuloj gvatantaj la kazernojn vidadis eniri falangistojn kaj *requetés**, kiuj iris tien por ricevi uniformojn kaj armilojn por batali kune kun la militistoj. Finiĝis la nokto, plia atenda nokto.
Oni povas sin demandi, kial la laboristaj organizaĵoj, ĉefe NKL, kiu senkompare estis la plej grava el ĉiuj en Katalunujo, ne atakis pli frue por profiti la surprizavantaĝon. La nursola klarigo, kiun ni trovas, estas la nesufiĉeco de armilaro kune kun la espero pri sintenoŝanĝo de la kataluna Registaro. Tamen sendube la timo disrompi la kontraŭfaŝisman fronton per ago, kiun la kataluna Registaro

---

*NeT: Falangistoj: anoj de *Falange Española*, la hispana faŝista partio. *Requetés*: karlismaj soldatoj. Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Karlismo

ne povintus nek volintus apogi, pezis ankaŭ grave. Ĉiel tiu «atendopolitiko», kiu estis ĝenerala fare de ĉiuj laboristaj organizaĵoj en la tuta duoninsulo, ofte plifaciligis la komencan venkon de la militistoj.

## LA BATALOJ DE LA 19-a KAJ 20-a DE JULIO EN BARCELONO

La 19-an de Julio je la kvara kaj duono matene la trupoj eliris el la kazernoj kriante: «Vivu la Respubliko! Vivu Hispanujo!». Sed la militruzo elpensita de Mola fiaskis. La armitaj grupoj, kiuj eĉ ne dum momento kredis ĝin kaj, kiuj antaŭ kelkaj tagoj estis postenigitaj apud la kazernoj, tuje ekpafis. La fabriksirenoj eksonis alvokante la laboristojn al la batalo. La trupoj sekvante la antaŭviditan planon, tio estas, la rapida okupo de la strategiovaloraj urbolokoj, postenis sur la placoj de Hispanujo, de la Universitato kaj de Katalunujo, prenis la plej gravajn konstruaĵojn, kiel la hotelon *Colon*, la hotelon *Ritz* kaj la telefonkonstruaĵon. La trupoj de la kazernoj de *Atarazanas* kaj de *la Maestranza* okupis la havensektoron de la Ĉefa Poŝt-Oficejo ĝis la strato de *la Paralelo*. La generalo Goded, kiu flugmaŝine venis de Majorko por komandi la ribelon, sin instalis en la ejo de la Kapitano-Generalo kaj eksigis kaj arestis la garnizonestron, Llano de la Encomienda, fidelan al la Respubliko.
Tia estis la situacio dum la fruaj matenaj horoj. Tamen la militistoj ĉie trovis feran kontraŭstaron. En la *Brecha de San Pablo* apud la Lignolaborista Unika Sindikato, ties aktivuloj starigis gravan barikadon sur la strato de *la Paralelo*, per kiu ili retenis dum kvar horoj la militistojn, kiuj nur atingis preni la barikadon kaj okupi la sindikatejon deviginte marŝi antaŭ si la virinojn kaj infanojn de la kvartalo. Sed tagmeze kontraŭatako de la NKL-aj aktivuloj rekonkeris la perditan terenon.

Samtempe okazis en la urbocentro bataloj, kiuj estos definitivaj. La militistoj estis sieĝataj en la konstruaĵoj, kiujn ili estis okupintaj sur la placo de Katalunujo. Je unua horo posttagmeze la laboristaj batalantoj ricevis la apogon de la Gvardianoj de Sturmo kaj de iomaj civilgvardianoj estrataj de la kolonelo Escobar (iu el la malmultaj oficiroj de la Civilgvardio –la forto faka pri la subpremado de la laborista kaj kamparana movadoj–, kiuj aliĝis al la respublikana tendaro). La situacio de la militistoj estis fariĝanta kriza. Ĝi nur povintus sin teni per la alveno de helpofortoj devenantaj de la Kazernoj de *San Andrés* kaj de la Kajoj. Sed la laboristoj de *Barceloneta* fiaskigis la riskan provon de la helpaj kolonoj konsistigitaj de kavaleria kaj artileria regimentoj. Dum la batalaĵoj ĉe la aleo de *Icaria* apud la kazerno de la Kajoj okazis io, kio findecidis la luktosorton.
Tiuokaze la soldatoj pravigis sian econ de «uniformitaj laboristoj kaj kamparanoj», kiel oni povas nomi ilin laŭ la ĵargono de la laborista movado: iuj ne sciis kion fari, aliaj pafis kontraŭ la nubojn, aliaj efektivigis la strofojn de la Internacio kaj ekpafis kontraŭ siajn oficirojn. La laboristoj profitis la ŝancon, forlasis siajn barikadojn kaj sin direktis amase kaj senprotekte kontraŭ la malamikon. Ili prenis grandan kvanton da kanonoj. La revolucia kontraŭatako komenciĝis.
Noktiĝis dum daŭris la bataloj, tamen la militistoj jam superegis nenie. La konstruaĵoj, kiujn ili okupis en la urbocentro, estis reakiritaj. Je la unuaj horoj de la lundo 20-a la kanonoj estis vicigitaj antaŭ la Kapitano-Generalejo. Oni minace postulis la kapitulacion al la ribelestroj. Por finkonvinki ilin, salvo tremigis la tutan konstruaĵon tiel malaperigante la lastajn esperojn de la militistoj. Goded estis arestita kaj kelkaj NKL-aj aktivuloj akompanis lin al la

Palaco de la *Generalitat*[*], kie li faris la sekvan deklaron antaŭ la radiomikrofonoj:

> «Ĉi tie la generalo Goded. Mi alparolas la popolon por deklari, ke la sorto estis nefavora al mi, kaj mi estas kaptita. Tion mi diras, por ke ĉiuj, kiuj ne deziras daŭrigi la lukton, sin sentu liberaj de ĉiu devo al mi.»[11]

En la kazernoj la soldatoj ribelis, mortpafis siajn oficirojn kaj disdonis armilojn al la laboristoj. Nur la fortikaĵo de *Drassanes* restis en manoj de la militistoj. La respublika aviadilaro –kelkaj «*cucos*»– komandita de Díaz Sandino komencis la atakon per bombardo. Poste la laboristoj efektivigis la finan atakon, dum kiu mortis Francisco Ascaso, fama anarĥiista aktivulo. Tiel estis neniigita la militista ribelo en Barcelono la 20-an de Julio. La aktivuloj de la laboristaj organizaĵoj alproprigis al si ĉiujn armilojn trovitajn en la kazernoj. Per kamionoj, aŭtoĉaroj kaj konfiskitaj privataj aŭtomobiloj, la armitaj grupoj deiris al la urboj kaj vilaĝoj de la kataluna regiono kaj venkis la militistojn en Taragono, Ĝirono kaj Ilerdo.
Kiu estis resume la situacio en la cetero de Hispanujo? La militistoj konkeris kelkajn ĉefajn strategilokojn en Andaluzio (Kadizo, Kordobo, Sevilo), kie surteriĝis la helpotrupoj de la maroka armeo transportitaj de italaj flugmaŝinoj. Ili ankaŭ superegis sufiĉe vastan zonon, kiu ampleksis de Korunjo ĝis Osko kaj Zaragozo, kaj de *Cáceres* laŭ la portugala landlimo ĝis Avilo, Segovio kaj Teruelo, enhavante Navaron, grandan parton de Aragono, Malnovan Kastilion, Leonon, preskaŭ tutan Galicon kaj parton de Ekstremaduro. La respublikana zono do restis disigita duparte: norde, Eŭskujo, Santandero, la norda parto de Asturio (escepte de

---

*NeT: *Generalitat*, nomo en la kataluna de la kataluna aŭtonoma Registaro. La palaco de la *Generalitat* estis kaj estas ĝia sidejo.
11PAZ, Abel: sama verko, paĝo 124.

la ĉefurbo, Oviedo) estis blokitaj inter la maro kaj la «ribeluloj»; kaj la plej grava parto, kiu amplekis preskaŭ tutan Andaluzion, Orienton*, Katalunujon, parton de Ekstremaduro kaj Novan Kastilion. Rimarkindas, ke en la pli industriigitaj (ĉefe Eŭskujo kaj Katalunujo), kelkaj el la plej riĉaj kampokulturantaj regionoj (kiel Oriento) kaj la grandaj urboj, kiel Madrido, Barcelono, Valencio, Bilbao ktp, la militista ribelo fiaskis kaj, ke tiu malvenko estis ĉie kaŭzita de la homamasa ago, ĉar la plejmulto de la armeo kaj la polico aliĝis al tendaro de la «puĉistoj».

Ĉi tiu «mapo» krome respondas preskaŭ ekzakte al la influo sur la lando de la dekstraj kaj maldekstraj fortoj. Tiel la militista puĉo, kiu estis konceptita kiel simpla ribelo, kiu apenaŭ daŭrus kelkajn tagojn kaj, kiu renkontus malmultan kontraŭstaron, renkontis serion da malfacilaĵoj ne antaŭviditaj de la Staboj. Kvankam por la grandaj kapitalistoj kaj la bienmastroj –kaj por la tuta aro da militistoj, klerikaro, monarĥiistoj, falangistoj kaj aliaj partianoj de la dikredo, la ordo kaj la patrujo– la ŝtatrenverso devus esti antaŭzorga dispono kontraŭ la alproksimiĝanta socia revolucio, reale ĉie faris nenion pli ol provoki ties eksplodon. Dum la unuaj monatoj de la enlanda milito okazis en Hispanujo senantaŭa socia revolucio. La faŝismo estis detenata, la burĝa Respubliko, trafata de la revolucia tajdo, dispeciĝis. Plian fojon en la nuntempa historio, la ekspluatataj amasoj ŝajnis mastri sian destinon.

## LA POTENCO DE LA ARMITAJ LABORISTOJ[12]

La strukturo de la burĝa ŝtato tutlande disfalis: «Nur restas la polvo de la ŝtato, la cindroj de la ŝtato» skribis poste

*NeT: Ĝenerala nomo de la mediteraneaj distriktoj de Hispanujo, ĉefe rilate la malnovajn reĝlandojn de Murcio kaj Valencio.

12Pri la laboristoj, proletaro kaj «laborista movado» oni vidu la precizaĵojn de la 2-a aneksaĵo.

respublikana juristo[13]. En la zono superregita de la militistoj venis la tempo de ĝenerala kontraŭrevolucia perforto. Ili mortpafis ne nur la aktivulojn de la laboristaj organizaĵoj, sed ankaŭ la laboristojn, nur ĉar ili estis tiaj. Ili mortpafis ne nur la voĉdonintojn por la Popola Fronto, sed ankaŭ ties edzinojn, ties gepatrojn, ties gefilojn.

En la «respublikana zono» la Registaro jam havis nenian realan aŭtoritaton. Kiel diris la komunista gvidantino Dolores Ibarruri: «Tuta la ŝtataparato estis neniigita kaj la ŝtatpotenco transiris en la straton»[14]. Dolores Ibarruri (kiel la ceteraj KPH-aj gvidantoj) bedaŭris tiun situacion; cetere la komunistoj baldaŭ sin dediĉis al la restarigado de la ŝtatpotenco.

> «Senigita je la subpremaj ŝtataj institucioj (skribas Bolloten), la Registaro de José Giral posedis la nominalan potencon, sed ne tiun efektivan, ĉar ĉi tiu estis disigita en sennumeraj fragmentoj kaj disetendita tra miloj da urboj kaj vilaĝoj en manoj de la revoluciaj komitatoj, kiuj starigis sian superregadon super la poŝto- kaj telegrafo-servo, radiostacioj kaj telefoncentraloj; organizis policorotojn kaj tribunalojn, ŝoseajn kaj landlimajn patrolojn, transportad- kaj provizad-servon; kaj kreis unuojn el volontarmeanoj por la batalmilitfrontoj. Resume la kabineto de José Giral havis realan aŭtoritaton nenie en Hispanujo.»[15]

Kvankam tiu situacio estis ĝenerala tra la tuta respublikana zono, estis en Katalunujo, kie tiu fenomeno atingis plejan amplekson. Tio veras ne nur rilate la politikajn, militistajn kaj subpremajn potencojn, sed ankaŭ koncerne la interhomajn

---

13OSSORIO y GALLARDO: *Vida y sacrificio de Companys* [hispane, Vivo kaj mortofero de Companys], paĝo 190.

14IBARRURI, Dolores: *Speeches and Articles (1936-1938)* [angle, Paroladoj kaj artikoloj (1936-1938)] Propaganda broŝuro de KPH.

15BOLLOTEN, Burnett: *El gran engaño* [hispane, La granda trompo]. Barcelono: *Caralt*, 1975, paĝo 43-44.

sociajn kaj ekonomiajn rilatojn. Ĉio estis ŝanĝita, trenita, aliigita de la granda revolucia tajdo, kiun kaŭzis tute kontraŭvole la militista ribelo.
En Barcelono la armitaj laboristoj estis la mastroj de la urbo kaj tuj sin dediĉis aliigi ties aspekton: ili bruligis la preĝejojn (escepte de la katedralo konsiderita kiel «artoverko») aŭ transformis ilin en lernejojn, kunvenejojn, kovritajn merkatojn ktp. Oni kreis novajn revoluciajn tribunalojn kaj malfondis la antaŭajn; ĝenerale la plej reakciaj juĝistoj estis ekzekutitaj, la prijuĝaj arkivoj estis bruligitaj, la malliberulejaj pordoj estis malfermitaj ne nur por la politikaj malliberuloj, sed ankaŭ por tiuj de la komuna juro. La laboristaj organizaĵoj organizis la Komitatojn pri Provizado taskitajn pri la provizado de nutraĵoj, kaj anstataŭis preskaŭ ĉie la privatan komercon[16]. Aliaj komitatoj –ĉefe la Komitato pri la Nova Unuiĝinta Lernejo konsistigita de aktivuloj de la laboristaj kaj universitatanaj organizaĵoj– sin okupis pri la instruado, malfermante post malmultaj tagoj 102 novajn lernejojn.
La Prikontrolaj Patroloj prigardis stratojn kaj ŝoseojn. La doganejoj ĉe Francujo, norde de Katalunujo, ankaŭ estis mastrumitaj de laboristoj: «...kelkaj anoj de la Kontraŭfaŝismaj Volontarmeoj gardodeĵoras. Ili surhavas blavan laborveston sur kiu elstaras la kartoĉujoj. Ili estas armitaj ĝis la dentoj per pistoloj kaj fusiloj. Post granda tablo sidas laboristoj kun la pistolo ĉezone, kiuj kontrolas pasportojn kaj kreditkartojn»[17]. Kaj ĉefe la laboristaj volontarmeoj okupis sin pri la lukto kontraŭ la militistoj: kvar tagojn post la fino de la bataloj en Barcelono, kolono da armitaj laboristoj gvidata de Durruti deiris por liberigi Zaragozon. Ĝi marŝis sur Aragono kun Armeo de Socia Liberigo aplikante metodon proponitan de la itala anarĥiisto

16Pri tiuj aferoj –provizado kaj lernejoj– oni vidu la 3-an aneksaĵon.
17STERLING, M. en *Modern Monthly* (oktobro 1936), citita de BOLLOTEN, citita verko, paĝo 39.

Malatesta: «Preni urbon aŭ vilaĝon, vanigi ĉiujn ŝtatreprezentantojn kaj inviti la loĝantaron sin memorganizi libere»[18]. Mi ne intencas eĉ plej minimume liveri idilian rakonton; la tasko fariĝis ne sen konfliktoj kaj eraroj, aŭ eĉ sen krimoj, tamen ĝi fariĝis.

La katalunaj laboristoj baldaŭ komprenis, ke la lukto disvolviĝis en du militfrontoj. Ke la dispecigita ŝtato (tiel la centra Registaro, kiel la kataluna, relative aŭtonoma) batalis, komence kaŝite, por ke ĝia nurŝajna potenco fariĝu reala. Ŝajnas, ke ili ankaŭ rapide komprenis, ke ne ĉiuj fortoj kontraŭstarantaj la radikalan socitransformon, kiun ili mem komencis, estis en la alia tendaro. Cetere ekde la unuaj tagoj eksplodis konfliktoj inter la potenco «suspektinda, malluma, nepalpebla, sen precizaj taskoj kaj evidenta aŭtoritato» de la Komitatoj, laŭ la komunisto Jesús Hernández[19], kaj la kataluna Registaro. Ekzemple la interokazaĵo en *Figueras*, kie anarĥiistaj laboristoj, venkinte la militistojn, estis senarmigitaj de la Civilgvardio. La numero de *Solidaridad Obrera* de la 21-a de Julio, kiu priskribis la okazintaĵojn, finiĝis per ĉi tiu averto: «Kamaradoj, lasu senarmigi vin fare de neniu pro nenia preteksto»[20]. Sed la revolucia ondo jam estis tro forta, kaj tiuj, kiuj volis deteni, direkti, aŭ eĉ disrompi ĝin, estis devigataj fari cedojn. La malnovaj policaj korpusoj estis dissolvitaj: tiuj el ties anoj, kiuj luktis kune kun la popolo, aliĝis al la laboristaj volontarmeoj kaj adoptis la supertuton, kiu kelkfoje anstataŭis la uniformon.

La katalunaj laboristoj, kiuj strikis de la 18-a de Julio, komencis ekde ĉi tiu momento kion Markso nomis «la senposedigo de la senposedigantoj». Ili komencis alproprigi

---

18Citita de BROUÉ kaj TEMINE: *La révolution et la guerre d'Espagne* [france, La revolucio kaj la milito de Hispanujo]. *Editions de Minuit*, paĝo 43.

19HERNANDEZ, Jesús: *Negro y rojo* [Nigro kaj ruĝo]. Propaganda broŝuro de KPH. Paĝo 37.

20«*Solidaridad Obrera*» (Laborista Solidareco) de la 20-a de Julio 1936.

al si kaj memmastrumi la plejmulton de la industriaj kaj komercaj entreprenoj tiel, kiel la servojn de Katalunujo. Rimarkindas, ke ili tion faris spontanee, sen ordono kaj instrukcio de iu organizaĵo, eĉ ne de NKL. Ĉi tiu, dum la unuaj tagoj sekvantaj la ribelon, absolute pligravigis la lukton kontraŭ la militistoj, kaj tiurilate estis tute superata de siaj aktivuloj kaj de la homamasoj ĝenerale. La unua manifesto de IAF perradie dissendita la 26-an de Julio parolis pri la «faŝista hidro», sed ĝi diris eĉ ne unu vorton pri la socia revolucio, kiu estis disvolviĝanta. La 28-an la Urba Federacio de Sindikatoj de NKL ĵetis la ordonon reveni en la laborpostenon pro la militaj bezonoj, sed ĝi donis eĉ ne la plej minimuman revolucian instrukcion. Tamen la laboristoj ne kontentiĝis per la «reveno en la laborpostenon», tio estas, per la reestado laŭ la ordonoj de siaj mastroj. De la 21-a de Julio, tio estas, la tago sekvanta la venkon super la militistoj, la gazetaro pleniĝis per rakontoj tre rivelaj pri la nova «animostato» de la laboristoj; ĉie armitaj grupoj de laboristoj komencis la konfiskojn. Vestitaj per siaj supertutoj, ĉekole ruĝan aŭ ruĝan kaj nigran tukon, ĉekape ĉapon aŭ bereton, armitaj per tre malsimilaj armiloj, inter kiuj ĉefis la Maŭsera fusilo, kaj montrante iom da inklino por la elmontrado kaj spektaklo, ili ja estis la armita popolo aganta. Aro da laboristoj «sin prezentis ĉe la oficejo de la Tramvoja Kompanio de Barcelono konfiskante ĝin kaj la societan arĥivon pri la tramvojistoj, kiun la kompanio posedis, kaj bruligis ĝin mezstrate»[21]. Ĉiuj servoj kaj rimedoj de komunikado kaj transporto ĉi-maniere estis konfiskitaj de la katalunaj laboristoj. De la 21-a la fervojistoj alpropigis al si la fervojon. Ili organiziĝis kiel Revoluciaj Komitatoj kaj aranĝis la defendon de la stacidomoj fare de la fervojistoj mem armitaj de fusiloj kaj maŝinpafiloj. La konfiskmovado efikis

21PEIRATS: citita verko, 1-a volumo, paĝo 164.

sur ĉiujn katalunajn industrisektorojn: en Katalunujo estis konfiskitaj la 70% de la entreprenoj[22].
Memkompreneble ĉi tiu ondego devis efiki sur ĉiujn vivaspektojn. Ĝi estis la «granda revolucia festo», en kiu ĉiuj ligoj de submetiĝo, kiuj ajn estu, restis tempe rompitaj. Estas signifoplene, ke la politikistoj kaj ideologiistoj parolas nenion pri la ĝojo, kiu dum tiuj tagoj mastris la virojn kaj virinojn en la revolucia Katalunujo. Tamen tiu feliĉo, tiu freneza ĝojo (ankaŭ freneza, ĉar la faŝista danĝero estis terure ĉeestanta kaj la kadavroj estis apenaŭ ĵus enterigitaj) ege altiris la atenton de kelkaj atestantoj. Alveninte Barcelonon, F. Borkenau rakontis:

> «Tiam, kiam mi turnis la stratangulon de *Las Ramblas* (la ĉefa arterio de Barcelono), ŝprucis grandega surprizo: antaŭ niaj okuloj, kiel fulmo, manifestiĝis la revolucio. Estis io miriga. Kvazaŭ ni venintus en kontinenton malsimilan al kiu ajn el tiuj, kiujn ni povintus vidi antaŭe.»[23]
> «En ĉiuj domoj, sur ĉiuj muroj (li plu diras), sur ĉiuj vestoj, sur ĉiuj aŭtomobiloj, sur la trajnovagonoj, ĉie estas enskriboj kaj desegnaĵoj, kiuj simbolas la lukton kontraŭ la faŝismo kaj la volon de la revolucio. Foje ili estas aŭtentikaj pentraĵoj: laŭŝajne ĉefe la fervojistoj havas tre rimarkindan pentremon.»[24]

Sendube la fakto, ke la fervojistoj senbridigis sian «pentremon», ankaŭ estis signo pri la transformoj, kiuj estis okazantaj. Borkenau, kies politikaj opinioj estas «moderaj», sed kiu honeste rakontas tion, kion li vidas, substrekas: «En ĉi tiu atmosfero de ĝenerala entuziasmo oni povas paroli sen malfacileco kun kiu ajn. (...), kaj post minuto ĉiuj estas

22Vidu sube la 4-an ĉapitron: «La kolektivigoj en Katalunujo».
23BORKENAU, Frank: *The Spanish Cockpit* [angle, La hispana luktejo], estas hispana traduko, *Ruedo Ibérico*, Parizo, 1971, paĝo 69.
24Sama verko.

ĉies amikoj.»[25] Jes efektive tio estas, kion mi diris, la bariloj rompiĝis, la ŝtato dispeciĝis, la polico dissolviĝis, la mastroj forkuradis, la fabrikoj apartenis al la laboristoj, ĉio eblis! (tio ne daŭros.) Eĉ la situacio de la virinoj, kiuj dum jarcentoj estis katenitaj al la familio, al la edzo, al la kuirejo, al la naskado, ligitaj de religiaj kaj sociaj tabuoj ene de unu el la plej severaj kaj mallumaj mediteraneaj tradicioj, ŝajnas, ke ĝi subite aliiĝis: «... la stratoj pleniĝis de ekscititaj grupoj konsistigitaj de armitaj junuloj –plu diras Borkenau- kaj ankaŭ de ne malmultaj virinoj; ĉi tiuj kondutis per senĝeno ne kutima inter la hispaninoj, kiam ili sin prezentas antaŭ la publiko (antaŭ la ribelo estus nekoncepteble por hispanino vestiĝi per pantalono, kiel nun faras ĉiuj volontarmeaninoj senescepte)»[26]. Same oni povas paroli pri la junularo. Ĉi tiu, kiel sciite, estas la ĉefrolulo de la revolucioj. Tamen en Hispanujo la familia submetiĝo –malgraŭ la liberecana propagando– estis aparte malmola kaj subpremanta. La gefiloj devis obei siajn gepatrojn preskaŭ ĝis ĝiaj morto. La familia hierarĥio –oni ne forgesu, ke tiam Hispanujo estis esence kamparana lando – estis preskaŭ tiel nefleksebla ĉe la «maldekstraj» laboristoj, kiel ĉe la katolikaj kaj reakciaj familioj. Sed surstrate, en la fabrikoj kaj militfrontoj, la knaboj (iuj ankoraŭ neaĝantaj 16 jarojn) kaj la knabinoj, ekprenante la fusilon, ĝoje liberiĝis el la multjarcentaj tradicioj kaj el la «senviva pezo de la estinteco sur la cerbo de la vivuloj». Ĉu iun povas mirigi, ke la homamasoj per granda spontanea movado samtempe kaj samforte (kvankam ne ĉiuj tion plenkonsciis) alfrontis ĉiujn subpremadojn kaj ĉiujn hierarĥiajn strukturojn de la socio arbitre disigitajn kaj apartigitajn en tiuj privataj kaj iluziaj kampoj, kiujn ni nomas tion «politikan», tion «ekonomian», tion «socian», tion «familian» kaj, kial ne, tion «kulturan»?

---

25Sama verko.
26Sama verko.

George Orwell alvenis Barcelonon je Decembro 1936. Per sia bonega libro Omaĝo al Katalunujo, li rakontas la strangan impreson, kiun kaŭzis al li la urbo. Tamen li sciis (ĉar oni senĉese diris tion al li), ke de Julio la aferoj tre malpliboniĝis:

> «La anarĥiistoj ankoraŭ virtuale superregis Katalunujon, kaj la revolucio troviĝis je sia apogeo. (...) Estis la unua fojo, ke mi vizitis urbon regatan de la laborista klaso. Preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj de ioma graveco estis okupitaj de la laboristoj, kaj ties fasadojn kovris ruĝaj standardoj aŭ la ruĝa kaj nigra standardo de la anarĥiistoj; sur ĉiuj muroj oni vidis la martelon kaj la falĉileton kaj apude la komencajn literojn de la revoluciaj partioj; preskaŭ ĉiuj preĝejoj estis forrabitaj kaj ties figuroj bruligitaj, kaj kelkaj el ili estis sisteme malkonstruitaj de grupoj da laboristoj. Ĉiuj vendejoj kaj kafejoj elmontris afiŝon tekstantan, ke ili estis kolektivigitaj; eĉ la ŝupurigantoj estis kolektivigitaj kaj iliaj skatoloj farbitaj per ruĝo kaj nigro (...). La servutaj aŭ nure respektemaj esprimoj tempe malaperis. Neniu plu diris *señor* aŭ *don*, eĉ ne *usted*; ĉiuj traktis la ceterajn, kiel «kamaradon» kaj «*tú*» * (...). Ne plu estis privataj aŭtomobiloj, ĉiuj estis konfiskitaj, kaj ĉiuj tramveturiloj, taksioj kaj la plejmulto de la ceteraj publikaj transportoservoj estis farbitaj per ruĝo kaj nigro (...) Laŭlonge de *Las Ramblas*, la larĝa centra urboarterio, kie homaj alfluoj senĉese iris kaj reiris, laŭtparoliloj surdigis ĉiujn per revoluciaj kantoj dum la tuta tago kaj ĝis unuaj horoj de la nokto. Sed plej surpriza de ĉio estis la aspekto de la homamaso. Se oni prijuĝas ĝian eksteron,

*NeT: *'Don'* kaj *'señor'* (sinjoro) samsignifas, tamen *'don'* estas iom pli respektema. 'Usted' similas la esperantan 'vi' uzata anstataŭ 'ci'. *'Tú'* egalvaloras la esperantan 'ci'.

> Barcelono estis urbo, en kiu la monohavantaj klasoj ĉesis ekzisti. Krom eta kvanto da virinoj kaj fremduloj oni ne vidis homojn bone vestitajn. Preskaŭ ĉiuj surhavis tre simplajn vestojn, proprajn de la laborista klaso, aŭ blavan surtuton, aŭ ian variaĵon de la volontarmea uniformo. Ĉio tio estis stranga kaj impresa. (...) Super ĉio oni kredis je la revolucio kaj la estonteco, oni havis la senton subite esti enirinta en eraon de egaleco kaj libereco. La homoj klopodis por konduti kiel homoj kaj ne kiel dentaĵoj de la kapitalisma maŝino.»[27]

Li ankaŭ rakontis, ke la laboristaj organizaĵoj konfiskis multajn domojn kaj krome endas aldoni, ke dum pluraj monatoj (la daŭro dependas de la urboj) neniu pagis la doman luprezon, tiel efektivigante praktike la senpagecon de la loĝejo... Ankaŭ oni redonis sen kontraŭpago ĉiujn bazajn necesaĵojn deponitajn en la *Montes de Piedad*[**], kaj ne estas malfacile imagi kion tio signifis por loĝantaro, kiu preskaŭ ĉiam mizeris. Oni organizis lukton kontraŭ la malriĉeco kaj la almozpetado, kiuj tiel gravaj estis en Barcelono antaŭ la revolucio:

> «La sindikato pri gastejoj kaj restoracioj donis manĝaĵojn meztage kaj vespere al ĉiuj malriĉuloj. Por esti akceptita estis bezona, principe, rajtigilo de komitato aŭ organizaĵo, sed ni ne estas burokratoj!, oni donis manĝaĵojn eĉ al tiuj, kiuj havis neniun paperon. Tiujn manĝaĵojn oni disdonis en pluraj hoteloj, eĉ en la Ritz.»[28]

---

27ORWELL, George: *Homenaje a Cataluña* [angle, Omaĝo al Katalunujo]. Barcelono, Eldonejo *Ariel*, 1970. paĝoj 40-42 (Orwell ankaŭ ne malfruis seniluziiĝi.)

**NeT: bonfaraj institucioj, kie la malriĉuloj deponis siajn posedaĵojn kontraŭ mona alprunto.

28Sama verko.

Kiel asertas tre prave Noam Chomsky: «Dum la monatoj sekvantaj la ribelon de Franco, disvolviĝis ĉe Hispanujo senantaŭa socia revolucio. Obeante spontanean movadon sendependan de ĉiu “revolucia avangardo”, la laboristaj amasoj dediĉis sin efektivigi la radikalan transformon de la sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj: la entrepreno montriĝis esti granda sukceso ĝis la momento, kiam ĝi estis neniigita de la armiloj. »[29]

29CHOMSKY, Noam: *L'Amérique et ses nouveaŭ mandarins* [france, Usono kaj ĝiaj novaj mandarenoj]. *Editions du Seuil*, paĝo 257.

# 2-a ĈAPITRO: LA ŜTATO DISPECIGITA

> *«Ĝi ne estis revolucio kontraŭ specifa formo de ŝtata potenco: legitimista, konstitucia, respublika aŭ imperia. Ĝi estis revolucio kontraŭ la ŝtato mem, tiu supernatura monstro de la socio; ĝi estis la repreno por la popolo kaj fare de la popolo de ties propra socia vivo.»*
>
> *Karlo Markso: La enlanda milito en Francujo*

## LA KATALUNA REGISTARO KAJ LA POTENCO DE LA ARMITAJ LABORISTOJ

Katalunujo estis la unua regiono, kie la militistoj estis venkitaj, kaj ankaŭ estis tie, kie la «laborista potenco» firmiĝis plej forte. Jaume Miravitlles, iu el la gvidantoj de RMK, la respublikana partio de la katalunnaciista maldekstro, skribis:

> «La mardon 21-an dumnokte la situacio en Barcelono estis reale tragika. La armeo jam ne ekzistis. La organoj de la kataluna Registaro tute miksiĝis kun la luktanta popolo.»[30]

Efektive la policofortoj kaj la soldatoj restantaj «lojalaj» tute aliĝis al la laboristaj volontarmeoj. Kvankam la Registaro de Madrido proklamis, ke la ribelo estis venkita en Barcelono danke la «lojalecon» de la Civilgvardianoj kaj la Gvardianoj

30«*Vu*» (29-a de Aŭgusto 1936), citita de PRUDHOMMEAUX, A. kaj D.: *La Catalogne Libertaire* 1936-1937 [france, La liberecana Katalunujo 1936-1937]. *Cahiers Spartacus*.

de Sturmo, Companys siaflanke sciis kiel statis la aferoj: li gratulis «la fortojn, kiuj kuraĝe, heroe luktis por la respublikana leĝeco kaj por la civila aŭtoritato», sed li tre bone sciis, ke tio, kion vere faris tiuj fortoj, tiuj de la kataluna proletaro, estis senigi je ĉia efektiveco tiun leĝecon kaj tiun aŭtoritaton. Tial la 20-an de Julio, apenaŭ finiĝinta la barcelona batalo, li kunvokis en la palaco de la *Generalitat* la anarĥiistajn gvidantojn. Juan García Oliver, kiu formis parton de la anarĥiista delegitaro, rakontis la intervidiĝon:

> «La prezenta ceremonio estis mallonga. Ni ĉiuj sidiĝis kun la fusilo interkrure. Esence tio, kion Companys diris al ni, estis, kio sekvas:
> –Antaŭ ĉio mi devas diri, ke NKL kaj IAF neniam estis traktataj tiel, kiel ili meritis laŭ sia reala graveco. Vi ĉiam estis malmole persekutataj, kaj mi, kiu antaŭe estis kun vi[31], kun granda bedaŭro, sed devigata de la politikaj realaĵoj, poste esti devigata vin alfronti kaj persekuti.
> Hodiaŭ vi estas la mastroj de la urbo kaj de Katalunujo, ĉar nur vi venkis la faŝistajn militistojn, kaj mi esperas, ke vin ne ĝenos, ke ĉi-momente mi memorigis al vi, ke ne mankis al vi la helpo de la multaj aŭ malmultaj lojalaj homoj de mia partio kaj de la gvardianoj kaj *mossos d'esquadra*[*] (...). La vero tamen estas, ke kvankam malmole persekutataj ĝis antaŭhieraŭ, hodiaŭ vi venkis la militistojn kaj faŝistojn. Mi ne povas do, sciante kiel kaj kiuj vi estas, uzi alian lingvaĵon ol tiu de granda sincereco.

---

31Lluís Companys mulfoje defendis kiel advokato la anarĥiistojn arestitajn dum la periodo 1917-1923 en Barcelono, kie tiam sinsekve okazis strikoj, pafadoj kaj atencoj. Poste, kiam, mortinta Macià, li fariĝis RMK-estro kaj poste prezidanto de la kataluna Registaro, li kontraŭstaris politike –kaj multfoje malliberigis– tiujn aktivulojn mem, kiujn alitempe li defendis.

*NeT: katalune, M*ossos d'Esquadra*; hispane, *Mozos de Escuadra*; laŭvorte, Knaboj de Plotono. Polico de la kataluna aŭtonoma registaro.

> Vi venkis, kaj ĉio estas en viaj manoj; se vi ne bezonas aŭ ne volas min kiel prezidanton de Katalunujo, nun ĝin diru al mi, kaj mi estos plia soldato en la lukto kontraŭ la faŝismo. Se kontraŭe vi opinias, ke en ĉi tiu posteno, kiun nur morta mi forlasintus antaŭ la venkanta faŝismo, mi povas utili per la homoj de mia partio, mia nomo kaj prestiĝo al ĉi tiu lukto, kiu kvankam finiĝas hodiaŭ en la urbo, ni ne scias kiam nek kiel ĝi finiĝos en la cetera Hispanujo, vi povas kalkuli je mi kaj je mia lojaleco de homo kaj de politikisto, kiu estas konvinkita pri tio, ke hodiaŭ mortas tuta estinteco el hontigo kaj, kiu sincere deziras, ke Katalunujo marŝu ĉekape de la landoj plej antaŭenirantaj pri sociala afero.»[32]

Al ĉi tiu eble sinceraj, sed ĉiuokaze, lertaj vortoj, la anarĥiistaj delegitoj povintus respondi, ke la afero ne temis pri li, ke ili estis tute pretaj forgesi la plendojn, kiujn ili havus kontraŭ li, sed ke por «fini per unu fojo kaj por ĉiam tiun hontigan estintecon» endis radikale transformi la socion, detrui ĉiujn ties sociajn strukturojn kaj, ke la palaco de la *Generalitat* jam estis nenio krom malplena konstruaĵo, kiu apartenis al tiu morta estinteco kaj, ke nun la homamasoj mem devis findecidi la formojn kaj tipojn de sia propra regado, la memmastrumadon de la kataluna ekonomio fare de la laboristoj kaj la formojn kaj tipojn de sia nova vivo. Kaj ne forgesendas eĉ solan momenton la bezonon detrui la faŝismon ĉe la tuta duoninsulo. Sekve tio farenda estis cedi la parolon al la homamasoj, por ke ili decidu, anstataŭ decidi plian fojon anstataŭ ili pere de sekretaj kunvenoj pli-malpli konfidencaj «ĉe la pinto». Tiu devis esti la unua paŝo cele al tiu transformo, kiu ŝajnis bezona al ĉiuj.

---

32*Dans la tourmente. Un an de guerre en Espagne* [france, Ĉe la ŝtormo. Unu jaro de milito en Hispanujo]. Parizo, 1938. Propaganda broŝuro de ILA (Internacia Laborista Asocio).

Sed ne estis tiuj vortoj (tre anarĥiismaj tamen), kiujn elparolis la gvidantoj de NKL kaj IAF antaŭ Companys. García Oliver rimarkigas, ke tiam «Companys parolis per evidenta sincereco». Tio tre eblas, sed veras, ke tiu estis la sola lingvaĵo, kiun li povis uzi, se li volis, ke la anarĥiistoj faru koncedojn. Se tiuokaze Companys volintus trudi sian volon kaj al ili postuli severan disciplinon rilate la katalunan ŝtaton –tio estas, se li alparolintus ilin per la lingvaĵo de reganta Registaro–, ili sendube alfrontintus lin kaj la anarĥiistoj estis sufiĉe fortaj por «preni la tutan potencon». Sekve li estis devigata alvoki iliajn sentojn kaj la kontraŭfaŝisman unuiĝon, rekoni ilian gravecon, flati ilin, kaj gajni tempon, ĉirkaŭparoli, eviti la alfronton. Laŭŝajne surprizitaj de ĉi tiu «eminenta ago de digneco kaj komprenemo» (García Oliver), la anarĥiistoj akceptis «porti sur novan vojon» la katalunan Registaron kaj ties prezidanton.
Atinginte ilian akcepton, Companys rapide sin turnis al la esenca celo de la intervidiĝo: la politikaj kombinaĵoj. Li anoncis al la delegitoj de NKL-IAF, ke «en la apuda salono atendis la reprezentantoj de ĉiuj katalunaj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj, kaj ke, se ni konsentus, ke li kiel prezidanto de la kataluna Registaro kondukus nin ĉe ili, li farus proponon por havigi al Katalunujo novan organon por daŭrigi la revolucian lukton ĝis la atingo de la venko.»[33]
La NKL-IAF-aj reprezentantoj kunvenis en la apuda salono kun tiuj de RMK, Unuiĝo de Farmantoj[*], Respublikana Unuiĝo, LPMU kaj USPK. Kortuŝanta ĉi tiu kunveno de kontraŭfaŝisma unuiĝo se oni konsideras, ke post ne longe

33Sama verko.
**NeT: Unió de Rabassaires i Altres Cultivadors del Camp de Catalunya (katalune, Unuiĝo de Farmantoj kaj Aliaj Terkulturistoj de la Kamparo de Katalunujo) estis sindikato de ne posedantaj vitkulturistoj fondita en Katalunujo en 1922.*

aperos la kaŝaj konfliktoj, kiuj atingos sian apogeon en la sanga alfronto de majo 1937.

> «Companys klarigis al ni (rakontas García Oliver), ke konvenis starigi Komitaton pri Volontarmeoj, kies celo estu gvidi la tutan vivon de Katalunujo ĝisfunde malordigitan de la militista ribelo kaj, kiu klopodu por organizi la armitajn fortojn por lukti kontraŭ la faŝistoj kie ajn ili aperos, ĉar en tiu momento de nacia konfuzo oni ankoraŭ ne sciis la situacion de la ekzistantaj fortoj. »[34]

Tamen la NKL-IAF-aj delegitoj volis unue konsulti sian organizaĵon (oni rajtas sin demandi, kial ili decidis «porti sur novan vojon» la katalunan Registaron konsultinte neniun...). «Pleno de la Regiona Komitato» okazis tiun saman nokton en la «Domo de Cambó», kiu estis okupita de la Prikonstrua Sindikato. García Oliver estis, kiu eldiris la proponon de Companys pri la Centra Komitato pri Volontarmeoj. Laŭ li la situacio starigas al ili la jenan dilemon: endis elekti «inter la liberecana komunismo, kiu signifis la anarĥiistan diktatorecon, kaj la demokratio, kiu signifis la kunlaboron». Stranga kaj tamen signifoplena maniero prezenti la demandon: kontraŭstarante ĉiujn ideojn esprimitajn per tunoj da artikoloj kaj paroladoj, la liberecana komunismo, je la decida momento, transformiĝas en «anarĥiistan» diktatorecon, kaj NKL-IAF en politikajn organizaĵojn, kiuj laŭ ĉi tiu hipotezo posedintus tute solaj la potencon! Kiel perfekta monerodorso la kunlaboro kun la aliaj politikaj fortoj, la burĝaj respublikanaj aŭtoritatoj de Katalunujo ktp estis... la demokratio. Ŝajnas, ke neniu leviĝis por defendi la aliajn ĉi-momente eblajn demokratioformojn, konsilantarojn el elektitaj kaj eksigeblaj delegitoj, novan Komunumon finfine. La dilemo de García Oliver estis falsa dilemo, sed signifoplena pri la pensmaniero de la anarĥiistaj gvidantoj,

34Sama verko.

kiel pruvos ĝis la evidenteco la estontaj okazaĵoj. La Regiona Komitato de NKL-IAF akceptis la konfuzimplikitajn argumentojn de García Oliver kaj proklamis: «Neniom da liberecana komunismo. Unue endas detrui la malamikon kie ajn li estu.»[35]. Neniu faris al si la penon pruvi, ke tio enhavus iun ajn kontraŭdiron.
Ĉi tiel oni decidis starigi la Centran Komitaton pri Kontraŭfaŝismaj Volontarmeoj de Katalunujo. USPK kaj LPMU havis ĉiu po unu reprezentanton; IAF du (Santillán kaj Aurelio Fernández), NKL tri (García Oliver, Asens kaj Marcos Alcón) kaj ĜUL ankaŭ tri reprezentantojn, kio estis senproporcia al ties reala influo. Ŝajnas tamen, ke NKL-IAF, kiuj pledis por la reprezentado de ĜUL, dezirintus favori la sindikatojn «malfavore» al la partioj, kio estis absurdaĵo, ĉar estis la stalinistoj (la plej «porpartianoj» ekzistantaj), kiuj monopoligis ekde la unua momento la reprezentadon de ĜUL. Ankaŭ estis unu reprezentanto de la Unuiĝo de Farmantoj kaj kvar de la respublikanaj partioj (RMK kaj Respublikana Kataluna Agado). La kataluna Registaro estis reprezentata en la Komitato pri Volontarmeoj de delegita komisaro kaj krome estis kiu nomumis la militistan komandanton.

## KONTRAŬFAŜISMAJ ORGANIZAĴOJ REPREZENTITAJ EN LA KOMITATO PRI VOLONTARMEOJ

### La Unuiĝinta Socialista Partio de Katalunujo (USPK):

Je Julio 1936 la hispana komunista movado estis entute tre malforta. Ĝi apenaŭ nombris 30.000 anojn, kio estas ridinda rilate la socialistan aŭ anarĥiistan tendencojn.
En Katalunujo ekde la komenco de 1936 estis pretiĝanta la kunfandiĝo de du etaj socialistaj organizaĵoj, kiuj estis allogitaj de la stalinismo, kaj la Kataluna Federacio de la

35*«Solidaridad Obrera» (21-an de Julio 1936)*

Socialista Partio, gvidata de Rafel Vidiella, kiu rompis kun la Hispana Laborista Socialista Partio (HLSP). La du etaj organizaĵoj estis la Kataluna Proleta Partio (skismo de RMK) kaj la Socialista Unuiĝo de Katalunujo (saturita de naciismo), kies sekretario estis Joan Comorera. La intertraktoj kondukis je la 24-a de Julio 1936 al la starigo de la Unuiĝinta Socialista Partio de Katalunujo (USPK), gvidita de Comorera mem, pri kiu Borkenau diris, ke li reprezentis «politikan sintenon kompareblan kun la ekstrema dekstro de la germana socialdemokratio. Li ĉiam konsideris la lukton kontraŭ la anarĥiistoj, kiel la ĉefan celon de la socialista politiko en Hispanujo.»[36] USPK aliĝis al la Kominterno, kaj tiu sendis al ĝi delegiton, kiu sub la nomo «Petro» (kaŝnomo de Gëroe, la fama hungara stalinisto) fakte direktis la tutan aktivecon de la partio. La komunista gvidantino Dolores Ibarruri tiel difinas la politikon de USPK dum la unuaj tagoj de la revolucio:

> «De la komenco ĝi disvolvis ekstreme intensan aktivecon tiel kontraŭ la ribelintoj, kiel kontraŭ la LPMU-anoj kaj la anarĥiistoj, kiuj sin trudis per la teroro al la kataluna Registaro; kiuj alpropigis al si preskaŭ ĉiujn armilojn de la garnizono de Katalunujo tiel, kiel la fabrikojn; kiuj estis la stratmastroj kaj movis sin tra la kamparo estigante teroran kaj perfortan ondon, kiu paralizis la kamparanojn.»[37]

Malgraŭ la socialdemokrata deveno de la gvidantoj de la nova partio kaj ties nomo, ĝi havis neniun aŭtonomecon antaŭ la «naciaj instancoj». USPK, kvankam flatis la naciismajn inklinojn de la kataluna etburĝaro (kiu estis ĝia ĉefa klientaro), nur estis federacio de KPH, kiel ĉiuj ceteraj

36BORKENAU, F.: citita verko (paĝo 146 de la hispana eldono).
37IBARRURI, Dolores: *El único camino* [hispane, La nursola vojo]. Moskovo: Eldonoj en Fremdaj Lingvoj, paĝo 532.

kaj, kiel ĉiuj ceteraj, estis submetita al la Politika Komitato kaj memkompreneble al la Komunista Internacio (KI).

**La Laborista Partio de Marksista Unuiĝo (LPMU):**
La stalinistoj malamis LPMU-on, ĉar ĝi estis fondita ĉefe de disidentaj komunistoj, de «renegatoj», inter kiuj estis kelkaj el la plej konataj aktivuloj de la hispana komunismo, kiel Andrés Nin, Juan Andrade, Joaquim Maurín ktp.
La stalinistoj karakterizis LPMU-on, kiel trockiisman (aŭ pli precize kiel «trocki-faŝisman»), difino tre uzata de la «liberalaj» ĵurnalistoj kaj historiistoj ĝis la verko de Hugh Thomas. Fakte, kvankam Andrés Nin, ekssekretario de la Ruĝa Sindikata Internacio, Juan Andrade kaj aliaj estontaj gvidantoj de LPMU forlasis KPH-on por fondi la «Komunistan Maldekstron», sin bazinte sur tezoj de la trockiista opoziciularo, tamen ili rompis kun Trocki, kiam ĉi tiu ordonis al ili fari «enigismon» en la Socialistan Partion, por starigi ene de ĝi revolucian tendencon. Anstataŭ obei lin, ili decidis kunfandiĝi kun la Laborista kaj Kamparana Bloko (antikva kataluna federacio de KPH, kiu rompis kun ĉi tiu dum la superregado de la «maldekstrega» tendenco de KI, ĉefe ĉar ĝi ne konsentis pri la afero de la «ruĝaj sindikatoj» kaj la kataluna nacia demando), direktata de Joaquim Maurín. La Kataluna Komunista Partio, direktata de Jordi Arquer (kiu ĉiam sin tenis sendependa de KPH, ĉefe pro katalunnaciismo) unuiĝis kun ambaŭ organizaĵoj por fondi LPMU-on komence de 1936. Tamen pri iuj aferoj (ĉefe la kritiko kontraŭ la stalinismo) LPMU sintenis tre proksime al Trocki –sed ankaŭ al Marceau-Pivert* ekzemple.
LPMU ekzistis preskaŭ ekskluzive en Katalunujo. Je julio 1936 ĝi nombris ĉirkaŭ 3.000 anojn, sed ĝi plikreskis dum la

*NeT: franca profesoro, sindikatisto, socialista aktivulo kaj ĵurnalisto. Li estis dum la 1930-aj jaroj la gvidanto de la ĉefa revolucia tendenco ene de la Franca Sekcio de la Laborista Internacio

sekvantaj monatoj kaj atingis konsiderindan influon sur kelkaj katalunaj urboj kiel Ĝirono, Taragono kaj ĉefe Ilerdo. Kiam komenciĝis la revolucio, la gvidantaro de LPMU sendube estis tiu, kiu sintenis plej radikale koncerne la homamasan movadon:

> «La laboristoj, kamparanoj kaj maristoj luktas ne por defendi la malnovan burĝan Respublikon, kiu nenion donis al ili, sed por starigi la estontan reĝimon: la Respublikon de la Laboristoj. Tio –ili ĝin scias– malgraŭ la propagando de la partioj de la Popola Fronto, kiuj klopodas por ke la laboristaj volontarmeoj defendu la nunan konstitucion. Se, en Madrido, la laborista klaso, direktata de la Socialista Partio, ĜUL kaj la oficialaj komunistoj, ankoraŭ sekvas la ordonojn de la Popola Fronto, en Barcelono kontraŭe la kataluna Registaro nur estas oficiala fasado sen ia potenco (...). Sekve en Katalunujo ne ekzistas la tiel nomata "dueco da potencoj", la laborista klaso regas la tutan socion. Per la sindikatoj, la proletaro garantias la administradon de ĉiuj publikaj servoj kaj de multaj privataj entreprenoj. La ekleziularo kaj la reakciularo daŭre estas senposedigataj, la domojn de la riĉuloj kaj la monaĥejojn oni transformas en edukejojn aŭ kuracdomojn. Kreiĝas komitatoj en la entreprenoj kaj vilaĝoj, inter la maristoj kaj la respublikanaj trupoj. Nia LPMU, kiu faras ĉion, kion ĝi kapablas, por krei aliajn novajn kaj interligi ilin, konsideras tiujn komitatojn kiel la bazon mem de la ĝermanta laborista kaj kamparana Respubliko.»[38]

Bedaŭrinde, malgraŭ ĉi tiuj belaj vortoj, LPMU ne estis luktonta por tiu laborista aŭtonomeco, por tiuj «komitatoj de bazo», de kiuj ĉi tie ĝi fariĝas proparolanto, tute male ĝi

38*La révolution espagnole [france, La hispana revolucio] n-ro 1 (Setembron 1936).*

ĉiam klopodos –laŭeble– por foroferi ilin cele al iluziaj «interkonsentoj ĉe la pinto» inter burokrataroj. Se Trocki kaj ties partianoj (Félix Morrow kaj poste Pierre Broué) kondamnis LPMU-on, ĉar ĝi ne estis sufiĉe leninisma, la tuta historio de la malnova revolucia movado kun ĝiaj falsaj venkoj, aŭ plejĝuste dirite ĝiaj malvenkoj, de la rusa revolucio ĝis la kataluna revolucio, kondamnis ĝin, ĉar ĝi estis tro leninisma.

* * *

La socialista partio, tiel potenca en aliaj hispanaj regionoj, ne ekzistis en Katalunujo. La kataluna federacio de HLSP partoprenis en la fondo de USPK, kiel ni ĵus vidis. Unu el la kialoj de la malmulta influo de HLSP sur la industria Katalunujo eble estis ties jakobena centralizismo, kiu kontrastis la naciajn inklinojn de la katalunaj socialistoj. Ĉiel en Katalunujo okazis tiu kurioza fenomeno, pro kiu ĉiuj socialistaj tendencoj fine kunfandiĝis ĉu en USPK aŭ en LPMU, kaj tiel almenaŭ oficiale transformiĝis cŭ en stalinismajn komunistojn ene de la unua aŭ en kontraŭstalinismajn ene de la dua.
La anoj de LPMU kaj de USPK interluktis iun tempon por regi la etetan katalunan ĜUL-on (la NKL-a hegemonio estis grandega). Sed tre baldaŭ USPK fine regis ĝin kaj aliigis tiun sindikaton en rifuĝejon por la etburĝoj timigitaj de la revolucio, kaj al kiuj LPMU kompreneble ŝajnis tro ekstremisma.

**La Nacia Konfederacio de la Laboro (NKL) kaj la Ibera Anarĥiista Federacio (IAF):**

NKL, heredinto de la bakuninismaj movadoj de la Unua Internacio, estis fondita en *Barcelono* je la 30-a kaj 31-a de Oktobro kaj 1-a de Novembro 1910 de liberecanaj grupoj, ĉefe katalunaj, kaj okazigis sian unuan ordinaran kongreson je Setembro 1911 ankaŭ en Barcelono: «Nombrante pli ol 30.000 aliĝintoj ĝi organizis tutlandan ĝeneralan strikon por

protesti kontraŭ la milito en Maroko; la Registaro reagis elleĝigante ĝin post kruela subpremado.
Venĝe Manuel Pardiñas mortigis la ĉefministron José Canalejas (Novembron 1912) kaj alia anarĥiisto klopodis por mortigi Alfonson la Dektrian (Aprilon 1913)»[39]. Kiel komenco, tio estas sufiĉe bona...
Oni povas diri, ke NKL estas organizaĵo senegala en la tuta internacia laborista movado, ĉar ĝi estas la unusola anarĥiisma homamasa organizaĵo de la 20-a jarcento. Malkaŝe anarĥiisma kaj anarĥisindikatisma ĝi laŭjare tre baldaŭ nombris inter 500.000 kaj pli ol miliono da aliĝintoj je Julio 1936, sed je 1938 superis la du milionojn kaj duonon. NKL estis samtempe sindikato laŭ tradicia senco (kiu ekzemple organizis prisalajrajn kaj depostulantajn strikojn) kaj revolucia organizaĵo (kiu organizis ribelajn strikojn, atencojn, senproprigojn de bankoj ktp), ĝi havis abundan gazetaron, kiu krome estis multe legata, popularajn eldonejojn, klerigajn rondojn, noktajn kursojn por laboristoj ktp. Kiu ajn aktivulo de NKL povis plenumi kiun ajn socian, klerigan, sindikatan aŭ «politikan» aktivecon ene de la organizaĵo. La nursola afero, kiun li estis devigita fari ekster la organizaĵo, estis perlabori salajron, ĉar en NKL estis neniu pagata posteno krom tiu de ĝenerala sekretario (kaj tio ankaŭ estas senegalaĵo).
Je 1927, sub la diktatoreco de Primo de Rivera, sur strando de Oriento (dum kaŝa kunveno maskita kiel ekskurso) aro da hispanaj kaj portugalaj anarĥiistoj fondis IAF-on. Ĝia celo estis disvastigi kaj defendi la anarĥiisman teorian purecon en la sindikatoj de NKL, dum ĉi tiuj devis organizi la laboristojn por ke ili okupu sin pri la administrado de la socio. Oni multe pripaloris la «diktatorecon» efektivigatan de IAF super NKL, sed, kvankam la opinioj pri tio ankoraŭ nuntempe diferencas entre si, paroli pri diktatoreco ŝajnas

39*LORENZO, César M.: Les anarchistes espagnols et le pouvoir [france, La hispanaj anarĥiistoj kaj la potenco]. Editions du Seuil, paĝo 45.*

ne ĝuste al mi. La plursenceco de la rilatoj inter la organizaĵo «specifa» (por ne diri de «avangardo») kaj la homamasa organizaĵo ja kaŭzis problemojn kaj kreis konfliktojn (kaj ĉiam kreos ilin dum ekzistos tiaj rilatoj), sed tiuj neniel povos kompari sin kun la «normalaj» rilatoj de dependeco de la sindikato kun la partio (ekzemple la nuntempaj rilatoj inter KPH kaj CC.OO.*. IAF, kvankam havis regionajn kaj duoninsulajn komitatojn, fakte estis federacio de aŭtonomaj grupoj, kiuj fondiĝis preskaŭ ĉiam spontanee pro decido de kelke da anarĥiistoj, kiuj organiziĝis kiel grupo de IAF. La plej fama sendube estis tiu de Durruti, la fratoj Ascaso, García Oliver, Jover ktp, kiu nomiĝis «la solidaruloj». La fakto, ke pluraj influaj gvidantoj de NKL estis aktivuloj de IAF, kontribuis al la naskiĝo de la legendo pri la diktatoreco de ĉi tiu lasta. Tamen, se estis influo, tiu estis reciproka, kaj dum la revolucio de 1936 IAF kaj NKL, kiuj estis intime unuigitaj ekde la komenco (iliaj komencliteroj ĉiam aperis kune), fine fakte kunfandiĝis en sola movado, kio kompreneble ekzkluzivis nek la malamikecojn nek la tendencojn.

La perforteco de la sociaj luktoj dum la monarĥio, dum la diktatoreco de Primo de Rivera kaj eĉ dum la Respubliko, la longaj periodoj de kaŝagado, la senĉesaj armitaj alfrontoj kontraŭ la polico kaj la armeo, kontraŭ la dungbravulaĉoj de la «libera sindikato» –kreita de la kataluna mastraro je la 1920-aj jaroj– kaj poste la falangistoj, stampis ĝisfunde la spiriton de ĉi tiuj organizaĵoj. Tial ĉe ĉiu regiona komitato de NKL estis kaŝaga Defenda Komitato. Tiu Defenda Komitato surprenis la rektan agadon kaj devis esti preta por anstataŭi la Regionan Komitaton, okaze ĉi tiu estus arestita –kio ofte okazis. Multfoje la Defendan Komitaton konsistigis aktivuloj de IAF (sed ne ekskluzive, nek ĉiam). Tiel el «pridoktrina gardisto» IAF fariĝis «armita brako» de NKL, ne forlasante

**NeT: CC.OO., Comisiones Obreras (hispane: Laboristaj Komisionoj), unu el la ĉefaj nuntempaj sindikatoj en Hispanujo.*

pro tio la pridoktrinajn taskojn: ĝi publikigis siajn proprajn priteoriajn gazetojn –kiel «*Tierra y Libertad*»–, broŝurojn kaj librojn, organizis prelegojn ktp.
NKL kompreneble ankaŭ estis malcentraliza organizaĵo: la regionaj federacioj ĝuis grandan aŭtonomecon rilate la Nacian Komitaton. Samkiel en aliaj organizaĵoj la supera instanco principe stariĝis per la kongresoj. La Nacia Sekretario povis esti plurfoje reelektita, sed tio ne oftis, ĉar ili preferis renovigi kiel plej eble ofte la gvidantajn postenojn.
Alia neskribita, sed tre grava, aparteco de NKL estis la prestiĝo, kiun ĝuis kelkaj gvidantoj nomitaj «naturaj», ili havu aŭ ne respondecon en la organizaĵo. García Oliver ekzemple, kiu neniam estis nacia sekretario de NKL, estis pli aŭskultita kaj sekvita ol multaj naciaj sekretarioj.
Kun Durruti okazis same, kio al li «havigis» post lia morto la «profiton» de aŭtentika personeca kulto. Iuj el tiuj «naturaj» gvidantoj estis anoj de IAF, sed ne ĉiuj.
Ĝuste ĉi tiuj malcentralizaj kaj kontraŭburokratemaj organizaĵoj estis tiuj, kiuj, kontaktinte la revolucian realon kaj la gravajn publikajn respondecojn (ĉefe en Katalunujo), reproduktis per nekredebla rapideco la burokratan fenomenon: ĉiurilate la gvidanta kasto «malradikiĝinte» ignoris ne nur la liberecanajn principojn, sed, kio pli gravas, ankaŭ la homamasan revolucian agon, serĉante ĉiam kaj ĉie la kompromison, kiam ĝi estis reprezentita en la Registaroj (la kataluna kaj la centra), kaj serĉante ĉiam repartopreni en ili, kiam ĝi forestis[40].

**La katalunnaciistaj respublikanaj organizaĵoj:**
«RMK estis homamasa partio naskiĝinta je Aprilo 1931 el la kunfandiĝo de pluraj respublikanaj partioj kaj grupiĝoj de Katalunujo. Ĝi baziĝis sur la potenca kamparana sindikata movado: la “Unuiĝo de Farmantoj”. Ĝia inspiranto kaj

40Pri la NKL-a historio vidu la 4-an aneksaĵon.

instiganto, Lluís Companys alitempe ligita al Salvador Seguí[41], estis dum longa tempo advokato de NKL»[42]. Ni sufiĉe konsentus kun Broué kaj Temime, verkintoj de tiuj ĉi linioj, se oni nuancus la «homamasan» karakteron de RMK. Fakte la Unuiĝo de Farmantoj, kamparana, respublikana kaj katalunnaciista movado, konsistigis la ĉefan popolan subteno al RMK. Cetere la agado de RMK dum ĉiuj revoluciaj okazintaĵoj en Katalunujo sentigis sin preskaŭ nur pere de la kataluna Registaro kaj de la aliaj katalunaj registaraj kaj municipaj organoj. Veras, ke dum la jaroj antaŭantaj al la militista ribelo ĝi havis ioman popolan apogon pro siaj poraŭtonomecaj sintenoj kaj siaj atingoj tiucele. Lluís Companys, elektita prezidanto de la kataluna Registaro kaj de RMK, aperis kiel la apostolo de la kataluna aŭtonomeco. Tiu partio, kiu, kiel ni vidos, efike luktis por la leĝeco kaj la restarigado de la ŝtata potenco, havis reformismajn tendencojn ĉe la sociala kampo.
Rilate la rolon de la Respublikana Kataluna Agado, kiu estis eta partio, ŝajnas, ke ĝi estis pure ornama: ĝi nur aperas en la politikaj kombinaĵoj, kiel la Popola Fronto, kaj pro la kreo de la Komitato pri Volontarmeoj. Ekster tio ĝiajn spurojn oni trovas nenie dum la revoluciaj okazintaĵoj de Katalunujo, nek ĉe la militfronto, nek ĉe la postmilitfronto.

## PLURSENCECO DE LA CENTRA KOMITATO PRI VOLONTARMEOJ

Dum sia mallonga ekzisto –de la 23-a de Julio ĝis la 3-a de Oktobro 1936– la Centra Komitato pri Volontarmeoj estis samtempe grava aneksaĵo de la kataluna Registaro kaj ia komitato kunordiganta la stabojn de la kontraŭfaŝismaj

---

41*Salvador Seguí estis anarĥisindikatista aktivulo tre konata ĉe Katalunujo je la jarcentkomenco. Domfarbisto, li naskiĝis en Ilerdo (Katalunujo) je 1890 kaj estis mortigita je Marto 1923 de la pistolistoj de la Libera Sindikato, «flava» organizaĵo kreita de la kataluna mastraro. Li estis venĝata de Francisco Ascaso laŭ la plej pura stilo de la vakerfilmoj.*
42BROUE kaj TEMIME: citita verko, paĝo 36

organizaĵoj. Ĝia kreado fariĝis necesa –kiel implicite rivelis Companys– pro la karaktero kaj la forto de NKL-IAF.
La anarĥiistoj estis tiuj, kiuj faris preskaŭ ĉion en Katalunujo por fiaskigi la militistan ribelon, kaj ankaŭ kiuj havis preskaŭ la tutan «potencon». Estis danĝere lasi ilin solaj. Iel tiel endis engaĝi ilin en la respondecojn de la politika potenco kaj trudi al ili la kontraŭfaŝisman unuiĝon, kion ili cetere akceptis volonte. Tamen, ĉar ties kontraŭŝtata karaktero al ili malhelpis –dum kelkaj semajnoj– partopreni en iu Registaro, la plursenca kaj transira solvo de la Komitato pri Volontarmeoj komence estis la sola, kiu, respektante iliajn principojn, reale ligis ilin al la respondecoj de la registara potenco. Dum la revoluciaj momentoj la Potenco ĉiam estas devigata maski sin per la «laboristaj» falsbrilaĵoj.
Dum la unuaj semajnoj la potencoj de la Komitato estis ampleksaj, kaj la kataluna Registaro limiĝis aprobi ties decidojn (pro la tiama korelativeco de fortoj). Poste ambaŭ regantaj organoj, kiuj deziris esti la sola reprezentanto de ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj kaj kies funkcioj praktike interkonfuziĝis, malhelpis unu la alian. Unu el la du malmankis. Tial, kiam NKL-IAF flanklasis siajn famajn kontraŭŝtatajn principojn por partopreni en la Registaro, la Komitato pri Volontarmeoj transdonis ĉiujn siajn prerogativojn al la kataluna Registaro kaj malfondiĝis la 3-an de Oktobro. La 26-an de Setembro la anarĥiistoj partoprenis en la Konsilantaro de la kataluna Registaro kaj la 4-an Novembro en la Centra Registaro.
Kvankam ne ĉiuj konsentas kun la rakonto de García Oliver pri la origino de la Centra Komitato pri Volontarmeoj (efektive iuj asertas, ke la ideo devenis de la anarĥiistoj kaj, ke Companys akceptis kaj subtenis ĝin), kompreneble estas pri la rolo kaj karaktero de ĉi tiu Komitato, kie la diferencoj pligrandiĝas. La hispana KP laŭ sia historio pri la enlanda milito, sukoriĉa trolaŭdega biografiprovo, vidas je la kreado

de ĉi tiu komitato la mallumegan kaj diktatorecan influon de la anarĥiistoj sur Katalunujo:

> «Subite eniris en la salonon (la faman salonon, kie la reprezentantoj de la ceteraj organizaĵoj atendis la rezulton de la interparolado inter NKL-IAF kaj Companys [C.S.-M.]), grava aro da anarĥiistaj gvidantoj: García Oliver, Durruti, Vázquez, Santillán, Eroles, Portelas, kun kartuĉujoj kaj pistoloj kaj iuj kun fusiloj. Ili venis prezenti aŭtentikan ultimaton (...). Pere de García Oliver la anarĥiistoj postulis la kreadon de Centra Komitato pri Volontarmeoj de Katalunujo, kio samvaloris preni la tutan potencon. Ĝia rolo estis «direkti la revolucion», «elpurigi» la postmilitfronton kaj «organizi la sendon de volontarmeoj al Aragono». Ĉiuj burĝaj partioj «senkuraĝiĝis» kaj la reprezentantoj de ĜUL kaj USPK (kiu oficiale ne estos fondita ĝis la 24-a de Julio, sed kiu fakte ekzistis jam antaŭ kelkaj semajnoj [C.S.-M.]), praktike izolitaj, malmulte povis fari.»[43]

La konsisto de la komitato –kion mi klarigis supre– malkonfirmas tiun «trouzon de aŭtoritato» kaj tiun «prenon de la potenco» fare de la anarĥiistoj. La eteta USPK havis 4 reprezentantojn, tri apartenis al ĜUL, dume NKL-IAF, kun grandega plimulto en Katalunujo, havis kvin. Rimarkendas, ke ekde ĉi tiu momento kaj tre ofte estontece la gvidantoj de NKL-IAF, kiuj konsideris LPMU-on kaj USPK-on, kiel «aŭtoritatemajn marksistojn», kies familiaj kveleroj tre malmulte ilin interesis, donis preferon al la stalinistoj pro oportunismo. Ĉiuj ja sciis, ke la reprezentantoj de ĜUL estis gvidantoj de la ĝermanta USPK, tamen tiel je tiu ĝusta

43*Guerra y revolución en España, 1936-1939 [hispane, Milito kaj revolucio en Hispanujo, 1936-1939]. Moskvo: Eldonejo Progreso. (verko redaktita de kolektivo da KPH-anoj sub la direktado de Dolores Ibarruri). 2-a volumo, paĝoj 8-9.*

okazo, kiel je postaj aliaj okazoj, NKL-IAF insistis pri tio, ke la stalinistoj havu kvar delegitojn, dum LPMU havu nur unu. Tio ŝajnas nenormalaĵo eĉ el la vidpunkto de la politikaj kombinaĵoj, ĉar malgraŭ ĉiuj diferencoj LPMU estis multe pli proksima al NKL-IAF ol la stalinistoj.
Laŭ Companys kaj ties amikoj de RMK, la Komitato pri Volontarmeoj estis malpli granda malbono, transira organo, kiu povis garantii ordoŝajnon, organizi la sendon de volontarmeoj al la militfronto, kaj ankaŭ politika kompromiso pri unuiĝo de la kontraŭfaŝismaj fortoj. La burĝaj respublikanoj, kies celo estis restarigi la malnovan laŭleĝan povon, la katalunan Registaron kaj la municipajn konsilantarojn malutilante la revoluciajn laboristajn komitatojn, ĉiam fidis ĝian transiran karakteron.
Ene de plena deliro de identigo kun la rusa revolucio, la trockiistoj vidis en ĉi tiu Komitato pri Volontarmeoj la «laboristan Registaron de la laborista revolucio» ĉirkaŭ kiu, laŭ Félix Morrow, «estiĝis sennumeraj komitatoj de fabriko, kvartalo ktp.»[44]. Fakte la Komitato pri Volontarmeoj estis kreita ekster kaj super la sennumeraj komitatoj, kiujn starigis preskaŭ ĉiam spontanee la revolucia homamaso. La staboj de la politikaj kaj sindikataj organizaĵoj estis kiuj, solaj kaj sen iu kontrolo kaj partopreno de la laboristaj komitatoj, elektis la anojn de la Komitato pri Volontarmeoj. Pri ĉi tiu punkto endas rimarkigi, kaj endos reparoli pri tio, ke neniam iu elektis la anojn de la Komitato pri Volontarmeoj, samkiel neniam iu elektis la estontajn ministrojn (aŭ konsilantojn, kiel oni nomis ilin) de la kataluna Registaro; ĉiuj ili estis perfingre nomumitaj de la staboj de la politikaj organizaĵoj proporcie al… ties korelativeco de fortoj kaj ties kombinaĵoj. Tio ne estis la laborista demokratio, sed pli ĝuste la diktatoreco de la staboj de la laboristaj organizaĵoj.

---

44*MORROW, Félix: Revolution and Counter-Revolution in Spain [angle, Revolucio kaj kontraŭrevolucio en Hispanujo]. Novjorko: Pionner Publishers, 1938, paĝo 63.*

Por la gvidantoj de NKL-IAF, la Komitato pri Volontarmeoj estis la reala potenco, la kataluna Registaro estis por ili nur marioneta kvazaŭregistaro nursole destinata ne timigi la okcidentajn demokratiojn. Tio estas la sola kialo por ke ĝi plu daŭru. Kompreneble temis pri unuiga potenco laŭ la orientiĝo adoptita de la gvidantaj instancoj de la katalunaj anarĥiistoj. Jen kiel parolas Abad de Santillán pri la rolo de la Komitato pri Volontarmeoj:

> «La Komitato pri Volontarmeoj estis rekonata kiel la sola efektiva potenco de Katalunujo. La kataluna Registaro daŭre ekzistis kaj meritis nian respekton, sed la popolo nur obeis la potencon stariĝintan danke la venkon kaj la revolucion, ĉar la popola venko estis la socia kaj ekonomia revolucio (...)»

La prerogativoj de la Komitato estis tre ampleksaj:

> «Starigado de la revolucia ordo en la postmilitfronto, organizado de fortoj pli-malpli preparitaj por la milito, instruado de oficiroj, lernejo de transsendoj kaj signaloj, provizado kaj vestaro, ekonomia organizo, leĝdona kaj juĝa agado; la Komitato pri Volontarmeoj estis ĉio, prizorgis ĉion, la aliigon de la pacindustrioj en la militindustriojn, la propagandon, la rilatojn al la Madrida Registaro, la helpon al ĉiuj luktejoj, la rilatojn al Maroko, la kulturadon de la disponeblaj teroj, la sanservon, la vigladon super la marbordoj kaj landlimoj kaj milojn da la pli diversaj aferoj. Ni pagis la volontarmeanojn, ties familianojn, la vidvinojn de la luktintoj; unuvorte: kelkaj dekoj da individuoj prizorgis la aferojn, kiuj postulas de ajna Registaro multekostan burokrataron. La Komitato pri Volontarmeoj estis samtempe Primilita Ministrejo dum milita tempo, Ministrejo pri Internaj Aferoj kaj

> Ministrejo pri Eksteraj Rilatoj, inspirante similajn organojn ĉe la ekonomia kaj kleriga kampoj.»[45]

Sub la protekto de la Komitato pri Volontarmeoj kreiĝis serio da komisionoj aŭ subkomitatoj respondecaj pri konkretaj taskoj, kiel ekzemple la Komitato pri Provizado, kiu principe estis taskita administri la impostojn kaj la prezojn, la vendejojn kaj ĝenerale la tutan nutraĵan komercon kaj ankaŭ la provizadon de la militfrontaj volontarmeoj, de la «prikontrolaj patroloj» kaj de la loĝantaro (restoracioj, malsanulejoj ktp). «Ĝi estis konsistigata de delegitoj el la diversaj partioj kaj sindikatoj (3 de NKL: Valerio Mas, Facundo Roca kaj Juan José Domènech; 2 de IAF: Juanel kaj Manuel Villar; 3 de ĜUL, 1 de LPMU, 3 de RMK, 1 de la Unuiĝo de Farmantoj, 1 teknikisto). Fakte NKL-IAF estis tiu, kiu direktis la Komitaton, kaj kiu efektivigis la plejparton de la laboro; efektive, kvankam la prezidado –nure honora– falis sur la katalunnaciiston Pujol, Juan José Domènech plenumis la funkciojn de ĉiopova ĝenerala sekretario. En la barcelonaj antaŭurbaj kvartaloj kaj en ĉiuj katalunaj loĝlokoj formiĝis komisionoj dependantaj de la Centra Komitato pri Provizado.»[46]

Oni kreis ankaŭ la jam cititan Konsilantaron pri la Nova Unuiĝinta Lernejo, kiu, konsistigita de reprezentantoj de la sindikatoj kaj la universitato, iel havis la respondecon pri la entutaj problemoj de la instruado, inkluzive pri la modifo de la studprogramoj.

Rilate la «publikan ordon» kaj la «justicon» la aferoj kompreneble estis pli mallumegaj. La komenca ideo estis, ke endis eviti la trouzojn kaj perfortajn pagigojn, kiujn povintus fari proprainiciate kelkaj «neregeblaj» individuoj aŭ grupoj. Por tio –kiel ĉiam en la tuta historio, ne nur en la

---

45*ABAD DE SANTILLAN, Diego; Por qué perdimos la guerra [hispane, Kial ni malvenkis la militon]. Madrido: G. del Toro, 1975, paĝoj 79 kaj 91.*
46LORENZO, César M.: citita verko, paĝoj 114-115.

historio de la revolucioj–, kion oni faris, estis klopodi por «laŭleĝigi» la trouzojn kaj perfortajn pagigojn. La rezulto estis anticipe antaŭvidebla, ili ne estis evititaj, ne estis limigitaj, oni nur aldonigis al la individuaj venĝoj la «laŭleĝajn» ekzekutojn, kaj mi ne mencios la interorganizaĵajn venĝojn, pri kiuj mi havos okazon reparoli. Unuvorte: nur «diversigis» sin la subpremado, kiu efektiviĝis ne nur kontraŭ la faŝistoj, eĉ ne nur kontraŭ la suspektuloj pri tio.

Kiel mi jam rimarkigis, la policaj korpusoj (la CivilGvardio kaj la Gvardio de Sturmo) komence estis dissolvitaj kaj poste restarigitaj. La «prikontrolaj patroloj» sin okupis pri la «publika ordo» almenaŭ dum tiu periodo. Laŭ César M. Lorenzo, estis 700 homoj en la prikontrolaj patroloj en Barcelono (325 de NKL, 145 de ĜUL, 45 de LPMU, 185 de RMK):

> «...direktitaj de la Centra Komitato pri Patroloj, konsistigita de 11 delegitoj de sekcio (4 de NKL, 3 de ĜUL, 4 de RMK); la anarĥi-sindikatista José Asens estis la ĝenerala sekretario.»

Kiel oni vidas, la svarmis ĝeneralaj sekretarioj anarĥiistaj (!).

> «(...) Ili agadis kunordigitaj kun la Komisiono pri Esploro, kiu devenis de tiu pri sekureco de la Centra Komitato pri Volontarmeoj. Tiu komisiono, direktita de la anarĥiisto Aurelio Fernández, estis speco de sendependa ministerio pri internaj aferoj aŭ speco de servo pri revolucia sekureco (...).»

Tamen ekster la Komisiono pri Esploro ekzistis policaj fortoj organizitaj de ĉiu partio aŭ sindikata centralo, kiuj dependis nur de siaj respektivaj direktantaroj: estis la famaj «ĉokoj»*,

---

**NeT. Hispane: checa, nomo devenanta el Ĉ.K., komencaj literoj de la rusa nomo de la unua sovetia politika polico (ЧК - чрезвычáйная комúссия, Eksterordinara Komisiono)*

tiom timindaj, kun ties sekretaj agentoj, ties privataj karceroj, ties taĉmentoj. Tiu de NKL, sub ordonoj de Manuel Escorza, estis la plej grava kaj la plej perfektigita.»[47] (!?)

Estas sufiĉe ridinde vidi anarĥiistan simpatianton, kiel "César M. Lorenzo"-n, laŭdi la policon, krome la policon de la… «ĉokoj». Kvankam tio ne plaĉas al nia aŭtoro, tiu de NKL ne estis kiu faris «la plej bonan laboron», tio estas, ni parolu klare, kiu torturis kaj mortigis pli da homoj (el kiuj nur eta parto estis faŝistoj), sed ke tiuj estis –kiel ilia nomo jam indikas– la «ĉokoj» de la sovetiaj agentoj kaj de ties kunlaborantoj de KI kaj KPH. La stalinista teroro en Hispanujo senkompare estis tiu, kiu estis la plej bone organizita kaj la plej efika (en la «respublikana kampo», oni komprenas, ĉar en la «alia tendaro» la afero estis ankoraŭ pli malbona).

Tiuj, kiuj estis arestataj pro imagaj aŭ realaj akuzoj kaj, postvivis la diversajn «ĉokojn», la senkontrolajn ekzekutojn kaj aliajn promenadojn, renkontis, kiam ili alvenis la tribunalojn, ĝisfunde reformitan juran sistemon.

> «...Revoluciaj tribunaloj (instalitaj en la provincaj ĉefurboj: Taragono, Ĝirono kaj Ilerdo), kie interdiskutis la delegitoj de la sindikatoj kaj partioj. La Komitato pri Justico de Katalunujo kaj la Prijura Kabineto havis siajn sidejojn en Barcelono, tie superregis (?) la advokatoj Barriobero kaj Angel Samblancat, ambaŭ NKL-anoj. Tiuj organoj plenumis geedziĝojn kaj eksgeedziĝojn, findecidis civilajn aŭ komercajn juĝaferojn, persekutis spekulaciistojn kaj ŝakristojn, juĝis la ribelintojn, suspektatojn kaj senrespondeculojn ktp. Antaŭe oni akurate elpurigis la primalliberejan administrantaron, la juĝistaron kaj la tribunalojn, ĝisfunde renovigis ĉion kaj simpligis la procedurojn, nuligis aŭ detruis la juĝdosierojn

47Sama verko, paĝoj 115-116.

antaŭajn al la 19-a de Julio; finfine estis neniigitaj la prijuĝaj kostoj.»[48]

Broué kaj Temime al ni indikas la socian kaj politikan konsiston de la Revolucia Tribunalo de Ilerdo, kiu estis «tute konsistigita de laboristoj, unu trionon nomumis LPMU, unu trionon ĜUL kaj unu trionon NKL-IAF. La prezidanto Larroca –de NKL– kaj la prokuroro Pelegrín –de LPMU– estis fervojaj laboristoj»[49]. Ŝajnas, ke dum la unuaj semajnoj de la revolucio oni faris gravajn reformojn en la juĝa sistemo, tamen ili estis nuligitaj, kiel ĉio cetera, kiam venkis la kontraŭrevolucia restarigado de la ŝtato.

Kontraŭe al tio okazinta en aliaj revolucioj, la «Revoluciaj Tribunaloj» ne estis tiuj, kiuj dediĉis sin al la plej malbonaj trouzaĵoj de subpremado, kiu finfine estis tiel reakcia, kiel ĉiuj subpremadoj, sed pli ĝuste la paralelaj policoj de la partioj kaj ties mallumegaj «ĉokoj», kiuj multfoje preferis «malaperigi» siajn malliberulojn ol sendi ilin al tribunaloj, kiuj ĉu ne ĉiam sufiĉe inklinis al ties partia vidpunkto aŭ estis submetitaj al nepreciza kontrolo de la publika opinio (fremdlandaj observantoj ktp).

Tiusence estas tre simptome konstati, ke ĝenerale oni akuzis la «prikontrolajn patrolojn» aŭ la hipotezajn «neregeblulojn» pri tio, ke ili estis la solaj respondeculoj pri la trouzoj faritaj en Katalunujo. Nenion oni diris pri la kreskanta severeco de la tribunaloj ĉiam pli submetitaj al la politika regado de la Centra Registaro de 1937, kaj oni eĉ kuraĝis, kiel ni ĵus vidis, kanti laŭdojn al la «ĉokoj», al ties «sekretaj agentoj», al ties privataj karceroj kaj al ties taĉmentoj!

Finfine endas konsideri, ke la anstataŭigo de la malnovaj polickorpusoj per patroloj de armitaj laboristoj estas unu el la plej bazaj disponoj por la publika plibonigo kaj, ke estas

48Sama verko, paĝo 116.
49BROUÉ kaj TEMIME: citita verko, paĝo 123.

groteske kompari la perforton –eble blindan– de izolitaj grupoj, de «neregebluloj», kun la sistema kaj organizita subpremado, al kiu sin fordonis la politikaj organizaĵoj, ĉefe KPH.
En Katalunujo, kiel okazas en ĉiuj aŭtentikaj revolucioj, la unua impulso estis malfermi la malliberejojn tiel por la politikaj kiel por la komunjuraj malliberuloj. Poste, kiam ili plenpleniĝis denove, tio estis unu el la signoj –kaj ne la malplej grava– de la antaŭeniro de la kontraŭrevolucio. La subpremanta aparato –tribunaloj, policoj, malliberejoj, koncentrejoj, torturoj, ekzekutoj ktp– nur estas la plej kruda kaj rekta esprimo de la hierarĥio de la aŭtoritatemaj socioj dividitaj en gvidantoj kaj plenumantoj. Hierarĥio kaj subpremanta aparato estas, antaŭ jarcentoj, nedisigeble kunigitaj kaj sanktigitaj de valorsistemoj same hierarĥiaj.
Tamen, hodiaŭ kiel hieraŭ en Katalunujo kaj kie ajn, staras antaŭ ni la demando scii ĉu la revolucio signifas la instalon de bona hierarĥio (laborista ŝtato) kun ties bonaj koncentrejoj, ties bonaj ekzekutrotoj, ties bona torturo ktp, ĉu estas revolucia ĉio, kio ĝuste emas rompi la regulojn de la socia ludo, malfermi ĉiujn malliberejojn, neniigi ĉiun hierarĥion –kaj sekve ĉiun subpremadon. Ĉar kiuj ajn estu la historiaj nuancoj, la socia hierarĥio («maldekstra» aŭ «dekstra», «laborista» aŭ «burĝa») ĉiam estas fonto de subpremado, ekspluatado, alinenigo, kaj ne eblas deziri lukti kontraŭ ĉi tio kaj ne lukti ankaŭ kontraŭ tio.
Sekve oni povas diri –kaj des pli bone, se tio mirigas iujn–, ke estas preskaŭ indiferente scii, kiu estas en la malliberejo –ĉar finfine nur temas pri malliberuloj kaj tiuj gardantaj ilin, provosoj–, la malliberejo estas kio estas netolerebla. Mi ĉi tie nur parolas pri la politika subpremado laŭ ties plej rekta senco, sed evidentas, ke la hierarĥio kaj ties subpremanta sekvo troviĝas tiel en la entuta socio, kiel en ĉiu socia parto konsistiganta ĝin, de la familia ĉelo ĝis la industria entrepreno, inkluzive la «avangardaj» partioj, kiuj, ĉar ili

estas hierarĥiaj, estas ne koncepteblaj sen sia subpremanta aparato, sen siaj kontrolaj kaj disciplinaj komisionoj, sen siaj policistoj kaj fidenuncistoj, sen sia ritaro el forpeloj kaj procesoj foje realaj (partioj ĉe la potenco) foje simboligaj: la forpelito malaperas, lia nomo, lia fotografaĵo malaperas de la trolaŭdegaj libroj ktp.
La persisto de la subpremaj aparatoj en Katalunujo bone pruvas interalie la persiston de la subpremaj hierarĥiaj strukturoj kontraŭ kiuj tamen la homamasoj ekigis mortolukton –komence ne sen sukceso. Kompreneble tiu subpremado praktike havis neniun realan efikon «sur la revolucidefendo» nek sur la lukto kontraŭ la «maskataj faŝistoj». La kapitalisma sistemo estis dispecigita de la spontanea ago de la homamasoj; la burĝoj, kiuj estis politike malamikaj al ili, ĉu forkuris aŭ rifuĝis en la kontraŭfaŝismaj organizaĵoj, kiuj volis akcepti ilin –en Katalunujo ĉefe ĜUL.
Escepte de iomaj centoj da falangistoj kaj frankistoj arestitaj aŭ mortpafitaj, la subpremado ĉefe efektiviĝis sur iuj kompatindaj uloj de «dekstro» aŭ sur iuj, kiuj «multe ĉeestis la meson», kiuj kompreneble signifis nenian danĝeron, kaj poste ĝi pliampleksiĝis kaj atingis sian plenreakcian sencon per la subpremado kontraŭ revoluciuloj aŭ kontraŭ aktivuloj de kontraŭaj organizaĵoj (spegulo de la lukto de la politikaj burokrataroj por la potenckonkero). La plej efikaj, ni ripetu ĝin, estis la hispanaj stalinistoj gvidataj de sovetiaj konsilantoj, kiuj kruelis kontraŭ LPMU kaj iu anarĥiista sektoro. Kiel ni vidos, oni atingis la virtuozecon. La subpremado ĉiam estas la esprimo de la reakcio, kiuj ajn estu la politika koloro aŭ la sociaj interesoj de tia reakcio[50].

50Tial estas aparte ridinde, pro tio groteska, konstati kiel eĉ nuntempe preskaŭ ĉiuj grupetoj karakterizantaj sin, kiel kontraŭaŭtoritemajn, volupte sin dediĉas al la ŝajnigo (ĉar ili ne povas fari aliaĵon) de la subpremado. La ritaro de la forpeloj, kiu estas la ŝajnigo de la «revoluciaj tribunaloj», la «batadoj», ŝajnigo de la ekzekutoj, kaj ni ne parolu pri la karceroj kaj tribunaloj de la popolo aŭ pri la organizo de la «ordoservoj», ĉiam pli militistigitaj, kiuj batas aŭ ne batas laŭ ordono kiel ajna polico, kun kiu ili kundividas la «ordotenadon»; la tuta

Tiel ĉekampe de la «publika ordo», kiel ĉekampe de la «justico», la politika potenco de la Centra Komitato pri Volontarmeoj estis malhelpita de serio da konkretaj potencoj de senfina varieco. En ĉiuj katalunaj urboj kaj vilaĝoj la malnovaj municipaj konsilantaroj estis ignoritaj aŭ simple eksigitaj kaj anstataŭigitaj de Revoluciaj Komitatoj. Tiuj siavice estis ĝenerale konsistigitaj surbaze de la kontraŭfaŝisma unuiĝo. Ĉiu revolucia komitato de ĉiu urbo aŭ vilaĝo estis aparta okazaĵo. Tiel, kvankam komence ili konsistis el delegitoj de la loĝantaro –balotitaj kaj eksigeblaj–, fakte preskaŭ neniam okazis aŭtentikaj balotadoj. Foje tiaj balotadoj realiĝis nursole ene de kelkaj organizaĵoj por scii, kiuj devis reprezenti la organizaĵon en la Revolucia Komitato. Ĉar, kiel en preskaŭ ĉiuj komitatoj, balotitaj aŭ ne, de «bazo» aŭ ne, la delegitoj fakte reprezentis ne la tuton –aŭ la plimulton– de urbo aŭ vilaĝo (aŭ entrepreno okaze de la administraj komitatoj), sed ke ili reprezentis tiun aŭ tiun alian organizaĵon en tiu aŭ tiu alia revolucia komitato. Mi ree parolos pri la monopolo de la organizaĵoj super la tuta politika kaj socia vivo (kaj eĉ super la ĉiutaga vivo) en Katalunujo. Ekstere de organizaĵo individuo ne ekzistis.

La revoluciaj komitatoj de la katalunaj urboj kaj vilaĝoj fakte ĝuis grandan aŭtonomecon rilate la Centran Komitaton pri Volontarmeoj. Ili volis mastri sin mem kaj preskaŭ ĉiam sukcesis. Krom tiu loka aŭ regiona aŭtonomeco ankaŭ estis la aŭtonomeco de ĉiu organizaĵo rilate la Centran Komitaton. La anarĥiistoj obeis la ordonojn de la Komitato pri Volontarmeoj, kiam NKL-IAF petis tion al ili, nome ili obeis sian organizaĵon –kaj ne ĉiam.

---

subprema armilaro, kiu ĉiam obeas moralan ordon (eĉ aŭ ĉefe kiam tiu morala ordo pretendas esti revolucia), pruvas ĝis la evidenteco la persiston de la subprema hierarĥio en la organizaj strukturoj kaj la cerbo de la aktivuloj, tiuj monaĥoj-soldatoj de la modernaj tempoj.

Same okazis rilate la aliajn partiojn. Pri la grandioza spontanea movado de la kolektivigoj, la Komitato pri Volontarmeoj, kiel ĉiuj potencorganoj kaj staboj de ĉiuj organizaĵoj, limiĝis konstati mirigita ties amplekson antaŭ ol klopodi por direkti kaj submeti ĝin.
Laŭ mia opinio la Komitato pri Volontarmeoj ne estis la «laborista Registaro de la laborista revolucio», ankaŭ ne originala kaj nedeterminita formo de «revolucia potenco». Antaŭ ĉio ĝi plenumis transiran rolon, kiu havigis ian provizorecon iom improvizan ĝis la reveno de la «laŭleĝa» potenco de la kataluna Registaro, kiu siaflanke estis delegado de la centra respublika povo.

**LA BURĜA-STALINA INTERLIGO**

USPK okupas apartan lokon en la kontraŭfaŝisma interligo. Efektive, se la anoj de NKL-IAF kaj de LPMU pensis, ke ili defendis la revolucion kunlaborante kun la kataluna Registaro, la gvidantoj de USPK siaflanke estis firme deciditaj subteni la kataluna Registaro kontraŭ la revolucio.
Kiel kompensilo de la Laboristaj Volontarmeoj, Comorera proponis al Companys la fondon de «Volontarmeoj de la kataluna Registaro», sed la burĝaj politikistoj pensis, ke pli gravis unue redoni al la kataluna Registaro la tutan regantan aŭtoritaton. La 2-an de Aŭgusto Casanovas, de RMK, faris provon ĉi-rilate helpita de la stalinistoj. Li enpotencigis Registaron de «popola fronto», kiu inkluzivis tri reprezentantojn de USPK: Comorera, ministro pri ekonomio, Ruiz, ministro pri Provizado kaj Vidiella, ministro pri komunikiloj. Tio estas, tri sektoroj, en kiuj estis firmiĝinta tiu aŭtonomeco, kiun ili okupis sin likvidi.
Sed NKL-IAF vigle reagis, ĉar ĝi rigardis tiun operacion, kiel manovron kontraŭ la Komitato pri Volontarmeoj kaj kontraŭ si mem:

> «Dum okazis la unua kunveno de la kataluna Registaro de la Popola Fronto, sin prezentis en la Palaco de la *Generalitat* delegitaro de la Komitato pri Volontarmeoj de IAF kun la sekvanta ultimato: ĉu la Registaro tuj dissolviĝas aŭ la Komitato pri Volontarmeoj alprenas la potencon.»[51]

La Registaro estis devigata memdissolviĝi la 8-an de Aŭgusto, sed, kiel poste skribis la komunista gvidantino Dolores Ibarruri: «Oni faris la unuan paŝon por disrompi la anarĥi-trockiistan premon.»[52]

Dum ĝi atendis por povi rekte ataki la anarĥiistojn kaj la LPMU-anojn kaj, preter ĉiuj ili, la revoluciajn konkerojn, USPK klopodis por disvastigi sian influon, iĝante la defendanto de la interesoj de la eta kaj meza burĝaro. Rapide ĝi okupis sin pri la regiona (kataluna) sekcio de ĜUL, kiu antaŭe havis malmultan influon. Kontraŭ NKL, la kataluna ĜUL, kiu agadis sendepende de la Nacia Registaro regata de Largo Caballero, ĵetis la devizon: «Defendi la propraĵon de la eta industriulo». La kataluna sekcio havis tre malmultan influon sur la proletaron; ĉefe aliĝis al ĝi iuj bankistoj kaj alta procento de ŝtat- kaj municip-oficistoj. Iomajn tagojn post la venko super la militistoj, ACKKI, la centra sindikato de la oficistoj de la privata medio, rifuĝis en ĜUL. La procento de la «blankaj kolumoj»* ankoraŭ pli grandiĝis, kiam oni dekretis la devigan «sindikataliĝon» de ĉiuj oficistoj, ĉar la plejmulto alfluis al ĜUL pli akordanta kun iliaj interesoj –opiniis ili– ol NKL.

Aliflanke la stalinistoj rapide organizis alian sindikaton ankaŭ aliĝintan al ĜUL, GKEKI (Kataluna Federacio de

---

51IBARRURI, Dolores: citita verko, paĝoj 532-533.

52Sama verko.

*NeT: salajra profesiulo aŭ laboristo iom kulturita, kiu realigas taskojn duonprofesiajn aŭ profesiajn de oficejo, administrado kaj kunordigo de vendoj, kontraste kun laboristo de blua kolumo, kies profesio postulas manlaboron kaj laboras en fabrikoj aŭ manlaborejoj.

Gildoj kaj Korporacioj de la Etaj Komercistoj kaj Industriuloj), kiu volis defendi la interesojn de la 18.000 komercistoj, metiistoj kaj etaj industriuloj kontraŭaj al la kolektivigoj. Tiel la katalunaj stalinistoj asociiĝis kun RMK kaj sin subtenis per la mezaj klasoj timigitaj de la revolucio, klopodante por aliigi la revolucian lukton kontraŭ la faŝistoj en defendon de la respublika leĝeco kaj de la burĝa ordo, bazante sin sur ĉio konservativa restanta en la lando, por neniigi la sociajn transformojn, kiuj estis efektiviĝantaj.
Dum la burĝa-stalinista interligo ne restarigis la potencon de la kataluna Registaro, la Komitato pri Volontarmeoj ne tro malkaŝe kontraŭstaris la homamasan iniciaton, sed ĝi ankaŭ ne faris ion por bremsi la progresantan revolucion. Kontraŭe la revoluciaj organizaĵoj (NKL-IAF kaj LPMU) penetris ĉiam pli en la vojon de la kunlaboro kun la burĝaro submaske de la kontraŭfaŝisma unuiĝo. Tiele la Konsilantaro pri Ekonomio, kiu estis konsistiga (alifoje) de ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj, kaj kiu estis kreita la 11-an de Aŭgusto kaj laŭleĝigita du tagojn poste, adoptis kiel celon la reguligon de la «problemoj starigitaj de tio, ke la laboristoj surprenas gravan sektoron de la kataluna ekonomio»[53]. Tio, se oni parolas klare, signifas novan provon fare de la staboj por forpreni la administradiniciaton de la laboristoj. Vere la «programo» de tiu Konsilantaro estis sufiĉe radikala (vidu la 4-an ĉapitron pri la kolektivigoj), tamen dum aŭgusto 1936 tio ne povis alimaniere okazi sub la risko malkaŝe ekkonflikti kun la ĉefroluloj de la kolektivigoj: la amaso de la laboristoj.
Momente la ofensivo kontraŭ la laborista aŭtonomeco kun ties paroladoj, sekretoj kaj manovroj post la kulisoj ofte estis senefikaj.
La 9-an de Setembro publikiĝis «dekreto», per kiu la kataluna Registaro ekadministris la tutan minan, industrian

53«*La Révolution espagnole*», n-ro 1 (Setembron 1936)

kaj manufakturan produktadon kaj ankaŭ la importadon de «plumbo». Sed por ke ĉi tiu dekreto povu esti efektiva – kaj por ke la kataluna Registaro reale reregu- nepros, ke Companys efektivigu tiun operacion (pretigitan kun USPK), kiu jam fiaskis komence de Aŭgusto: la starigadon de «popolfronta Registaro», tio estas, la restarigadon de la potenco de la kataluna Registaro subtenatan de ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj. NKL-IAF kaj LPMU, kiuj malebligis la unuan provon tiucele, la Registaron Casanovas de la 2-a aŭgusto (sendube ĉar ili ne estis reprezentitaj en tiu kombinaĵo), tiuokaze estis pretaj akcepti tian interligan Registaron (kondiĉe memkompreneble partopreni en ĝi).
Sekve la 26-an de Setembro enpontenciĝis nova Registaro, en kiu estis reprezentitaj ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj: 3 anoj de RMK: Tarradellas (Financo), Ayguadè (Sekureco) kaj Gassol (Kulturo); 3 anarĥiistoj: Fàbregas (Ekonomio), Domènech (Provizado) kaj Birlán (Sanservo); 2 komunistoj: Comorera (Publikaj Servoj) kaj Valdés (Laboro); 1 de la Unuiĝo de Farmantoj: Calvet (Terkulturo); 1 ano de LPMU: Nin (Justico); 1 ano de Kataluna Agado: Closas (senposteno) kaj la leŭtenanto kolonelo Sandino en Milito: la programo de ĉi tiu Registaro estis «la maksimuma koncentriĝo pri la penado por venki la militon, akceptante iun ajn rimedon, kiu povas kontribui al rapida venko»[54] Jam travidebliĝis la falsa elekto, kiu poste tiel grave rolos, inter revolucio kaj milito.
Kiel skribis la respublikana juristo Ossorio y Gallardo, biografo de Companys:

> «La kataluna Registaro ankoraŭ estis pure formala institucio, tamen Companys, kiu rekonis la rajton de

54Citita de RABASSAIRE, H.: *Espagne, creuset politique* [france, Hispanujo, *politika vojkruciĝo]. Parizo: Editions Fustier, 1938 (estas hispana traduko. Eldonejo Proyección, Bonaero)*

> la laboristoj regi kaj, kiu eĉ proponis al ili forlasi sian postenon, manipulis la aferon per tia lerteco, ke iom post iom li sukcesis restarigi la legitimajn organojn de la Potenco, transdoni la agadon al la konsilantoj kaj limigi la laboristajn organojn al ties rolo de asistantoj, helpantoj kaj plenumantoj. Post kvar aŭ kvin monatoj la situacio estis renormaligita.»[55]

Estas tute klare: la «normala situacio» estas tio, ke Registaro regu, kaj, ke la laboristaj organizaĵoj estu la plenumantoj kaj helpantoj de ĝi.

Ĉar ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj jam estis reprezentitaj en la kataluna Registaro, la provizoreco de la Komitato pri Volontarmeoj alproksimiĝis al sia fino. La 3-an de Oktobro oni publikigis dekreton, kiu «malfondis la Centran Komitaton pri Kontraŭfaŝismaj Volontarmeoj». Tiun sekvis aliaj dekretoj same signifoplenaj:

> «11-an de Oktobro: dekreto, per kiu oni ordonas la malfondon de ĉiuj lokaj komitatoj starigitaj sur la tuta Katalunujo, kiuj malhelpis kaj malebligis la registaran agadon. Tiun dekreton akompanis alia de la Departemento pri Interna Sekureco, per kiu estis fiksita tempolimo por plenumi la enoficigon de la novaj municipaj konsilantaroj sur la tuta Katalunujo. La lokaj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj devis nomumi la novajn konsilantojn laŭ la sama proporcio, kiu ekzistis en la Konsilantaro de la kataluna Registaro.
>
> 27-an de Oktobro: dekreto, per kiu oni ordonas la redonon de la longaj armiloj (fusiloj kaj maŝinpafiloj).
>
> 28-an de Oktobro: dekreto, per kiu oni militistigas la volontarmeojn. En ĉi tiu dekreto tekstas, ke la Konsilantaro de la kataluna Registaro ekzamenis novan kodon pri militista juro, sed ke, dum oni

55OSSORIO Y GALLARDO: citita verko, paĝo 176.

> atendas ties aprobon, la volontarmeoj estos submetitaj al la nune valida kodo pri militista juro. »[56]

Kiel videblas, la kataluna Registaro ne perdis la tempon klopodi por restarigi «la aferojn laŭorde». NKL-IAF kaj LPMU, reprezentitaj en la kataluna Registaro, akceptis kaj aprobis tiujn disponojn. Tiel oni povas legi en «*La Batalla*» de la 28-a Oktobro 1936, sen komentoj, la tekston de la dekreto pri senarmiigo de la laboristoj kaj kamparanoj:

> «1-a artikolo: Ĉiuj longaj armiloj (t.e. la fusiloj, la maŝinpafiloj ktp), kiuj estas en posedo de la civitanoj, devos esti transdonitaj al la municipoj aŭ forprenitaj de tiuj, je la tempolimo de ok tagoj post la publikigo de ĉi tiu dekreto. Tiujn armilojn oni devas deponi en la ĝeneralaj kazernoj de artilerio kaj en la Ministrejo pri Defendo de Barcelono por helpi la militfrontbezonojn.
> 2-a Artikolo: Tiujn, kiuj ankoraŭ posedas tiajn armilojn post la tempolimo, oni konsideros faŝistoj kaj ili estos juĝitaj per la severeco, kiun meritas ties konduto.»

* * *

Mi volonte amplekse traktas la rolon de la Centra Komitato pri Volontarmeoj pro la interpretoj, kiujn ĉi-rilate faris la diverstendencaj ideologiistoj de la «laborista movado». En ĉi tiu okazo, kiel en aliaj, niaj teoriistoj strebas al la senfrukta serĉado de la loko, kie loĝis la bona potenco. Laŭ iuj –burĝoj kaj stalinistoj, alifoje miksitaj– la «bona potenco» estis en la kataluna Registaro, kiu reprezentis la respublikan legitimecon, kaj kies politiko respondis la karakteron de la okazanta milito: milito por la defendo de la demokratiaj institucioj de la Respubliko, minacataj de la faŝista atako.

---

56MARTIN, J.-G.: *La transformation politique et sociale de la Catalogne* [france, La politika kaj socia transformo de Katalunujo]

Laŭ aliuloj, nome finfine laŭ la nostalgiemuloj kaj arkivistoj pri la «bona revolucia tradicio», estis en la Komitato pri Volontarmeoj, kie kuŝis dum tro mallonga tempospaco la «bona revolucia potenco» (se ĝi ne daŭris, ĉu eble tio okazis pro la eterna demando pri la «revolucia direktantaro»?). Laŭ tiuj lastaj ne plifortigi (kiom?) la Komitaton pri Volontarmeoj estis perfido, la akcepto de ties malfondo kaj ties fakta integriĝo en la katalunan Registaron estis abdiko. Sur la forlaso de tiu «bona potenco» kuŝas la fiasko de la revolucio.
Laŭ ĉiuj «marksismaj-leninismaj» ideologiistoj, la demando pri la potenco resumas ĉion. Kiu estas la «klasa enhavo» de la potenco? Kiu klaso estas ĉe la potenco? Tie estas ĉio. La respondo tamen estas tre simpla: ĉiu klaso ĉe la potenco estas ekspluatanta klaso, ĉu ties vestoj estu «burĝaj» aŭ «proletaj». La socia deveno de la kamaradoj ministroj kaj de la politika-ŝtata burokrataro modifas nenion pri la demando, ĉar la laboristoj siavice daŭre estas katenigitaj de sia alieniga laboro kaj kondamnitaj al la rolo de nuraj plenumantoj.[57]
Kompreneble oni ne riproĉas al la Komitato pri Volontarmeoj, ke ĝi ne estiĝis el ia «demokratia balotilelnombrado». Pro la situacio de Katalunujo dum Julio 1936, se oni konsideras ĉion, estis normale, ke laboristaj gvidantoj prenis tiajn iniciatojn. La Komitato pri Volontarmeoj adoptis disponojn, kiuj estis utilaj kaj bezonaj dum la unuaj tagoj post la venko super la militistoj. Sed la iniciato de la homamaso, la utilaj kaj bezonaj disponoj, kiujn ĉi tiu improvizis, estis multe pli progresemaj kaj havis multe pli ambiciajn celojn laŭ ĉiuj vidpunktoj ol tiuj de la staboj de la laboristaj kaj kontraŭfaŝistaj organizaĵoj, kiuj dum mallonga tempospaco estis kunigitaj en la Komitato pri Volontarmeoj.

---

57Pri ĉi tiu koncepto pri la Potenco vidu la 5-an aneksaĵon.

Finfine tio estas, kio laŭ mi, pli gravas. Estas en la spontanea movado de la homamaso, kie vivis la revolucio, ne en la Komitato pri Volontarmeoj nek poste en la kataluna Registaro. La Komitato pri Volontarmeoj restis tre malantaŭe de la reala movado, kiun ĝi klopodis por regi, direkti, kaj unuvorte bremsi. Inter ĝiaj aktivecoj, de Julio ĝis la 3-a de Oktobro, kaj tiuj de la kataluna Registaro, dum la sekvantaj monatoj, estas neniu rompo. Ambaŭ, kiel organoj de la potenco, lokis sin antaŭ la homamasa movado sammaniere: de ekstere kaj super ĝi, samtempe.
En la Katalunujo de Julio-Aŭgusto 1936 la ŝtato estis dispecigita, diserigita je mil potencoj. Ĉiuj politikaj kaj sindikataj burokrataroj sentis la danĝeron, ili estis «ekster la ludo», ili estis baldaŭ senutiliĝontaj. Ili interkonsentis ree krei centralizan Potencon (dum ili interbatalis por regi ĝin) kaj rekonstrui la hierarĥian piramidon ĉe la kampoj politika, militista, ekonomia, polica ktp, modifante laŭ sia profito la komponantojn de tiu piramido (la sindikata kaj politika burokrataro ofte anstataŭis la malnovan administran kaj ŝtatan burokrataron, ekzemple). Foje konscie kaj aliaj senskoncie ili unue klopodis por kaj poste sukcesis restarigi, oni povas tiel diri, la ŝtaton.
La Komitato pri Volontarmeoj tiurilate jam estis provo. Du monatojn poste ĝi fariĝis senutila, ĉar estis la samaj organizaĵoj, kaj foje la samaj homoj, kiuj konsistigis la katalunan Registaron, kun la samaj prerogativoj kaj la samaj roloj kaj krome kun la respublikana legitimeco.
Tamen tio, kion mi ĵus skribis, donas al ni nur skeman rigardon pri la realo. La forto de la homamasa revolucia movado estis tia, tiom gravaj la sociaj transformoj, kiujn ĉi tiu iniciatis, ke la Komitato pri Volontarmeoj, samkiel poste la kataluna Registaro, dum iom da tempo montriĝis senutilaj, senvaloraj, kreante organon post organo kaj publikigante dekreton post dekreto, kiujn neniu –aŭ preskaŭ

neniu– prenos en konsidero: aferoj multe pli gravaj estis farotaj.
La aŭtoritato ekzistis «laŭjure», tamen la rilato al la aŭtoritato ne estis rilato de submetiĝo, sed tute male. Kaj la aŭtoritato -ne rekonata- hezitis inter la kapturniĝo kaj la kolero.
Jes, oni ja povas paroli pri «sovaĝa demokratio» (samkiel ni parolas pri «sovaĝa striko») por nomi la novan socian vivon, kiun starigis en Katalunujo la armitaj laboristoj.
Mi deziras ne fali miavice en la «maldekstreman» fetiĉismon, tamen ŝajnas al mi, ke la disvolviĝo de tiu sovaĝa demokratio povintus naski formon de socia organizo de la tipo de federacio de konsilantaroj (tio estas nura rimarko, ĉar, kiel mi ne verkas kuirlibron, ne havas kialon por doni receptojn). Por tio estis esencaj kaj konkretaj faktoj: 70% el la entreprenoj kolektivigitaj, multnombraj kamparanaj komunumoj, laboristaj volontarmeoj, neniigo de la malnovaj policaj korpusoj, revoluciaj komitatoj en la entreprenoj, kvartaloj, urboj kaj vilaĝoj, kontraŭautoritatema «nova animstato», transformiĝoj de la ĉiutaga vivo, de la situacio de la virinoj ktp.
Se ne okazis tiel, kaj se okazis plurmonata lukto inter la potenco (unue la Komitato pri Volontarmeoj, poste la kataluna Registaro) kaj tiu sovaĝa demokratio, tio estis kaŭzita de multo da kialoj, kiuj devenas de la historia kaj socia konteksto: la milito – kompreneble–, sed ankaŭ la rolo plenumata de la laboristaj organizaĵoj –de ĉiuj organizaĵoj– kaj la fideleco, oni preskaŭ povas diri submetiĝo, de la aktivuloj al ties organizaĵoj kaj estroj. Ĝuste estis pere de la organizaĵoj –eĉ la liberecana NKL-IAF–, kiel estis «reenkondukita» la Potenco, resanktigita la aŭtoritato, trudita la disciplino, militistigitaj la volontarmeoj, restarigita la socia hierarĥio kaj venkita la revolucio.

«Kiel en ĉiuj antaŭaj ribeloj de laboristoj kaj malriĉaj kamparanoj», (verkas tre prave *Living Marxism*), «la plej grava fakto estas tio, ke la hispanaj homamasoj estis pli radikalaj, pli 'maldekstremaj', pli ekstremismaj ol siaj gvidantoj kaj la organizaĵoj, kiujn tiuj ĉi lastaj regis. Ne temas pri tio, ke la homamasoj agadis kontraŭ siaj organizaĵoj, nek pri tio, ke ili vidis barilon inter si kaj siaj organizaĵoj, tamen la politika ŝanĝo okazinta de kiam la revolucio transformis la konsistigon de la nova reĝimo, sufiĉe pruvas, ke inter la agantaj homamasoj kaj ties organizaĵoj ekzistis iu malakordo eĉ pli granda ol tio, kion la laboristoj povis imagi. La homamasaj agoj dum la somero kaj finoj de 1936, en kiuj partoprenis la laboristoj aliĝintaj aŭ ne al organizaĵo[58], ne estis decidataj nek gvidataj nek disvolvataj de la oficiala direktantaro de la diversaj organizaĵoj –inkluzive de anarĥiistaj sindikatoj–, sed de la laboristoj mem kaj de la cirkonstancoj pro kiuj ili –direktitaj aŭ ne– reagis». Kaj poste: «Tion, kio estis aŭtentike revolucia ĉe la hispana enlanda milito, kaŭzis la rekta agado de la laboristoj kaj malriĉaj kamparanoj, kaj ne iu specifa formo de sindikata organizaĵo aŭ la agado de iuj aparte brilaj ĉefoj. Tamen endas aserti, ke la pli granda libereco, ekzistanta en la malmulte centralizataj anarĥiistaj sindikatoj, konkretiĝis en multe pli aŭtonoman iniciaton fare de la anarĥiistaj laboristoj. La revoluciaj atingoj de la spontanea agado de la hispanaj laboristoj dum la okazintaĵoj de julio estis neniigitaj, kiam la dekretoj, la decidoj de la partioj, la registara aŭtoritato anstataŭis la aŭtonoman agadon de la

58Kvankam sektoro de nealiĝintaj laboristoj partoprenis en la lukto de Julio 1936, baldaŭ la sindikataliĝo fariĝis deviga –kaj krome bezona, ekzemple por sin provizi.

> proletaro, kaj kiam la tuta renovigita maŝinaro komencis regi la homamasojn».[59]

Mi diras nenion plu.

---

59«Living Marxism», n-ro 4 (6-an de Aprilo 1939). Ĉikago, Usono.

# 3-a ĈAPITRO: USSR KAJ LA HISPANA REVOLUCIO

La rolo de la okcidentaj demokratioj, ĉefe Francujo kaj Britujo, en la hispana enlanda milito estas relative bone konata. Oni konas la hezitemon de Blum, la politikon pri ne interveno kaj ties konsekvencojn, la falsan neŭtralecon de la britaj konservativuloj, tiam en la potenco, kiuj inklinis ĉiam pli al la frankistoj ktp. La materiala subteno de la nazia Germanujo kaj de la faŝisma Italujo estas en ĉies menso; kvankam multfoje oni troigas ĝian gravecon, atribuante al la ĉi-landa militista helpo la solan aŭ preskaŭ la solan respondecon de la malvenko de la «respublikanoj» kaj tiel ne endas paroli pri la eraroj de ĉi tiuj lastaj. Sed male la rolo de USSR estis multe pli polemika, kio fine estas normala, ĉar same okazas kun ĉio, kio rilatas al la «granda stalinista mensogo».

La milito de Hispanujo ankoraŭ estas parto de la bona komunista legendo. La stalinista «*Epinal*»* ĝissate parolas pri la «neprofitema helpo de la granda frata popolo», pri la internaciaj brigadoj, pri la hispanaj aŭ eksterlandaj prestiĝaj militistestroj, kompreneble ĉiuj ili komunistaj.

La novaj pilgrimantoj serĉantaj «socialismon kun humana vizaĝo», kiel Arthur London[60] aŭ Charles Tillon, tre laŭte

---

*NeT: vidu https://eo.wikipedia.org/wiki/Epinal-bildo

60Arthur London, post sia eliro el la malliberejo en Prago (vidu La Konfeso), skribis libron pri la milito de Hispanujo titolita *¡España!, ¡España!* [hispane, Hispanujo! Hispanujo!], (hispana traduko eldonejo *Artís*, Prago, 1965), kie kolektas kun plezuro ĉiujn mensogojn de la stalinista propagando: LPMU: faŝistaj spionoj; anarĥiistoj: frenezuloj aŭ sabotantoj ktp. Estas ĉio. (Oni rekomendas la samtempan legadon de Hispanujo! Hispanujo! kaj La Konfeso por la studo de la stalinista psikopatologio.)

depostulis ne nur sian personan partoprenon en la arma konflikto, sed ankaŭ la partoprenon de la komunistoj (KI, KPH, USSR inkluzive), kiel gloran paĝon de ties historio, kio estus la pravigo (inter multaj aliaj kompreneble, sed ĉi tiu aparte gravas) de iliaj tridek jaroj -aŭ pli- de senkondiĉa stalinismo. Ĉi tiu argumento, polemika kaj jezuita samtempe, permesas kontraŭmeti la oran, heroan legendon de la komunismo el kiu la milito de Hispanujo estas, laŭ ili, unu el la plej belegaj ornamaĵoj, al la «mallumo» de la ekstermejoj, la malliberejoj, la torturoj, la antaŭpreparitaj procesoj, unuvorte, la stalinista teroro. La efikeco de ĉi tiu tipo de sinteno estas certa: oni kontrastas tion «bonan» kun tio «malbona» de la komunista tradicio por rimarkigi, ke tio «bona» pli gravas, kaj tiel pravigi la stalinismon, kiel necesan historian periodon; kaj samtempe pravigi sin mem. En politiko endas elturniĝi kiel ajn.

Sed la sukceso de ĉi tiu tipo de ago bezonas absolutan nescion pri la okazintaĵoj, ĉar nenie la agado de la internacia komunista aparato estis tiel klare kontraŭrevolucia, kiel en Hispanujo; nenie, krom la nomitaj «socialismaj» landoj, la stalinista polica subpremo plenumis tiel konsiderindan rolon, nek ĝuis tiom da agadlibero. La «krimoj de la stalinismo» dum la hispana enlanda milito plenigus plurajn volumojn. Ne estas ĉi tio, kion mi intencas fari, sed endas paroli pri tio, ĉar la rolo de USSR (kaj de la hispanaj komunistoj) estis definitiva por la detruo de la kataluna revolucia sperto.

Cetere por mi ekzistas neniu kontraŭdiro inter la kontraŭrevolucia politiko de USSR en Hispanujo kaj ties «socia naturo». Ankaŭ ne tio skandalas malgraŭ kion diris kaj diros multaj komunistoj «de maldekstro», trockiistaj aŭ ne - obstine klopodantaj por klarigi la «lecionon de Oktobro»-: ĉar, kiel la «sovetia» socia sistemo estas unu el la pli reakciaj de la mondo (subprema, policisma, rigide hierarĥigita), estus minimume mirige, ke ĝi helpintus la

hispanan Revolucion anstataŭ uzi ĝin por siaj interesoj de «granda regno».
En Januaro 1933 Hitlero enpotenciĝis en Germanujo; la 21-an de Oktobro 1933 Germanujo sciigis sian eksiĝon el la Ligo de Nacioj (LdN). Antaŭ la alarma pliigo de la strečiteco fare de la militemaj potencoj, la sinteno de USSR komence estis de spektemo. Se Hitlero fidelis al la kondiĉoj de la traktato de *Rapallo*[*], Stalino pretis interkompreniĝi kun li; samkiel li interkompreniĝis kun Mussolini, la sola eksterlanda ŝtatestro, kiu neniam estis persone atakita de la tiutempa sovetia gazetaro kaj al kiu, Litvinov, la tiama komisaro de la popolo por eksterlandaj aferoj, deklaris, ke li subtenis «la plej korajn rilatojn».
La «*Isveztia*»[**] de la 4-a de Marto 1933 deklaris, «ke USSR estis la sola lando, kiu ne havis malamikajn sentojn al Germanujo, kiu ajn estu la formo kaj konsisto de ties Registaro». Fine de 1933 «*Pravda*» ankaŭ skribis, ke la laborista klaso ne havis kialon fari distingojn inter faŝismaj kaj kvazaŭdemokratiaj ŝtatoj. Sed la faŝismaj ŝtatoj okupiĝis per si mem fari tiun distingon kaj, la 28-an de Decembro 1933, Molotov, en la kunsido de la plenuma Centra Komitato pri eksterlandaj aferoj, bedaŭris, ke dum la pasinta jaro «kelkaj gvidantaj grupoj de Germanujo klopodis por revizii la ĉi-landajn rilatojn al USSR». Tamen li reasertis, ke «USSR siaflanke havas nenian motivon por modifi sian politikon rilate Germanujon».[61]
Kiam restis pruvite, ke momente ne estis perspektivoj plibonigi la rilatojn al la nazia Germanujo (tiaj perspektivoj

---

*NeT: subskribita inter Germajnujo kaj USSR, la 16-an de Aprilo de 1922 en la urbo *Rapallo* inter la eksteraferaj ministroj Walther Rathenau kaj Georgij Ĉiĉerin, kiuj rezignis pri rekompencaj pagoj (pro ŝtatigitaj germanaj firmaoj) kaj decidis denove starigi la diplomatiajn kontaktojn.

**NeT: Vidu https://eo.wikipedia.org/wiki/Izvestija

61DEGROS, Jane: *Soviet Documents and foreing Policy* [angle, Sovetiaj Dokumentoj kaj Eksterlanda Politiko], volumo eldonita de la «*Royal Institute of International Affairs*».

poste aperos kaj USSR rapidos subskribi la germana-sovetian interkonsenton en 1939), Stalino decidis solidigi siajn rilatojn al la ceteraj okcidentaj potencoj. Fine de 1933 USSR jam atingis la laŭleĝan rekonon de Usono. La intertraktadoj kun Francujo, komencintaj printempe de 1933, kondukis USSR-on aliĝi al LdN kun konstanta posteno en la Konsilantaro la 18-an de Septembro 1934. Post kiam Germanujo forlasis ĉi tiun organizaĵon -prapatro de UN- tiel, kiel Italujo kaj Japanujo, USSR pretendis transformi tion, kio ĝis hieraŭ mem ankoraŭ estis «ligo de imperiismaj rabistoj defendantaj la traktaton de banditeco de Versalles», en efikan rimedon por sia diplomatio. La intertraktadoj kun Francujo krome estis kronitaj de la subskribo de franca-sovetia traktato pri «helpo, reciproka okaze de senprovoka atako fare de eŭropa regno». La traktato estis subskribita en Parizo la 2-an de majo 1935. Laŭ la «*Petit Parisien*» de la 20-a de Junio 1935, «la prezidanto de la Konsilantaro, M. Laval, precizigis, ke oni enmetis la alineon relativan al la politiko de nacia defendo de la franca Registaro pro iniciato de Stalino».
Stalino atingis altrudi al USSR kaj al la Komunista Internacio la «memsufiĉan» periodon de sia politiko: absolutan unuarangecon por la plifortigo de la ekonomia kaj industria kapablo de Rusujo, kaj ekstere politikon de interligoj kun kiu ajn por garantii sian trankvilecon kaj ĉi tio ankaŭ samcele. Resume, hieraŭ kiel hodiaŭ, ĉu la interkonsento kun Laval, ĉu la germana-sovetia interkonsento, ĉu Hispanujo aŭ Ĉeĥoslovakujo ktp, la sovetia eksterlanda politiko ĉiam klopodis por protekti la interesojn de granda regno de USSR malutile al kiu ajn se tio necesus, kaj laŭ unu el la plej reakciaj diplomatiaj tradicioj de la grandaj imperiismaj regnoj.
Kvankam hodiaŭ kelkaj komunistaj partioj grimacas pro kelkaj tro malkaŝe imperiismaj intervenoj de USSR -kaj ĉio por provi komplezi siajn kolegojn de la politika klaso-, hieraŭ

«la tutmonda armeo de la proletaro» discipline obeis kaj sekvis per granda impeto ĉiujn zigzagojn de la sovetia eksterlanda politiko kaj, kiel USSR ludis la atuton de la interligo kun la okcidentaj demokratioj «kontraŭ la faŝismo», la Komunistaj Partioj ĝin sekvis, kiel tuj ĝin sekvos pro la ŝanĝiĝo kaŭzita de la germana-sovetia interkonsento de 1939.
La teorio de la «socialismo en unu sola lando», ideologia preteksto de la novnaciismo de la rusa burokrataro, triumfis en la 6-a Kongreso de KI, kiu proklamis en siaj rezolucioj: «...la internacia proletaro, kies sola patrujo estas USSR, la fortikaĵo de siaj konkeroj, la esenca faktoro de sia internacia liberiĝo, havas la devon kontribui al la sukceso de la socialismo en USSR kaj ĉiurimede defendi ĉi tiun landon kontraŭ la atakoj de la imperiismaj potencoj»[62].
Ĉi tiu lingvaĵo de sinjoro alparolante siajn subulojn solidiĝis pro la 7-a Kongreso de KI, komencinta en Moskvo la 25-an de Julio 1935. USSR estas pli ol neniam: «la plej grava faktoro de la historio de la mondo»[63].
Dum ĉi tiu kongreso oni teorie formulis la politikon de naciaj kaj internaciaj interligoj de la «popola fronto» kaj la «kontraŭfaŝismo», flanklasante la «maldekstrismajn» ornamaĵojn, la instrukciojn kiel «klaso kontraŭ klaso» kaj la kritikon kontraŭ la «sociala-faŝismo». Ĉi tiu teoriigo postulis, ke oni subtenis revolucian karakterizon por la politiko de la Popola Fronto kaj la defendo de la burĝa demokratio. Dimitrov deklaris: «antaŭ dekkvin jaroj, Lenino al ni rekomendis "serĉi manierojn de transiro aŭ alproksimiĝo al la proleta revolucio". Ŝajnas, ke en multaj landoj la registaro

62CLAUDÍN, Fernando: Dokumentoj de la 7-a Kongreso de KI cititaj en *La Crisis del Movimiento Comunista* [hispane, La Krizo de la Komunista Movado], *Ed. Ruedo Ibérico*, Parizo, 1970
63Sama verko.

de popola fronto pruvis esti unu el la pli gravaj transirmanieroj»[64].

En siaj finaj rezolucioj, la 7-a Kongreso kunvokis la komunistajn partiojn lukti por la kreo de «ampleksa popola fronto kun la laboristaj amasoj, kiuj ankoraŭ estis malproksimaj de la komunismo, sed kiuj, malgraŭ ĉio, povus unuiĝi al ni en sia lukto kontraŭ la faŝismo».

En Hispanujo la Popola Fronto venkis la balotadojn de Februaro 1936 kaj en plena plivastiĝo de la «popolfronta» politiko eksplodis la revolucia krizo de Julio 1936. Ĉi tiu revolucio multe superis la kontraŭfaŝisman kaj parlamentan kadron de la tipo Popola Fronto; fakte ĝi superis ĉiujn kadrojn, programojn kaj antaŭvidojn, kiel okazas kun ĉiuj veraj revolucioj. Sed, ĉar la hispana Revolucio kontraŭdiris la interesojn de USSR -kio estis logika-, la komunista aparato faris tion eblan por reteni kaj tiel sufoki ĝin. Ĉi-sence la afliktoj de la hispana Komunista Partio estas sufiĉe komikaj: en Aprilo 1931, kiam, laŭ la oficiala historio, la partio apenaŭ kalkulis 800 aktivulojn, la komunistaj gvidantoj bonvenigis la starigon de la Respubliko per la krio de «La tuta potenco al la Sovetoj!. For la burĝa Respubliko!». En la Kongreso de 1932, la estraro de Bullejos estis eksigita, ĉar ĝi ĵetis la «oportunisman» instrukcion defendi la Respublikon kontraŭ la ribela provo de la generalo Sanjurjo (ribela provo malsukcesinta, sed Sanjurjo unuiĝis kun Franco kaj Mola ĉekape de la puĉo de Julio 1936). Sed kiam la movado de homamasoj efektive radikaliĝis kaj, kiam la ribelo de Asturio en Oktobro 1934 pruvis la forton de la revolucia tendenco en la lando, tiam la komunistaj estroj, obeante la instrukciojn de KI, decidis, ke la hispana Revolucio ne estis socialisma, sed simple demokratia-burĝa.

64DIMITROV, George: *Oeuvres choisies* [france, Elektitaj verkoj], *Ediciones Sociales*, Parizo, paĝo 102.

Kiam, post la venko de la Popola Fronto en la februaraj balotadoj kaj pro la revolucia premo de la homamasoj, Largo Caballero, gvidanto de la maldekstra tendenco de la Socialista Partio kaj de ĜUL, proponis la formadon de «laborista Registaro» de kiu restus ekskluzivitaj la respublikanoj, KPH kontraŭstaris. José Díaz, la ĝenerala sekretario, skribis en la organo de la Kominterno: «Ni devas lukti kontraŭ ĉia elmontro de troigita senpacienco kaj kontraŭ ĉiu klopodo por rompi la Popolan Fronton antaŭtempe. La Popola Fronto devas daŭri. Ankoraŭ al ni restas multa vojo por trairi kune kun la respublikanoj de maldekstro».
Fakte la vera celo estis bremsi la movadon de homamasoj, kiu inklinis ĉiam pli «al la maldekstro», reteni ĝin ene de la limoj de la kontraŭfaŝismo, tio estas, de la interligo kun la liberala burĝaro; ankaŭ oni celis plifortigi la influon de KPH, kiu ĝis tiam estis nur malgranda partio, ene de la laboristaj organizaĵoj. Kun la konsento de Largo Caballero, KPH malfondis UĜKL-on*, ties sindikato aliĝinta al la Ruĝa Sindikata Internacio, kaj «invitis» ĝiajn membrojn aliĝi al ĜUL. Fakte ne estis vera kunfandiĝo pro la eteco de la komunista sindikato. Sed en kelkaj regionoj, ĉefe en Katalunujo, la stalinistoj nelonge poste atingis la regadon de la kataluna sekcio de ĜUL. Alia ago, kiu tuj rezultis pli profitdona por KPH: la kunfandiĝo de la komunistaj kaj socialistaj junularoj, kiuj respektive kalkulis 3.000 kaj 50.000 membrojn, en la sino de la Unuigita Socialista Junularo. Malgraŭ sia malplimulta pozicio, la stalinistoj rapide atingis preskaŭ la tutan regadon de la organizaĵo de Unuigita Junularo, kiun ili transformis en efikan instrumenton de sia politiko dum la enlanda milito. Sed iliaj ambicioj estis ankoraŭ pli vastaj kaj volis realigi la saman agon kun la

---

*NeT: hispane, *CGTU -Confederación General del Trabajo Unitaria*, Unuigita Ĝenerala Konfederacio de la Laboro disigita de ĜUL dum la dua Respubliko

komunista kaj socialista partioj. Iliaj intertraktadoj pri tio kun la maldekstra tendenco de la Socialista Partio (tiu de Largo Caballeno) eĉ estis sufiĉe disvolviĝintaj, sed la projekto malsukcesis (escepte de Katalunujo) ne tiel pro ilia subordigo al USSR –lando, kiu tiam ĝuis grandan prestiĝon en ampleksaj sektoroj socialistaj de maldekstro-, kiel pro ilia koncepto pri la Popola Fronto kaj la «demokratia» fazo en kiu ili volis enfermi la potencan lukton de la homamasoj «por ke ŝanĝiĝu la aferstato». Iliaj konceptoj pri interna politiko estis multe pli proksimaj, estis preskaŭ identaj, al tiuj de la socialistoj de dekstro -tendenco Indalecio Prieto-, kiuj kontraŭe eĉ ne volis aŭdi paroli pri kunfandiĝo kun la stalinistoj.
Ĉi tiu kontraŭdiro ne solviĝis kaj dum la enlanda milito la stalinistoj asociiĝis al la socialistoj de dekstroj kaj la respublikanoj por lukti kontraŭ ĉiuj revoluciaj tendencoj, ĉu socialistaj, ĉu anarĥiistaj aŭ LPMU-istaj.
De «La tuta potenco al la Sovetoj!» en 1931 ĝis la «lukto defende de la demokratia Respubliko» en 1936 -kaj ĉio cetera-, la direktoŝanĝoj de KPH ne nur okazis pro ĝia subordigo al Stalino pere de KI; estis aliaj motivoj, kiuj ankaŭ havis sian influon. El ĉi tiu vidpunkto, estas absurde ne konsideri la internan logikon de ĉiu ĉi-tipa organizaĵo, kiu en 1931 ne estis pli ol sektisma «grupeto» loĝanta en «alia loko», por tiel diri, revolucia (USSR hieraŭ, Ĉinio hodiaŭ), kiu tiom identiĝis kun tiu «alia loko», ke ĝi eĉ mekanike ripetis ties «instrukciojn», kiu malŝatis la peradojn, ĉar ĝi havis neniun influon sur ili ktp. Post malmultaj jaroj, danke al tre trafa manobra lerteco uzante la kuntekston de Popola Fronto, ĝi penetris en la klasikan politikan ludkampon, vidis kiel ĝiaj balotantoj unue ekzistis kaj poste pliiĝis, ĝi eniris en la Parlamenton kaj pasis de la kaverna vivo de la sektoj al la rondaj tabloj de la politikaj kombinaĵoj, en kiuj, kvankam komence malplimulta, ĝi atingis sufiĉe rapide (okaze de KPH) kelkajn sukcesojn. Temas pri la klasika kaj ĉiam

aktuala proceso ene de la laborista movado. Ekzemple donu dek deputitojn al la Komunista Ligo en Francujo kaj vi vidos la rezultojn!
La ĉi-tempa eksterlanda politiko de USSR estis kondiĉita de la deziro de Stalino neebligi, ke Britujo kaj Francujo akordiĝu kun Hitlero kaŝe de li. Pro ĉi tiu eblo, la okcidentaj komunistaj partioj klopodis por iĝi la plej bonaj defendantoj de la respublika burĝa ordo. En Francujo, ili rompis la potencan movadon de fabrikokupado de majo-junio 1936 (kiam Maurice Thorez distingiĝis per sia fama «porentreprena» frapfrazo: «Endas scii fini strikon!»). En Hispanujo, kvankam ili ne povis neebligi, ke la ondo de strikoj fine iĝis la revolucia enlanda milito, la stalinistoj kruelege luktis por «ke per unu fojo kaj por ĉiam oni finu la provojn de la sindikatoj kaj la komitatoj efektivigi la socialismon», kiel deklaris en majo 1937 per mirinda kaj senintenca humursento, Jesús Hernández tiama KPH-estro[65].

## LA HELPO DE USSR AL LA HISPANA RESPUBLIKO

Broué kaj Temime konstatas tri fazojn en la sovetia sinteno koncerne la militon de Hispanujo:

> «– unue pozicio de fakta neŭtraleco akompanata de evidentaj atestoj de simpatio kaj solidareco,
> – post Oktobro 1936, konsiderinda penado de militista helpo, kiu respondis al forta sinteno favore al la Respubliko en la Komitato de ne-interveno.
> – Laste post la somero 1938 iom-post-ioma malpliigo de la militista helpo, kiu finiĝis per la tuta forlaso de la Respubliko»[66].

Ĉi tiuj tri fazoj estas logikaj en la kunteksto de la sovetia diplomatio: unue atendo pro neatendita kaj maloportuna

65Citita de B. Bolloten, citita verko.
66Broué kaj Temime, citita verko, paĝo 338.

revolucio, kiu ŝajnis esti se ne superregita almenaŭ ja multe influita de la anarĥiistoj; atendo ankaŭ por koni la reagojn de Francujo kaj Britujo. Poste helpo, sed helpo destinita ne por la triumfo de la revolucio, sed por ĝia detruo; helpo, kiu al ĝi permesis havi grandan politikan influon lerte uzatan laŭ kontraŭrevolucia senco. Laste forlaso ne nur de «perdita kaŭzo», sed ankaŭ pro inversigo en la interligoj, pro nova ŝanĝiĝo de la sovetia diplomatio, kiu estis kronita de la germana-sovetia interkonsento.

Fernando Claudín, malnova KPH-estro, kritikas en sia libro –laŭ ĉi tiu sama senco kvankam per iom pli modera maniero- la sintenon de USSR:

> «USSR ne povis flanklasi sian devon pri aktiva solidareco kun la hispana popolo arm-en-mane sub la puno senkreditigi sin antaŭ la tutmonda proletaro. Ĉi tiu devo koincidis, unuflanke, kun la kontraŭhitlera tendenco de la sovetia eksterlanda politiko dum tiu periodo. Sed aliflanke ĝi ekkonfliktis kun la estmanieroj, ni diru taktikaj, de ĉi tiu tendenco. Ĉi-rilate la celo numero unu de la sovetia politiko estis solidigi la militistan interligon kun Francujo kaj atingi amikan rilaton al Anglujo. Sed nek la burĝa Francujo de Blum nek la konservativa Anglujo de Chamberlain povis akcepti la venkon de la proleta revolucio en Hispanujo. Kontribui al ĝia venko signifis, por la sovetia Registaro, baldaŭ aŭ ne baldaŭ rompi rilatojn al ambaŭ potencoj. La sola ŝajna eblo por akordigi la "helpon al Hispanujo" kun la cititaj celoj de la sovetia eksterlanda politiko estis, ke la hispana proletaro ne preterpasis tion, kio finfine povus esti akceptebla por la franca-angla burĝaro. Kaj tio plej akceptebla por ĝi estis, ke en Hispanujo ekzistu parlamenta Respubliko. Demokratia, kontraŭfaŝisma, eĉ

> popolfronta, ĉio maldekstra, kion oni volas, sed... burĝa! Ĉefe burĝa!»[67]

Miaflanke mi ne kredas, ke la timo senkreditigi sin antaŭ la «tutmonda proletaro» havus tiom da pezo en la decidoj de la stalinistaj gvidantoj. Efektive ĉu Moskvo ne forlasis la tutan sian kontraŭhitleran strategion kaj subskribis la germanan-sovetian interkonsenton (kun la «mortigistoj de la hispana Respubliko») apenaŭ finita la milito de Hispanujo, tiel realigante plenan inversigon de siaj aliancoj, ŝajne ne timante, ke ĝia nova alianco kun la «plej malbonaj malamikoj de la tutmonda proletaro kaj de la tuta progresema homaro» ĝin senkreditigis antaŭ iu?

La helpo de USSR al Hispanujo okazis pro pli subtilaj motivoj ol la timo senkreditigi sin antaŭ la «tutmonda proletaro» -ni diru pli ĝuste antaŭ la komunista movado-, kiu jam kutimiĝis senproteste engluti ĉion, kvankam la stalinistoj uzadis tiun «helpon» (mi klare parolu: la vendo de armiloj kontraŭ alta prezo al la Respubliko) por sia propagando.

Por mi la esenca celo estis la eblo, kiu al ili prezentiĝis, estri la politikon de la respublikana Registaro, unue por sufoki la revolucion, sed ankaŭ por uzi ĝin, kiel pecon plian sur la eŭropa diplomatia tabulo, kiel eventualan ŝanĝmoneron -sen tio, ke pro tio, evidente, ĝi devus rompi kun la franca kaj angla Registaroj. Ili ankaŭ povis sin prezenti kiel la plej bonajn defendantojn de la hispana, laŭleĝa kaj modera Respubliko, kontraŭ la faŝismo ktp. Ĉi tiu taktiko donis multnombrajn eblojn al la sovetia diplomatio, kio ne volas diri, ke ĝi plene sukcesis.

Tio ankaŭ prezentis eblojn en la interna kaj politika kampoj (kvankam nur estu por kaŝi la ĉiajn malfacilaĵojn kaj la kreskantan ondegon de la procesoj kontraŭ la bolŝevika malnova gvidantaro kaj la homamasaj deportadoj).

67Fernando Claudín, citita verko, paĝo 180.

La unua decido de la sovetia Registaro estis anonci, la 3-an de Aŭgusto 1936, ke oni dekalkulos la 1 procenton de la monataj salajroj de la laboristoj kaj oficistoj laborantaj en la fabrikoj kaj oficejoj de la regno, kiel helpo al la hispana Respubliko. Kompreneble en Hispanujon venis eĉ ne centono. Tra la tuta lando organizis sin movadoj de solidareco petantaj al la laboristoj, ke ili atendu malfalcilojn kaj, ke ili pliigu la produktadon «por Hispanujo», kio estis bona temo de agitado-propagando por pliigi la penadon de industriiĝo. Prezentis sin kelkaj volontuloj antaŭ la organizaĵoj de la Partio por lukti en Hispanujo, sendube kortuŝitaj de la reklamaĵoj. Ili estis arestitaj kaj deportitaj en Siberion, kiel rakontas Victor Serge en siaj Memoraĵoj. Kaj kiam estis kreita la Komitato pri Ne-Interveno, USSR tuj aliĝis al ĝi, ĉiam por komplezi la francojn kaj la anglojn.
Jesús Hernández, malnova gvidanto de la Hispana Komunista Partio kaj respublika ministro dum la enlanda milito, rakontas en sia libro La Granda Perfido:

> «... Kiam ankoraŭ sonis en la oreloj de la mondo tiuj vortoj de Stalino, kiuj al ni ŝajnis tiel belegaj: “La afero de la hispana popolo ne estas privata afero de la hispanoj, estas la afero de la tuta antaŭenira kaj progresema homaro”, Kremlo respondis la francan Registaron, kiu al ĝi demandis kiu estus la konduto de USSR okaze de Francujo estus minacita pro sia helpo al la Registaro de Madrido: “La franca-sovetia interkonsento de 1935 al ni devigas interhelpon okaze de unu el niaj landoj estus atakita de alia regno, sed ne okaze de milito kaŭzita de la interveno de unu el ni en la aferojn de alia nacio”.»[68]

---

68HERNÁNDEZ, Jesús: *La grande trahison* [france, La granda perfido], Eldonejo *Fasquelle*, Parizo, 1953, paĝo 34.

Verŝajnas, ke la prudenta sinteno de USSR (tiel, kiel de Britujo) ege kontribuis al la misprezentoj de la Registaro Blum.

Komence de la monato de Septembro 1936 okazis en Moskvo eksterordinara kunveno de la Politika Buroo dum kiu Stalino anoncis sian decidon helpi la respublikanan Hispanujon en ties lukto kontraŭ Franco. W. G. Krivitsky, tiutempa estro de la sovetia militista spionadservo en okcidenta Eŭropo, rakontas, ke du tagojn poste ricevis la jenan mesaĝon: «Tuj pligrandigu viajn operaciojn por ampleksi la hispanan enlandan militon. Mobilizu ĉiujn agentojn kaj disponeblajn rimedojn por rapide krei sistemon de armiltransporto al Hispanujo»[69]. Sed, ĉar ankaŭ endis prigardi «la bonan uzon», kiun oni faros per ili, Stalino ordonis al Iagoda, tiama KPIA-estro[*], ke li instalu reton da agentoj en Hispanujo. La 14-an de Septembro Iagoda kunvokis urĝan konferencon en Lubianka, sidejo de la politika sekreta polico de Moskvo -kaj ankoraŭ hodiaŭ fama malliberejo-. Dum ĉi tiu konferenco oni enoficigis veteranan oficiron de KPIA por ke li direktu la retojn en Hispanujo; estis Nikolsky, kiu agadis sub la nomo de Orlov. Tiutempe ekprenis formon grava movado de solidareco, kiu kontretiĝis per la deiro de volontuloj al Hispanujo. Iuj el ĉi tiuj neniel estis stalinistaj komunistoj (eĉ ne komunistoj) kaj ilia kontakto kun la revolucia realo de Hispanujo (tiel, kiel la sperto, kiun iuj havis pri la stalinista diktatoreco) estis politika danĝero por la stalinismo. La agentoj de KPIA devis fari, ke regu la ordo inter ĉi tiuj volontuloj. Sekve ili devis enŝteliĝi kaj estri la «Internaciajn Brigadojn» kun duobla celo: uzi ilian kuraĝon en la batalo (kiu multfoje estis reala)

69KRIVITSKY, W.G.: Agento de Stalino (originala eldono: *In Staline's Secret Service* [angle, En la Sekreta Servo de Stalino], Novjorko, *Harper Brothers*, 1939).

*NeT: KPIA - Народный комиссариат внутренних дел, ruse, Komisararo de la Popolo por Internaj Aferoj de Sovetio.

nur profite por la stalinismo kaj likvidi ĉiujn siajn realajn aŭ «eblajn» kontraŭulojn. Iuj el ĉi tiuj viroj, kiel André Marty, kunlaboris per tia efikeco kun KPIA en ĉi tiu dua laboro, ke li al si gajnis la kromnomon de «buĉisto de *Albacete*».[**]
Sed la militista helpo el USSR ne estis senpaga. Kiel estas konate, la Respubliko pagis la armilojn anticipe kaj per oro. La oro de la Banko de Hispanujo estis enŝipigita, la 25-an de Oktobro 1936, en Kartaĥeno cele al Odeso. Ĉi tiun agon direktis Negrín, tiama Ministro pri Financoj, konsente kun siaj kolegoj de la respublika Registaro. La ekzakta kvanto, kiun valoris tiu oro, estis tre diskutita, sed oni indikis, ke ĝi povus esti ĉirkaŭ 510 milionoj da pesetoj. Ni ankaŭ ne konas la ekzaktan kvanton da armiloj, kiujn sendis la sovetianoj. Laŭ dokumento de la usona ministrejo pri eksteraj rilatoj citita de Cattell kaj kolektita de Broué kaj Temime: «La 25-an de Marto 1937, el 460 respublikanaj aviadiloj estis 200 ĉasaviadiloj, 150 bombaviadiloj kaj 70 skoltaviadiloj rusaj. Ĉefe estis bombaviadiloj Katiuska kaj ĉasaviadiloj I.15 kaj I.16, superaj al la unuaj germanaj aparatoj, sed tre malsuperaj al la Messerschmidt-oj. Preskaŭ ĉiuj tankoj ankaŭ estis de rusa origino: la tankoj de 12 kaj 18 tunoj estis rapidaj kaj bone armitaj»[70].
Granda parto de la materialo aĉetita per la hispana oro estis -laŭ la atestoj de la eŭska Prezidanto Aguirre kaj ankaŭ laŭ Krivitsky mem- kadukiĝinta kaj ofte neuzebla materialo, kiu «datiĝis de la milito de Krimeo» diris Aguirre. Ĉar USSR formis parton de la Komitato pri Ne-Interveno, KI kaj KPIA kreis tutan serion de kompanioj por aĉeti kaj transporti armilojn en la respublikan zonon kaj tiel demeti respondecojn al la sovetia Registaro (kiu kontraŭe delasis eĉ ne unu gramon de la ricevita oro).

**NeT: vidu https://eo.wikipedia.org/wiki/Andr%C3%A9_Marty
70Broué Kaj Temime, citita verko, paĝo 341.

> «...En preskaŭ tuta Eŭropo, en Parizo, Londono, Amsterdamo, Zuriko, oni kreis entreprenojn administritajn de Moskvo, kies komisio estis havigi al ni armilojn kvazaŭ tio estus normala komerco de lando al lando. Kompreneble ĉi tiujn negocojn oni aranĝis per la mono de la hispana regno. Kvankam ni jam ne ekskluzive dependis de la rusa provizado, daŭre estis katenitaj al Moskvo, ĉar ĉiuj tiuj oficejoj de aĉeto estis administritaj de homoj de Kremlo, kiuj laŭvole ĉiam povis pliigi aŭ malpliigi la ekspedojn de kie ajn ili devenis.»

Ni vidis, ke Krivitsky persone sin okupis pri tiuj aĉetoficejoj, kies ĉefaj profitantoj estis kelkaj komunistaj partioj:

> «La franca KP, inter aliaj, aĉetis ŝipareton el 12 komercaj ŝipoj, kiu sulkis la marojn nome de la mara kompanio "*France-Navigation*", ĝi aĉetis la "Domon de la Partio", aŭtojn por siaj estroj, kreis ĵurnalojn, ekzemple "*Ce Soir*", ĉio tio per la mono por la "aĉeto de armiloj", kiun Negrín deponis en manoj de la francaj komunistestroj, mono, kiu, laŭ Prieto, atingis la kvanton da du milionoj kaj duono da frankoj»[71].

USSR-on, por ties subtila diplomatia ludo, ne interesis rapida venko de la frankistaj militistoj kaj iliaj naziaj kaj faŝistaj aliancanoj. Tio povintus tro plifortigi la faŝistan tendaron en Eŭropo, timigintus la okcidentajn demokratiojn kaj povintus fari, ke oni izolus USSR-on. Sed ĝin ankaŭ ne interesis tro rapida venko de la respublikanoj, pro la graveco, kiun havis la hispanaj revoluciaj fortoj komence de la enlanda milito, graveco, kiu okaze de venko estus centobligita kaj povus kroni sin per sociala revolucio ne estrita (de iu), kio ĝenintus -aŭ povus ĝeni- la diplomatian

71HERNÁNDEZ, Jesús: *La granda trahison* [france, La granda perfido], Eldonejo *Fasquelle*, 1953, paĝoj 47-48.

ludon de USSR kaj la ceteraj potencoj. La eblaj konsekvencoj de tiu revolucio kompreneble timigis ĉiujn Registarojn. Necesis, ke oni detruu ĉiujn revoluciajn fortojn kaj samtempe, ke la Respubliko povu defendi sin kaj, ke okaze venki, ĝi tion farus sub la aspekto de la plej modera de la respublikoj rekonita kiel tia de la okcidentaj demokratioj, kaj plena de dankemo al USSR. Ankaŭ ne endis malakcepti la eblon de kompromiso inter ambaŭ tendaroj.

La unuaj rusaj armiloj venis en Hispanujon la 28-an de Oktobro 1936. Ili tuj estis konfiditaj al KPH kaj estis uzitaj por la defendo de Madrido, kiu estis preskaŭ ĉirkaŭita de la frankistaj trupoj. Tuj poste la alveno de la armiloj, laŭtiĝis la tono de la komunistoj kaj la sovetiaj konsilantoj. Ili ordonis, postulis kaj estis aŭskultataj. La ĉantaĝo preskaŭ ĉiam funkciis: «Obeu aŭ vi ne havos pli da armiloj». En Madrido, ekzemple, la stalinistoj absolute vetois la partoprenon de delegitoj de LPMU en la Estraro pri Defendo, kiu teorie estis konsistigita de ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj. Kaj kvankam ĉiuj ili, escepte de KPH, komence akceptis la ĉeeston de la delegitoj de LPMU, ĉi tiuj, Gorkin kaj Andrade, devis reveni en Barcelonon ne atingante kontentigon. Ili tiam publigikis en «*La Batalla*», la organo de LPMU, artikolon en kiu ili rakontis la okazintaĵon. Antonov-Ovsenko, la ĝenerala konsulo de USSR en Barcelono, sekvatage respondis ilin per noto al la gazetaro en kiu li denuncis «la faŝismajn intrigojn de LPMU». «Kelkajn tagojn poste (rakontas Gorkin) mi havis okazon paroli en Valencio kun kelkaj ministroj de la Respubliko.» La ministro pri Propagando al li faris amikajn riproĉojn: «Ne endas ekpolemiki kontraŭ la rusoj ĉi-momente: ili al ni havigas armilojn». «Konsentite, mi respondis lin, sed kontraŭ tiuj armiloj, kiuj, laŭ mi pensas, estis laŭdeve pagitaj per oro, ĉu ni estas permesontaj, ke Stalino al ni diktu sian volon de Moskvo? Ŝajnas al mi, ke vi ne rimarkas la danĝeron, kiun

signifas la stalinismo kaj la politiko, kiun ĝi volas apliki en Hispanujo. La hispana popolo nenio interesas Stalinon, ĉion li dependigas de la bezonoj de sia eksterlanda politiko.» Mi komunikis al la subsekretario de la ministro mian konvinkon, ke la stalinismo preparis nian fizikan forigon. Mi plu diris: «Kaj estu zorgemaj, ke post ni, venos la vico de ĉiuj ne akceptantaj ĝian diktatorecon». Tiam li al mi konfesis: «Ili ĉie estas lokitaj, intervenas en ĉion. La Prezidanton mem de la Respubliko multe zorgas tio, kion ili diras kaj faras. Sed kiel reagi? Ili estas kiuj al ni havigas armilojn»[72]. Ni nur aldonas, ke ĝuste pro tio ili ilin havigis.

Ĉi tiel la komunistoj ĝisekstreme ekuzis la sintenon de forto, kiu al ili havigis la sovetian helpon kaj ekpravigis ĉiujn timojn de Gorkin eĉ uzante la «fizikan forigon» de la revolucia opoziciularo. Krivitsky skribas: «Se Stalino volis transformi Hispanujon en peonon en sia ludo por atingi solidan aliancon kun Francujo kaj Britujo, li devis forigi ĉiun opozicion en la respublikana Hispanujo. La bastiono de ĉi tiu opozicio estis Katalunujo. Stalino decidis subteni per homoj kaj materialo nur la grupojn, kiuj estis pretaj akcepti sen rezervoj lian direktadon. Li estis decidita ne permesi, ke la katalunoj tuŝu niajn aviadilojn per kiuj ili povintus atingi militistan sukceson, kiu pliigintus ilian prestiĝon kaj ilian politikan potencon en la respublikanaj vicoj»[73].

Antaŭ ol sendi la armilojn, la sovetianoj multe insistis pri tio, ke plenumiĝu la kompleta kaj entuta restarigo de la centra potenco en la respublika zono. La ambasadoro de Moskvo en Madrido, Rosenberg, multigis siajn klopodojn por la neniigo de la revoluciaj spertoj kaj de la aŭtonomeco de la laboristaj komitatoj kaj por la starigo de fortika Registaro. Tiam tia Registaro povis inklini «al la maldekstro», se ne, la homamasoj al ĝi donintus tiel malmultan fidon, kiel al la

72GORKIN, Julián: *Caníbales Politicos* [hispane, Politikaj kanibaloj], Eldonejo *Quetzal*, Meksikurbo, 1941, paĝo 91.
73Krivitsky, citita verko, pág. 196.

Registaro Giral. Sekve la 4-an de Septembro enpotenciĝis Registaro de Popola Fronto en Madrido. Ĝi estis prezidita de Largo Caballero, kiu ankaŭ rezervis por si la Ministrejon pri Milito kaj, kiu deklaris, ke li sin konsideris «kiel la rektan reprezentanton de ĉiuj fortoj luktantaj en la diversaj militfrontoj por la tenado de la demokratia Respubliko». Efektive la nova Registaro estis konsistigita de reprezentantoj de ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj kaj partioj, escepte de NKL-IAF, kiu ne formis parton de la Registaro ĝis la 4-a de Novembro, sed malgraŭ tio ĝis tiam al ĝi donis sian tutan subtenon.

Malgraŭ sia relativa malkonsekvenca sinteno, Largo Caballero defendis politikan linion multe pli maldekstran ol kio povis plaĉi al la ĉiunaciaj stalinistoj. Kompreneble li tre bone komprenis la bezonon pri armilaro kaj estis preta fari cedojn por atingi ĝin, sed li kelkfoje montris sin suspektema kaj eĉ malkaŝe malamika al la «konsiloj» de la sovetianoj. Tial Stalino mem per sia plej bela stilo al li skribis personan leteron, konvinkita sendube, ke la laborista oratoro tuj flamos pro amo ricevinte ĝin:

> «Endas altiri al la Registaro -skribas Stalino- la etan kaj mezan urban burĝaron aŭ ĉiuokaze havigi al ĝi la rimedojn por ke ĝi prenu neŭtralan sintenon favoran al la Registaro, kiu protektas ĝin kontraŭ ajna klopodo pri konfisko kaj garantias al ĝi la komercliberon (...) Endas ne malproksimigi la gvidantojn de la respublikanaj partioj, sed male endas altiri ilin, alproksimiĝi al ili kaj engaĝi ilin en la komunan penadon de la Registaro. Aparte necesas garantii al la Registaro la subtenon de Azaña (la Prezidanto de la Respubliko [C. S.-M.]) kaj de ties grupo kaj fari ĉion eblan por neebligi iliajn hezitojn. Tio ankaŭ necesas por ke la malamikoj de Hispanujo ne vidu en ĝi komunisman respublikon kaj tiel

> antaŭmalhelpi ilian malkaŝan intervenon, kio konsistigas la plej gravan danĝeron por la respublikana Hispanujo. Oni povus uzi la okazon kaj deklari per la gazetaro, ke la Registaro de Hispanujo ne toleros, ke iu, estu kiu ajn, atencu kontraŭ la posedaĵoj kaj kontraŭ la leĝaj interesoj de la eksterlandanoj en Hispanujo, de la civitanoj de la regnoj ne subtenantaj la faŝistojn.»[74]

Jen, per stilo de vilaĝa pastro, la programo, kiun Stalino elmetis al la hispanaj kontraŭfaŝismaj fortoj kontraŭ la militista helpo. Per unu fojo Trockij ne eraras kiam rimarkas:

> «Ĉi tiu ĉantaĝo ne nur servis al la respublikanoj, kiel preteksto por ilia kontraŭrevolucia politiko, sed ankaŭ al la socialistoj kaj eĉ al la anarĥiistoj, kiuj tiel pravigis sian kunlaboradon kun la Registaro postulitan de la stalinistoj. (...) Stalino, per siaj armiloj kaj sia kontraŭrevolucia ultimato, estis por ĉiuj tiuj grupoj la savanto. Li garantiis al ili, kion ili deziris: la militista venko super Franco samtempe liberigante ilin de ĉiu respondeco sur la irado de la revolucio. Ili rapidis kaŝi siajn socialismajn kaj anarĥiismajn maskojn, atendante povi ree uzi ilin, kiam Moskvo restarigos por ili la burĝan demokration. Por pli granda komforto, tiuj sinjoroj povis pravigi sian perfidon kontraŭ la proletaro per la neceso de la militista interligo kun Stalino. Siaflanke Stalino pravigis sian kontraŭrevolucian politikon per la neceso de la interligo kun la respublika burĝaro.»[75]

Ĉiuj stalinistoj, hispanaj aŭ ne, «politikaj», «militemaj» aŭ «policemaj» tuj aplikos la kontraŭrevolucian linion difinitan

74En *Guerra y revolución en España* [hispane, Milito kaj revolucio en Hispanujo], 2-a volumo, paĝoj 101-102.
75TROCKIJ, L.: *Ecrits* [france, Skribaĵoj], Eldonejo *IV Internacional*, 2-a volumo, paĝoj 538-539.

de Kremlo per brutala efikeco. Ni krome rimarkigu, ke la grandega plejmulto de ĉiaj teknikistoj, sekretaj agentoj, militistaj konsilantoj kaj ceteraj (el kiuj ni mencios kelkajn en ĉi tiu libro, sed ili estis miloj) estos ekzekutitaj reveninte en USSR-on. Estis la kutima metodo de la stalinista justico: periode plenumi la ekzekuton de siaj ekzekutistoj.

Kompreneble KPH estis, kiu estis realigonta «la plej penigan laboron». Helpata de militistaj konsilantoj, politikistoj kaj policistoj de KI kaj KPIA, ĝi strebis, ne sen sukceso, modifi laŭ la dezirata direkto la registaran politikon -kaj tiun de la partioj de la Popola Fronto-, militistigi la volontarmeojn, defendi la privatan propraĵon, restarigi la potencon de la centraliza ŝtato, unuvorte, bremsi la progresantan revolucion. Ankaŭ ili estis komisiitaj teorie pruvi al la homamasoj, ke tiu kontraŭrevolucia politiko estis la sola revolucia politiko ebla dum tiu «fazo de la lukto». Ĉi-rilate ĝi estis helpata de la delegitoj de KI, ĉefe de Ercoli-Togliatti kaj Codovila.

Tiel komunista gvidanto diris en Marto 1937 parolante pri tiu «manio socialigi kaj konfiski»: «Kial la laboristoj falis en tiun eraron? Unue pro malkono de la politika momento, kiun ni travivas, kiu al ili kredigi, ke ni estis en plena socia revolucio»[76]. Tio absurda de la burokrata mensogo atingas ĉi tie siajn plej belajn pintojn: la laboristoj kredas travivi socian revolucion -ĝis la ekstremo, ke ili ĝin faras- sed feliĉe la «partio de la laboristoj» estas tie por elrevigi ilin eĉ per la armiloj enmane se necesas. La Partio estas la posedanto de la revolucio kaj decidas, kontraŭ la homamasoj, kontraŭ la faktoj, kontraŭ la revolucio mem, ke tio, kio estas en la tagordo, estas... la burĝa revolucio! Tiel ĝin klarigas Dolores Ibarruri en la komunista ĵurnalo «*Mundo Obrero*» de la 30-a de Julio:

---

76«*Frente Rojo*» (30-an de Marto 1937).

«Estas la demokratia-burĝa revolucio, kiu alilande, kiel en Francujo, disvolviĝis antaŭ pli ol jarcento, kio estas realiĝanta nialande, kaj ni, komunistoj, estas la avangardaj luktantoj en ĉi tiu lukto kontraŭ la fortoj, kiuj reprezentas la malklerismon de pasintaj tempoj (...) En ĉi tiuj historiaj horoj, la Komunista Partio, fidela al siaj revoluciaj principoj, respektema al la volo de la popolo, lokas sin ĉe la Registaro, kiu estas la esprimo de tiu volo, ĉe la Respubliko, ĉe la demokratio.»[77]

77Parolado de la 25-a de majo 1937, citita de B. Bolloten, citita verko, paĝo 92.

# 4-a ĈAPITRO: LA KOLEKTIVIGOJ EN KATALUNUJO

La kolektivigoj en la «respublikana zono», ĉefe en Katalunujo kaj Aragono, estas laŭ mia opinio la plej grava fenomeno ene de la implikaĵo de revoluciaj okazaĵoj de ĉi tiu periodo.[78] La kolektivigoj, kiuj estis perforte kalumniitaj de iliaj kontraŭuloj komanditaj de la komunistoj, kiuj estis praktike longe ignoritaj de la historiistoj aŭ, kiuj estis idealigitaj de la plimulto de la anarĥiistaj komentariistoj, konsistigas kontraŭdiran realon, en kiu aperas pli klare ol en la «militista» aŭ «politika» medio la karaktero de kio estis decidiĝanta en tiu lukto. Oni atakis la tutan socian ordon per la transformadoj de la rilatoj de produktado, renversis la

78Ĵus aperis pluraj libroj, kiuj temas pri la kolektivigoj en la respublikana zono ĝenerale kaj en Katalunujo aparte. Ni citu: LEVAL, Gaston, *L'Espagne libertaire, 36-39* [france, La liberecana Hispanujo, 36-39], Eldonejo *du Cercle* kaj Eldonejo *de la Tête des Feuilles*, Parizo, 1972; ĝi estas la versio reviziita kaj korektita de la libro eldonita en la itala kun la titolo de *Ne Franco ne Stalin* (en la hispana: *Colectividades libertarias en España* [Liberecanaj kolektivigoj en Hispanujo], 2 volumoj, Eldonejo *Proyección*, Bonaero, 1972) MINTZ, Frank, *L'autogestion dans l´Espagne révolutionnaire* [france, La memmastrumado en la revolucia Hispanujo], *Editions Bélibaste*, Parizo, 1970. En Katalunujo mem oni eldonis: PÉREZ-BARÓ, Albert, *30 mesos de collectivisme a Catalunya* [katalune, 30 monatoj de kolektivismo en Katalunujo], *Ediciones Ariel*, Barcelono, 1970. BRICALL, Josep Maria, *Politica econòmica de la Generalitat* 1936-1939 [katalune, Ekonomia politiko de la kataluna Registaro, 1936-1939], *Ediciones 62*, Barcelono, 1970. *«Los de siempre», Colectividades campesinas, 1936-1939* [hispane, «La ĉiamuloj», Kamparanaj Kolektivigoj, 1936-1939], *Colección Acracia (Libertarios)* n-ro 15, *Tusquets Editores*, 1977. SOUCHY BAVER, Agustín, *Entre los campesinos de Aragón (El comunismo libertario en las comarcas liberadas)* [hispane, Inter la kamparanoj de Aragono (La liberecana komunismo en la liberigitaj distriktoj)], *Colección Acracia (Libertarios)* n-ro 21, *Tusquets Editores*, 1977.

tutan ekonomian vivon, disfalis la tutan hierarĥian piramidon de la socio. Ne nur oni tute ignoris la «plej sanktajn» principojn de la privata propraĵo, sed ankaŭ tiujn aliajn principojn -ankaŭ la «plej sanktajn» por la nomitaj partioj de «avangardo»-, kiuj pravigis la dividon inter gvidantoj kaj plenumantoj.
Sed ni tuj vidos kiel, laŭlonge de ilia sperto, la laboristoj devis lukti -kaj kiel ili ne sciis efike fari ĝin- ne nur kontraŭ la malfacilaĵoj propraj, ekzemple, al la milito, ne nur kontraŭ la senkaŝaj kontraŭuloj de la kolektivigoj, sed ankaŭ kontraŭ la novaj obstakloj estigitaj de tiu sperto mem.
La unua konstato, kiun ni faras, temas pri la spontanea karaktero de la spertoj pri kolektivigo. En ĉi tiu amasa kaj spontanea movado de la kolektivigoj estas sur kio plej bone povas bazi sin mia aserto pri la graveco de la aŭtonoma movado de la laboristaj amasoj en Katalunujo, kiu alie estus nur «maldekstrisma» babilado.
Efektive la 18-an de Julio la gvidantaj komitatoj de NKL-IAF ĵetis la instrukcion de revolucia ĝenerala striko por alfronti la militistan ribelon en Norda Afriko. «Ĝuste la 28-an de tiu sama monato, la komitatoj mem donis pure kaj simple la ordonon reveni en la laborpostenon.»[79] Nu ekde la 21-a de Julio komenciĝis la unuaj konfiskoj. La movado komenciĝis en la publikaj servoj. Tiun tagon mem la katalunaj fervojistoj kolektivigis la fervojojn. La 25-an la urbajn transportojn, la 26-an la elektroservon kaj tiel plu.
«Ĝis la unuaj tagoj de Aŭgusto, NKL ne okupis sin laŭ oficiala kaj organizita maniero direkti la kolektivigojn.»[80] Ĝia unua oficiala reago estis limiganta: la gvidantoj de NKL intervenis por ke ne estu kolektivigitaj la fremdaj entreprenoj, kiel la konsulejoj krie postulis.
Ene de granda movado de entuziasmo, la laboristoj, ignorante ajnan specon de «gvidinstruisto», ĵetis sin

---

79PEIRATS, José, en «*Presència*», n-ro 5 (Septembro-oktobron de 1966).
80PEIRATS, José, en «*Presència*», n-ro 5.

kolektivigi la industriojn, la publikajn transportojn, la publikajn servojn, komercojn kaj inkluzive salonojn kaj industriojn de la spektaklo, kafejojn, hotelojn, frizejojn ktp. De la komenco ĉiu kolektivigo estis aparta afero, sed malgraŭ tio ili povas klasifiki sin laŭ tri ĉefaj sektoroj (mi poste parolos pri la terkulturo):
1) Entreprenoj en kiuj la posedanto teorie daŭris en sia posteno, sed en kiuj la laboristoj elektis Komitaton pri Laborista Administrado, kies povoj almenaŭ komence estis tiel realaj, kiel vastaj (ĉefe temis pri alilandaj entreprenoj).
2) Entreprenoj en kiuj oni anstataŭigas pure kaj simple la mastron per elektita komitato.
3) Socialigitaj entreprenoj.
La fundamenta diferenco inter kolektivigitaj kaj socialigitaj entreprenoj estas, ke ĉi tiuj lastaj grupigis ĉiujn entreprenojn en sama branĉo de produktado. La plej bona ekzemplo sendube estas la industrio de la ligno, kiu sub la gvidado de la Sindikato pri la Ligno (NKL) unuigis ĉiujn aktivecojn rilatajn al la ligno, de la dehako de arboj ĝis la vendo de mebloj, tute reorganizante manlaborejojn kaj magazenojn. La socialigitaj entreprenoj tamen estis malplimulto. La kolektivigitaj entreprenoj kutimis sin ignori reciproke, eĉ tiuj de sama industria sektoro, ĉu la teksa aŭ la metalurgia.
Ĉi tiuj kolektivigoj havis vastegan disvastigon tra la tuta Katalunujo, kie pli ol la 70 % de la industriaj kaj komercaj entreprenoj estis konfiskitaj de siaj laboristoj, malmultajn tagojn post la militista ribelo de la 19-a de Julio. En kelkaj malgrandaj urboj -aŭ vilaĝoj- de la kataluna zono kaj ĉefe en Aragono, oni enkondukis originalajn metodojn, kiuj unuigis la terkulturajn kaj industriajn kolektivigojn en la sino de liberecana komunumo.
La ĉefroluloj de ĉi tiu kontraŭkapitalisma ondego sendube estis la anarĥiistaj kaj anarĥisindikatistaj laboristoj de NKL. Evidente ili obeis neniun instrukcion de «supre», ĉar iliaj gvidantoj komence restis ĉi-rilate mutaj, ĉar ili estis tre

okupataj «farante politikon» (kaj ankaŭ organizante la militon). Sed ĉi tio al ili ne prezentis gravajn problemojn de konscienco, ĉar ili faris nenion pli ol apliki la liberecanajn ideojn, ĉefe tiujn konkretigitajn en la juŝa Kongreso de Zaragozo. Ili apartigis sin de siaj gvidantoj laŭ la senco, ke ili decidis, ke venis la tempo efektivigi ĉi tiujn ideojn dum la gvidantoj siaflanke decidis, ke endis foroferi la «programon de la liberecana komunismo» je la nomo de la kontraŭfaŝisma unuiĝo.

Endas rimarkigi, ke la kolektivigoj estis objektive favoritaj de la fuĝo eksterlanden -aŭ en la frankistan kampon- de multaj mastroj, administristoj aŭ direktistoj de entreprenoj. En sia libro *Por qué perdimos la guerra* (hispane, Kial ni malvenkis la militon), Diego Abad de Santillán malkaŝas, ke dum la dekkvin tagoj antaŭintaj al la frankista ribelo, estis eltiritaj 90 milionoj da pesetoj el la katalunaj bankoj. Kompreneble la kapitalistoj ne estis fuĝontaj kun la manoj malplenaj. La restantaj mastroj, kiuj ne estis forigitaj el la «socia sfero» kaj akceptis la novan reĝimon, trovis laborpostenon en sia malnova fabriko laŭ sia profesia kompetenteco (oni kalkulas, ke ili estis ĉirkaŭ 10 procento). Ili povis esti inĝenieroj aŭ librotenistoj aŭ komercaj agentoj aŭ eĉ simplaj laboristoj. Ilia salajro estis egala al tiu de kiuj plenumis identan funkcion. Daniel Guérin ne eraras, kiam rimarkigas, ke la katalunaj laboristoj rilate aliajn samtipajn spertojn havis la sorton disponi la kunlaboradon de relative grava nombro de inĝenieroj kaj teknikistoj. «Dum pli ol kvar monatoj, la entreprenoj sur kiuj flagris la ruĝa kaj nigra flago de NKL estis direktitaj de la laboristoj, grupigitaj en Revoluciaj Komitatoj.»[81]

Tamen baldaŭ ekestiĝis gravaj malfacilaĵoj en kelkaj industriaj sektoroj, malfacilaĵoj, kiuj estis kaŭzataj, inter aliaj aferoj, pro la manko de krudmaterialoj kaj la malpliigo de la

81GUÉRIN, Daniel: *L´Anarchisme* [france, La Anarĥiismo], Eldonejo *Gallimard*, Kolekto «*Idées*», paĝo 157.

merkatoj pro la milito. «La situacio ne estas tiel bona en la teksa industrio (tiutempe tre grava en Katalunujo [C. S.-M.]): pro la manko de krudmaterialoj oni nur laboras 2 aŭ 3 tagojn semajne en multaj fabrikoj, sed oni pagas la salajron respondan al 4 tagoj. La plidaŭrigo de ĉi tiu situacio malfortigas la entreprenojn. La monprofitoj de la laboristoj, kiuj nur enspezas kvartagajn salajron, estas nesufiĉaj. Ĉi tio ne estas konsekvenco de la kolektivigo, sed de la milito. La kataluna teksa industrio perdis siajn ĉefajn merkatojn. Parto de Andaluzio, Ekstremaduro, Kastilio la Malnova kaj la tuta nordo de Hispanujo kun la dense loĝata kaj industriema regiono de Asturio, estas en manoj de la faŝistoj.»[82]
Kion la aŭtoro ne diras, estas, ke la kataluna Registaro mendis ŝtofon por la uniformoj de la nova armeo eksterlande, tiel granda estis ĝia malfido (por ne nomi ĝin alimaniere) pri la kolektivigoj. La situacio pliboniĝis komence de 1937: la kataluna teksa industrio tiam laboris por la respublika armeo.
Tamen la laboristoj faris plurajn gravajn erarojn. Unu el ili estis ne tuŝi la bankojn, ili tiel ripetis la eraron de siaj distingitaj antaŭuloj de la Komunumo de Parizo. La kataluna Registaro estis, kiu administris ĉiujn katalunajn bankojn. Ĉi tio kreis malfacilaĵojn inter ĝi kaj la Banko de Hispanujo kaj sekve la centra Registaro, kiel ni vidos poste, sed samtempe ĉi tio al ĝi permesis efektivigi tre efikan premon sur la kolektivigitajn entreprenojn kun financaj malfacilaĵoj aŭ eĉ nur kun malfacilaĵoj pri monfluo.

82SOUCHY, A.: *Collectivisations: L'Oeuvre constructive de la Révolution Espagnole (1936-1939)* [france, Kolektivigoj: La konstrua verko de la Hispana Revolucio] (kompilaĵo de dokumentoj), Eldonoj de NKL, Toulouse, reeldonita en 1965, paĝo 21. Longe ĉi tiu broŝuro estis la sola meze sistema verko pri la afero, eldonita en la franca.

## LA KONFISKOJ

La 27-an de Julio, la oficistoj de la maraj agentejoj aliĝintaj al ĜUL prezentiĝis en siaj oficejoj kaj plenumis la konfiskon de la Kompanio *Transatlántica*. Same okazis en la Kompanioj *Mediterráneas, Ibarra, Ramos* ktp. Ĉi tiu konfisko estas preskaŭ la sola ekzemplo en kiu ĜUL prenis la iniciaton kompare kun NKL. Ni memorigu, ke ĜUL, kiu estis eta organizaĵo en Katalunujo, tamen havis kelkajn sekciojn inter la oficistoj, malgrandaj funkciuloj kaj aliaj proletoj de «blanka kolumo». Tamen NKL partoprenis ekde la unua momento en la Centra Komitato pri Administrado de la Kompanio *Transatlántica*, kiu estis konsistigita jene: tri membroj de NKL, tri de ĜUL kaj du registaraj delegitoj, unu el la kataluna, alia de la centra Registaro.
La ŝiparo de ĉi tiu kompanio estis de cent mil tunoj. La unua dispono de la Centra Komitato, kiu direktis la aktivecojn de la komitatoj de ŝipoj, magazenoj, oficejoj ktp, estis eksigi la administristo-direktiston, ties asistanton kaj preskaŭ ĉiujn respondeculojn de la malnova direktistaro. Ankaŭ oni interrompis la pagon al la akciuloj.
En Barcelono la publikaj servoj de transporto, tramoj, metroo kaj buso konsistigis unuunuran privatan entreprenon. De la 19-a de Julio, la Unuunura Sindikato pri la Transporto decidis la konfiskon. La entrepreno restis dividita en tri sektoroj: Tramoj, Metroo kaj Buso. Ĉekape ĉiu branĉo oni elektis Komitaton. La kataluna Registaro ankaŭ enoficigis delegiton, sed ties rolo almenaŭ komence nur estis simbola. La organiza strukturo kreita de la sekcio de tramoj servis kiel modelo al la ceteraj sekcioj. Oni elektis Komitaton de Entrepreno konsistigitan de delegito de ĉiu branĉo aŭ sekcio de laboro. Ĉiu sekcio havis sian Komitaton, kiu organizis sian laboron kunordigita kun la Komitato de Entrepreno. Unu el la plej gravaj disponoj estis la egaligo de salajroj. La inĝenieroj kaj teknikistoj daŭrantaj en sia laborposteno, ekzemple, konstatis kiel malpliiĝis ilia salajro dum la plej

malaltaj salajroj pliiĝis. Oni reorganizis la laboron forigante la burokratajn postenojn, kiujn oni konsideris senutilaj. De Julio 1936 ĝis la militfino, la servoj de urba transporto de Barcelono en manoj de la laboristoj funkciis pli bone ol antaŭe -laŭ multnombraj atestoj.

La 21-an de Julio la fervojistoj prenis la relvojojn de katalunaj fervojoj: M.Z.A.* kaj de la Nordo. Tuj stariĝis Revoluciaj Komitatoj, kiuj ankaŭ okupis sin pri la defendo de la stacidomoj kaj la nodoj de trafikvojoj. Ankaŭ ĉi tie, kiel en la urbaj transportoj kaj kiel en la 99% de la okazoj, estis la aktivuloj de NKL, kiuj prenis la iniciaton, sed poste la membroj de ĜUL -oficistoj, teknikistoj- formis parton de la Revoluciaj Komitatoj kun la samaj rajtoj, kiel tiuj de NKL, ĉar oni ne konsideris la proporcion de aliĝantoj. Ĉiuj katalunaj linioj de fervojo estis kolektivigitaj de la fervojistoj, organizitaj en Revoluciaj Komitatoj de stacidomo, deponejoj ktp. Oni komunikis al la malnovaj servestroj, ke ili estis maldungitaj. Tamen iuj revenis en la laboron, ne jam kiel direktistoj –rolo, kiun surprenis la Komitatoj-, sed kiel teknikistoj.

En Katalunujo, la telefona servo estis privata propraĵo de usona trusto. Obeante la ordonojn de la kataluna Registaro kaj tiujn de siaj propraj gvidantoj, la sindikatoj de telefonservoj ne kolektivigis tiun entreprenon, sed ili starigis en ĝi rigidan laboristan administradon direktitan de komitatoj NKL-ĜUL en ĉiu centralo sur la tuta Katalunujo. La usonaj «mastroj» -aŭ ties hispanaj reprezentantoj- ne havis aliajn aktivecojn ol kontroli la «enirojn» kaj «elirojn» de siaj pesetoj. Inter aliaj disponoj oni al ili trudis la eksigon de la direktistoj kaj servestroj konsideritaj netaŭgaj kaj tro bone pagitaj.

Estus tro longe laŭorde citi la liston de kolektivigoj. Antaŭ ol studi per pli detalo kelkajn konkretajn aferojn, ni rimarkigu,

---

*NeT: Kompanio de Fervojoj de Madrido al Zaragozo kaj Alakanto

ke la «kolektiviga» tajdo invadis preskaŭ la tutan produktadan aktivecon de Katalunujo, eĉ la frizejojn: la sindikataliĝintaj frizistoj eksigis siajn mastrojn kaj ili mem administris siajn salonojn, forigante la dankmonojn kaj trudante ununurajn prezojn. En kelkaj kafejoj kaj hoteloj oni faris tion saman. La komunistoj, volante pruvi la «kolektivigan frenezon» de la anarĥiistoj, diris, ke la famaj bordeloj de la ne malpli fama «ĉina kvartalo» de Barcelono ankaŭ estis kolektivigitaj. Sed ni trovis neniajn spurojn pri tiu interesa iniciato en la dokumentoj kaj libroj temantaj pri tio...
Male ekzistas abunda dokumentaro pri la kolektivigoj realigitaj de la Sindikato pri la Spektaklo de NKL. La tuta teatra, kina, danca, koncertkafeja aktiveco estis kolektivigita. Filmproduktadestroj, mastroj kaj ceteraj posedantoj estis eksigitaj kaj la sindikato senpere direktis ĉiujn aktivecojn de la spektaklo, okupis sin tiel de la programoj, kiel de la salajroj de la artistoj, la prezo de la enirbiletoj ktp.

**LA SINDIKATO PRI LA LIGNO**

La Sindikato pri la Ligno realigis, kiel mi jam diris, la «socialigon» de ĉi tiu industrio. Estas la ekzemplo de tio, kion NKL tiam komprenis kiel socialigon: unuiĝo de ĉiuj entreprenoj kaj aktivecoj de industria branĉo en la sino de sola socialigita institucio senpere administrita de la responda sindikato. La sindikato -kaj kompreneble ne nur tiu pri la Ligno - ŝanĝiĝis de «naturo». De institucio de «ekonomia kaj revolucia lukto de la proletaro», kio ĝi diris esti -kio plejparte reale estis NKL antaŭ 1936-, ĝi iĝis la organizanto kaj administranto de serio da esencaj sektoroj de la ekonomio, kiam «la eksproprigantoj estis eksproprigitaj». En la revolucia Katalunujo, la Sindikato (NKL) estis plenumonta rolon preskaŭ sen egalan en la historio de la internacia laborista movado: post malmultaj tagoj ĝi iĝis la unua politika forto de la lando -plenumante

decidan rolon, de la Centra Komitato pri Volontarmeoj ĝis la plej malgrava Revolucia Komitato de kvartalo-, la plej grava militista forto, kvankam nur estu pro la kvanto de voluntarmeanoj, kaj samtempe la esenca kerno de la kataluna ekonomio, kies tri kvaronaj partoj estis kolektivigitaj de la laboristoj mem. Ĉi tiu originala situacio kaŭzis tutan serion da malfacilaĵoj kaj kontraŭdiroj. La unua kaj plej evidenta el ĉiuj ili estis la naskiĝo -rapide likvidita de la malvenko- de laborista burokrataro.

* * *

La 6-an de Oktobro 1936 la Unuunura Sindikato de la Branĉo pri la Ligno (NKL) publikigis raporton pri sia agado, kiu komenciĝis tiel:

> «NI CELAS ĈION. Ni jam diris en alia artikolo, ke endas celi ĉion, ke endas renversi ĉion ekzistantan; endas sanigi la fokusojn de infekto. Ni devas doni impreson de stabileco rekonante, ke la burĝa reĝimo atingis ĝian finan horon.
> Ni devas renaskigi la fidon inter la laboristoj. Ni al ili devas diri kaj diras: Laboristoj de la Ligno: la mastroj ne ekzistas kaj por ke vi klare konstatu tion, ni prezentas ĉi tiun bilancon. La mastroj, lignaĵistoj rifuĝintaj en la kaverno de *trabucaires del Fomento*,[83] jam ne ekzistas kaj anstataŭe la Branĉo pri la Ligno instalis unu el siaj oficejoj.
> La meblista kanajlaro, kiu havis sian sidejon en la Lernejo de Metiistoj, hodiaŭ tute malorganizita, detruita, jam ne ekzistas kaj la ejo kaj dokumentaro estas sub nia prigardo. La "Enpakista kaj Tapiŝista Labormastraro" ankaŭ malaperis. Ejoj kaj dokumentaroj estas en nia Povo. Ni celas ĉion kaj

83«*Trabucaires del Fomento*»: la banditoj de la labormastra organizaĵo (*Fomento*).

> havas la devon trudi nin kaj ni nin trudas kiel revolucia sektoro. La malgrandajn mastrojn ni regrupigis en grandaj manlaborejoj. Kaj atingita ĉi tio, ni direktas la tutan produktadon. Kreinte niajn konfederaciajn manlaborejojn, ni devas kreskigi niajn aktivecojn. Ni volas, kaj kiam ni ĝin diras, estas, ĉar ni certas pri tio, povi esti post nelonge la solaj, kiuj havos sub nia direktado la tutan produktadon. Ĉiuj laboroj devas fariĝi pere de la Sindikato, ĉar kvankam veras, ke antaŭe ili estis institucioj de lukto kontraŭ la kapitalo, hodiaŭ devas esti la regulantoj de la produktado»[84].

Identan tonviglecon ni konstatas en la jena teksto publikigita la 25-an de Decembro 1936 en la Bulteno NKL-IAF, sed ĉi-foje ĝi ne nur turnas sin kontraŭ la mastroj.

> «...Anstataŭ atingi la veran konfiskon, anstataŭ doni vastan kontentigon al la popolo, oni devigas al la mastroj pagi la semajnan salajron kaj pliigas la salajrojn kaj malpliigas la laborhorojn.
> Kaj ĉi tio en plena milito! Fare de la kataluna Registaro la konfisko de ĉiuj varoj, oni akceptas la lombardon sur imagaj inventaroj kaj pruntedonas tiel fabelajn monkvantojn, ke hodiaŭ ili devas penti sin, kiam farita la bilanco oni povos pruvi la kvanton da milionoj, kiun oni elspezis ne produktante kaj, kiu tiom malfortigita lasis la ekonomion.
> Oni kreis multe da parasitaj burokratoj (substrekita de mi, [C. S.-M.]), kion la Branĉo pri la Ligno klopodis por malpliigi en la laborpostenoj, kiujn ĝi direktas. Estas tro da neproduktantaj komitatoj pri administrado, kaj ĉi tio ne estas justa...»
> . . . . . . . .

84Personaj arkivoj.

> «Ni, la Sindikato pri la Ligno kun ampleksa sento de respondeco, konstatante la momenton, volis ne nur daŭrigi la iradon de la revolucio, volis direkti ĝin konsiderante nian ekonomion, la ekonomion de la popolo. Tiucele ni kolektis ĉiujn malgrandajn posedantojn, tiujn malgrandajn nepagokapablajn mastrojn sen propraj vivrimedoj, ni surprenis la etajn manlaborejojn konsistigitajn de eta nombro de laboristoj ne demandante al ili, al kiu sindikata centralo ili apartenis, nur vidante neniofarantajn laboristojn, kiuj malutiligis la ekonomion.
> Tiel do: el ĉi tiuj manlaborejoj, nur uzante niajn proprajn rimedojn kaj la kotizojn de la laboristoj, ni instalis konfederaciajn manlaborejojn konsistigitaj de ducent aŭ pli da laboristoj, kiel neniam ekzistis en Barcelono kaj tre malmultaj en la cetero de Hispanujo.»

Sciiginte la miskomprenon kaj la sabotadon, kiujn ĉi tiu reorganizo de la industrio de la ligno kaŭzis en ĉiuj medioj, ili plendas pri la sinteno de la registaraj Komitatoj pri Kontrolo koncerne ilin. Ĉi tiuj al ili vendis la krudmaterialojn, kiujn ili bezonis, kontraŭ supermezuraj prezoj. Ili nur atingis esti prenitaj serioze –plu daŭras la teksto- kiam ili pagis siajn ŝuldojn en la fiksita limtempo, kiu ajn estu la prezo, kion certe neniu tiam faris en Katalunujo. Ĉiel ne sufiĉas fari kelkajn deklarojn pri principoj por forigi la komercan spiriton de la sociaj rilatoj. La teksto finiĝas tiel:

> «Estas miskompreno, kiam oni asertas, ke ni ne akceptas la Dekreton pri Kolektivigo. Tute male, ni akceptas ĝin, sed sur la praktika kampo ni al ĝi donas alian interpreton. Tio facila, tio logika por iuj estintus fari tiujn kolektivigojn, kiuj ne estas alia aĵo ol grandaj kooperativoj, en kiuj nur la industrioj kun propra vivo havos garantiita sian ekziston. Sed anstataŭe ili lasas

forlasitaj la malriĉulajn je iliaj propraj rimedoj, kio ne estas alia aĵo ol krei du klasojn: la novaj riĉuloj kaj la eternaj malriĉuloj. Neegaleco, kiun oni ne povas toleri! Ni akceptas la kolektivigon de ĉiuj industrioj, sed kun sola sparkaso por atingi la justan dividon. Kion ni ne akceptas, estas ke estu malriĉaj kaj riĉaj kolektivigoj. Jen la vera problemo de la kolektivigo: aŭ oni kolektivigas ĉiujn branĉojn de la produktado ĝenerale aŭ permesas fari praktikajn provojn...»[85]

La vera problemo de la kolektivigoj estis tiu prezentita de la neegaleco, estigita de ĉiaj faktoroj (manko de mono, merkatoj, krudmaterialoj ktp), inter la kolektivigitaj entreprenoj, kiuj plejparte estis sendependaj, formante izolitan societon kaj agante por sia propra profito.
La problemo de la kunordigo inter la kolektivigitaj entreprenoj estis rapide konstatita de multnombraj sektoroj de NKL kaj ne nur de la Sindikato pri la Ligno. En Oktobro 1936 oni okazigis en Barcelono sindikatan Kongreson, kiu reprezentis 600.000 laboristojn, kies celo estis la socialigo (laŭ la senco, kiun oni indikis antaŭe) de la industrio. Oni decidis adopti serion da praktikaj disponoj celantaj grupigi ĉiujn aktivecojn de la diversaj branĉoj, ĉio ĉi sub la gvidado kaj la direktado de la sindikatoj. Sed ĉi tiuj disponoj, kiuj pretendis respondi la realajn malfacilaĵojn, neniam aplikiĝis laŭ efektiva maniero. Poste la Dekreto pri Kolektivigo de la 24-an de Oktobro 1936 proponis malsaman organizon en kiu kompreneble la ŝtato estos, kiu direktos la tutan aparaton de la sindikatoj kaj de la diversaj komitatoj.
Por lukti kontraŭ la problemo de la «riĉaj» kolektivigoj, kiuj malinteresis pri la sorto de siaj «malriĉaj fratoj», ĉiuj, tiel la kataluna Registaro, kiel la sindikatoj, multigis la administrajn kaj burokratajn klopodojn, la instituciojn pri kontrolo ktp. -la parazitaj burokratoj denuncitaj de la Sindikato pri la Ligno-,

85Personaj arkivoj.

kiuj malsukcesis atingi veran demokratian «planadon», sed ke anstataŭe ili faris, ke multiĝis la konfliktoj kaj la misuzoj propraj al la laborista burokratismo.
La Sindikato pri la Ligno ŝajne atingis sufiĉe bone, koncerne ĝin mem, solvi la problemon de la kunordigo. Kiel ni vidis, ĝi rapide liberigis sin de la mastroj, grupigis en vastaj manlaborejoj la malgrandajn linaĵistajn metiistojn kaj aliajn kune kun la laboristoj ĉarpentistoj ktp, manlaborejoj, kiuj ankaŭ okupis sin pri la vendo de la produktaĵoj, kiujn ili fabrikis. La transformado de la etaj kaj ĉie disigitaj entreprenoj en la konfederaciajn manlaborejojn, kie estis grupigitaj la diversaj aktivecoj de la industrio de la ligno, ebligis planadon de la produktado, malpliigon de la neproduktopova burokratismo kaj egaligon de la salajroj de la laboristoj, dispono, kiun oni renkontas en la grandega plejmulto de la spertoj pri kolektivigo. Teorie ŝajnas, ke ekzistis la kondiĉoj bezonaj por vera laborista administrado de la produktado. Sed la «administristo» estis precize kaj klare nomumita; estis la sindikato. Kiam la tekstoj de la Sindikato pri la Ligno asertas, ke la sindikatoj estis kiuj devis «administri la produktadon», ili estas ene de la plej pura ortodokseco de NKL. Kiel mi sentas grandan malfidon al ajna ortodokseco, plaĉus al mi preterpasi la vortojn kaj pli ĝuste scii kion signifis sindikata administrado en la industrio de la ligno. Al ni mankas dokumentoj -aŭ mi ne sciis trovi ilin. Por mi evidentas, ke oni neniel povas konfuzi sindikaton pri la ligno kun laboristoj de tiu industrio. Ni donas banalan ekzemplon: Sindikato povas esti tiel la ĝenerala sekretario kaj ties asistantoj, kiel la aro de la membroj de NKL (tio estas, la plejmulto de la laboristoj) demokratie praktikantaj siajn rajtojn kaj reale kaj kolektive realigantaj la administradon de la produktado.
En la unua hipotezo, «en nomo de la sindikato», ties gvidantoj povis trudi kelkajn disponojn al la laboristoj, manipuli la asembleojn kaj la voĉdonojn kaj finfine

rekonstrui la monopolon de la scio kaj la potenco profite de la «direktistaro». Tio estas konata mekanismo –kiun mi resumas-, kiu kondukas al la burokrata hierarĥiigo. En la dua, estus interese studi kiel plenumintus sin la laboristaj demokratio kaj administrado pere de la Sindikato kaj, kiuj estis la rilatoj de NKL al la malplimulta ĜUL kaj al la ne sindikataliĝantoj -almenaŭ dum la unuaj semajnoj-, ĉar la aliĝo al sindikato tre baldaŭ fariĝis preskaŭ deviga. La ideologio de NKL estas rilate tion obstaklo por la analizo: ĉar la sindikato estas la supera formo de socia organizado kaj de laborista demokratio, la administrado de industrio fare de la responda sindikato, devige endas esti efika kaj demokratia! La magia vorto de sindikato kaŝas la konfliktojn, kiuj povus ekzisti.

## LA TEKSA INDUSTRIO

La teksa industrio tradicie estis unu el la plej gravaj katalunaj industrioj. Sed ĝia strukturo estis arkaika eĉ tiutempe kaj ekzemple oftiĝis la malgrandaj manlaborejoj.
Jen kelkaj aspektoj de la oficiala bilanco pri la kolektivigo en la teksa industrio laŭ la informo de la ununura Sindikato de Barcelono (NKL) publikigita sen dato en la broŝuro de NKL: La konstrua verko de la hispana revolucio:

> «Unu el la plej gravaj industrioj de Katalunujo, ĉefe koncentrita en *Sabadell* kaj *Tarrasa*, estas la teksa. La ununura Sindikato administras, nur en Barcelono, 40.000 laboristojn de NKL. La kvanto da laboristoj administritaj de la du sindikataj centraloj estas ĉirkaŭ 230.000 laboristoj, el kiuj 170.000 apartenas al nia Konfederacio. Inter la sindikataliĝantaj laboristoj ĉirkaŭ 70% apartenas al NKL kaj ĉirkaŭ 30% al ĜUL.
> Salajroj: antaŭ la movado, la laboristoj de la sektoro de tinkturado enspezis salajron de 68 pesetoj semajne. Hodiaŭ ili enspezas 78.20, kio estas kresko

de la 15 procento. La laboristoj de la sektoro de bontenado enspezas la saman salajron.
Trikado: la laboristoj de ĉi tiu subdivido popece laboris kaj antaŭ la 19-a de Julio enspezis 175 pesetoj semajne, surbaze de mezumo de 10 laborhoroj tage. Hodiaŭ ili enspezas 135 pesetojn je semajno de 40 horoj kaj laboras je tagoj.
La laboristinoj, kiuj laboris popece per "*Standard*" kaj enspezis 60 ĝis 70 pesetojn, hodiaŭ enspezas salajron de 65 pesetoj semajne.
La salajroj de la industriaj teknikistoj pasis de 250-350 pesetoj al 200-250 pesetoj semajne.
Tiuj de la submastroj de servo de 125 al 125-130 pesetoj.
Laŭ ĉi tiuj nombroj ŝajnas, ke la salajroj malpliiĝis.
Fakte estis evidenta avantaĝo por la laboristo, ĉar li havas fiksan salajron, sekuran kaj konstantan, ĉar malaperis la popeca laboro. Antaŭ la 19-a de Julio la laboristoj laboris per "*Cotton*" kaj "*Standard*"; por atingi la salajrojn, kiujn ni antaŭe menciis, ili devis labori 80 semajnajn horojn; hodiaŭ en la fabrikoj en kiuj ne estis adoptita la malpliigita semajno (pro malabundeco de krudmaterialoj), oni nur laboras 40 horojn.
La koeficiento de salajro-laborhoroj estas tre supera ĉi-momente al tiu ekzistinta dum la burĝa reĝimo.»
(Ĉi tiuj argumentoj al mi ŝajnas malmulte konvinkaj [C. S.-M.])
«Volontarmeoj en la militfronto. La nombro de aliĝantoj al NKL de la teksa sektoro, kiuj forlasis sian laborpostenon en la fabrikoj kaj manlaborejoj administritaj de nia Konfederacio por iri militfronten, estas tre alta. Ni povas diri, ke en la nuntempa momento la laboristaro tre malpliiĝis en ĉi tiu branĉo de la industrio. En la urbo de Barcelono, de 20.000

ĝis 25.000 homoj aliĝintaj al NKL deiris kiel voluntuloj al la militfronto, dum de ĜUL nur ĝin faris 3.000.
Mondonacoj por la viktimoj de la faŝismo. USMT (Ununura Sindikato Metia kaj Teksa) ĝis hodiaŭ donacis 2.500.000 pesetojn al la Komitato por la viktimoj de la faŝismo. Pro la malpliigo de la laboro kaŭzita de manko de krudmaterialoj, la mondonacoj, kiuj antaŭe estis de 110.000 semajnaj pesetoj, malpliiĝis ĝis 55.000.»[86]

Indikinte, ke la laboristoj de la teksa sektoro donacis la 5 ĝis la 15 procentojn de siaj salajroj, laŭ la monkvanto, al la Komitato pri Volontarmeoj por la militbezonoj, la informo plu priskribas la strukturon de la organizo de la kolektivigitaj entreprenoj. Eble endus bedaŭri la malprecizecon de la frazo «preskaŭ la tuta teksa industrio estas kolektivigita en Katalunujo», kiu al ni ne indikas, kiu estis la procento de industrio, kiu ankoraŭ estis privata, nek la rilatojn inter la kolektivigita industrio kaj la Komitatoj pri Kontrolo en la privata industrio. Tamen la dua parto de ĉi tiu informo komencanta per: «Plenuminte la kolektivigon, la Komitatoj pri Kontrolo iĝos teknikaj administraj Komitatoj», ŝajnas indiki, ke en la tempo, kiam tiu informo estis redaktita (septembron aŭ Oktobron 1936, pro la aludoj al la Komitato pri Volontarmeoj) la kolektivigo neniel estis finita.
La organiza strukturo estis klasika el la vidpunkto de NKL. Temis pri piramido el komitatoj: Komitato de Entrepreno, Loka Komitato, kiu grupigas la delegitojn de la Komitatoj de Fabriko de la loĝloko, Komitato de Zono, Regiona Komitato (por NKL, Katalunujo ĉiam estis «regiono») kaj Nacia Komitato de la Teksa. La tekstoj insistas pri la demokratia aspekto de la organizaj strukturoj, ne nur, ĉar ĉiuj iliaj

86SOUCHY, A.: *Collectivisations*... [france, Kolektivigoj…] paĝoj 48-50. Endas rimarkigi kiel «reakcian spuron de la estinteco», ke la salajra diskriminacio koncerne la virinojn (sendube spegulo de pli ĝeneraligita diskriminacio) daŭris tiel en la industriaj, kiel en la kamparaj kolektivigoj.

komitatoj estis elektitaj, sed ankaŭ ĉar, okaze de konflikto, oni decidas turni sin al la plena Asembleo de laboristoj de entrepreno aŭ inkluzive de loĝloko, kaj ĉi tiu Asembleo estas la decidanto. Kiam la konflikto lokiĝas en pli «alta» nivelo, zono, regiono aŭ nacio, la Asembleoj de delegitoj aŭ la Kongresoj estas kiuj memkompreneble decidas.
Sur la papero ŝajnas, ke estas kunordigo per la elektitaj komitatoj inter ĉiuj katalunaj teksaj entreprenoj, kio faris, ke eblis lukti kontraŭ la neegalecoj pri kiuj mi jam parolis. Tamen la informo limiĝas konstati, ke pro la laboro kaj la malpliigitaj salajroj la laboristoj de kelkaj entreprenoj nur povis pagi malgrandan kotizon por la militbezonoj. Oni ne mencias la antaŭviditajn rimedojn por solvi ĉi tiun situacion. Ĉu ĉi tiu kunordigo ja sukcesis superi la stadion de la bonaj deziroj? Cetere oni ne scias tion, kio postvivis, kiam la Dekreto pri kolektivigoj starigis alian ŝtata-sindikatan strukturon.
Ankaŭ plaĉos al ni havi pli da informo pri la fakto, ke ĉiu komitato, kiu siavice estis subdividita en kvar aŭ kvin fakoj, rajtis nomumi «la teknikan kaj burokratan (laŭtekste) dungitaron bezonan por realigi siajn funkciojn».

## LA METALURGIA INDUSTRIO

En la metalurgia sektoro la aferoj ankaŭ ne estis tro simplaj. Endas rimarkigi antaŭ ĉio, ke kelkaj sufiĉe gravaj metalurgiaj fabrikoj estis eksterlandaj kaj, ke ili sekve ne estis kolektivigitaj. Kelkaj, kiel *Barret S.A.*, kiu estis kolektivigita, kiam la belga Konsulejo intervenis komunikante, ke la 80% de la kapitalo de tiu entrepreno estis belga, oni devis decidis alion kaj pasi de la kolektivigo al la laborista administrado.
Evidente la kataluna metalurgio tute -aŭ preskaŭ tute- iĝis militindustrio, kiun oni klopodis por meti, unue sub senpera regado de la Komitato pri Volontarmeoj, poste sub la admistrado de la kataluna Registaro kaj laste sub tiu de la

centra Registaro, kiel oni vidos poste. Sed malgraŭ ĉio ankaŭ en ĉi tiu sektoro la laborista iniciato iom etendiĝis ĉien. Ni citu la ekzemplon de la fabriko *Hispano-Suiza*:

> «MANLABOREJOJ *HISPANO-SUIZA*
>
> »La manlaborejoj de ĉi tiu grava entrepreno kalkuliĝas kiel kiuj laboras per pli granda intenseco en la pli diversaj branĉoj por la provizado de la laboristaj volontarmeoj. De la komenco, la sindikataj organizaĵoj plenumis la konfiskon de la fabriko kaj la organizon de la laboro sub la kompleta direktado de la institucioj kreitaj de la proletaro cele adapti la fabrikadon al la bezonoj postulitaj de la enlanda milito. Neniam realiĝis, laŭ maniero tiel kompleta kaj rapida, modifo de la servoj por transformi porpacan produktadon en pormilitan produktadon. La produktoj, liveritaj de ĉiuj instalaĵoj de la metalurgia industrio al la servo de la milito, estas submetitaj al la administrado de la Komitato pri Volontarmeoj, kiu agadas pere de delegito rekte enoficigita speciale por tio. La kamarado, kiu plenumas ĉi tiujn tiel malsimplajn kaj taktoplenajn funkciojn, estas unu el la plej elstaraj membroj de la Ununura Sindikato pri la Metalurgio (NKL). Li havas sian oficejon instalitan ene de la fabriko *Hispano-Suiza*, sekve la direktado de la pormilita metalurgia produktado estas centralizita tie.
>
> »Estas 1.000 laboristoj laborantaj sub la reĝimo de la kolektivigita entrepreno. La tuta sumo de la semajnaj salajroj altiĝas ĝis 110.000 pesetoj.
>
> »La interna direktado de la fabriko estas garantiita de Komitato de Entrepreno, konsistigita de ĉiusektora reprezentanto, inkluzivitaj la delegitoj de la teknikistoj, oficistoj, inĝenieroj ktp.

» Oni konstruis en la fabriko la sekvajn specialaĵojn:

– Blenditaj kamionoj.
– Bomboj de mano (grenadoj).
– Ambulancoj.
– Apogiloj por mitraloj.
– Rimenoj kaj sakoj de kampanjo.
– Oni estas studanta la eblon de fabrikado de tankoj kaj obusoj.

»Krome oni daŭrigas la kutimajn laborojn: fabrikado de aŭtoj kaj motoroj de aviadilo. El ĉi tiuj lastaj oni sendis kelkajn al la flughaveno de *El Prat* kaj al la Registaro de Madrido.
»La animstato de la laboristoj estas admirinda. Ĉiuj konscience laboras pri la ellaborado de tiuj instrumentoj tiel utilaj por la kontraŭfaŝisma lukto. Dum la sep unuaj tagoj, oni blendis dek kvin kamionojn per duobla metala vando kaj izolanta korko, kio estas konsiderinda rekordo. Ĉiuj tiuj kamionoj estis senditaj al la militfrontoj de Aragono.
»La produktado de grenadoj altiĝas ĝis kvincent tage, tute finitaj kaj ŝargitaj. Ni konsideras nebezone indiki, ke tiaj grenadoj estas de sekura uzo kaj granda mortiga potenco.
»Momente ne eblas starigi tabelojn kompareblajn kun la antaŭa situacio, ĉar la diferenco de laboro kaj cirkonstancoj kreitaj de la enlanda milito falsos la kalkulojn. Sed la ritmo de laboro de ĉi tiu entrepreno kaj ties financa situacio al ni permesas havi grandan esperojn. Ĉi tiu estos unu el la plej gravaj elmontroj de la ebloj de la proletaro kaj de la nova organizo tiel plena de promesoj por la estonteco.»[87]

87Citita verko, paĝo 71.

## LA DEKRETO PRI KOLEKTIVIGOJ KAJ TIES KONSEKVENCOJ

La malmultaj ekzemploj de kolektivigo, kiujn ni ĵus vidis, al ni nur povas doni tre supraĵan kaj eble abstraktan ideon pri kio reale estis tiu movado. Endas imagi kion ĝi signifis: subite centoj da miloj da laboristoj estis travivontaj situacion, kiun sendube revis, sed ke ili neniam travivis. La mastroj estis neniigitaj, la privata propraĵo nuligita, ili nun estis la mastroj. Dum preskaŭ kvar monatoj (de Julio ĝis la 24-a de Oktobro 1936), neniu labormastra aŭ ŝtata aŭtoritato kuraĝis invadi la konkeritan terenon. Ĉio estis elpensota. Kaj kompreneble endis fari ĝin bazante sin sur la liberecanaj ideoj pri la afero, sed tiaj ideoj difinis linion de ĝenerala konduto kaj ne alportis solvon al la konkretaj malfacilaĵoj. Kaj ĉi tiuj malfacilaĵoj (malplenaj ŝparkasoj, manko de krudmaterialoj, manko de merkatoj ktp.) estis ĉiutagaj kaj la enlanda milito faris, ke ilia solvo estu ankoraŭ pli malfacila.

Endas ripeti, ke ĉiu kolektivigo estis aparta afero. Dum la fervoro de la unua periodo (ĝis la Dekreto pri Kolektivigo) la solvoj aperis laŭ la irado de la okazantaĵoj. Ŝajnas, ke estas dum tiu periodo, kiam la rekta demokratio estis pli kompleta: la asembleoj de laboristoj estas kiuj elektas la Komitatojn pri Entrepreno (aŭ de Administrado) kaj ankaŭ estas kiuj decidas pri ĉiuj gravaj demandoj.

En la publikaj servoj (fervojo, urbaj transportoj, elektroservo ktp.), la propra naturo de ilia laboro unuigis inter ili la laboristojn de la urbo kaj eĉ, ĝis iu grado, tiujn de la tuta Katalunujo. Io simila okazis ĉe la metalurgio, kiu preskaŭ tute transformiĝis en militindustrion (sed ĉi-okaze aperis apartaj problemoj pri kiuj ni poste parolos). Oni faris kelkajn sukcesajn klopodojn pri kunordigo inter entreprenoj de sama industria branĉo -ekzemple, la Sindikato pri la Ligno- aŭ inter ĉiuj industrioj de kelkaj katalunaj urboj. Sed ĝenerale ĉiu memmastrumata entrepreno estis aŭtonoma institucio, bastiono samtempe izolita (koncerne la financajn

problemojn aŭ aliajn) kaj asociita al la aro de la movado per mil ligoj. Ĉi tio estas facile komprenebla: la laboristoj de ĉiu entrepreno okupis sin unue reorganizi siajn vivon kaj laboron ene de sia entrepreno. Sed tre baldaŭ ĉi tiu situacio estigis ekonomiajn malfacilaĵojn (kvankam la nure ekonomiaj malfacilaĵoj nur estas alia plia logartifiko). La milito, la ĉiaj bezonoj de la loĝantaro ktp, postulis, ke oni deturnu la produktadon laŭ determinitaj direktoj kaj kelkaj entreprenoj daŭre produktis la samajn aĵojn, kiel antaŭ la milito, ne trovante aĉetontojn. Pri ĉi tio ni povas doni neordinaran ekzemplon: pro la entuziasmo kaŭzita de la kreo de «nova vivo», «proleta» socio, oni faris grandan kampanjon, cetere spontanean, kontraŭ la burĝa maniero vesti sin (eĉ la burĝoj vestis sin kvazaŭ estus laboristoj por esti nerimarkataj). La ĉapelo, simbolo de la burĝa maniero vesti sin, tute arkaikiĝis. Nu la ĉapelaj laboristoj per sia sindikato protestis kontraŭ ĉi tiu «diskriminacio». La tutan sian vivon ili faradis ĉapelojn, sekve ili daŭre faris ilin, sed ĉar neniu ilin surportis, kiel vendi ilin? Ili renkontis sin antaŭ senelira situacio... Ĉi tiu «chaplin-a» ekzemplo, elektita elinter multaj aliaj, ĉiuokaze pruvas, ke necesis modernigo de kelkaj industriaj branĉoj. Ne sufiĉis daŭre produkti, ankaŭ kaj ĉefe endis alimaniere produkti... «Alimaniere produkti» ree postulis scii kiu decidas kion kaj kiel produkti. «La produktado por la produktado» neniam povas esti la celo de memmastrumata ekonomio. La atingenda celo devis esti produkti por ĉiam pli kontentigi la libere esprimitajn bezonojn de la homamasoj. Evidente la grandega plimulto de la katalunoj konsentis pri kelkaj prioritatoj kaŭzataj de la milito: kreo de militindustrio, nutraĵprovizado por la volontarmeoj ktp. Sed la malfacilaĵoj ne finiĝis tie.

La kunordigo, la modernigo de certaj industrioj, la nova direkto donenda al la produktado, la egaleco de kondiĉoj de vivo kaj salajro, ne nur ene de ĉiu entrepreno, sed ankaŭ por ĉiuj katalunaj laboristoj ktp, postulis, ke oni kreu pontojn

inter la insuloj de tiu grandega insularo, kiu estis la kolektivigitaj entreprenoj. Dum la kvar monatoj de la unua periodo estis la sindikatoj (ĉefe NKL), kiuj estis la sola ligilo inter la laboristoj de la diversaj entreprenoj, la diversaj urboj kaj la diversaj industriaj branĉoj (NKL eĉ kreis Konsilantaron pri Ekonomio, kiu nur havis konsultiĝan rolon). Tiu ligo, kiel ni vidis kaj ree vidos, ĉe la paso de la tagoj ĉiufoje fariĝis pli burokrata, sed ĉi tio ŝajnis tute normala al la laboristoj, kiuj plimulte estis aliĝintaj al NKL kaj akceptis en granda parto la NKL-an ideologion, laŭ kiu la sindikatoj -post la revolucio- iĝas la organoj de administrado de la produktado.
Sed ni scias, ke la ĉefaj staboj de NKL ne nur ne organizis la kolektivigojn, sed ke ĉi tiuj realiĝis malgraŭ ili. Kiam la fenomeno prenis tian gravecon, NKL, ankaŭ ĜUL kaj eĉ la kataluna Registaro, impresis sin. La kataluna ekonomio estis preskaŭ en manoj de la laboristoj, ili ne povis daŭre ignori tiun fakton. Kompreneble la kataluna ŝtato baziĝis sur la kelkfoje realaj, kelkfoje fikciaj mankoj kaj difektoj de tiuj spertoj por preni sur sin la kolektivigojn.
La «postuloj de la ekonomia raciigo» ĉi-okaze ankaŭ kaŝis la plej profundajn intencojn de la politikaj burokrataroj. Kiu direktis la katalunan ekonomion post la senposedigo de la mastroj? Neniu. Tiu estis la skandala fakto, kiun ili ne povis toleri. Post kvar monatoj de kreemo, de laborista demokratio, de provoj kaj, kial ne?, de eraroj, oni povus proponi plurajn solvojn, ĉu por daŭrigi la revolucian iradon, ĉu por «restarigi la ordon». Oni elektis la plej aŭtoriteman eblan solvon ene de la kunteksto de la revolucia Katalunujo.

* * *

La 24-an de Oktobro 1936, la kataluna Registaro instituciigis per Dekreto la kolektivigojn. Ĉi tio multfoje estis prezentata, eĉ de granda nombro de interpretistoj de liberecana tendenco, kiel la nura rekono pri tio, kion realigis la laboristoj mem. Fakte estis ĝuste la malo: la ŝtato prenas

sur sin la kolektivigojn, unue por limigi ilin, sed ankaŭ kaj ĉefe por pligrandigi sian propran influon kaj sian regadon malutile de la laborista aŭtonomeco. Dum la paso de la tagoj kaj pro la amasiĝo de problemoj, kiujn neeviteble kreas radikala transformado de la ekonomia vivo meze de enlanda milito, oni povus trovi diversajn solvojn. La fakto, ke oni elektis tiujn antaŭviditajn de la dekreto, neniel estas mirinda. Oni ne povas izoli la aferon de la kolektivigoj de la aliaj problemoj, kiujn ĉiutage estigis la revolucia situacio. Ankaŭ ĉi-okaze, kiel ni tuj vidos, la anarĥiistaj gvidantoj elektis la aŭtoritaton samkiel ili elektis -aŭ elektos- la «kontraŭfaŝisman unuiĝon» kontraŭ la revolucio, la Armeon kontraŭ la volontarmeoj ktp.
La Dekreto estis preparita de la Konsilanto pri Ekonomio de la kataluna Registaro, Juan P. Fábregas, kiu ne aliĝis al NKL ĝis Julio 1936. Antaŭe li estis direktisto de la Instituto pri Ekonomiaj Sciencoj de Barcelono kaj estis politike ligita al la naciismaj burĝaj medioj de la *Lliga**. Ŝajnas, ke la Dekreto estis krude diskutita de la diversaj politikaj tendencoj reprezentitaj en la kataluna Registaro antaŭ ol esti aprobita. Ĉar iuj ĝin konsideris tro revolucia...

## LA DEKRETO KAJ LA ORGANIZADO DE LA EKONOMIO

> «UNUA ARTIKOLO. Konsente kun la normoj, kiuj estas difinitaj en la nuna dekreto, la industriaj kaj komercaj entreprenoj de Katalunujo sin klasifikas kiel:
> AI) Kolektivigitaj entreprenoj, en kiuj la respondeco de la direktado falas sur la laboristojn mem, kiuj ilin

*NeT: *Lliga Regionalista* (katalune: Regionisma Ligo) estis kataluna politika partio, kiu ĝuis relativan gravecon dum la komencoj de la 20-a jarcento ĝis la proklamo de la dua hispana respubliko. La partio, de konservativa kaj katalanisma ideologio, estis personigita dum granda parto de sia historio de la politikisto Francesc Cambó.

konsistigas, reprezentitajn de Konsilantaro de Entrepreno.

B) Privataj entreprenoj, en kiuj la direktadon prenas sur sin la mastro aŭ administristo kun la kunlaborado kaj la kontrolo de la laborista Komitato pri Kontrolo.

A) Kolektivigitaj entreprenoj

2-a artikolo: Estos devige kolektivigitaj la industriaj kaj komercaj entreprenoj, kiuj la tagon 30-an de Junio 1936 donis laboron al pli ol cent salajruloj, kaj ankaŭ tiuj, kiuj dungas malpli grandan nombron de laboristoj, sed iliaj mastroj estis deklaritaj ribelantoj aŭ forlasis la entreprenon. Tamen la entreprenoj de malpli ol cent laboristoj povos esti kolektivigitaj se tion interkonsentas la plimulto de la laboristoj kaj la posedanto aŭ posedantoj. La entreprenoj de pli ol kvindek laboristoj kaj malpli ol cent ankaŭ povos esti kolektivigitaj, se tiel interkonsentas la tri kvaronaj partoj de la laboristoj. La Konsilantaro pri Ekonomio (de la kataluna Registaro [C. S.-M.]) povos ankaŭ decidi la kolektivigon de tiuj aliaj industrioj, kiuj, pro ilia graveco ene de la nacia ekonomio aŭ pro aliaj karakterizaĵoj, konvenas forpreni ilin de la agado de la privata entrepreno.»

Ni memorigu al kiuj estus tentitaj konsideri ĉi tiujn artikolojn tre favoraj al la ideo pri la kolektivigo, ke ĉio, kio estas specifita en ili, jam estis realigita de la laboristoj de antaŭ kvar monatoj kaj, ke krome tiam estis politike neeble decidi alion. Krome en la dekreto estas unua provo de limigo, ĉar oni volis lasi ekster la kolektivigoj la entreprenojn kun malpli ol 100 laboristoj. Sed ĉi tiuj entreprenoj estis la grandega plimulto en la 1936-a Katalunujo –ni cetere rimarkigu, ke preskaŭ ĉiuj jam estis kolektivigitaj. Laŭ la Dekreto, ekzemple, la Sindikato pri la Ligno devintus redoni al la privata sektoro la grandegan procenton de manlaborejoj,

kiuj nombris malpli ol 100 laboristojn la 30-an de Junio 1936. Kompreneble ĝi ne faris tion.
Eĉ el la vidpunkto de la produktopoveco, estis tute absurde permesi, ke amaso de etaj industriaj kaj komercaj entreprenoj vegetis, kiel okazis en Hispanujo, kiu estis tre subevoluinta rilate la eŭropajn industriajn landojn. Ilia regrupigo kaj kunfandiĝo estis necesa kondiĉo por la ekonomia pligrandiĝo –kiel oni diras hodiaŭ. Sekve ĉi tiu dispono kontraŭis la «filozofion» de la Dekreto kiu, subtenita de ĉiuj politikaj ĉefaj Staboj, pretendis organizi la ekonomion por ke ĉi tiu obeu la imperativojn de la produktado.
Sed ne estis tiuj supozaj «imperativoj de la produktado», kiujn ili obeis, sed la politikajn imperativojn cele ne malamikiĝi kun la mezaj klasoj pro la atako kontraŭ la plej sakregaj principoj de la privata propraĵo al kiuj, kiel sciate, ili estas tiel intime ligitaj.
La alianco kun la «mezaj klasoj» -kamparanaj, komercaj, industriaj- formis parton de la programo de la stalinistoj, eĉ estis la ĉefa akso de ties supozata strategio de «demokratia-burĝa» revolucio. LPMU ankaŭ konsideris bezona tian aliancon por la imaga fazo en kiu ĝi lokis la lukton: la «demokratia-socialisma» fazo. Grandaj sektoroj de la direktantaro de NKL ankaŭ estis akceptemaj rilate ĉi tiujn argumentojn, sed ne el la vidpunkto de la absurda teorio de la «fazoj» de la marksisma-leninisma vulgato, sed el tiu de la kontraŭfaŝisma unuiĝo, kiun oni supozis nepra por venki la militon. Koncerne la «burĝajn» kaj naciismajn partiojn de la Popola Fronto, ĉar ili estis la politikaj reprezentantoj de tiuj klasoj, kompreneble inklinis protekti ties rajton pri la propraĵo.
Krom la entreprenoj kun malpli ol 100 salajruloj, estis antaŭvidita privata sektoro, kiu reale ekzistis paralele kun la kolektivigita sektoro. Fakte ĉefe estis eksterlandaj entreprenoj -aŭ tiuj havantaj parton de eksterlanda kapitalo-, kiujn ĉiuj Staboj de la politikaj aŭ sindikataj organizaĵoj,

konsente unufoje dum sia vivo, respektis cele ne ĝeni la okcidentajn demokratiojn. Efektive Britujo, Francujo kaj Belgujo estis inter la landoj kun plej grandaj interesoj en Katalunujo.
Tiel do en la privata sektoro stariĝis la «laborista kontrolo». Laŭ la Dekreto, la funkcioj de la Komitato pri Kontrolo estis la jenaj (22-a artikolo):

> a) La kontrolo de la laborkondiĉoj, tio estas, la rigora plenumado de la validaj kondiĉoj koncerne salajrojn, laborhorarojn, socialajn asekurojn, higienon kaj sekurecon ktp, tiel, kiel ankaŭ la rigoran disciplinon en la laboro. Ĉiuj avertoj kaj sciigoj, kiujn devu fari la administristo de la entrepreno al la dungitaro, estos diskonigitaj pere de la Komitato.
> b) La administra kontrolo laŭsence inspekti la enspezojn kaj pagojn, tiel per kontanta mono, kiel pere de Bankoj, por ke ili respondu al la bezonoj de la negoco. Samtempe la komitato intervenos en ĉiujn aliajn operaciojn de komerca karaktero.
> c) Kontrolo pri la produktado, kiu konsistas en la intima kunlaborado kun la mastro cele perfektigi la proceson de la produktado. La laboristaj Komitatoj pri Kontrolo penos subteni la plej bonajn eblajn rilatojn al la teknikistoj cele garantii la bonan iradon de la laboro.
> 23-a artikolo: La mastroj estos devigitaj prezenti al la laboristaj Komitatoj pri Kontrolo la jarajn bilancojn kaj raportojn, kiujn ili sendos plenigitaj al la ĝenerala Konsilantaro de la respektiva industrio.»

Kiel oni povas konstati, ĉi tiu teksto permesis, tiel al lerta kaj entreprenema mastro ŝarĝi al la laborista Komitato la plej malmolajn laborojn por subteni «rigoran disciplinon» kaj «la disvolviĝon de la produktado», kiel al senhezitaj laboristoj efektivigi realan kontrolon. Sed sendube la destino de la

leĝaj tekstoj estas esti dubasencaj kaj klopodi por maski la realajn konfliktojn. Ankaŭ ĉi tie estis evoluo ligita al la ĝenerala politika evoluo de Katalunujo: komence la mastroj estis «angorintaj kaj timigitaj» pro la revolucia progreso kaj akceptis la postulojn de la laboristoj, poste helpataj de la registaraj aŭtoritatoj ili klopodis por iom reakiri sian potencon ĉie.
(Estu kiel ajn, la koncepto mem de laborista Kontrolo estas almenaŭ dubasenca, ĉar preskaŭ ĉiam samvaloras diri, ke la laboristoj mem devas kontroli sian propran ekspluatadon!).
La Dekreto ankaŭ specifis, ke la Komitatoj pri Kontrolo devis esti konsistigitaj de delegitoj de ĉiuj servoj: laboristoj, teknikistoj, oficistoj kaj administraj kadruloj. Ĉi tiuj delegitoj estis elektitaj, sed la reprezentado de ĉiu sindikato devis esti proporcia al la nombro de siaj respektivaj aliĝantoj en la entrepreno, kio aŭtomate garantiis la superegadon de NKL pro ties plejmulta influo sur la katalunan laboristan klason.
Ni ree parolu pri la kolektivigitaj entreprenoj kaj la disponoj, kiuj limigis la memmastrumadon de la unuaj monatoj:

> «15-a artikolo: En ĉiuj kolektivigitaj entreprenoj devige estos kontrolisto de la kataluna Registaro, kiu formos parton de la Konsilantaro de Entrepreno kaj, kiu estos nomumita de la Konsilantaro pri Ekonomio konsente kun la laboristoj.»

Dum la Konsilanto pri Ekonomio membrus en NKL, oni povas logike pensi, pro la atmosfero de la epoko, ke la kontrolisto preskaŭ ĉiam ankaŭ membrus en ĝi, kio ne lin liberigas aŭtomate de la spirito burokrata -aŭ de nekompetenteco-, sed almenaŭ principe li ne devis esti malamika al la kolektivigoj. Ĉi tio poste ŝanĝis, kaj post la 1937-aj majaj okazintaĵoj, kiuj vidis la restarigon de la ŝtatpotenco super preskaŭ ĉiuj aferoj, la «kontrolistoj» iĝis en multaj entreprenoj la realaj direktistoj. Ĉefe en la

entreprenoj, kiujn oni konsideris bezonaj por la milita penado. Ĉiel de la komenco, ĉar tiuj «kontrolistoj» estis la reprezentantoj de la supera aŭtoritato en Katalunujo, la aŭtonoma Registaro, ili ĝuis grandan politikan aŭtoritatecon plifortigitan pro la financaj malfacilaĵoj de multaj entreprenoj kaj la regado de la kataluna Registaro super la bankoj, kiel evidenta rimedo de premo kaj ĉantaĝo, ĉar ĝi povis koncedi aŭ ne kreditojn.

> «14-a artikolo: Por okupiĝi laŭ konstanta maniero pri la irado de la entrepreno, ties Konsilantaro enoficigos direktiston, kiu tute aŭ parte taskos la funkciojn, kiuj koncernas la menciitan Konsilantaron. (Substrekita de mi [C.S.-M.].)
> En la entreprenoj dungantaj pli ol 500 laboristoj, aŭ kiam ilia kapitalo superas milionon da pesetoj, aŭ kiuj ellaboras aŭ uzas materialojn rilatajn al la nacia defendo, la nomumo de la direktisto devos esti aprobita de la Konsilantaro pri Ekonomio.»

Ĉi tiu artikolo estas tre signifoplena, ĉar ĝi fakte nuligas la plenumon de la rekta demokratio bazita sur la Konsilantaroj de delegitoj elektitaj kaj eksigeblaj (kvankam al ni mankas detaloj pri ilia eksigo, kaj ŝajnas, ke tio nur estis permesita en la ekstremaj okazoj pri kiuj la ĝenerala Asembleo de la fabriko devis decidi). La hierarĥion de la produktado oni reenkondukis laŭ ĝia plej tradicia kaj reakcia aspekto: ĉekape de entrepreno -samkiel ĉekape de partio, armeo kaj, kial ne? ĉekape regno- necesas estro. La skemo senĉese ripetiĝas. Malgraŭ ĉiuj paroladoj pri la demokratio, eĉ pri la anarĥio, kiam endas agi, tio sola, kion oni faras, estas kontrastigi hierarĥion, kiun oni supozas bona, kun alia konsiderita malbona. Kaj la anarĥiistoj, egaj kontraŭuloj de ĉia hierarĥio, estis ĝuste la ĉefaj aŭtoroj de tiu projekto.

Sed ne finiĝis ĉi tie la ŝtata regado. Efektive la Dekreto ankaŭ antaŭvidis la kreon de ĝeneralaj Konsilantaroj pri Industrio:

> «24-a artikolo: La ĝeneralaj Konsilantaroj pri Industrio estos konsistigitaj laŭ la sekva maniero:
>
> – 4 reprezentantoj de la Konsilantaro de Entrepreno <u>elektitaj laŭ la maniero, kiun oni oportune decidos</u> (substrekita de mi [C.S.-M.]);
> – 8 reprezentantoj de la diversaj sindikataj centraloj laŭ nombro proporcia al tiu de la aliĝantoj en ĉiu el ili;
> – 4 teknikistoj enoficigitaj de la Konsilantaro pri Ekonomio. Ĉi tiuj Konsilantaroj estos prezidataj de la <u>respektiva delegito</u> de la Konsilantaro pri Ekonomio de Katalunujo (substrekita de mi [C.S.-M.]).
>
> 25-a artikolo: La ĝeneralaj Konsilantaroj pri Industrio ellaboros la laborplanojn de la Industrio, planos la produktadon de ĉiu branĉo kaj reguligos ĉiujn aferojn rilatajn al ĝi.
> 26-a artikolo: La interkonsentoj, kiujn decidos la ĝeneralaj Konsilantaroj pri Industrio, estos plenumendaj. Neniu Konsilantaro de Entrepreno nek privata entrepreno rajtos neglekti ilian plenumon.
> Oni nur povos apelacii kontraŭ ili al la Konsilanto pri Ekonomio, kies decido estos neapelaciebla.»

Ĉi tiuj Konsilantaroj pri Industrio kaj la Plena Asembleo de la entrepreno kundividis la privilegion povi eksigi ĉion aŭ parton de la Konsilantaroj de Entrepreno. Sed kiam estis la Konsilantaro pri Industrio, kiu decidis la eksigon de Konsilantaro de Entrepreno, ĉi tiu lasta nur povis apelacii – se ĝi estis subtenita de la Asembleo- al la Konsilanto pri Ekonomio, tio estas, al la ministro, «sed la decido de ĉi tiu

lasta, antaŭa informo de la Konsilantaro pri Ekonomio, estos neapelaciebla» (20-a artikolo).
La Konsilantaroj pri Industrio fiksis, sendepende de la Konsilantaroj de Entrepreno, «la ĝeneralan planon pri produktado». «Por la decido de la marĝeno de profitoj, fiksado de la ĝeneralaj kondiĉoj de vendo, akiro de krudmaterialoj, kaj pri tio rilata al la normoj de amortizo de materialo, kreo de operacia kapitalo, fonduso de rezervo kaj disdono de profitoj, oni same sekvos la disponojn de la ĝeneralaj Konsilantaroj pri Industrio» (12-a artikolo)[88].
Ni cetere rimarkigu, ke laŭ la modelo de statutoj de la kolektivigitaj entreprenoj decidita de la kataluna Registaro, la 50 procento de la profitoj devis esti deponita en la Sparkaso de Industria Kredito de Katalunujo (tio estas, en la kataluna Registaro); la 15 procento estis destinita al socialaj verkoj de kolektiva karaktero; alia 15 procento devis doni sin al la laboristoj por ke, kunvenintaj en asembleo, ili ĝin uzu kiel plej bone konsideros. La cetera 20 procento estis destinita al la Fonduso de rezervo, la amortizo de la maŝinoj ktp.
La potenco estis restarigita de supre suben, la laborista aŭtonomeco restis preskaŭ reduktita al nenio. La burokrata piramido en la entreprenoj ree ekfunkciis; la «kontrolisto» de la Registaro kaj la direktisto ĉekape de la entreprenoj, la Konsilantaroj pri Industrio super ili kaj super ĉiuj, kiel estas devige en la burokrata universo, la ministro kaj ties Konsilantaro pri Ekonomio.
Sed tro rapida legado povus doni la impreson, ke, ĉar tiuj Konsilantaroj pri Industrio estis teorie superregitaj de la reprezentantoj de la laboristoj, la laborista demokratio aŭtomate restis garantiita. Sed ĉi tio ankoraŭfoje estus

88La teksto de la Dekreto estas komplete reproduktita en CERDÍ y RICHART, Baldomero: *Empresas colectivizadas e intervenidas* [hispane, Kolektivigitaj kaj direktitaj entreprenoj], *Editorial Bosch*, Barcelono, 1937. Vidu ankaŭ Peirats, citita verko, 1-a volumo, paĝoj 341 ĝis 345.

konfuzi burokrataro kun laborista klaso, cetere tre kuranta konfuzo ĉefe tiutempe. Ni ekzamenu la aferojn pli ĝisfunde: la solaj delegitoj de la laboristoj, la 4 reprezentantoj de la Konsilantaroj de Entrepreno, ne nur estis malplimulto, sed krome ne estis specifita ilia elektmaniero. Kaj, kial ĉi tio estis tiel, sed ĉar ili ne povis esti rekte elektitaj en la asembleoj de la laboristoj? La 8 reprezentantoj de la sindikataj centraloj fakte estis «ne produktantaj» sindikataj funkciuloj, kiuj dependis kaj obeis la estrojn de NKL kaj ĜUL kaj sekve la katalunan Registaron, ĉar estis la gvidantoj de tiuj sindikatoj, kiuj ilin reprezentis tiel en la kataluna, kiel en la centra Registaro.

Fine estis 4 «teknikistoj» rekte nomumitaj de la kataluna Registaro. Kiel minimume oni povas diri, ke la kataluna Registaro havis hegemonian rolon ene de tiuj Konsilantaroj, rolo plifortigita kaj garantiita de la fakto, ke okaze de konflikto ĉiam estis la ministro, kiu definitive decidis.

Aliflanke ĉi tio estas tute konfirmita de la teksto de la interkonsento subskribita en Barcelono la 22-an de Oktobro de 1936 (du tagojn antaŭ la publikigo de la Dekreto) de NKL-IAF kaj ĜUL-USPK:

> 1) Ni formale kompromisas plenumi la interkonsentojn kaj decidojn de la Konsilantaro de la kataluna Registaro, uzante tutan nian influon kaj organizan kapablon cele faciligi ilian efektivigon.
>
> 2) Ni estas favoraj al la kolektivigo de produktado, tio estas, al la senposedigo sen monkompenso por la kapitalistoj kaj al la transdono de tiu posedaĵo al la kolektivo. Ni estas favoraj al la kolektivigo de ĉio, kio estu bezona por la militbezonaĵoj.
>
> <u>Ni konsentas konsideri, ke tiu kolektivigo ne donus la deziritan rezulton se ĝi ne estus direktita kaj kunordigita de institucio, natura reprezentanto de la kolektivo, kiu ĉi-okaze nur povas esti la Konsilantaro</u>

> de la kataluna Registaro (substrekita de mi [C.S.-M.]). Koncerne la malgrandan industrion ni ne estas favoraj al la kolektivigo, se ne estas en la antaŭvidita kazo de ribeluloj aŭ de la neeviteblaj militbezonaĵoj.[89]

La tuta filozofio de la dekreto esta ĉi tie resumita.
La militindustrio estas speciala afero en la problemo de la kolektivigoj. Malgraŭ Katalunujo estis unu el la plej industriigitaj regionoj de Hispanujo, la fabrikoj de armilaro maloftegis. La unua tasko estis krei realan militindustrion. Kion oni faris kaj kompreneble estis la Sindikato de NKL pri la Metalurgio, kiu realigis la plej grandan penadon.

> «La 21-an de Julio (1936), la Sindikato pri la Metalurgio konsente kun García Oliver elektis Vallejo-n por organizi la fabrikojn de militmaterialo. De la 19-a de Julio, pluraj firmaoj de Barcelono spontanee distingiĝis pro la fabrikado de tankoj per pli bona volo ol tekniko. Vallejo dediĉis trairi la entreprenojn kaj enpostenigi en ilin ĉiujn utilajn kamaradojn por la laboro. Post ses tagoj oni jam liveris kelkajn tankojn al la Komitato pri Volontarmeoj.»[90]

Tiuj «tankoj» estis preskaŭ ĉiam simplaj blenditaj kamionoj. Ĉiel oni kreis tute realan militindustrion, plejparte metiistan kompreneble.
La Sindikato NKL pri la Metalurgio kaj Vallejo, kiel delegito, prenis la unuajn disponojn. Unue, en la sino de la Komitato pri Volontarmeoj (kun Iglesias kiel delegito pri Defendo kaj Diego Abad de Santillán kiel delegito pri Ekonomio, ambaŭ de NKL, ni memorigu ĝin) kaj poste en la sino de la kataluna

89Citita de ANDRADE, J.: *Les syndicats dans la révolution espagnole* [france, La sindikatoj en la hispana revolucio], «*Confrontation Internationales*», n-ro 3 (1949).
90«*Solidaridad Obrera*», citita de Peirats, citita verko, 2-a volumo, paĝo 97.

Registaro, la registaraj respondeculoj de la militindustrio estis anarĥiistaj gvidantoj. Ĉi tio ŝanĝiĝis post la majaj okazintaĵoj, kiam la Centra Registaro rekte okupis sin pri la Defendo kaj la Polico en Katalunujo, kiel ni vidos poste.

Al la stalinistoj ne povis plaĉi tiu respondeco de la anarĥiistoj sur la tuto de la kataluna nova militindustrio. Plurfoje ili ĵetis gazetarajn kampanjojn kontraŭ la «sabotado» kaj la «neglektemo» de NKL en ĉi tiu militpenado. NKL vigle kontraŭatakis en la gazetaro kaj la 15-an de Aprilo 1937 José Tarradellas mem, tiama Unua Konsilanto de la kataluna Registaro, malakceptis la aludojn kaj la atakojn de la gazetaro de USPK, defendante la penadojn realigitajn de la militindustrio en Katalunujo.

Post majo, la stalinistoj, per la persono de Comorera, rekte turnis sin al la socialisto de dekstro Indalecio Prieto, Ministro de la centra Registaro, renovigante siajn akuzojn. Prieto skribis al Companys, Prezidanto de la kataluna Registaro, kiu lin respondis per longa letero defendante la realigitan verkon, letero el kiu ni donas ĉi tie ekstrakton: «En Katalunujo, pro ties industria kaj ekonomia situacio, niaj laboristaj amasoj sentis, kiel historian depostulon, la bezonon konfiski ĉian industrion. Sed ĉi tiu konfisko, ĉefe koncerne la metalurgion, ne nur obeas la dezirojn havi ĝin en iliaj manoj, ĉar endas rekoni, ke oni tuj pensis transformi ĝin por ke ĝi povu produkti militan materialon...»[91]. La letero plu daŭras rekonante la konfliktojn estigitajn inter la kataluna Registaro kaj la laboristaj Komitatoj pri la direktado kaj organizado de tiu industrio, konfliktoj, kiuj «solviĝis» favore al la kataluna Registaro. Companys faris la bilancon de la militproduktado kaj detalis ĉiujn fabrikojn kaj militmaterialon, kiujn oni metis je dispono de la centra Registaro tiel, kiel Prieto mem dekretis post la majaj okazintaĵoj.

91Ossorio y Gallardo, citita verko, paĝo 210

Ankaŭ ĉi-okaze ni vidas kiel ripetiĝas la klasika scenejo. La sindikatoj de NKL prenas la iniciaton tute krei militindustrion. Companys benas ĉi tiun aŭdacan provon, sed kompreneble konsideras tro danĝere lasi tiun industrion en manoj de la laboristaj Komitatoj. Li sukcesas efektivigi super ĝi la regadon de la kataluna Registaro. Post majo, la aŭtonomeco de Katalunujo estos limigita, samtempe ĉar ĝi estas tro revolucia kaj, ĉar la jakobena tendenco, kiu superregas la centran Registaron kaj la organizaĵojn, kiuj ĝin subtenas, postulas la revenon en la ŝtatan centralizismon. La centra Registaro estos, kiu iom post iom prenos en siaj manoj tion esencan de la kataluna militindustrio. La stalinista kampanjo de misfamigo ne havis alian celon ol favori la senposedigon de la laboristaj Komitatoj.

* * *

Kiel reagis la laboristoj al la disponoj de la Dekreto pri Kolektivigo? Ŝajnas, ke en la plimulto de la okazoj pure kaj simple ili rifuzis apliki ĝin. Juan Andrade donas la jenan ateston pri la situacio:

> «La 17-an de majo 1937 (tio estas, kelkaj tagoj post la "sanga semajno" de Barcelono [C.S.-M.]), komisiono nomumita de la Urba Federacio de Sindikatoj de NKL de Barcelono publikigis noton: "pri la ekonomia reorganizo de Katalunujo", en kiu deklaris, rilate faktorojn de malordo, tion jenan: "Unue endas rimarkigi kiel faktoron de perturbo la ne rigoran plenumon de la nuntempe valida Dekreto pri kolektivigo, ĉar ampleksaj sektoroj de laboristoj tute neglektis la enhavon kaj spiriton de la Dekreto kaj ĵetis sin en kolektivigojn, kiuj malhavis ekonomian kaj sciencan fundamenton... La ekscesa avideco kolektivigi ĉion, ĉefe tiujn entreprenojn, kiuj posedas monajn rezervojn, vekis inter la homamasoj

> kritikendan utilisman aŭ etburĝan spiriton. Konsiderante ĉiun kolektivigon, kiel privatan posedaĵon de la kolektivigita entrepreno, anstataŭ konsideri ĝin, kiel fruktuzon, ili ignoris la interesojn de la cetero de la kolektivo, kondutis sin laŭ egoisma kaj kruela maniero, kaj efektivigis procedojn, kiuj estas karakterizaĵo de la kapitalisma reĝimo. Anstataŭ rapide antaŭeniri al la kreo de ĝeneralaj Konsilantaroj pri Industrio, la sindikataj organizaĵoj mem malprogresis, malordigante la proceson de disvolviĝo kaj perfektiĝo priskribitan de la Dekreto... La kolektivigitaj entreprenoj nur prizorgis sian pasivon, kaŭzante malekvilibron en la financoj de la entreprenoj, kio estigas aliajn motivojn de malordo... Ankaŭ estas faktoro de socia maldisciplino: <u>mankas morala stimulo por devigi ĉiun doni la produktokapablon nemalhaveblan por sia entrepreno</u> (substrekita de mi [C.S.-M.]) samtempe, ke oni lasas sufiĉan marĝenon por subteni la aliajn elspezojn de la militfronto kaj la postmilitfronto."»

Elinter la disponoj kapablaj korekti ĉi tiun situacion, la Komisiono de la Urba Federacio de Sindikatoj de NKL de Barcelono konsilis la jenajn:

> «Rigora kaj severe preciza apliko de la nune valida Dekreto pri kolektivigo sen tio, ke oni permesu la plej minimuman nuligon. Koncentriĝo de la industrioj kaj malpliigo de la dungitaro de ĉiu el ili, laŭ la rigoraj bezonoj de la ĉi-momenta produktado. Devigo por ĉiuj kolektivigoj likvidi sian pasivon. Starigi militimposton sur ĉiujn salajrojn por maksimume alproksimigi ilian egaliĝon kaj eviti la ekziston de manlaboristoj de unua, dua kaj tria klaso tiel, kiel funkciuloj, kiuj enspezas salajrojn tri-, kvar- kaj kvin-oble superajn al la plej altaj salajroj de la laboristoj.

> Kreo de militpruntedono eltirita el la profitoj de ĉiuj entreprenoj, kolektivigitaj aŭ ne, cele malpliigi tiajn profitojn ĝis la minimumo dum la milito. Krei financan politikon, kiu permesu al la publikaj aŭtoritatoj atingi la fiskan produkton kaj al la Kataluna Registaro plenumi ĝiajn registarajn funkciojn de la ekonomia vidpunkto.»

La noto finis tiel:

> «La Komisiono konsideras, ke endas rapide apliki ĉi tiujn disponojn se ni volas eviti pli frue ol kelkaj semajnoj la disfaligon, kiu minacas la ekonomion de la regiono. Endas atingi ĉi tiun favoran reagon, garantii la socian ordon kaj trudi la moralecon kaj la sobrecon en la postmilitfronto. Konvenas ree fiksi la sekvotan ekonomian politikon por savi la sperton, kiun ni estas efektiviganta. La komisiono ree insistas pri la fakto, ke la reputacio aŭ malreputacio de la nune valida Dekreto pri Kolektivigo estas intime ligita al NKL, kiu ĝin defendis, ĝin trudis kaj ĉefe sin okupis pri ĝia plenumo.
> La Komisiono konsideras, ke estas niaj propraj kamaradoj, kiuj kreis la plej grandajn malfacilaĵojn por la apliko de la Dekreto, senĉese ignorante ĝiajn konsilojn, tiel metante la Dekreton en krizan situacion, tiel en Katalunujo, kiel ekstere de ĝi.»[92]

Daŭre mirigas nin la aŭtoritatema kaj burĝa spirito de ĉi tiu teksto: estas impeta alvoko al la aŭtoritato de la Registaro kaj kontinua insisto pri la principoj de disciplino, profitdoneco, produktopoveco, kiujn oni konsideras prioritataj. El la liberecanaj ideoj nur restas la justa mencio al la bezona egaligo de salajroj. Ĉio ĉi post kiam la stalinista

92ANDRADE, Juan: *L'intervention des syndicats dans la révolution espagnole*, [france, La interveno de la sindikatoj en la hispana revolucio], «*Confrontation Internationale*» (septembro-oktobron 1949), paĝo 43.

kontraŭrevolucio klopodis por, kaj parte atingis, dronigi en sango la katalunan revolucion.
Mi ne kaŝis la difektojn kaj misfunkciadojn de la kolektiviga sperto en la kataluna industrio (ankaŭ ne la ĉiajn malfacilaĵojn), sed ne ĉesas esti strange, ke en la rezisto apliki la Dekreton oni nur vidas «renaskiĝon de la kapitalisma spirito», kiam tio okazinta estis, ke la laboristoj kontraŭstaris apliki disponojn, kiuj fakte finis ilian aŭtonomecon kaj la memmastrumadon de la unuaj monatoj. Al ĉio ĉi kompreneble kuniĝis la egoismaj kaj apartaj interesoj de kelkaj «riĉaj» kolektivigoj, kiuj volis konservi sian aŭtonomecon kaj la «aferstaton», kiu al ili permesis disdoni relative gravajn profitojn. Sed pro la malfacila situacio de la kataluna industrio entute, tiuj apartaĵoj ne oftis kaj tio, kio intervenis, estis du radikale malsamaj konceptoj pri la kolektivigoj: la demokratia koncepto, kiu baziĝis sur la aŭtonomeco kaj la memmastrumado, kaj la ŝtata, kiu reenkondukis la burokratan hierarĥion en la ekonomion. Alifoje NKL estis en la du tendaroj.

## LA KOLEKTIVIGOJ EN LA TERKULTURO

En ĉiuj regionoj, kie la frankista ribelo malvenkis, okazis spertoj de terkultura kolektivigo. Mi nur parolos ĉi tie pri tiuj de Katalunujo kaj Aragono, kiu estas tiom rekte ligita tiel militiste, kiel socie al Katalunujo almenaŭ dum la tempo, kiun ni studas, ke malfacilas disigi ilin. Mi ne parolos pri la kolektivigoj en Oriento (Valencio, Alakanto ktp.), kiu sendube estas la regiono de Hispanujo pli riĉa de la terkultura vidpunkto kaj, kie la kolektivigoj ankaŭ multe disvolviĝis.
En Katalunujo la terkulturaj sektoroj de la sindikatoj NKL kaj ĜUL ne estis la solaj gravaj kamparanaj organizaĵoj, kiel okazis en aliaj regionoj de Hispanujo (inkluzivita Aragono, kiu estis superregita de NKL). Ankaŭ ekzistis potenca kamparana organizaĵo, specife kataluna, kiu estis la ĉefa

socia kaj politika forto de RMK: la «Unuiĝo de Farmantoj». Ĝi estis ĉefe konsistigita de farmantoj kaj malgrandaj kamparanoj. La Farmantoj estis kontraŭaj al la kolektivigoj kaj favoraj al la terdivido, la neniigo de la farmo kaj la kreo de terkulturaj ekspluatejoj de «familia» tipo. Kio cetere realiĝis. De Julio 1936 la katalunaj kamparanoj bruligis la aktojn de posedo de la grandaj bienuloj, kaj de farmantoj ili iĝis posedantoj de la terpeco -pli aŭ malpli granda-, kiun ili kulturis. Tamen dum la regiona Kongreso de katalunaj kamparanoj okazinta en Januaro 1937, NKL klopodis por pretigi «komunan terkulturan politikon» kun la aliaj terkulturaj sindikatoj. La Farmantoj kaj la terkulturaj sindikatoj de NKL venis en akordon pri «interkonsento», kies ĉefaj punktoj estis la jenaj:

> 1-a. Ĉiu familio havos la teron, kiun oni al ĝi asignos. Tiu restanta kaj la aliaj administritaj povos esti kolektivigitaj kondiĉe, ke estu individuoj, kiuj propra-vole volas kolektivigi ilin, kontrolataj de respondecaj organizaĵoj.
> 2-a. En ĉiu vilaĝo, la kapablo de familia ekspluatejo estos decidita laŭ ties karakterizaĵoj kaj kvalito de ties tero.
> 3-a. La fruktoj de la tero apartenos al tiuj, kiuj ĝin prilaboras, je kiu ili ne povos esti senigitaj dum ili laŭdeve prilaboras ĝin.
> 4-a. Por organizi la kolektivigojn en la vilaĝoj aŭ loĝlokoj, kie ili fondiĝas, la kolektivigantoj komunigos la posedatajn terojn tiel, kiel la aliajn terojn ne individue kulturatajn, kaj estos nepra kondiĉo, ke la aliĝontoj al la kolektivigo kontribuu al ĝi per ĉiuj posedataj teroj kaj ĉiuj laboriloj.»

Aliaj punktoj rilatas al la koncentriĝo de teroj, la kunlaborado inter la kolektivigoj kaj la individuaj kamparanoj ene de Unuunura Terkultura Sindikato en ĉiu loĝloko; la rajto de la

terkulturaj laboristoj, sen teroj, aliĝi al kolektivigo per nur sia «persona laboro» kun la samaj rajtoj kaj devigoj, kiel la aliaj membroj ktp.

Unuvorte oni klopodis por ke kunekzistu kaj eĉ kunlaboru la individua kaj la kolektivigita sektoro. Sed ĜUL, per diversaj pretekstoj, ne ĉeestis en tiu kongreso kaj ne subskribis la interkonsenton. Kiel la Farmantoj konsideris nepra la subskribon de ĜUL por efektivigi ĝin, okazis nova kunveno, sed en ĝi ĜUL deklaris, ke ĝi ne povis subskribi la interkonsenton, ĉar ĝi kontraŭis la kolektivigojn, ne «principe», sed «pro la cirkonstancoj». La rifuzo de ĜUL subskribi ĉi tiun interkonsenton rompis la rilatojn inter la tri organizaĵoj koncerne la klopodon pri kunordigo de komuna terkultura politiko.[93]

Sed kompreneble de Julio-Aŭgusto 1936 kreiĝis kolektivigoj en la terkulturo samkiel okazis en la industrio. Ili preskaŭ ĉiam realiĝis spontanee kaj kelkfoje sub la premo aŭ la instigo de NKL. Kiam la Kolono Durruti eniris en Aragonon, malmultajn tagojn post la detruo de la militista ribelo en Barcelono, iĝis instigo de kolektivigoj kaj de «liberecana komunismo» en la regiono.

Malgraŭ la diverseco de spertoj kaj la konfliktoj, multokaze armitaj, inter kolektivigantoj kaj individuaj kamparanoj -aŭ pli ĝuste inter organizaĵoj favoraj al unu aŭ alia solvo-, la ĝeneralajn principojn, kiuj inspiris la fondon kaj la aktivecon de la kolektivigoj, oni povas resumi laŭ la sekva maniero:

La kolektivigo devis esti libera kaj propra-vola. En certa vilaĝo, ĉiuj kamparanoj kaj terkulturaj laboristoj, kiuj ĝin deziris, grupiĝis en memmastrumata terkultura kolektivigo. Ili alportis al la kolektivigo ĉion, kion ili posedis: terojn, laborilojn, bestojn por laboro aŭ ajnan alian aĵon. Kompreneble la terkulturaj laboristoj, kiel ni jam diris, nur alportis siajn brakojn. En registron oni enskribis la havaĵojn,

93Peirats, citita verko, 2-a volumo, paĝoj 29-32.

kiujn ĉiu kamparano transdonis al la kolektivigo por ke, kiam li volus foriri, kion principe li ĉiam rajtas, li povu reakiri ilin. Oni povis forpeli neniun membron el la kolektivigo sen tio, ke tio estu akordigita de la ĝenerala Asembleo el ĉiuj ĝiaj membroj kaj sen tio, ke li estu sciigita de unu avizo -aŭ pluraj- fare de tiu Asembleo mem. Ĉiuj teroj de la komunumo estis kolektivigitaj; tiuj de ĝiaj membroj, evidente, kaj ankaŭ tiuj de la grandaj bienuloj tiel, kiel la komunaj kaj municipaj teroj. La ununuraj, kiujn oni ne kolektivigis, estis tiuj de la sendependaj kamparanoj, kiujn ili prilaboris kun siaj familioj, sed kiujn ne povis ekspluati fremda laboro, tio estas, ili ne povis dungi terkulturajn laboristojn. Kompreneble ĉi tiuj ĝeneralaj normoj renkontis multnombrajn malfacilaĵojn kaj estigis konfliktojn. Krome ilia graveco variis laŭ la regionoj. Tie, kie superregis la Farmantoj, daŭris la terdividoj inter sendependaj kamparanoj. Male en Aragono, danke al la influo de la liberecanaj ideoj, la kolektivigoj estis multnombregaj. Oni akuzis (ĉefe la stalinistoj, kompreneble) la anarĥiistojn devigi per la teroro la kamparanojn kolektivigi sin. Ĉi tiuj kalumnioj, kiuj devenas de politika antaŭjuĝo, estis malkonfirmitaj de multnombraj atestoj (kiujn ni citos poste). Estas tute ridinde paroli pri teroro, kiam la liberecanaj komunumoj de Aragono (kie ĝuste oni diras, ke tiuj pretenditaj anarĥiistaj ekscesoj estis pli multnombraj) estis memmastrumataj kaj la asembleoj de laboristoj ne nur elektis kaj eksigis siajn komitatojn, sed ke krome ili rekte solvis, dum siaj periodaj kunvenoj, ĉiujn gravajn aferojn.

Kiu efektivigis la teroron kaj kontraŭ kiu, se la grandega plimulto de komunumo (vilaĝeto, vilaĝo aŭ eĉ urbo) rekte partoprenis en ties mastrumado? Veras, ke en Katalunujo okazis kelkaj bataletoj, kelkfoje armitaj, inter favoruloj kaj kontraŭuloj de la kolektivigoj, inter membroj de NKL kaj Farmantoj, aŭ de la Terkultura Sindikato kreita de ĜUL, superregita de la stalinistoj. Sed estis izolitaj okazoj kaj

kvankam oni plenumis kelkajn misuzojn kontraŭ kelkaj malplimultoj malfavoraj al la kolektivigoj, kio ĉefe vekas la atenton en la terkulturaj kolektivigoj (tiel, kiel en la industriaj) estis ilia amasa karaktero, ilia kreemo, ilia spontaneeco, unuvorte. Krome –kiel oni vidos en la lasta parto de ĉi tiu libro- kiam la komunistaj trupoj komanditaj de la neesprimebla Líster eniras en Aragonon somere 1937, por likvidi per la teroro la liberecanajn komunumojn, ili ne sukcesis, tiel granda estis la rezisto de la terkulturaj laboristoj -kaj de la ceteraj laboristoj-. La komunistoj devis decidi alion kaj haltigi la «reorganizon de la terkulturo» (la likvidon de la komunumoj) per la preteksto ne «malhelpi la laborojn de la rikolto». Evidente la armita interveno de la trupoj de Líster bremsis, limigis, kaj ofte malpliigis la movadon de la terkulturaj kolektivigoj en Aragono. Por fini la fikcian anarĥiistan «teroron» falis sur tiun regionon reala armita subpremo, kiu malgraŭ ĉio ne atingis sian celon: nevola kaj sanga pruvo de la alligiteco de la kamparanaj homamasoj al la kolektivigoj.

* * *

Jen kelkaj ekzemploj de terkulturaj kolektivigoj, unue en Katalunujo:

«*Plan de Cabra*: Du mil loĝantoj, parto de ili laboranta en la teksa fabriko Martí Llopart. La Kolektivigo estis konsistigita, en Junio 1937, de ĉirkaŭ 270 individuoj. Ili kulturis ĉirkaŭ 5.000 hektarojn da tereno. La teroj pliigis sian produktopovecon ĉirkaŭ 75%. Ne ekzistis horaro de fiksa laboro. La salajro estis familia. Ĉiu kolektivisto enspezis kvin pesetojn de tagsalajro, kaj oni aldonis al ĝi po du pesetojn pliajn por ĉiu membro de la familio ne konsiderante la aĝon. Ili produktis cerealojn, guŝojn, vitejon, migdalon kaj avelojn. La pluson de la konsumado oni vendis ekstere aŭ praktikis la interŝanĝon. Farmobieno kun 500 kokinoj por la

produktado de ovoj. Naŭ bovinoj, ses bovidoj kaj virbovo. Ili aranĝis magazenon en la preĝejo. Ili muntis kolektivajn vendejojn de manĝaĵo, guŝoj, salaj fiŝoj kaj viando. Ili malhavis terkulturan maŝinaron. La teksa fabriko, kolektivigita de la laboristoj, trapasis kriztempon pro manko de krudmaterialoj kaj kemiaj ingrediencoj. La laboristoj apartenis al NKL kaj ĜUL.

»*Hospitalet de Llobregat*: La teroj kulturataj de la Kolektivigo mezuris surfacon de 15 kvadrataj kilometroj. Pli ol 1.000 gekolektivistoj. Oni pagis ĉirkaŭ 90.000 semajnajn pesetojn, kiel salajrojn. La rikolto de fazeoloj de 1937 donis la kvanton da 555.000 kilogramoj. La teroj estis dividitaj en 38 zonoj; 35 estis de irigacio kaj la tri ceteraj senirigaciaj. Ekde ĝia fondo oni pagadis 7.000 semajnajn pesetojn por kostoj de ĝenerala plibonigo en la konstruo de novaj verkoj. Dum dek monatoj oni aĉetis maŝinaron kontraŭ kvanto da 180.000 pesetoj. Jen tre ilustra bilanco de ĝia administrado:

SEPTEMBRO 1936 – AŬGUSTO 1937

| | Enspezoj | Elspezoj |
|---|---|---|
| Unua trimonato | 432.710,37 pesetoj | 416.973,09 pesetoj |
| Dua trimonato | 910.756,81 pesetoj | 794.628,51 pesetoj |
| Tria trimonato | 1.655.045,20 pesetoj | 1.312.305,10 pesetoj |
| Kvara trimonato | 2.007.992,80 pesetoj | 1.643.771,05 pesetoj |
| | 5.006.505,18 pesetoj | 4.167.679,75 pesetoj |

La Kolektivigo sendis al la militfronto ĉirkaŭ ok vagonojn da artiŝokoj, taksitajn je 30.000 pesetoj, kaj plurajn kamionojn de legomoj. Oni ankaŭ praktikis solidarecon kun aliaj Kolektivigoj bezonantaj ĝin. Ĉiu trimonato oni okazigis ĝeneralan Asembleon por studi la atingitajn rezultojn kaj indiki novajn bezonojn. Antaŭ ĉi tiuj asembleoj, la Konsilantaro pri Administrado prezentis al la kolektivistoj

detalan kontan registron. Ĉi tiu Konsilantaro pri Administrado estis konsistigita de kvin kamaradoj, helpataj de delegitoj de ĉiu zono, unu sindikata kaj la alia teknika. La teknikaj delegitoj kunvenis ĉiun dekkvin tagojn por studi la bezonojn de la laboro. Per la informoj de la teknikaj delegitoj, la Konsilantaro pri Administrado decidis tion, kio ĉiutage devis esti transportota en la merkatojn, tiel de *Hospitalet,* kiel de Barcelono. La kolektivistoj projektis kanaligi la riverbordon de la rivero *Llobregat* por protekti la urban zonon kontraŭ la oftaj inundoj. Escepte de ĉirkaŭ sesdek kolektivistoj, la aliaj apartenis al NKL. La kolektivigo de la teroj estis kompleta. Oni praktikis la solidarecon kaj la interŝanĝon kun aliaj Kolektivigoj. Oni aĉetis kamionon por la transporto de la produktoj.»

Ambaŭ ekzemploj, eltiritaj de la libro de Peirats[94], permesas al ni fari ideon pri la funkciado de la terkulturaj kolektivigoj en Katalunujo. La principoj, kiujn sekvis tiuj spertoj, estis inspiritaj de la anarĥiismaj teorioj. Ni rimarkigu la demokratian kaj memmastrumatan aspekton de la kolektivigoj; la ĝenerala Asembleo estis la «supera organo de la potenco», la Konsilantaro pri Administrado estis elektita kaj eksigebla; la egaleco de ĉiuj membroj, tiel por rajtoj, kiel por devoj, estis senescepta. Ĝenerale oni ne trudis rigidajn laborhorarojn, sed la taskoj disdoniĝis laŭ grupoj el 5 aŭ 10 personoj. Ni same rimarkigu la raciigon kaj la kreskon de la produktado, la helpon al la militfronto per donacoj el naturaĵoj - kaj el viroj! - ktp. Same grava aspekto estis la granda socia penado realigita je la eduka kaj sanitara kampo fare de la terkulturaj kolektivigoj. Ĉiuj informoj rimarkigas la kreon de novaj lernejoj, de kursoj pri alfabetigo aŭ pri perfektigo por plenkreskuloj, la malfermon de klinikoj kaj hospitaloj, la kreon de bibliotekoj kaj kulturaj kluboj.

94Peirats, citita verko, 1-a volumo, paĝoj 278-279.

En la vilaĝoj, kie la Kolektivigo grupigis preskaŭ ĉiujn loĝantojn, Kolektivigo kaj Municipo intermiksiĝis fakte, kvankam ne rajte. En la aliaj, estis Municipo konsistigita de ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj kaj, laŭ la rilatoj ekzistantaj inter la politikaj fortoj, okazis streĉitecoj kaj malkonkordoj. Ĝenerale oni povas diri ke, almenaŭ de Julio 1936 ĝis la somero 1937, preskaŭ ĉiam la Revoluciaj Komitatoj kaj la Komitatoj de la kolektivigoj estis la organoj de loka povo, ĉar la Urbaj Konsilantaroj, ĉu ekformis parton de la Revoluciaj Komitatoj, ĉu paralele ekzistis kiel simplaj ornamoj aŭ spuroj de estinteco momente nuligita. Ekde la somero 1937, la registaraj aŭtoritatoj klopodis por -kaj kelkfoje atingis- redoni al la Urbaj Konsilantoj ties laŭleĝajn funkciojn. Tiuj Urbaj Konsilantaroj subtenitaj de la Registaro ne estis reelektitaj, sed kooptitaj en la sino de la organizaĵoj de la Popola Fronto.
Koncerne la terkulturajn kolektivigojn en Katalunujo -kaj aliloke- endas elstari la nekredeblan diskriminacion pri la salajro de la virinoj -kio ankaŭ okazis en la industrio-. Kvankam la sistemo de salajroj ne estis unuforma -ĉar oni komune ĝin decidis en ĉiu kolektivigo: familia aŭ individua salajro aŭ kombino de ambaŭ-, oni pagis al la virinoj malpli ol al la viroj. Kiu ajn estu la uzata preteksto, en ĉio tio estas reakcia postvivado de la estinteco, kiu ne tre bone akordas kun la profunde liberiga sperto de la kolektivigoj.

Aragono: La 14-an kaj 17-an de Februaro 1937 okazis en *Caspe* -ĉefurbo de la revolucia Aragono kaj sidejo de la Konsilantaro de Aragono- la fonda Kongreso de la Federacio de Kolektivigoj de Aragono. Estis reprezentitaj dudek kvin kantonaj federacioj, tio estas, 275 vilaĝoj kaj 141.430 familioj. Post kelkaj monatoj la nombro de kolektivigoj en Aragono altiĝis ĝis 450, kiuj grupigis 433.000 laboristojn.

Evidente la celo de la Federacio de Kolektivigoj estis kunordigi kaj plani la aktivecon de ĉiu el ili samtempe respektante ilian aŭtonomecon:

> «La kvara punkto de la tagordo estis la starigo de ĝenerala Regularo, kiu specifis la entutajn instrukciojn de la aragonaj Kolektivigoj. Ĉi tiu estas ĝia teksto:
> 1. Per la nomo de Federacio de Terkulturaj Kolektivigoj fondiĝas en Aragono asocio, kiu havos kiel komision la defendon de la kolektivaj interesoj de la laboristoj organizitaj en ĉi tiuj.
> 2. Funkcioj de ĉi tiu Federacio:
> a) Intense propagi la avantaĝojn de la kolektivismo bazante ĝin sur la interhelpo.
> b) Administri la eksperimentajn farmobienojn, kiujn oni povas krei en tiuj loĝlokoj, kie la kondiĉoj de la grundo estu favoraj por semi ĉian semojn.
> c) Priatenti la junulojn, kiuj havas talentojn por la teknika preparado, per la kreo de teknikaj specialigitaj lernejoj.
> d) Organizi grupon el teknikistoj, kiuj studu en Aragono la manieron atingi plej grandan produktokapablon el la laboro efektivigata en la diversaj kamparlaboroj.
> e) Serĉi la komercajn plivastiĝojn ekster la regiono ĉiam emante plibonigi la kondiĉojn de interŝanĝo.
> f) Ĝi ankaŭ sin okupos fari la komercajn operaciojn eksterlande per la kontrolo, fare de statistikoj, pri la plusa produktado de la regiono, kaj sekve ĝi prenos sur sin rezistokason por alfronti ĉiujn bezonojn de la federaciaj kolektivigoj, ĉiam en bona harmonio kun la Regiona Konsilantaro pri Defendo de Aragono.»

La Federacio ankaŭ okupis sin:

a) Havigi al la Kolektivigoj ĉiujn amuzrimedojn, kiuj samtempe servu kiel distro kaj pliigu la kulturon de la individuoj laŭ ĝenerala senco.
b) Organizi prelegojn, kiuj emu plibonigi la edukon de la kamparano pere de la kino, teatro, kaj kiom da rimedoj de propagando eblas.
c) Ankaŭ necesas starigi, ene de ĉiu Kolektivigo, bredadejojn por selekti bestojn de diversaj rasoj, danke al la progreso de la moderna scienco por atingi pli bonajn produktokapablojn ol tiuj atingitaj ĝis nun... Ĉiuj ĉi aktivecoj estos direktitaj de teknikistoj kvalifikitaj por tio... Aliflanke ĉiu terkultura ekspluatejo devas samtempe inkluzivi la terkulturon kaj la bredadon... Ni havas disponeblaj por la kolektivistoj plurajn planojn de eksperimentaj farmobienoj.»[95]

La Federacio ankaŭ sin okupis konsili planadon de la kulturaĵoj laŭ la naturo de la tereno, la rilaton de kunvivado kun la privataj kamparanoj ktp. La «politika» organo de la Federacio estis la Konsilantaro de Aragono, prezidita de la NKL-ano Joaquín Ascaso, kiu anstataŭis la malnovan Guberniestron.
Laste ĉi tiu Kongreso mem de *Caspe* prenis decidon koncerne Dekreton de la Registaro per kiu la Urbaj Konsilantaroj devis esti restarigitaj ĉie. La Kongreso decidis akcepti la Dekreton konsiderante, «ke la Urbaj Konsilantaroj plenumas malsaman rolon al tiu de la Kolektivigoj» kaj, ke «ili plenumas malsaman funkcion al tiu de la Administraj Komitatoj de la Kolektivigoj». Ĉiel ĝi konfidis al NKL –kiu kompreneble estis ĉie- la taskojn prigardi por ke regu la interkompreno inter ambaŭ institucioj, kaj politike regi la Urbajn Konsilantarojn. Tamen kvankam oni supozis, ke ĉi tiuj lastaj reprezentis la tutan loĝantaron -ĉar ne ĉiuj estis

95LEVAL, Gaston: *Colectividades libertarias en España* [hispane, Liberecanaj kolektivigoj en Hispanujo], paĝoj 89-93.

membroj de Kolektivigo- ne ŝajnas, ke la Dekreto estis reale aplikata en tiuj liberecanaj komunumoj, en kiuj la grandega plimulto de la loĝantaro apartenis al la Kolektivigo. La Urbaj Konsilantaroj, ne elektitaj, estis instalitaj per la forto en tiuj urboj kaj vilaĝoj, pro la militista atako de la stalinistoj kontraŭ la terkulturaj kolektivigoj de Aragono. Ankaŭ ĉi tie, la liberecana demokratio -tre disvastigita- kunvivis kun la «respublika leĝeco» antaŭ ol esti brutale atakita de tiu lasta. Nu ree konfirmas sin tio, ke la atako estas la plej bona defendo kaj, ke endus efektivigi radikalan renovigon de la membroj, metodoj kaj funkcioj de la Urbaj Konsilantaroj estu aŭ ne tiel nomitaj -kaj ĉi tio per demokratia vojo, per liberaj balotadoj- kaj ne per kaŝkombinoj inter partioj. Iel ajn tio ne estas esenca, laŭ mi opinio; tio esenca estas la graveco kaj la sukceso de la aragonaj terkulturaj kolektivigoj.
La socialista ĵurnalisto Alardo Prats, kiu vizitis la Kolektivigon de *Graus*, en majo 1937, rakontas, kion vidis:

> (...) «Ĉio estis kolektivigita: Feraĵvendejo de la Kolektivigo, Vendejo de manĝaĵoj de la Kolektivigo, Gastejo de la Kolektivigo, Forĝejo de la Kolektivigo, Muelejo de la Kolektivigo. Ĉiuj materialaj, moralaj kaj ekonomiaj esprimoj de la popolo estas unuigitaj en la tuto de la Kolektivigo. La laboro estas dividita. Ĉiu gildo, per asembleo, fiksis ĝin al ĉiu kolektivisto. Oni pensus, ke ĉi tiuj Asembleoj de gildo estas fonto de diskutadoj. Oni tre malmulte parolas. Ĉar ĉiu scias sian devigon kaj ne ĝin evitas.
> La viroj pli aĝaj ol sesdek jaroj estas sendevigitaj de la labordevo. Komence ĉi tiuj irantoj al la lastaj vivjaroj sentis sin malinklinaj pro la aŭdacoj de la junularo, kiu decidis, per plimulto, la plenumotajn kolektivigajn normojn. Ili timis, ke tiuj junuloj sufokos ilin per troa laboro por iliaj jaroj. Ili baldaŭ konstatis, ke ne estis tiel. La maljunuloj ne devis labori. (...)

Tiam la maljunuloj, en asembleo, interkonsentis labori. Necesis labori por ne esti multekosta ŝarĝo por la aliaj kolektivistoj kaj por kontribui levi la popolon de ĝia humiligo cele loki sin ĉekape de la produktado inter la aliaj vilaĝoj de la ĉirkaŭaĵoj. Por helpi venki la militon, la maljunuloj de *Graus* ne povis konsideri la aĝon kaj la korpajn sandifektojn, kiel baron. Tiam la maljunuloj de *Graus* kreis aŭtentikan kaj emociigan rapidagan brigadon. La vilaĝo al ĝi donis la nomon de "Internacia Brigado"... La mirindaj progresoj de la Kolektivigo facile konstatas sin. Ĉiusabate la kolektivistoj iras al la Centra Ŝparkaso de la Kolektivigo, subskribas la salajran liston kaj enspezas sian monon. En la kooperativoj de la Kolektivigo ili akiras tion bezonan por sia vivtenado.
Kiam kolektivisto decidas edziĝi, oni al li koncedas ferisemajnon pagatan laŭ la kuranta salajro, al li serĉas domon -la loĝejoj ankaŭ estas kolektivigitaj- kaj al li havigas meblojn pere de la responda kooperativo, kies valoron li amortizas laŭ la tempopaso kaj sen ia angoro. (...) La infanoj estas objekto de specialega zorgo kaj de la permanenta atento de la Kolektivigo. Pro nenia kialo nek preteksto ili laboras antaŭ la dekkvar jaroj. Finiĝis la ekspluatado de la infanoj fare de la parencoj mem, kiuj alitempe preskaŭ ĉiam devigitaj de la mizero de la hejmoj, kie ili naskiĝis, antaŭtempe forlasi la lernejajn taskojn. La patrinoj kaj ĉefe la virinoj, kiuj estos patrinoj, same estas objekto de speciala traktado, ĉefe dum la periodo de la mamnutrado. Ili estas liberigitaj de ĉiu laboro.
Ĉiuj junulinoj laboras en la manlaborejoj, kie ili kudras kaj faras vestaĵojn por la luktantoj en la kampoj aŭ en la oficejoj. La tuta *Graus* estas svarmo el laboremaj kaj sinoferemaj homoj, regata de la sonsignaloj de

sireno, kiu indikas la horojn de laboro kaj ripozo al ĉiuj najbaroj (...)[96]» «Kiam la ĝenerala sekretario de la Kolektivigo, kamarado Portella, kondukis min al la fako de statistiko kaj eltiris sliparon por informi min laŭ preciza maniero pri la irado de la laboroj kaj la nombroj da produktado de la tuta vilaĝo, mi preskaŭ svenis. Jam povus esti kontenta la plej bone funkcianta ŝtata institucio, disponanta plej kompetentajn kaj preparitajn funkciulojn, la plej rigora pri la precizeco de ciferoj, se ĝi iom similas al la organizo de la Kolektivigo de *Graus*. Al ĉiuj, kiuj akceptas ĉi tiun aserton per skeptikeco, mi permesas al ili konsili, ke ili kontrolu ĝian absolutan certecon surloke.

Ĉio estas sisteme organizita. Ĉiu branĉo de la produktado havas sian sliparon kun la ekzaktaj donitaĵoj pri sia disvolviĝo kaj pri siaj ebloj aktualigitaj ĝistage, ĝishore. (...) Ĉi tiu organizo faciligis ĉiujn plibonigojn realigitajn de la Kolektivigo: apud la vilaĝo, por la brutaro de porkino oni muntis modelan farmobienon, kiu loĝigas ĉirkaŭ du mil bestojn de diversaj aĝoj kaj rasoj. (...) Kiam venos la vintro, ĉiu najbaro de *Graus* havos porkon, kiel unu el la bazoj de sia vivtenado. La farmobieno estas aranĝita laŭ la postuloj de la plej modernaj instalaĵoj. La bestoj havas duŝojn kaj ĉiujn zorgojn, kiujn la scienca traktado de la brutaro postulas. Mi demandis la kamaradojn, kiuj prizorgas la farmobienon kaj tiujn, kiuj ĝin aranĝis, de kie ili prenis la modelon. Ili asertis al mi, ne donante al tio grandan gravecon, ke, kiam komenciĝis ĉi tiu verko, ili studis kaj zorge diskutis diversajn modelojn kaj, ke ili fine elektis usonan modelon egalan al tiu de la porkaj farmobienoj de

96Kontraŭe al aliaj kolektivigoj, ĉi tie la laborhoraroj ŝajnas sufiĉe rigidaj.

Ĉikago. Aliloke de la ĉirkaŭaĵoj de la loĝloko estis instalita alia birdobreda farmobieno, modelo de organizo kaj laboratorio de tre kontentigaj spertoj. (...) La pli variaj specoj de hejmaj birdoj svarmas en la sekcioj de la farmobieno. Ĉirkaŭ dek mil ekzemplerojn ili opinias havi je plena produktokapablo la proksiman aŭtunon. Nun la pavilonoj de la farmobieno loĝigas ses mil. Ĉio estas nova kaj superba. Ĉio estis instalita laŭ la plej antaŭeniraj postuloj de la tekniko kaj de la sperto de ĉi tiu tekniko. La direktisto de la farmobieno elpensis novan kovaparaton kun pli granda produktokapablo ol tiuj konataj. Miloj da tre etaj kokidetoj svarmas en la ĉambroj ekipitaj de hejtado. Centoj da anasoj kaj anseroj. Centoj da kokidoj kaj kokinoj zorge klasifikitaj. Estas eksterordinara farmobieno, samkiel tiu de la porka brutaro. De ĉiuj distriktoj de Aragono oni iras tien por preni modelon. *Graus* estas loko de pilgrimado por la aragonaj laboristoj kaj lernejo pri ekonomia rekonstruo de nia patrujo.»

«Reveliĝis en ĝiaj loĝantoj ĉiuj kreantaj kapabloj. Funkcias ĝiaj superbaj lernejoj –portantaj la nomon de Joaquín Costa - kaj biblioteko kun katalogo, kiu estas indekso de la plej modernaj verkoj pri la plej diversaj temoj de la intelektaj fakoj. Posedas la Kolektivigo presejon kaj librejon. Oni kreis Lernejon pri artoj kaj metioj, kie studas pli ol sesdek junuloj de la loĝloko, kaj ekzercas sin en la diversaj teknikoj de ĉiuj artoj kaj metioj. En la konstruaĵo mem de la Lernejo pri belaj artoj kaj metioj estis instalita muzeo de pentraj, skulptaj verkoj.

*Graus* plejparte priatentas la bezonojn de kolonio de rifuĝintaj infanoj kun ties instruistoj, instalita en granda palaco kun vasta ĝardeno proksima al la

loĝloko. (...) Ĝi vivtenas pli ol kvindek plenaĝajn rifuĝintojn.

*Graus* ĉekape estas por ajna postulo de la militbezonoj elinter ĉiuj vilaĝoj de Aragono. Ĝi riparis vojojn. Ĝi studas la eblojn de ekspluatado de kelkaj zonoj de ĝia distrikto, riĉaj en minoj de karbo kaj piritoj. Funkcias ĝiaj industrioj laŭ la maksimuma produktokapablo ene de la perfekte normalaj ekonomiaj bazoj. Ĝi konstruis novan muelejon kun modernega instalaĵo. Ĝi akiris modernan terkulturan maŝinaron elinter kiu elstaras modelo de novega draŝmaŝino. Ĝi industriigis la uzon de la brutobredado, finfine transformis la vivon de la vilaĝo kaj iras survoje al la transformado de la vivo de ĉiuj vilaĝoj el la distrikto de ĝia nomo. Ĝi faris la Revolucion.»[97].

Tamen la aŭtoro de ĉi tiu raportaĵo rimarkigas, ke *Graus* iamaniere estas eksperimenta sperto kaj, ke aliaj kolektivigoj, kiujn li vizitis, ne atingis tiel kontentigajn rezultojn.

Tamen temis pri malgranda vilaĝo: 700 loĝantoj, ĉiuj ili membroj de la Kolektivigo escepte de 170. Endas rimarkigi, ke ĉi tie oni ne nuligis la monon. La Centra Ŝparkaso de la Kolektivigo ĉiusabate pagis la salajrojn de la kolektivistoj. La verkisto ne specifas se la salajro estis individua aŭ familia. Estis Banko en *Graus*, kiu estis forlasita post la brulado de siaj sliparoj. Ĝiaj dungitoj laboris kiel librotenistoj de la Kolektivigo, kies Centra Ŝparkaso efektivigis ĉiujn internajn aŭ eksterajn operaciojn.

En la liberecanaj komunumoj, en kiuj la mono estis nuligita, la salajroj estis pagitaj per kuponoj, konsente kun la principo de la familia salajro. «La kolektivigoj de NKL plejparte

97PRATS, A.: *Vanguardia y Retaguardia en Aragón* [hispane, Militfronto kaj Postmilitfronto en Aragono], broŝuro, paĝoj 85-93.

karakteriziĝas pro la adopto de la familia salajro. La salajroj estis pagataj laŭ la bezonoj de ĝiaj membroj kaj ne pro la laboro de ĉiu laboristo.»[98] Kiam en Kolektivigo estis abundo de vino, pano aŭ oleo, ekzemple, oni senpage distribuis porciojn, oni povis aĉeti la aliajn varojn per kuponoj, fakte ili plenumis funkciojn de «interna monero», ĉar kiam oni devis aĉeti aŭ vendi ekstere, la mono reakiris siajn rajtojn. Kompreneble escepte se la interŝanĝo fariĝis inter du anarĥiistaj Kolektivigoj. Kaminski priskribis la Kolektivigon de *Alcora*:

«Ĉiu ricevas tion, kion li bezonas. Sed, de kiu? De la Komitato, kompreneble. Tamen estas neeble provizi kvin mil personojn per sola disdonejo. En *Alcora* estas vendejoj, kie oni povas aĉeti kiel antaŭe.» Sed ĉi tiuj vendejoj, rimarkigas Kaminski, nur estas disdonejoj: «Ili apartenas al la tuta popolo kaj iliaj antaŭaj posedantoj akiras nenian profiton el ili. Oni jam ne pagas per mono, sed per kuponoj. Eĉ la barbiro razas kontraŭ kupono. Ĉi tiuj kamparanoj volas havi “ĉion komune", kiel oni rakontas pri la Ermitoj en la Biblio. Ili konsideras, ke la plej sekura rimedo por realigi la ĝeneralan egalecon konsistas nuligi la monon». En *Alcora*, kiel en multaj aliaj liberecanaj komunumoj de Aragono, oni anstataŭigis la monon per kuponoj liveritaj de la Komitato: «La teorio laŭ kiu la bezonoj de ĉiu loĝanto estos kontentigitaj, nur malperfekte realiĝis, ĉar oni baziĝas sur la principo, ke ĉiuj havas la samajn bezonojn. Oni ne faras individuajn diferencojn aŭ, por esti ĝuste, oni ne rekonas la individuon: nur rekonas la familion. La fraŭloj estas la solaj, kiujn oni konsideras kiel individuojn». Stranga sinteno fare de anarĥiistoj!

Plu diras Kaminski: «Ĉiu familio kaj ĉiu persono loĝanta sola ricevis karton, kiun ĉiutage oni truas en la laborposteno, de kiu neniu povas tiel liberigi sin. La kuponoj distribuiĝas

98A. Souchy, en «*Tierra y Libertad*» (6-an de Aŭgusto 1938).

akorde kun tiuj kartoj. La granda manko de la sistemo estas la jena: ĉar ĝis nun mankas alia sistemo de mezurado, ili devis ree uzi la monon por kalkuli la egalvaloron de la realigita laboro. Ĉiuj, laboristoj, komercistoj, kuracistoj, por ĉiu labortago ricevas po kvinpesetajn kuponojn». Ni cetere rimarkigu, ke en preskaŭ ĉiuj Kolektivigoj, la kuracistoj, instruistoj, agronomaj inĝenieroj, flegistinoj ktp, iĝis salajruloj de la Kolektivigo kaj iliaj servoj estis senpagaj por ties membroj.

«Parto de la kuponoj portas la surskribon "pano" (ekzemple), ĉiu egalvaloras unu kilogramon. Alia parto eksplicite havas monan kontraŭvaloron. Tamen ĉi tiujn kuponojn oni ne povas konsideri kiel biletojn de Banko. Per ili oni nur povas interŝanĝi varojn de konsumo kaj krome per limiga kriterio. Kvankam la kvanto reprezentita de tiuj kuponoj estus pli granda, neeblus akiri rimedojn de produktado kaj iĝi kapitalisto, eĉ laŭ malgranda skalo, ĉar nur la varoj de konsumo estas vendeblaj. Ĉiuj rimedoj de produktado apartenas al la komunumo.»

Ankaŭ ĉi tie, skribas Kaminski, la Komitato estas la elektita reprezentanto de la tuta komunumo. La Komitato neleĝe posedas la tutan monon de *Alcora*, proksimume cent mil pesetoj. «La Komitato interŝanĝas la produktojn de la vilaĝo kontraŭ aliaj produktoj, kiuj al ĝi mankas, kaj ĝi aĉetas kion ĝi ne povas akiri per tiu metodo. Sed la monon oni nur konsideras kiel necesan malbonon, validan dum la cetero de la mondo ne sekvas la ekzemplon de *Alcora*.»

La Komitato okupas sin pri ĉio, direktas ĉion, posedas ĉion, estas ia patro de familio. «Ĉiu speciala deziro, skribas Kaminski, devas esti al ĝi submetita. Nur ĝi povas decidi la finan verdikton. Oni povus kritiki, ke la membroj de la Komitato riskas iĝi burokratoj kaj eĉ diktatoroj. Ĉi tio ankaŭ ne estis preteratentita de la kamparanoj. Ili decidis, ke la Komitato ofte renovigu sin tiel, ke ĉiu loĝanto iutempe formu parton de ĝi.»

Ĉi tio ankaŭ estas komuna al la plej granda parto de la kolektivigoj de Aragono aŭ Katalunujo.
«Ĉiu ĉi regularo havas, pro ties naiveco mem, kortuŝantajn trajtojn. Estus eraro pretendi vidi en tio ion pli ol provo, fare de la kamparanoj, starigi la liberecanan komunismon kaj tro malmilde mallaŭdi ĝin. Antaŭ ĉio endas ne forgesi, ke la terkulturaj laboristoj kaj eĉ la malgrandaj komercistoj mem de ĉi-tipa vilaĝo, ĝis nun, vivis kun ekstreme malalta vivnivelo. Iliaj bezonoj ne estas tre diversaj. Antaŭ la Revolucio, peco de karno jam estis lukso por ili kaj nur kelkaj intelektuloj loĝantaj inter ili havas dezirojn, kiuj superas la plej elementajn bezonojn. La pruvo de tio estas, ke la karto de familio lasas la plej prematan estulon el Hispanujo -la virinon- sub la plena dependeco de la viro.»[99]
Efektive la familia salajro -kaj la karto de familio- defendita de NKL, kiel grandega sociala progreso, fakte pruvis esti profunde reakcia, ĉar ne nur estis la virino -kiu efektive estis la plej premata estulo el Hispanujo-, kiu estis submetita al la viro, ankaŭ la infanoj estis submetitaj al la familipatro. Eĉ la knaboj, kaj ankoraŭ pli la knabinoj de 18-20 jaroj kaj eĉ pli aĝaj, estis submetitaj al la patra aŭtoritato. Sendube ne estis en *Alcora*, kie oni povis esti sekse libera. Paradokse tio, kion oni pretendis prezenti kiel progreseman principon, ĝuste estis la esenco mem de la familio laŭ ties plej konservativa kaj tradicia aspekto kaj laŭ tio pli reakcia, kion ĝi enhavas. Ĉio ĉi tre bone klarigas, kiel tre trafe rimarkigas Kaminski, «la nuntempan aferstaton», tio estas, la malfruo en kiu tiam estis Hispanujo, ĉefe en la kamparo, en plena revolucia transformado, en la konscienco mem de la partoprenantoj en tiaj transformadoj.
Ni ree parolu pri la «nuligo de la mono», krom la «kortuŝa naiveco» pri kiu parolas Kaminsky, endas rimarkigi la grandegajn komplikaĵojn, kiujn estigis la sistemo de

99E. H. Kaminski, citita verko, paĝoj 118-121.

kuponoj. La aŭtoro rakontas, per sufiĉe humura sento, ke se juna laboristo de *Alcora* volis viziti sian fianĉinon loĝantan en najbara vilaĝo, li devis turni sin al la Komitato por interŝanĝi siajn kuponojn kontraŭ mono por la buso. Same okazis se li volis iri en la urbon al la kinejo, viziti parencon. La Komitato povis rifuzi, decidi kiom da fojoj la kolektivistoj povis viziti siajn fianĉinojn aŭ kiom da fojoj ili povis iri al la kinejo ktp.! Ne malfacilas imagi la misuzojn, kiujn povis plenumi ofendiĝema kaj rigorema membro de la Komitato. Aliaj atestantoj, kiel Borkenau aŭ Bolloten, kies opinioj pri la kolektivigoj ege diferencas inter si, rakontas aliajn ĉi-tipajn misuzojn.
Evidentas, ke la nuligo de la mono en *Alcora* aŭ en aliaj liberecanaj komunumoj estis fetiĉisma, kvazaŭmagia agado. Ĉar oni konsideris la monon, kiel la absolutan malbonon, nuligi ĝin estis nuligi la Malbonon kaj restarigi la Bonon. Ĝis la ekstremo, ke en kelkaj komunumoj, oni eltiris la biletojn el la kiraskasoj de la Bankoj kaj bruligis ilin meze de la strato, meze de la ĝenerala ĝojo. Sendube estis aŭtentikaj festaj fajroj, sed bedaŭrinde ili ne sukcesis fini la «imperion de la mono». Neeblis nuligi la monon ene de la kolektivigoj, dum ĝi daŭre superregis la sociajn rilatojn en la socio ĉirkaŭanta ilin, dum ĝi estis necesa por aĉeti kaj vendi, por iri al la kinejo, por veturi per la buso ktp, kaj krome dum la najbaraj Kolektivigoj, multfoje tiel liberecanaj, kiel la ceteraj, pagas siajn salajrojn per mono kaj ne akceptas kuponojn.
Se oni povas konsideri la monon, kiel la esprimon de la relativa malabundo (abundo: senpageco) kaj de la socia neegaleco, la nuligo de la mono nur povus deveni de la nuligo de la neegaleco kaj de la malabundo, sed ne inverse.

* * *

La aŭtonoma kataluna Registaro ankaŭ oficiale diskonigis Dekreton por la terkulturaj kolektivigoj, kies tekston publikigis «*Solidaridad Obrera*» la tagojn 4-an kaj 6-an de

Novembro 1937. Ĉi tiu Dekreto, subskribita de Luis Companys, Prezidanto, kaj José Calvet y Mora, Konsilanto pri Terkulturo kaj Gvidanto de la Unuiĝo de Farmantoj, ne havas tiel intereson, kiel tiun pri la industrio, ĉar ĉi-okaze temis pri la akcepto de kio jam fakte ekzistis. Kompreneble por pravigi ĝian ekziston, la Dekreto pretendis starigi devigajn kaj ĝeneralajn normojn por la funkciado de la terkulturaj Kolektivigoj. Ni rimarkis en ĝi la deziron de rajto pri viglado kaj malfondo farota de la registaraj aŭtoritatoj pri la aktivecoj de la cititaj Kolektivigoj tiel, kiel la enkondukon de «privata sektoro» en ilia sino. En la Dekreto oni disponis, ke la membroj de la Kolektivigoj povis private posedi legomĝardenon, kortajn birdojn, bestojn de farmobieno (kaproj, porkoj, ŝafoj), kiel en la sovetiaj kolĥozoj. Tamen al ni ŝajnas signifa pri la amplekso kaj la reala graveco de la terkulturaj Kolektivigoj, la fakto, ke la kataluna Registaro, post la 1937-aj majaj okazintaĵoj, publikigis ĉi tiun Dekreton rekonante ilin kaj starigante normojn, kiuj pli-malpli estis, kiuj regis ilian aktivecon de antaŭ pli ol jaro.

## KIEL BILANCO

«La entrepreno pruvis esti tre konsiderinda sukceso ĝis la momento, kiam ĝi estis neniigita de la armiloj», skribas Noam Chomsky. Efektive estas tre rimarkinde vidi la amasojn de terkulturaj kaj industriaj laboristoj tiom profunde transformi la ekzistantan socian ordon. Ili obeis neniun instrukcion «de supre», sed ili devis lukti kontraŭ la ordonoj kaj ĉiaj premoj devenantaj de la Staboj de ĉiuj politikaj kaj sindikataj organizaĵoj, kaj tio en plena revolucia milito kontraŭ «la armeo de la grandaj kapitalistoj kaj bienuloj.»
Efektive ĉiuj iel tiel estis kontraŭ la kolektivigoj escepte de la laboristoj mem. Veras, ke NKL-IAF depostulis la Kolektivigojn, kiel «ties» kreon kaj preskaŭ ĉiam estis ĝiaj aktivuloj, kiuj prenis la iniciaton. Sed la Dekreto, kiu ilin limigis kaj senvalorigis, ankaŭ grandparte estis verko de

NKL. Kaj ĉiuj disponoj devenantaj de tiu Dekreto, administraj kaj burokrataj, kies celo estis fini la laboristan aŭtonomecon, estis prenitaj kun la aktiva partopreno de NKL-IAF. Kaj kiam dum la majaj okazintaĵoj, kiel ni vidos poste, oni klopodis por likvidi per la forto la kolektivigojn kaj la laboristan demokration ĝenerale, NKL ilin defendis ĉe la barikadoj kaj NKL -la ministroj, gvidantoj, grandaj kaj malgrandaj burokratoj- predikis la kompromison, la civilan pacon, la kapitulacon unuvorte. La sinteno de NKL estos duobla dum la okazaĵoj, kiujn ni analizas. Diri, ke la gvidantoj perfidis la revolucian impulson de la «bazo», kvankam ne estas tute false, ankaŭ klarigas nenion. Kial oni ilin obeis en organizaĵo, kiu principe ne akceptis la «ferdisciplinon», nek la «kulton al la estroj»?
En la «bazo», la liberecanaj laboristoj kaj kamparanoj kolektivigas ĉion ekde la unuaj tagoj de la revolucio: la transportojn, la publikajn servojn, la komercon, la terkulturon. La memmastrumado realiĝis ĉie aŭ preskaŭ. Kune kun kelkaj tre rimarkindaj sukcesoj, mi konstantis mankojn de kunordigo kaj solidareco inter «riĉaj Kolektivigoj» kaj «malriĉaj Kolektivigoj». Ĉi tio ne estas la sola manko: oni ankaŭ povas rimarkigi la ne modernigon de kelkaj arkaikaj industrioj tiel, kiel nesufiĉan ŝanĝon de direkto en la produktado mem. Ĉio ĉi, por tiel diri ĝin, estas normala en tiu unua fazo, kies ĝeneralan sencon -tre gravan- oni povas resumi ĉi tiel: la laboristoj prenas sur sin siajn entreprenojn. Same ankaŭ estas normale, ke la plej progresaj spertoj de rekta demokratio disvolviĝis en la vilaĝoj kaj urboj de Aragono kaj Katalunujo, kie la asembleoj de laboristoj povis periode kunveni kaj «surloke» decidi ĉiujn necesajn disponojn. En la industrio la problemo estis pli malsimpla -kvankam nur estu pro la nombro de laboristoj-; aperis la afero de la «delegado de povoj», la sindikatoj intervenis (aperas la sindikata burokratismo kun ĝiaj apartaj celoj) ktp. Ĉiuj ĉi fenomenoj atingas grandan

gravecon tuj kiam oni «eliras» el ĉiu entrepreno. Ene de ili kompreneble la rekta demokratio fariĝas ebla kaj krome facila -tiel facila, kiel en liberecana komunumo de Aragono. Ĉi tio sendube klarigas multajn aferojn.
La gvidantaro de NKL, por mildigi la mankojn kaj protekti la kolektivigojn -fakte por direkti ilin-, proponis organizon, kiu estis konkretigita per la Dekreto de la 24-a de Oktobro 1936. La Dekreto limigis la kolektivigojn ekskluzivante la fremdajn entreprenojn (por komplezi la okcidentajn demokratiojn) kaj la entreprenojn de malpli ol 100 laboristoj. Ĝi tiel redonis al la privata sektoro gravan industrian sektoron (pro la malforta grado de koncentriĝo de la tiama kataluna industrio). Fakte okazis nenio el tio, krom rilate la fremdajn entreprenojn. Krome la Dekreto restarigis la hierarĥigitan piramidon de la produktado en kies vertico lokiĝas la ŝtato, kies rolo en la ekonomio unuafoje fariĝis decida en Hispanujo (kvankam diversgrade ĉi tiu fenomeno tute superis la kadron de Katalunujo). Paralele al la klopodo por starigi «freŝan» ŝtatan aŭtoritaton, la anarĥiistaj rondoj klopodis por enkonduki super la kolektivigoj sindikatan aŭtoritaton. La Dekreto, ni jam ĝin konstatis, atribuis al la sindikatoj tre gravan rolon en la nova organizo de la ekonomio, sed rolon subordigitan al la kataluna Registaro, supera aŭtoritato (almenaŭ teorie la centra Registaro neniam tute akceptis la katalunan aŭtonomecon, sukcesante, post Junio 1937, fakte likvidi ĝin). Sed ĉiam estis en NKL sufiĉe forta tendenco volanta, ke la sindikatoj rekte direktu la ekonomion sen ŝtata enmiksiĝo. Senutilas diri, ke ĉi tiu tendenco plifortiĝis dum tiuj periodoj, kiam NKL ne estis reprezentita en la kataluna kaj centra Registaroj, kaj ĝi malplifortiĝis kiam NKL ja estis, kiel okazis -en la kataluna Registaro- dum la publikigado de la Dekreto. Ĉi tiu tendenco, ni nomu ĝin «porsindikata», neniam atingis esti tute hegemonia, ne luktis, male al kio povis ŝajni, kontraŭ la

burokrata fenomeno, sed siamaniere kontribuis por ke ĝi okazu.

* * *

La sinteno de la Komunista Partio pri la kolektivigoj estas pli logika. Ĝi kontraŭis ilin, pretekstante, ke ili ne respondis al la «demokratia-burĝa fazo» en kiun ĝi pretendis enfermi la revolucion. Sed esence ĝi estis kontraŭ la memmastrumado kaj la laborista aŭtonomeco, kiel ĉiam ĝi estis -kaj estos. Ĝian sintenon resumis José Díaz, ĝenerala Sekretario de KPH, en parolado eldirita la 2-an de Februaro 1937 en la teatro Olimpia de Valencio, dum mitingo de omaĝo al... Maurice Thorez*:

> «Endas kuraci tion, kion ni povus nomi la malsano de la konfisko de havaĵoj de la malgrandaj industriuloj, de la "socialigo" de la malgrandaj industrioj, de ĉiuj tiutipaj misuzoj. Kaj samtempe, ke ni ĝin faras, ni devas tute sincere prezenti la problemon kaj fari tion, kio eblas por atingi la ŝtatigon de la grandaj industrioj, ke la industrioj de bazo estu transdonitaj, kiel devus esti, en manojn de la ŝtato, ke oni dekretu la ŝtatigon de ĉiuj industrioj bezonajn por la milito... (...)
> Ene de la fabrikoj endas esti administrado organizita de la laboristoj kaj sindikatoj; konsentite, sed siavice ĉi tiuj sindikatoj ankaŭ ne devas forgesi, ke ilia devo, en la nuntempa momento, konsistas ĉiakoste organizi kaj intensigi la produktadon sub la direktado de la Registaro kaj realigante ĉiujn oferojn bezonajn por venki la militon.»[100]

---

*NeT: franca politikisto, ĝenerala sekretario de la Franca Komunista Partio inter 1930 kaj 1964, ministro inter 1945 kaj 1947, kaj vicprezidanto de la Konsilantaro de Ŝtato en 1947

100Broŝuro de la Nacia Komisiono pri Agitado-Propagando de la hispana KP, Valencio, 1937.

Tio estas, endis respekti la malgrandan kaj mezgrandan industrion, «naturaj aliancanoj» de la proletaro en la demokratia-burĝa revolucio. Endis esti «laborista administrado» de la produktado por plifortigi la disciplinon kaj la produktopovecon sub la registara aŭtoritato, kaj endis atingi la ŝtatigon por tiel plifortigi la rolon de la ŝtato en la ekonomio; kio konsistigas la bezonan humon por la disvolviĝo de la burokrataro, kiel reganta klaso. Hodiaŭ ĉiuj scias, ke la ŝtatigoj –kutima kliŝo de la komunistaj programoj- neniel estas «paŝo al la socialismo», neniel kontribuas likvidi la ekspluatadon de la laboristoj, sed ke ili simple plifortigas la kapitalismon de ŝtato. Kaj ĉi tio okazas tiel en la nomataj kapitalismaj landoj (kvazaŭ estus landoj, kiuj ne estus tio!), en kiuj la ŝtata sektoro kunvivas kun la privata sektoro (kiu ĉiufoje estas malpli privata), kiel en la nomataj socialismaj landoj, kie ĉio estas ŝtatigita kaj, kie realiĝis la tuta koncentriĝo de la kapitalo, tio estas, en la landoj de burokrata kapitalismo de ŝtato.
En la kamparo, KPH manifestis sin ankoraŭ per plej granda forto, kiel la aliancanon de la mal- kaj mez-grandaj posedantoj (la grandaj, samkiel la grandaj industriuloj kaj bankestroj, estis ĉiuj ĉe Franco aŭ fuĝis eksterlanden). Vicente Uribe, gvidanto de KPH kaj ministro pri Terkulturo, eĉ proponis la fusilojn de la Partio por protekti la kamparanan propraĵon kontraŭ la kolektivistoj:

> «Komence la fundamenta problemo, por iuj, ne estis krei la bazojn por nova terkultura ekonomio, sed efektivigi frenezan provon singarde aranĝitan de personoj, kiuj tute perdis la senton pri la realo. Ili volis solvi la terkulturan problemon per la kolektivigoj!»[101]

La indigno de la Sinjoro Ministro kaŭzas kompaton. Lia kolego de la kataluna Registaro, Calvet y Mora, gvidanto de la modera Unuiĝo de Farmantoj, kiu rekonis la terkulturajn

101Citita verko.

Kolektivigojn en Katalunujo –tiel, kiel lia politika amiko, la Prezidanto de la kataluna Registaro, Companys- estas danĝeregaj revoluciuloj kompare kun la komunisto Uribe. Fakte la centra Registaro neniam rekonis la kolektivigojn, nek en la industrio, nek en la agrikulturo. La ministro pri Agrikulturo, Uribe, limiĝis leĝigi kelkajn terdistribuojn de grandaj terposedantoj jam realigitaj de la kamparanoj, kaj fervore lukti kontraŭ la kolektivigoj.
Kvankam en la cetero de Hispanujo ĜUL estis prefere favora al la laborista administrado, komence en Katalunujo estis trenita de la potenca kolektivista movado.
Sed la stalinista influo sur la kataluna ĜUL al ĝi iĝis aliancano de USPK en ties lukto kontraŭ la laboristaj aŭtonomeco kaj administrado.
Ankaŭ ne LPMU subtenis pri ĉi tiu afero tro klaran sintenon. La Konsilantaro pri Ekonomio, dum ĝi dependis de la Centra Komitato pri Volontarmeoj, kaj en kies sino estis Santillán (NKL) kaj Andrés Nin (LPMU), publikigis la 11-an de Aŭgusto 1936 ekonomian planon el 11 punktoj:
1) Reguligo de la produktado laŭ la bezonoj de la konsumado.
2) Monopolo de la ekstera komerco.
3) Kolektivigo de la grandaj terkulturaj propraĵoj, kiuj estos ekspluatitaj de la kamparanaj sindikatoj, kaj deviga sindikataliĝo de la individuaj kamparanoj.
4) Parta redukto de la valoro de la urba posedaĵo per trudo de impostoj kaj malpliigo de luprezoj.
5) Kolektivigo de la grandaj industrioj, la publikaj servoj kaj la kolektivaj transportoj.
6) Konfisko kaj kolektivigo de la entreprenoj forlasitaj de ties mastroj.
7) Disvastigo de la kooperativisma reĝimo en la distribuo de produktoj.
8) Laborista kontrolo de la bankaj operacioj ĝis la atingo de la ŝtatigo de la Bankoj.

9) Laborista sindikata kontrolo de ĉiuj tiuj entreprenoj, kiuj daŭre estas ekspluatataj laŭ privata reĝimo.
10) Rapida reenoficigo de la senlaboruloj.
11) Rapida forigo de la diversaj impostoj por atingi la solan imposton.

Laŭ W. Solano,[102] estis Andrés Nin mem, kiu redaktis ĉi tiujn punktojn, kiuj pli-malpli povas esti konsideritaj kiel la oficiala vidpunkto de LPMU. Kiel oni povas konstati, ĝia sinteno estas multe pli radikala ol tiu de KPH kaj respondas al ĝia koncepto pri la demokratia-socialisma karaktero de la revolucio: la revolucio devis ĝisfine plenumi la taskojn de la nefinita demokratia-burĝa revolucio kaj samtempe devis realigi la premisojn de la socialisma transformado. Samkiel la komunistoj, ili volis «respekti» la posedaĵojn de la et- kaj mez-burĝaro. Bedaŭrinde por iliaj respektivaj skemoj, «la aŭtonoma movado de la homamasoj» jam superis tion dum la radikala transformado de la socio. Kaj estas rilate ĉi tiun veron, kie la sinteno de LPMU radikale diferencas de tiu de KPH. Per tiu nedetruebla bona konscienco, kiun havigas la burokrata mensogo, la stalinistoj fariĝis la plej kruelaj malamikoj de la kolektivigoj kaj de la laborista demokratio.
LPMU, siavice superita de la laborista iniciato kaj subtaksante ties realigojn, lokiĝis dum la decidaj momentoj, ekzemple dum la majaj okazintaĵoj, ĉe la laboristoj. Kio al ĝi ne neebligis kondamni, ĉefe per la plumo de Juan Andrade, la realigojn «spontaneajn kaj sen entuta plano» de la laborista klaso ĝenerale kaj de la anarĥiistoj aparte. Ankaŭ ĉi-okaze ĝia centralizisma-leninisma vidado ilin devigis subtaksi riĉan kaj vivplenan sperton, nome de dogmoj, kiuj pretendis, ke tiu sperto neeblis, dum ne ĝi realiĝos sub la

102Wilebaldo Solano estis Ĝenerala Sekretario de LPMU en la ekzilo. Dum la enlanda milito estis Sekretario de la Junularoj de LPMU (Ibera Komunista Junularo).

komando de Laborista kaj Kamparana Registaro kaj la aŭtoritato de partio de avangardo.

* * *

Kvankam tio povas multe surprizi la plej naivulojn ankoraŭ kredantajn, ke la komunistoj lokiĝas en la ekstrema maldekstro, la katalunaj naciismaj fortoj –RMK, la Unuiĝo de Farmantoj- havis multe pli nuancitan sintenon koncerne la kolektivigojn ol la komunistoj.
La unua komento, kiun ŝajne faris Luis Companys pro la unuaj eksproprigoj, la sekvan tagon de la 19-a de Julio, estis, ke la kataluna industrio ree ekfunkciis. En manoj de la laboristoj, veras, sed pli bone tio ol tuta ĉeso, kiu fine kondukus en la ekonomian ĥaoson. Tuj sekve li iom post iom komencis, sen tro da perforto, «restarigi la ordon». Tio estas, restarigi la aŭtoritaton de la ŝtato.
La sola potenco, kiun havis la kataluna Registaro dum la unuaj monatoj de la revolucio, estis la financa. Kiel mi jam rimarkigis, la konfiskoj kaj eksproprigoj ne atingis la Bankojn –ĉu eble pro la malestimo de la anarĥiistoj al la mono? La kataluna Registaro, siaflanke, rapidis starigi rigoran administradon de ĉiuj bankaj operacioj.
«La Reguliga Oficejo pri pago de salajroj koncedis al la entreprenoj, kiuj estis sub laborista administrado, pruntojn valoritajn je 44 milionoj da pesetoj, dum la Oficiala Ŝparkaso de Rabatoj kaj Pruntoj distribuis 35 milionojn da pesetoj inter la monatoj de Julio kaj Novembro 1936 (...) La kataluna Registaro, devigita sukcese plenumi la lukton en Aragono, militiste helpi la centran Registaron, akiri armilojn kaj municiojn, kontribui al la necesoj de loĝantaro, de lando, kies eksportadoj malpliiĝis ĝis nulo, pensis, ke estis juste postuli al la centra Registaro la rajtigon ĝiri 180 milionojn da pesetoj je konto de la Banko de Hispanujo. Anstataŭ respondi ĉi tiun peton, la Nacia Trezorejo ordonis al la Delegitaro pri Financoj de Barcelono, ke ĝi al ĝi transdonu

373 milionojn da pesetoj. La malnova regionisma kverelo denove revivis en Aŭgusto (1936).
»Ĉar la laborista Potenco apenaŭ estis en embria stato, la sola aŭtoritato leĝe kapabla por solvi la konflikton estis la kataluna Registaro. La 27-an kaj 28-an de Aŭgusto, la Konsilantaro pri Financoj deklaris la konfiskon de la kataluna filio de la Banko de Hispanujo (...) Konfiskinte, kiel punrespondon, 36.000 britajn pundojn, kiujn Katalunujo posedis en Parizo, la centra Registaro cedis kaj deklaris laŭleĝaj la operaciojn efektivigitajn de la kataluna Registaro. Sed, aliflanke, la interkonsento inter ambaŭ Potencoj indikis, ke ĝi nur validis por la Kataluna Registaro!»[103] Ĉi tiu lasta rezervo ne lasas havi sian gravecon, ĉar ĝi pruvas la malfidon, kiu preskaŭ atingis la sabotadon, kiun la centra Registaro sentis sur la Centra Komitato pri Volontarmeoj, tiam en la potenco, kaj laŭ pli ĝenerala maniero sur la laboristaj komitatoj kaj la kolektivigoj. La kataluna Registaro, sola financa potenco de Katalunujo, uzis tiun rimedon por efektivigi kreskantan regadon super la tuta ekonomia vivo de la lando.
«La afero de la kredito, reala «obstaklo por la normala disvolviĝo» de la Kolektivigoj, ankaŭ ne solviĝis konforme al la ideoj de la revoluciuloj. Estis ĝia krizo, kiel ni vidis, kiu minacis la funkciadon mem de la kolektivigitaj entreprenoj. La Konsilantaro de la kataluna Registaro rifuzis krei la Bankon de Industrio kaj Kredito petita de NKL kaj LPMU. (...) La Bankoj povis rezervi siajn kreditojn nur por la privataj entreprenoj, kaj eĉ enspezi supermezurajn makleraĵojn kontraŭ la monĝiroj ordonitaj de la Registaro. Juan Peiró proponis la kreon de industria Banko, destinita financi la aktivecojn de la kolektivigitaj fabrikoj. Sed la ministro pri Financoj, Negrín, kontraŭstaris tion (...) Tiel estis limigita kaj poste haltigita la movado de la kolektivigo, dum la Registaro

103H. Rabassaire, citita verko, paĝoj 228-229.

restis kiel mastro de la entreprenoj pere de la Bankoj. Iom post iom ĝi firmigis sian aŭtoritaton tiel en la entreprenoj konfiskitaj (kolektivigitaj), kiel en la administritaj, per la elekto, kiun ĝi faris, de kontrolistoj kaj direktistoj. La serĉo de la efikeco kaj la politikaj zorgoj ofte ĝin kondukis reenpostenigi per aliaj titoloj la malnovajn posedantojn kaj submastrojn.»[104]

Ĉi tiuj linioj, ekstraktitaj el la libro de Broué kaj Temime, povas doni la impreson, ke la kolektivigoj restis tute likviditaj antaŭ la malvenko de la Respubliko. Sed tio ne okazis tiel. Ĉefe en Katalunujo, kelkaj ankoraŭ gravaj sektoroj de la industrio kaj la publikaj servoj tenis sin kontraŭ ĉiuj malfacilaĵoj en manoj de la laboristoj ĝis la militfino. Veras, ke la kataluna kaj la centra Registaroj intensigis sian influon, laŭ la senco antaŭe indikita, sur serio da industriaj sektoroj. Aliflanke, krom la financa sabotado, la registaraj aŭtoritatoj decidis tutan serion da laŭleĝaj disponoj por «malfondi» la kolektivigojn. Tiel, en majo, post la okazintaĵoj de la barikadoj, la centra Registaro nuligis la Dekreton pri la kolektivigoj de la 24-a de Oktobro 1936 per la preteksto, ke la kataluna Registaro havis neniun jurisdikcion pri la afero: la 44-a artikolo de la Konstitucio specifis, ke nur la regno povis eksproprigi kaj ŝtatigi, kaj la kataluna Registaro ne povis anstataŭi la hispanan regnon.

Alia dekreto de la 28-a de Aŭgusto 1937 donis al la centra Registaro la rajton pri la interveno kaj la absoluta regado super la minoj kaj la metalurgiaj industrioj. En Oktobro samjare, «*Solidaridad Obrera*» denuncis decidon de la aĉetservo de la Ministrejo: ĉi tiu nur subskribos kontraktojn pri aĉeto kun tiuj entreprenoj funkciantaj «sub la direktado de siaj malnovaj posedantoj aŭ sub simila reĝimo garantiita de la administrado de la Ministrejo pri Financoj kaj Ekonomio».[105]

104Broué Kaj Termime, citita verko, paĝoj 204, 261-262.
105Morrow, citita verko, paĝo 98.

Tiel do, ni ripetu ĝin, nek la financa sabotado, nek ĉiuj laŭleĝaj disponoj kaj politikaj premoj sukcesis fini la kolektivigojn. Kiam en Aŭgusto 1937 la komunistaj trupoj klopodis por likvidi sian ĉefan malamikon, la liberecanajn komunumojn de Aragono, ili estis devigitaj, kiel ni vidis, decidi alion. La registaraj aŭtoritatoj kaj la kontraŭkolektivigaj politikaj partioj ankaŭ devis decidi alion en la industrio, premitaj de la laboristoj, kiuj ne akceptis tiun revenon en la kapitalismon, kvankam estu la kapitalismo de ŝtato. Ili ja povis, ekzemple, enoficigi direktistojn kun plenaj potencoj, tamen se la laboristoj rifuzis obei ilin kaj daŭre elektis siajn proprajn reprezentantojn, la direktisto ne estis pli ol registara ornamo. Kelkaj terkulturaj kaj industriaj Kolektivigoj malpliigitaj kaj ĉie sieĝitaj tiel sin tenis almenaŭ ĝis la eniro de la frankistaj trupoj en Aragonon kaj Katalunujon, kio sange finis tiun revenon en la ordon komencitan -ankaŭ kelkfoje sange- de la respublikaj aŭtoritatoj.

Tio esenca de ĉi tiu batalo kun multnombraj frontoj, kelkaj el kiuj, kaj ne la malpli gravaj, devenas de tio imaga, neniam estis skribita. Oni bone aŭ malbone parolis pri la kolektivigoj, citante nombrojn, faktojn ktp. Oni parolis pri la Dekreto, pri ties funkciado, pri la sindikata organizo, pri la laŭleĝaj disponoj -favore aŭ kontraŭe-. Unuvorte oni faris multan penadon por la studo de la institucioj, ĉu por laŭdi ilin kaj elmeti ilin al la mondo, kiel ekzemplon (ĉu oni ne fiere diris, ke Jugoslavio inspiriĝis el ili?), kelkfoje oni eĉ citas Alĝerion (kio jam estas la neplio de la nigra humuro!), ĉu por mallaŭdi ilin kaj klopodi por pruvi, ke la memmastrumado estas logartifiko, kiam pri kio oni parolas estas ĝuste pri ĉio, kion oni faris kontraŭ la memmastrumado. Sed oni neniam vere parolis pri la animstato de la laboristoj, pri ilia rilato al la Aŭtoritato. Mi ĉi tie ne plenigos ĉi tiun malplenon per kelkaj frazoj, sed ĉiel oni devas rimarkigi ĝin, ĉar al mi ŝajnas, ke tio estas multe

pli grava ol la nostalgia serĉo de «bonaj institucioj», kiuj permesas pli bonan «funkciadon de la ekonomio». Ĉiel ne estas bonaj institucioj!
Tamen ni duonvidas per la tekstoj kaj atestoj amasan konduton de «civila malobeo» bedaŭrinde laŭ tro malpreciza kaj vualita maniero malhelpanta, ke ni povas koni la detalojn. Tiu sovaĝa demokratio pri kiu mi jam parolis -kiel la strikoj tiel nomitaj-, samtempe firmigas sin kontraŭ la ŝtato, la mastroj kaj la «laboristaj» burokrataroj kaj ne estas instituciigita, estas esprimita en neniu laŭleĝa teksto, en neniu programo de iu organizaĵo, en neniu analizo de iu teoriisto. Pro la simpla kialo, ke rekoni ĝin estus nei sin mem, kiel «leĝo», kiel «teoriulo». Tamen estis tiu stato de revolucia kaj liberecana animo de la laboristoj, kiu ĝin ebligis; tiu animstato, kiu ilin ĵetis kontraŭ la militistoj kaj la faŝistoj, kiu al ili kondukis kolektivigi ĉion -aŭ preskaŭ- kaj, kiu nutris sian superan rifuzon al la Aŭtoritato. Ho!, certe apenaŭ disfaligita la malnova mondo, ĉiuj meĥanismoj rapidis rekonstrui la «novan», kiu, kvazaŭ hazarde, prenis el la malnova ties esencajn valorojn; en ĝi oni sanktigis, apenaŭ maskitajn, la bonajn malnovajn principojn de la nuntempa sklaveco: la Aŭtoritato kaj la Disciplino, la Armeo kaj la Patrujo (jes, eĉ la Patrujo!), la Produktopoveco kaj la Ordo ktp.
Nenio el ĉi tio estas nova. Kontraŭe, kio se ne estas nova almenaŭ estas malmulte ordinara, estis la rilato de la homamasoj al la Aŭtoritato en la tiama Katalunujo. La Aŭtoritato klopodis por sin firmigi ĉie, ne nur per la pacienca kaj insidema restarigo de totalisma ŝtato, sed ankaŭ per la subtila produktado de fantomoj; la spektaklo de la herooj kaj la estroj: tiuj junaj generaloj vestitaj de ledo kaj kun kartoĉujoj, kiu devenis rekte de la 2-a Jaro*, kun la neevitebla elvoko de la bolŝevikismaj kliŝoj. Kleber kaj

*NeT: ĉi tie la aŭtoro parolas pri la rusa revolucio

Budienny tiam nomiĝis Líster aŭ Durruti (jam ĉi tiu morta, kio ĉi-okaze estis pli prudenta). La bildo de la respektegitaj estroj (en unua vico aperis kompreneble Stalino, kiun adoris ne nur la stalinistoj), tiuj «sanktaj bildoj» floris sur ĉiuj muroj de la detruitaj urboj, en la ejoj de ĉiuj politikaj organizaĵoj. Ĉiu organizaĵo havis siajn proprajn sanktulojn, kiel furaĝon por la homamasoj, por ke ĉi tiuj, plenaj de devoteco, estu pli obeemaj. Venĝanta mano etendiĝas al la analfabeta kamparano kaj al la mallaborema laboristo, kiuj meze de tiu admirinda «heroaĵo» malprudente ĵetis sin en sen egalan aventuron: ili simple klopodis por ŝanĝi sian vivon. Tiu ne estis ilia loko. Tiam ili akuzis ilin bojkoti la militon. Ankaŭ ili ilin akuzis -ĉar la heroa ago estas tre bona, eĉ nepras, sed ne estas ĉio- sabotadi la produktadon kaj kompreneble la Ordon. Tiu Ordo postulanta, ke ĉiu estu en sia loko kaj plenumu la taskojn, kiujn al li atribuis la Aŭtoritato. Estas nekoncepteble -diras la Aŭtoritato sub siaj multnombraj vizaĝoj, komunista, respublika aŭ anarĥiista- estas nekoncepteble, ke la fabrikoj estas «en manoj de la laboristoj». Tio volas diri nenion. Por direkti fabrikon oni bezonas direktistojn, tio estas tute logika. Por organizi kaj plani la ekonomion oni bezonas organizantojn, specialistojn, teknikistojn kun scio kaj potenco. Ĉiu organizaĵo proponis «siajn» specialistojn. Multfoje, kiel ni vidis, estis la malnovaj mastroj, kio iel estas logika: ĉu ili ne pruvis jam sian kapablon por esti estroj, ĉar ili jam estis tio? Sed la «mallaborema» laboristo, kiun oni eĉ akuzis havi «kapitalismajn interesojn» -kiel okazis antaŭ nelonge en Ĉinujo dum tiu sanga venĝo inter frakcioj de la burokrataro, prudente nomita «kultura revolucio»-, kaj la analfabeta kamparano kontraŭstaris admirindan reziston al ĉiuj tiuj provoj fare de la Aŭtoritato. Simple ili ne ĝin rekonis. Ili laboris, luktis -malgraŭ kion diras la burokrata mensogo-krome, kion alian ili estis farontaj?. Ili ne malakceptis la postulojn de la tekniko kaj la kulturo, male, ili pli ĝuste emis

tro respekti ilin, sed ili volis decidi, volis daŭre esti la mastroj de sia propra vivo, de sia laboro, kvankam ĉi tiuj estis tre malmolaj kaj mizeraj. Se ĉi tiu ne estas revolucia sinteno, kio estas la revolucio?
Kial, malgraŭ tiu animstato de ribelemo kaj tiu sovaĝa demokratio, kiun trudis la laboristoj, oni povis restarigi la aŭtoriteman ŝtaton -kvankam ĝi apenaŭ estis obeita? Kiel oni povis limigi -sed ne likvidi- la movadon de la kolektivigoj? Ĝuste pro aparta maniero sperti la solidarecon de klaso, pro la fideleco al la organizaĵo, pro certa koncepto pri la aktivismo, pro tio la Aŭtoritato reenkondukis sin «en la kapon» de la aktivuloj, eĉ de la plej ribelemaj. Tiu «fila» fideleco al la Organizaĵo (ĉi-okaze al NKL-IAF) estas kiu finfine limigis iamaniere la eksterordinaran amplekson de la granda rifuzo. Pro ĉi tio ni kompreneble devas paroli pri la burokrata fenomeno en la movado de la kolektivigoj.

* * *

La studo de ĉi tiu fenomeno ĉiam forestas de la tekstoj temantaj, favore aŭ kontraŭe, pri la kolektivigoj. Mi ĉi tie parolos pri la burokrata transformado de NKL-IAF «kontakte» kun la potenco. Insisti pri tiuj aferoj, kiujn ni tre bone konas, kiel la stalinista burokrataro aŭ tiu de la sindikatoj superregitaj de ĝi, kiel ĜUL en Katalunujo, nur estos perdo de tempo.
En sia broŝuro titolita *Ne Franco ne Stalino: L'attivitá sindicale nella transformazione sociale*[106], Gaston Leval kolektas la akuzojn de grava gvida sektoro de NKL kontraŭ la «laborista novkapitalismo» (laŭtekste) rilate la industriajn kaj komercajn entreprenojn, kiuj agadas solaj kaj per siaj propraj rimedoj; kiuj post la 19-a de Julio trovis la ŝparkasojn plenaj kaj merkatojn por sia produktado, kaj iĝis tio, kion oni nomis «riĉaj kolektivigoj» kaj, kiuj malinteresiĝis,

106G. Leval, citita verko, Milano, 1948, paĝoj 36-38 kaj 40-41.

laŭ Leval, pri la ĝenerala intereso. Sed oni eĉ akuzis la «malriĉajn kolektivigojn» pri novkapitalismo, ĉar kiel ili ne havis krudmaterialojn nek merkatojn, petis pruntitan monon al la kataluna Registaro por pagi la laboristojn «por fari nenion». Grandega skandalo! (la kamarado Gaston ŝajnas ne konstati, ke ne tre kutimas, ke la kapitalistoj pagas siajn laboristojn «por fari nenion»...).
Tiel por Leval, kiel por sektoro de NKL, la solvo al tiu problemo kuŝis en tio, kion ili nomis la «socialigo» (Ho, plursenseco de la vortoj!), nome en la administrado, pere de la respondaj sindikatoj, de la industriaj branĉoj kunigitaj. Nu bone, estis ĝuste en la sindikata administrado, kie la burokrata fenomeno iel atingis, en Katalunujo, originalan reliefon. Se ni parolas pri tiu tempo, konstatas ke, male al kio okazis en NKL antaŭ la Revolucio, kie la sola pagata posteno, en organizaĵo superanta la milionon da membroj, estis tiu de Ĝenerala Sekretario kaj, ke ĉi tiuj neniam estis en la posteno dum tro da tempo, en organizaĵo unuvorte, kiu havis malinklinegon al burokratismo kaj luktis kontraŭ tiu fenomeno propra al ĉiu organizaĵo, komencis multobliĝi en ĉiuj ŝtataj aŭ specife sindikataj institucioj nova tavolo el sindikataj funkciuloj, kiuj okupis aŭ volis okupi sin pri la administrado, kunordigo, planado, komerciigo de la produktado de la kolektivigitaj entreprenoj. Ĉi tiu nova tavolo el sindikataj respondeculoj, malproksimaj de la produktado, havis realan potencon, kiu estis samtempe ekonomia, politika, militista kaj eĉ polica. En la Urbaj Konsilantaroj, en la administrado de la ŝtato -kaj eĉ en la sino de la Registaroj- en la politikaj institucioj de kontraŭfaŝisma interligo aŭ specife anarĥiistaj (NKL-IAF-IFLJ), en la sino de la asocioj de terkulturaj kaj industriaj kolektivigoj, en la nova armeo kreita sur la ruinoj de la volontarmeoj (ni poste parolos pri ĉi tiu afero), en la polico, paralela aŭ ne, tie, kie lokiĝas la nova Potenco, sur la pinto de la nova hierarĥio, oni trovas la saman grupon el estroj, la tavolon el sindikataj

respondeculoj kun ampleksaj kaj diversaj potencoj, kies renovigo per elekto estis iom post iom anstataŭita de la kooptado - alifoje pro la preteksto, ke la milito devigis tion!-. Ni ne nin trompu, malgraŭ ĝia nigra kaj ruĝa flago kaj ĝia paroladaĉo pri la libereco, ĝi estis la vera burokrataro, tio estas, aparta tavolo el estroj kristaliĝinta ĉirkaŭ specifaj interesoj devenantaj de la plenumo de la potenco, de potenco kompreneble tiel ekonomia, kiel politika, kiu parolas «nome» de la proletaro, tio estas, anstataŭ ĝi, dum ke la proletaro parolas ĉiam malpli per si mem, antaŭ ol tute esti kun la manoj kunligitaj!
«Por ni -skribas Claude Lefort- la burokrataro estas grupo inklinanta al tio, ke longe daŭru certa maniero de organizo, kiu disvolviĝas laŭ certaj kondiĉoj, kiu floras pro aparta situacio de la ekonomio kaj la tekniko, sed ke ĝi esence estas kio estas nur pro socia aktiveco. Ĉiu klopodo por koncepti la burokrataron, kiu ne evidentigas specifan manieron de konduto, al ni ŝajnas, ke ĝi estas anticipe kondamnita al la fiasko. La burokratismo ekzistas nur danke al la burokratoj, nur ekzistas pro sia komuna intenco starigi apartan medion malproksimigitan de la superregitoj, partopreni en socialigita povo, pro tio, ke unuj determinu la aliajn surbaze de hierarĥio, kiu garantias al ĉiu materialan rangon aŭ rangon de prestiĝo.»
Sed, plu diras Claude Lefort, oni ne povas redukti la burokratismon al aro de similaj kondutoj. La konduto de la izolita individuo estas «nekomprenebla». «Ĝi nur havas sencon se oni lokas lin en la kadro de grupo. La burokratismo stariĝas ene de tuja socialigo de la aktivecoj kaj la kondutoj. Ĉi tie la grupo ne estas kategorio de aktiveco aŭ de socia-ekonomia rango: estas konkreta medio el kiu ĉiu eltiras la determinon, kiu al li estas propra. Tamen ĉi tiu observo faras, ke krome aperu la rilato de la burokratismo al la institucio de homamasoj. En ĉi tiu lasta, ĉu ministrejo, ĉu sindikato, ĉu partio aŭ industria entrepreno,

estas kie la burokratismo renkontas sian taŭgan formon. Ĉar la unueco de la kadro, la interkonektoj de la taskoj, la nombro de laborpostenoj, la proksimeco de la homoj ene de ĉiu sektoro, la perspektivo de kreskanta disvolviĝo de la institucio, la volumo de la uzataj kapitaloj, ĉirkaŭlimas socian kampon de potenco. De tie devenas la fakto, ke la identiĝo de la burokrataro kun la entrepreno al kiu ĝi estas kunigita estas natura paŝo en la konscienco, kiun la grupo akiras pri sia propra identeco. Sed ĉi tiu identiĝo (...) al ni ne devas kaŝi la fakton, ke reale la burokrataro ne rekontas sian destinon rigore trudita de la teknika strukturo de la institucio de homamasoj, sed ke ĝi ankaŭ kontribuas doni formon al la strukturo de ĉi tiu. Iĝinte agento de tre preciza strukturiĝo, ĝi multobligas la postenojn kaj la servojn, disigas la diversajn sektorojn de la aktiveco, artefarite kreas taskojn de kontrolo kaj kunordigo, reduktas al funkcio de nuraj plenumantoj ĉiam pli grandan amason da laboristoj por ĉiunivele kontraŭstari al ili funkcion de aŭtoritato, kiu klopodas por atingi sian maksimuman amplekson per la kreo de sistemo de rilatoj de dependeco kiel plej eble diferencigita.»[107]

Certe, meze de enlanda milito kaj meze de la perforto de la sociaj konfliktoj, la burokrataro en Katalunujo ne povis havi tiujn trajtojn tiel difinitajn, estis pli ĝuste skizo. Sed la difino de Lefort perfekte akordas al ĝi. Tiu «sindikata» burokratiĝo ankaŭ ne estis rigida. Kelkfoje ligita al la aparato de la ŝtato, ĝi konfuzis kun ĝi kaj samtempe kontraŭstaris ĝin. Eksplodis konfliktoj inter sindikataj funkciuloj enpostenigitaj de la politika situacio en la ekonomia aparato de la ŝtato kaj funkciuloj sen aliaj respondecoj ol la sindikataj, sed kiuj tamen efektivigis administradan potencon. Oni povas preni

107LEFORT, Claude: *Elements d'une critique de la bureaucratie* [france, Elementoj de kritiko kontraŭ la burokratismo]. Eldonejo *Droz*, Ĝenevo-Parizo, paĝoj 306-307. (En la hispana, «*¿Qué es la burocracia*?». [«Kio estas la burokratismo?»]. Kolekto «*El Viejo Topo*». *Ruedo Ibérico*, Parizo.)

kiel ekzemplo tiun de la «Konsilantaroj pri Industrio», en kiuj partoprenis membroj de NKL, delegitoj de la kataluna Registaro kaj aliaj membroj, ankaŭ de NKL, delegitoj siavice de la responda Sindikato pri Industrio. La unuaj estis komisiitaj protekti la aŭtoritaton de la ŝtato, la duaj la aŭtonomecon de la sindikatoj kaj ties influon sur la ekonomio (ĉiel unuj kaj aliaj renkontis la oponadon de la «bazo»). Kompreneble mi eĉ ne mencias la rivalecojn multe pli akrajn ekzistantajn inter NKL kaj ĜUL, tiel pri ĉi tiu, kiel pri aliaj aferoj.
La NKL-aj respondeculoj enpostenigitaj en la diversaj branĉoj de la burokrataro devis alvoki «la disciplinon de organizaĵo», unuj postulis la respekton al la aŭtoritato de la kamarado Ministro (la postenoj, kiujn dum pli da tempo okupis la anarĥiistaj ministroj en Katalunujo, estis tiuj pri Ekonomio kaj Defendo), la aliaj, al la aŭtoritato de la kamarado Ĝenerala Sekretario de la responda sindikato. Temis ĉi tie pri io pli grava ol simpla kverelo inter personoj kaj funkcioj, pri io pli ol malordo kaj la formalaĵoj kaŭzataj de tiu multobligo de komitatoj kaj komisionoj, kiuj efektivigis ĉian administradon -kaj pri kiu parolas ĉiuj atestantoj-, kelkfoje ŝtataj kaj aliaj sindikataj (aŭ de la partioj), dum intermetis kaj kverelis unuj kontraŭ aliaj. Temis pri la lukto por la hegemonio inter du tendencoj de la burokrataro. La unua, kiun mi nomis «porsindikata» kaj, ke en Katalunujo estis preskaŭ ekskluzive reprezentita de NKL-IAF kaj la dua, la ŝtata burokrataro, en kiu ĉiuj kontraŭfaŝismaj politikaj kaj sindikataj organizaĵoj estis reprezentitaj -inkluzivita NKL-, sed en kiu, ĉe la paso de la tempo, la influo de la stalinistoj kreskadis.
Oni povas trovi interesan teorigon de la unua tendenco en la artikolo publikigita en «*Solidaridad obrera*» de Juan Peiró, unu el la plej influaj anarĥiistaj gvidantoj (kiu ne estis membro de IAF) kaj, kiu tiam estis Ministro de la centra Registaro –fakto, kiu tre bone reflektas la malsimplecon de

la fenomeno. Kritikante, bone komprenante la situacion, la foreston de entuta ekonomia plano inkluzivanta ĉiujn industriojn de la respublika zono, Peiró deklaris tion jenan pri la sindikata administrado:

> «Kion mi ĉiam volis diri kaj, kion mi hodiaŭ ripetas, estas, ke antaŭ ol entrepreni la kolektivigojn kaj la socialigojn, kiuj hodiaŭ havas la tutan malbonan guston de la korporaciemo, endas doni prioritaton al la kreo de institucioj kapabligitaj por direkti kaj administri (substrekita de mi, [C. S.-M.]) la novan ekonomion sen tio, ke necesu por tio iu kuratoreco ŝtata aŭ de ties institucioj. Tamen la kreado de la institucioj, kiuj al ni tuj servos por strukturi la kolektivigon kaj la socialigon de la socia riĉeco ankaŭ estas fari revolucion; ĉar konkeri poziciojn kaj instrui nin en ili, por ke finita la milito ni kapablu organizi la novan ekonomion, ankaŭ estas profunde revolucia laboro, multe pli ol detrui ekonomion, eksproprigante, kolektivigante aŭ socialigante industriojn, tasko por kiu neniu estis preta, inter aliaj aferoj pro manko de taŭgaj institucioj, solaj, bezonaj, por politika-sociala tasko tiel nobla kaj tiel majesta.»[108]

Belega ekzemplo de burokrata lingvaĵo: la kolektivigoj, kiuj ne estis deciditaj de supre, detruas la ekonomion. Laŭ nia teoriisto, antaŭe endas krei gvidantajn kaj administrajn instituciojn. Kompreneble la burokrataron oni eĉ ne mencias, sed oni parolas pri ĝi maskante ĝin en efikecon. Malpermeso socialigi, eksproprigi, kolektivigi, dum oni ne konstruas la novan hierarĥion. Kiel reprezentanto de la «porsindikata» tendenco, la kamarado ministro neas al la ŝtato ajnan enmiksiĝon en la «novan ekonomion».

La venko de ĉi tiu tendenco signifintus la venkon de NKL (tiu «anarĥiista diktatoreco», kiun la gvidantoj foroferis nome

108«*Solidaridad Obrera*» (26-an de Januaro 1937).

de la kontraŭfaŝisma unuiĝo). Ni scias, ke okazis nenio de tio, kvankam la gvidantoj de NKL-IAF dum momento pensis realigi ŝtatrenverson.[109] La burokrata transformado de NKL-IAF al ni permesas pensi ke, kvankam la hispanaj anarĥiistoj volintus preni la potencon kaj sukcesintus atingi ĝin, ili ne farintus aliaĵon. Tio estas, ke ili apartigintus de la Potenco la rivalajn frakciojn de la politika burokrataro (komunistoj, socialistoj, respublikanoj), sed ili ne pro tio detruus tian «potencon». Sendube maskita sub la nomo de «Laborista Centra Konsilantaro» tio, kio estiĝintus je la fino de tiu «venko», estintus burokrata ŝtato.
La burokrata tendenco, kiu laŭlonge de la tuta enlanda milito, luktadas por la hegemonio de la ŝtato (de ŝtato, kiun oni pretendis laŭleĝa, respublika kaj demokratia, sed kiu portis en si mem ĝeneralan aspekton de kio estos la ŝtatoj de la «popolaj demokratioj»), se ĝi venkintus, metintus la sindikatojn en ilian lokon: ili iĝintus nuraj burokrataj dentaĵoj serve de la ŝtato. Malgraŭ la kontinua plifortiĝo de la ŝtato, ĉi tiu neniam povis tute submeti la sindikatojn de NKL - ankaŭ ne la laboristan aŭtonomecon. Comorera, gvidanto de USPK, konfesis ĉi tiun fiaskon, kiun li supozis tempa, dum kunveno de sia partio en Ilerdo en Januaro 1938:

> «La sindikatoj ne povas esti apartigitaj de la ekonomia direktado de la lando. Unue ĉar la Registaro ankoraŭ ne havas sufiĉe bone aranĝitan ekonomian aparaton por surpreni ĝi mem la tutan respondecon de la direktado. Krome Katalunujo estas lando, kiu havas malnovan kaj tre enradikiĝitan sindikatan tradicion. Ni ne povas urĝegi nin (...) Absolute necesas hodiaŭ, ke la sindikataj centraloj intervenu en la ekonomia direktado de la lando.»[110]

109Koncerne ĉi tiun aferon, vidu la 6-an aneksaĵon.
110MUNIS, G.: *Jalones de derrota, promesa de victoria* [hispane, Spertaĵoj pri malvenko, promeso de venko], Eldonejo *Lucha Obrera*, Meksikurbo, 1948, paĝo 348.

Ni ne forgesu, ke ĉiuj organizaĵoj, inkluzive NKL-IAF, estis reprezentitaj en la «porŝtata» tendenco kaj, ke por plenumi por propra profito la kundividon de respondecoj pri la direktado de la ekonomio kun la sindikatoj, unue necesintus, ke organizaĵo -aŭ bloko de organizaĵoj - sukcesus venki la aliajn, sukcesus preni la tutan potencon, unue ĉe la aparato de la ŝtato, poste tutlande. La stalinistoj kaj ties aliancanoj atingis bonegajn rezultojn ĉi-sence, sed ili ne atingis la tutan venkon.
La frankista venko estis, kiu negative solvis la konflikton, tamen ne estas tro absurde pensi ke, okaze de respublika venko, estus per la armiloj, kiel oni definitive finus la lukton inter la diversaj burokrataj tendencoj. Ĉion ĉi mi ne diras por eniri en la ludon de la historia hipotezo, sed simple por indiki la diversecon de vojoj, kiuj povas konduki al la burokrata kapitalismo de la ŝtato.

* * *

La laboristoj, kiuj realigis la verkon, cetere ekzemplan, de la kolektivigoj kaj, kiuj alfrontis mil malfacilaĵojn kaj la atakojn fare de ĉiuj burokrataroj, ne sciis organizi la kontraŭatakon por la defendo kaj la firmigo de siaj konkeroj. Ilia rezisto estis pasiva: ili ne aplikis la disponojn de la Dekreto, ne obeis la ordonojn kaj admonojn de la gvidantoj de NKL. Kiam, devigitaj de la manko de mono, ili akceptis la direktiston enoficigitan de la kataluna Registaro, ĉi tiu, jam en sia posteno, ne estis obeita. Kaj tiel plu. Ĉi tiu «defenda» rezisto favoris, kaj krome pravigis, la izoladon de ĉiu entrepreno. Ene de ĉiu el ili (sendube kelkfoje intervenis egoismaj motivoj) la laboristoj estis la mastroj. Tuj kiam ili eliris, tuj kiam loka aŭ regiona projekto estis skizita, la sindikataj kaj ŝtataj burokratoj kaptis ĝin nome de la raciigo de la planado, de la militbezonoj aŭ de la ŝtatkialoj. Kiam ili sentis sin senposedigitaj, la laboristoj ree rifuĝis en siaj entreprenoj, kvazaŭ ĉi tiuj estus sieĝataj fortikaĵoj. La rekta

demokratio nur eblis en la malgrandaj urboj kaj vilaĝoj de Katalunujo kaj Aragono, kiel ni jam diris kaj, sekve, ankaŭ povis ekzisti tie entuta loka plano, diskutita kaj aprobita de ĉiuj, kiu unuigis terkulturajn kaj industriajn entreprenojn, kulturajn kaj alitipajn aktivecojn.
Tamen la laboristoj neniam pridubis la sindikatan strukturon kaj ne ŝajnas, ke ili havis tro klaran konscion pri la burokrata fenomeno. Por la aktivuloj de NKL, ilia organizaĵo estis sanktega, kvankam iuj el iliaj gvidantoj ne estis tia. Ĉi tio sendube klarigas, kial oni faris neniun seriozan klopodon por rompi la hierarĥion de NKL kaj aŭdigi la voĉon de la laborista amaso. Ankaŭ ne oni faris ion por starigi kunordigon, kiu estu aŭtentike demokratia. Tamen iam eblintus (kompreneble tio estas parolmaniero, ĉar kiel la laboristoj eĉ ne al si prezentis tiun problemon, ĉi tiu eblo daŭre estas abstrakta) kontraŭstari al la sindikataj funkciuloj la delegitojn elektitajn -kaj eksigeblajn ajnamomente- de la laboristoj. Tiuj delegitoj, kiuj daŭre laborintus en siaj entreprenoj, povintus esti malsamaj en ĉiu interenterprena renkonto. Ĉi tiuj delegitoj, ĉiam eksigeblaj en la asembleoj de ĉiu entrepreno, evidente povintus krei kunordigon kaj efektivan solidarecon inter la diversaj entreprenoj kaj katalunaj industriaj branĉoj. Se oni efektivigintus tian iniciaton, oni povintus starigi unuan paŝon en la laborista kontraŭatako kontraŭ la burokratismo. Sed pro la ligo de dependeco de la revoluciaj laboristoj koncerne ilian organizaĵon (ĉi-okaze NKL), tiu iniciato ŝajnintus sakrilegio, tiel por la «bazo», kiu kvankam rezistis kaj malakceptis, neniam komencis klaran kaj ĝeneralan kontraŭofensivon kontraŭ la burokratismo, kiel por ĉi tiu lasta, kiu cetere ne dubintus aresti kiel faŝistan sabotanton ĉiun personon, kiu publike pridubus la sindikatan strukturon kaj la «dian rajton» de la organizaĵo.

* * *

La problemo de la burokratismo ne estas malĉefa en la nuntempaj socioj ĝenerale, nek estis tia en la revolucia Katalunujo aparte. Tute ne temas pri marĝena fenomeno, kiun oni povas senefikigi per oni ne tre bone scias kiun bonan funkciadon de la «demokratiaj institucioj» aŭ per la «rajto al la kreado de tendencoj». La problemo de la burokratismo estas niatempa centra problemo. Certe post la hispana revolucio, la aro de la burokrataj spertoj konsiderinde riĉiĝis pro la venko de la totalismaj burokratismoj en multnombraj kaj vastaj landoj kaj ankaŭ pro la burokratiĝo de la moderna kapitalismo. Devus esti perfekte klare hodiaŭ por ĉiuj, ke la diferencoj, kiuj povas ekzisti inter ambaŭ sistemoj -la «socialisma» kaj la «kapitalisma»-, ne plu povas kaŝi sian komunan trunkon konsistigitan de ekspluatado kaj mensogo.
Ĉar la burokrata administrado baziĝas tiel -kaj kelkfoje pli- sur la kapitalisma administrado, kiel sur la ekspluatado kaj alienigo de la laboristoj. Ĉiel endos fini per unu fojo por ĉiam tiujn malnovajn polvplenajn mitojn, kiuj pretendas, ke la burokrata administrado (tiu supozata «socialisma posedo de la rimedoj de produktado») estas granda paŝo antaŭen al la «bona» socio, ĉar ĝi nuligis la «privatan posedon de la rimedoj de produktado». Hodiaŭ restis pruvite -kaj kiamaniere per la sperto de ĉiuj punlaborejoj, kiujn oni baptas laŭ granda paranoja impulso per la nomo de «socialismaj landoj»-, ke la privata posedo de la rimedoj de produktado estas nek la «bremso por la disvolviĝo de la produktantaj fortoj» laŭ la marksisma tezo, nek la sola moderna formo de ekspluatado.
Sed en 1936-1937, la sola referenco, la sola ekzistanta modelo de burokrata socio kompreneble estis USSR. Al tiu modelo de «socialismo» estas al kiu volis direkti sin la stalinistoj per la nerekta vojo de la respublika leĝeco. Sed ankaŭ estis al tiu sovetia socio -kvankam kun malgravaj modifoj- kien direktis iliajn okulojn la membroj de LPMU kaj

multaj socialistoj de maldekstro. Tiam neniu vidis la danĝeron, neniu havis tre klaran konscion pri tio, kio estis decidiĝanta en la lukto disvolviĝanta en Katalunujo, nek pri la vera naturo de la sovetia socio. Eĉ la anarĥiistaj sektoroj, kiuj restis fidelaj al siaj ideoj kaj instinkte malfidis, por tiel diri ĝin, la diktatoran aspekton de la sovetia reĝimo kaj de KPH, ne analizis la gravecon de la burokrata fenomeno kaj nur havis malprecizan ideon, supraĵan -kvankam ne falsan- pri la naturo de USSR.

«...La rusa socio estas socio dividita en klasoj - tre trafe skribas Pierre Chaulieu- el kiuj la du pli gravaj estas la burokrataro kaj la proletaro. La burokrataro plenumas la rolon de superreganta kaj ekspluatanta klaso laŭ la tuta senco de la vorto. Ĝi ne nur estas la privilegiita klaso, kies neproduktanta konsumado ensorbas parton de la socia produktado kompareblan (probable superan) al tiu, kiun ensorbas la neproduktanta konsumado fare de la burĝaro en la landoj de privata kapitalismo, sed ke ĝi ankaŭ trude ordigas la uzon de la tuta socia produkto, unue determinante ĝian disdonon sub formo de salajroj kaj plusvaloro (samtempe, kiel ĝi klopodas por altrudi al la laboristoj la plej eblajn malaltajn salajrojn kaj eltiri el ili la plej grandan eblan laboron), poste decidante la disdonon de tiu plusvaloro inter ilia propra neproduktanta konsumado kaj la investojn inter la diversaj sektoroj de produktado.

»Sed la burokrataro ordigas la uzon de la socia produkto nur ĉar ĝi ankaŭ ordigas ĝian produktadon. Ĝuste ĉar ĝi administras la produktadon de la fabriko, povas senĉese devigi la laboristojn produkti pli kontraŭ la sama salajro, kaj ĝuste ĉar ĝi administras la produktadon laŭ nivelo de la socio, povas decidi, ke oni fabriku pli da kanonoj kaj silkaĵoj ol loĝejojn kaj kotonon. Oni povas kontroli, ke la esenco, la fundamento de la burokrataro super la rusa socio, baziĝas sur la fakto, ke ĝi superregas de la interno la rilatojn de produktado; same oni povas kontroli, ke ĉi tiu sama funkcio

ĉiam estis la bazo de la superregado de klaso super la socio. Alivorte ĉiam la nuntempa esenco de la rilatoj de klaso en la produktado estas la antagonisma divido de kiuj partoprenas en ĉi tiu produktado en du fiksaj kaj stabilaj kategorioj: gvidantoj kaj plenumantoj. La resto koncernas la sociologiajn kaj jurajn meĥanismojn, kiuj garantias la stabilecon de la gvida tavolo; ĉi tiuj estas la feŭda posedaĵo de la tero, la kapitalisma privata propraĵo aŭ tiu stranga formo de senpersona privata proprieto karakterizanta la nuntempan kapitalismon.
En Rusujo estas la totalisma diktatoreco de la institucio, kiu esprimas la ĝeneralajn interesojn de la burokrataro (la «Komunista» Partio), kaj la fakto, ke la varbado de la membroj de la reganta klaso fariĝas per kooptado, kiu etendiĝas al la tuta socio.»[111] (Kompreneble ĉi tio povas aplikiĝi hodiaŭ tiel al Rusujo, kiel al Ĉinujo, al Rumanujo, kiel al Kubo ktp., kaj pri ĉi tio temis la lukto de klasoj de la revolucia Katalunujo.)
Ne estas tre originale aserti, ke la nesolvebla malfacilaĵo de la ekspluatado estas la rilatoj de produktado. Ĉi tiuj rilatoj de produktado estas superregitaj de la antagonismo gvidanto-plenumanto. Kio volas diri, ke la laboristo, lokita en la proceso de produktado kun rolo de simpla plenumanto, vidas sin senigita je ĉiu decido pri sia laboro, je ĉiu interveno, iĝinta simpla dentaĵo de aktiveco decidita kaj organizita de aliaj -la gvidantoj-, kiuj forprenas la «fruktojn» kaj decidas per tuta suvereneco, kiu devas esti ilia uzo. Evidentas, ke ĉi-nivele la rilatoj de produktado estas identaj,

---

111CHAULIEU, Pierre: *Sur le contenu du socialismo* [france, Pri la enhavo de la socialismo] en «*Socialisme ou Barbarie*», n-ro 17, paĝoj 6-7. La *Ediciones 10/18* ĵus komencis publikigi en pluraj volumoj la tekstojn de C. Castoriadis, sub la ĝenerala titolo de *La Société bureaucratique* [france, La burokrata Socio], multaj el kiuj antaŭe aperis en la revuo «*Socialisme ou Barbarie*» sub diversaj kaŝnomoj, inter aliaj tiu de P. Chaulieu. (Ankaŭ oni estas publikiganta en la hispana: *La Sociedad burocrática, Tusquets Editor*, Barcelono, 1976; aperis la du unuaj volumoj)

se la fabriko apartenas al kapitalista trusto -kun ties akcioj kvotitaj en Borso- aŭ al ŝtata trusto. La diferencoj, kiuj povas esti inter ambaŭ sistemoj -multe pli klaraj en la tempo, kiun ni studas, sed ke ili poste emas malpreziciĝi pro la akcelata burokratiĝo de la kapitalismo-, ne ŝanĝas tion esencan de la ekspluatado kaj la alienigo de la salajrata laboristo en la modernaj socioj.
Mi tiom insistas pri la ekspluatado kaj alienigo de la laboristo, ĉar estas unu el la preferataj temoj de la burokrata mensogo (ili, la laboristoj, preferas la burokratan administradon! Kia ŝerco!). Sed evidentas, ke en malsamaj gradoj, la socio ĝenerale, la aro de la homaj aktivecoj kaj la tuta ĉiutaga vivo estas kiuj devas suferi kaj devas lukti kontraŭ la ekspluatado, la alienigo kaj la hierarĥia divido de gvidantoj-plenumantoj. Ĉar evidente ne estos kiel civitano, kiel povos la laboristo senposedigita (ankaŭ ne la aliaj) efike interveni kaj reale partopreni en la ŝtataj decidoj pri la uzo de la fruktoj de sia laboro, eĉ ne pri sia propra vivo. Ĉi tie la komparo eĉ estas pli malfavora por la totalismaj reĝimoj («socialismaj» aŭ ne). Ke ĉiuj tiuj «revoluciaj» pastraĉoj moku kiom volu pri la demokratiaj liberecoj -nomataj burĝaj-, kiam ili estas neniigitaj ankoraŭ estas pli malbone.
Al mi ŝajnas, ke tio, kion mi ĵus diris, klarigas la enhavon de la klaslukto en Katalunujo. Malantaŭ la propagando de la partioj de maldekstro kaj de ties programoj pli aŭ malpli moderaj (ni konservu gravajn sektorojn de privata kapitalismo pro politikaj motivoj) aŭ pli aŭ malpli «revoluciaj» (ni akcelu la ŝtatigon de la ekonomio), oni duonvidas la lukton inter la memmastrumado de la laboristoj kaj la burokrata administrado -kun ĝia versio pli-malpli originala estigita de la gvidaj rondoj de NKL. La ŝtata superregado super la ekonomio -kaj super la socia vivo ĝenerale- al mi ŝajnas, ke ĝi estas enskribita en la politikan kaj socian evoluadon de la hispana Respubliko dum la enlanda milito. (Sed la frankista venko ankaŭ signifis siamaniere ŝtatigon

de la socio kaj de la ekonomio kun ties burokrata konsekvenco, kiu hodiaŭ alproksimiĝas, ne sen penadoj, al tio, kion iuj sociologoj nomas la «industriaj socioj».)
La laboristoj, kiuj realigis kaj defendis dum longaj monatoj la memmastrumadon de multnombraj industriaj kaj terkulturaj sektoroj (kaj ankaŭ tiu de la kulturo kaj la instruado ktp.), havis kiel malamikojn ne nur la militistojn kaj la faŝismajn reprezentantojn de la superregantaj klasoj de la burĝaro kaj la grandaj bienuloj, sed ankaŭ «objektive» la novajn burokratajn tavolojn, kiuj sub iliaj samaj flagoj pretigis -jam estis komencintaj- restarigi, per formoj kelkfoje novaj, la malnovan ekspluatadon de la salajrata laboristo kaj la totalisman hierarĥion de la socia vivo.
Endas ree rimarkigi la subtilan instalon en la socio de meĥanismoj, kiuj ĉiam agas -kvankam ne ĉiam sammaniere- por restarigi laŭ nivelo de la produktado -kaj de la socio entute- la dividojn gvidanto-plenumantoj. La rolo, kiun plenumis ĉi-okaze (kaj en aliaj) la politikaj kaj sindikataj organizaĵoj «de la laborista klaso» en ĉi tiu proceso, tiom evidentas, ke oni demandas sin, kiujn novajn pruvojn oni devus alporti por pruvi, ke la partioj kaj la sindikatoj formas parton –antaŭ longe- de la specifaj instrumentoj de la ĝeneraligita subpremado de la modernaj socioj.

# 5-a ĈAPITRO: VOLONTARMEANOJ, JES!, SOLDATOJ, NENIAM!

Post la okazintaĵoj de Julio 1936, jam ekzistis nek armeo nek polico kaj la laboristaj volontarmeoj estis kiuj defendis la Revolucion, tiel en la postmilitfronto, kiel en la militfronto. Ankaŭ pri tio, la kataluna Registaro estis devigita rekoni la revoluciajn iniciatojn atendante «pli bonajn tagojn»: la 21-an de Julio 1936, Companys kreis per Dekreto la laboristajn volontarmeojn..., kiuj jam estis detruintaj la militan ribelon en Katalunujo tagojn antaŭe. La Dekreto atribuis al la volontarmeoj provizoran kaj defendan rolon. Enrique Pérez Farras estis enoficigita «militestro de la volontarmeoj» kaj Luis Prunes y Sato komisaro pri defendo en la kataluna Registaro «kun la necesaj atribuoj por la organizo de la volontarmeoj».

Fakte estis la laboristaj organizaĵoj, kiuj organizis, armis kaj regis la kolonojn de volontarmeanoj; ĉiu organizaĵo havis sian kolonon. La Komitato pri Interrilato kreita de la kataluna Registaro limiĝis leĝigi la iniciatojn kaj konfiskojn por la armilaro, provizado kaj transporto de la volontarmeoj.

> «Jen la komenca konsisto de la kontraŭfaŝismaj volontarmeoj de Katalunujo: NKL-IAF: 13.000 anoj; ĜUL: 2.000; LPMU: 3.000; Polico kaj kataluna Registaro: 2.000.»[112]

La plej granda parto de la volontarmeanoj estis membroj de NKL-IAF. De ĉi tiu organizaĵo devenis la iniciato marŝi sur

112PRUDHOMMEAUX, A. kaj D.: *La Catalogne Libertaire* [france, La liberecana Katalunujo], «*Cahiers Spartacus*», 1936-1937, Eldonejo 1940, paĝo 6.

Zaragozon, urbo kun grava anarĥisindikatista sektoro kaj, kiu estis, kiel ni vidis, en manoj de la militistoj. Ĉi tiu unua kolono penetris en Aragonon kvar tagojn post finitaj la luktoj en Barcelono. La fervojistoj plenrapide konstruis blenditan trajnon, kiun metis je dispono de la volontarmeanoj; krome ĉi tiuj konfiskis aŭtojn privatajn kaj kamionojn. Ili antaŭeniris meze de la entuziasmo kaŭzita de la unuaj venkoj, liberigante multnombrajn urbojn kaj vilaĝojn de Aragono. Sed tre baldaŭ la kolono, veninte je malmultaj kilometroj de Zaragozo, ne povis plu antaŭeniri. Entranĉeigitaj en la urbo kaj sur la ĉirkaŭantaj montoj, kun Ebro kiel netransirebla baro, la militistoj, pli bone armitaj, interrompis la iradon de la volontarmeanoj. Ĉi tiuj neniam prenos la urbon.
Povas veki la atenton la fakto, ke al neniu venis en la kapon ĉirkaŭi la urbon, penetri tra la postmilitfrontojn de la malamikaj linioj kaj ataki ilin surprize. Ne endis serĉi aliajn precedencojn de ĉi tiu gerila taktiko ol tiuj havigitaj de la milito kontraŭ Napoleono en Hispanujo mem. Sed, kiel ni poste vidos, la stagnado antaŭ Zaragoza nur estas ekzemplo, inter multaj aliaj, de la sentaŭgeco de la volontarmeoj kaj ĉefe de la sentaŭgeco de la nomita Popola Armeo, kreita monatojn poste, por efektivigi veran gerilan militon.
La gvidanto de ĉi tiu kolono estis Buenaventura Durruti, unu el la plej popularaj aktivuloj de la anarĥiista movado, unu el tiuj «naturaj gvidantoj», kiuj kutimis havi pli da aŭdantaro ol la sekretarioj (la grandega plimulto de tiuj «naturaj gvidantoj» dum la enlanda milito plenumis la plej altajn oficialajn postenojn en la aparato de la ŝtato, la sindikatoj, la armeo ktp, perdante tiel sian «naturan» specifecon). Pérez Farras, kariera militisto, estis lia militista konsilanto. Por la anarĥiisma literaturo, Durruti iĝis la simbolo de la sociaj transformadoj okazantaj dum la marŝo de lia kolono. Por aliaj literaturoj, li estis «pafmortigisto», kiu altrudis per la

teroro la liberecanan komunismon en Aragono.[113] Ĉiam oni kutimas asocii la historiajn okazaĵojn kun la figuro de «heroo». Durruti estis nek «pafmortigisto» nek la ĉefanĝelo de la socia revolucio. Sendube lia kolono plenumis maljustaĵojn, sed ĝi ankaŭ agadis kiel instigo por la kreo de la «liberecanaj komunumoj». Tamen la anarĥiistaj kamparanoj ne atendis liajn «ordonojn» por realigi la kolektivigojn: la frankista ribelo kaj la revolucia reago, la eniro de la kolono de volontarmeanoj en Aragonon, estis por ili la signalo pri tio, ke venis la tempo de la socia revolucio. Samkiel en la industriaj kolektivigoj, kio karakterizis la kamparanan movadon estis la spontaneeco. La ĉeesto de la anarĥiistaj volontarmeanoj sendube favoris la kreon de la liberecanaj komunumoj, sed ne estis ili, kiuj ilin kreis.

Tiel estas kiel Durruti priskribas la agadon de «sia» kolono:

> «Ni samtempe faras la revolucion kaj la militon. La revoluciaj disponoj efektiviĝas ne nur en Barcelono, sed ke ili etendiĝas ĝis la paflinio. Ĉiu vilaĝo, kiun ni konkeras, komencas revolucie disvolviĝi. Malvenko de mia kolono estus io terura, ĉar nia retiriĝo similus al tiu de nenia armeo. Ni devus kunporti ĉiujn luktantojn de la vilaĝoj, kiujn ni trairis. De la paflinio ĝis Barcelono, sur la irvojo sekvita de ni, nur estas luktantoj. Ĉiuj laboras por la milito kaj la revolucio: ĉi tiu estas nia forto.»[114]

Jen strategio de revolucia milito, kiu tre bone respondis al la situacio, sed kiu bedaŭrinde ne estis sufiĉe disvolviĝinta. Durruti ne estis la sola el tiuj prestiĝaj anarĥiistaj kolonestroj -kiel Domingo Ascaso, Cipriano Mera, Ricardo Sanz ktp-, kiuj komenciĝinta la milito pretendis transformi siajn kolonojn en la rapidagajn fortojn de la socia revolucio. Sed

113Pri ĉi tiuj ekzekutoj, vidu la aneksaĵo 7.
114Peirats, citita verko, 1-a volumo, paĝo 209.

li, kiel mi ĵus diris, renkontis en Aragono la entuziasman apogon de la malriĉaj kamparanoj kaj laboristoj, kiuj ĵetis sin en la eksterordinaran aventuron de la «liberecanaj komunumoj». Sed ĉiuj tiuj «naturaj gvidantoj», jam iĝintaj kolonestroj, akceptis la militistigon (ankaŭ Durruti) kaj ilia ekzemplo kaj ilia prestiĝo multe influis. La rolo de ĉi tiuj gvidantoj estas tre dubasenca: ĝuste ĉar ili havis «pasintecon el lukto», ĉar ili kuraĝe estis ĉekape dum la bataloj de Barcelono (mi ankoraŭ parolas pri la anarĥiistaj gvidantoj), ili sciis «treni la homamasojn», havis ideojn kaj prenis iniciatojn, kaj estis aŭskultitaj kaj obeitaj. Kaj ĝuste ĉar ili estis aŭskultitaj kaj obeitaj, povis, dum kreiĝis la nova socia tavoligo, disiĝi de la homamasoj kaj plenumi la specifan rolon de gvidantoj-burokratoj. Kaj ĉi tio, kio estas realo en la irado de la revolucio ĝenerale, ankaŭ tiel estis en la afero de la militistigo de la volontarmeoj. Kaj tiel, tiu «armeo de socia liberigo», kiu estis la unuaj kolonoj de volontarmeanoj, estis transformiĝonta, kiel ni vidos, en malbonan armeon de «prusa» tipo.
Durruti mortis -laŭ mistera maniero pri kiu oni formulis ĉiajn hipotezojn[115]- la 20-an Novembro 1936, en Madrido, kien estis alvokita lia kolono, kiel plifortigo antaŭ la faŝista ofensivo kontraŭ la ĉefurbo. Kaj kvankam ni scias, ke li akceptis la militistigon, kion ni ne povas scii estas ĉu li akceptintus ĉiujn reakciajn konsekvencojn, kiujn ĝi okazigis. Sed por kio fari supozojn pri tiu afero?

* * *

Dum la unuaj monatoj de la milito, la volontarmeoj de NKL karakteriziĝis pro sia kontraŭaŭtoritatema spirito.

> «... ne estis militistaj gradoj, ordenoj, emblemoj aŭ distingoj en la manĝoj, vestaĵoj kaj loĝejo kaj la malmultaj profesiaj militistoj, kies servoj estis

115Pri la morto de Durruti, vidu la 8-an aneksaĵon

> akceptitaj, nur agadas kiel konsilantoj. La baza unuo estis la grupo, ĝenerale konsistigita de dek viroj; ĉiu grupo elektis unu delegiton, kies funkcioj estis similaj al tiuj de suboficiro de la plej malalta grado, sed sen la egalvalora aŭtoritato. Dek grupoj konsistigis centopon, kiu ankaŭ elektis sian propran delegiton, kaj certa nombro de centopoj konsistigis kolonon, je kies kapo estis militkomitato.
>
> Ĉi tiu komitato estis ankaŭ elektita kaj estis dividita en pluraj sekcioj laŭ la bezonoj de la kolono. La posteno de delegito de grupo kaj centopo kaj tiu de membro de la militkomitato ne signifis la ekziston de konstanta Stabo kun specialaj privilegioj, ĉar ĉiuj delegitoj povis esti eksigitaj tiel frue, kiel ili malsukcesis en sia interpreto de la deziroj de la homoj elektintaj ilin.»[116]

Ĉi tiu kontraŭaŭtoritatismo, karakteriza de la anarĥiistoj, ne ekzistis en ĉiuj kolonoj de volontarmeanoj, sed la «alligiteco al idealo» kaj la entuziasmo preskaŭ ĉiam anstataŭis la militistan disciplinon. La unuaj bataloj, kiujn realigis la volontarmeanoj kontraŭ la armeo, la polico aŭ la faŝistaj volontuloj, finiĝis ĉu venke, ĉu malvenke, sed ĉiuj gvidantoj konsideris, ke la esenca kaŭzo, kaj preskaŭ ĉiam la sola, de la malvenkoj estis la foresto de specife militista disciplino. Ili diris, ke la ŝlosilo de la venko kuŝis sur la starigo de fera disciplino kaj, sekve, sur la militistigo de la volontarmeoj.

* * *

De finoj de Julio 1936, la centra Registaro prezidita de José Giral mobilizis du kontingentojn por ke ili servu kiel kontraŭpezo al la laboristaj volontarmeoj, dispono, kiu ne havis praktikajn efikojn, unue ĉar la grandega plimulto de la «mobilizitoj» jam estis en la militfronto kun la volontarmeoj

116Bolloten, citita verko, paĝo 231

kaj due, ĉar la Registaro tiumomente havis neniun premrimedon sur la malmultajn «rekomenditojn». La 3-an de Aŭgusto oni proklamis novan Dekreton per kiu anoncis la kreon de «Batalionoj de Volontuloj»[117], sed la volontuloj daŭre aliĝis al la laboristaj volontarmeoj.
Tamen la Registaro esti decidita havi «sian» armeon kaj, ĉar ĝi ne povis lasi la monopolon de la milito al la laboristaj volontarmeoj, insistis kaj du semajnojn poste, la 18-an de Aŭgusto 1936, Giral, subtenita de la stalinistoj (kiel li mem klarigis al Bolloten) «diktis serion da novaj dekretoj celantaj la estigon de armeo de volontuloj” per la viroj de la unua rezervo, kun kadroj konsistigitaj de oficiroj kaj suboficiroj, kiuj estis en situacio de rezervo aŭ aktive kaj, kies lojaleco estis konfirmita de partio aŭ sindikato de la Popola Fronto».[118] Sed ĉiuj tiuj dekretoj servis por nenio, ne nur ĉar la volontuloj jam luktadis, sed ankaŭ pro la grandega malfido, kiun NKL-IAF kaj la maldekstra socialistaro -kio nombris multajn homojn- sentis al José Giral kaj ties Registaro, kiujn ili konsideris tro burĝaj. Tiuj organizaĵoj, kiuj regis la plej grandan parton de la volontarmeoj, ne volis cedi sian militistan aŭtoritaton al Registaro, kiun reale ne akceptis. Nur poste, kiam enpotenciĝis la pli «laborisma» Registaro de Largo Caballero (kaj poste la kataluna Registaro), kaj ĉefe pro la manovroj de la stalinistoj kaj la ĉantaĝo de la rusaj armiloj, oni atingis krei, fronte al la frankista armeo, samtipan respublikan armeon. Kio estas, en si mem kaj laŭ evidenta maniero, fiasko.
En Katalunujo, la klopodo por restarigi la malnovan hierarĥigitan armeon de klasika tipo renkontis aparte fortan reziston. «Pro la provo de militista mobilizado de la madrida kaj kataluna Registaroj, la stratoj de Barcelono estis invaditaj de la rekrutoj de la kontingentoj de la jaroj 1933-34

117DÍAZ-PLAJA, Fernando: *El Siglo XX. La Guerra. 1936-1939* [hispane, La 20-a jarcento. La Milito. 1936-39] Eldonejo *Faro*, Madrido, 1963, paĝoj 194-195.
118Bolloten, citita verko, paĝo 220.

kaj 1935, kiuj, ĉar ili havis neniun fidon je la oficiroj kaj konsideris sin liberigitaj je la malnova militista koncepto de la enkazernigo, rifuzis aliĝi al la armeo. Multaj el ĉi tiuj junuloj enskribis sin en la volontarmeojn; iuj eĉ volis tuj deiri al Zaragoza». En granda politika amaskunveno, en kiu kunvenis 10.000 junuloj, oni voĉdonis la sekvan tagordon:

> «Ni ne rifuzas plenumi nian civitanan kaj revolucian devon. Ni volas iri liberigi niajn fratojn de Zaragozo. Ni volas esti volontarmeanoj de la libereco, ne uniformitaj soldatoj. La armeo pruvis esti danĝero por la popolo; nur la popolaj volontarmeoj povas protekti la publikajn liberecojn: Volontarmeanoj, jes!, soldatoj, neniam!»[119]

La kataluna Federacio de NKL-IAF same opiniis ĉi-sence kaj deklaris: «Ni ne povas defendi la ekziston, nek kompreni la bezonon de regula, uniformita kaj deviga armeo. Ĉi tiu armeo devas esti anstataŭita de la popolaj volontarmeoj, de la popolo armita, sola garantio, ke la libereco entuziasme estos defendita kaj, ke en la ombro ne koviĝos novaj konspiroj».[120] Fine la Centra Komitato pri Volontarmeoj aranĝis kompromison kaj la 6-an de Aŭgusto decidis, «ke la soldatoj de la kontingentoj de 1934-1935 kaj 1936 tuj ree aliĝu al la kazernoj kaj, ke ili tie metu sin je dispono de la Komitatoj pri Volontarmeoj starigitaj sub la aŭtoritato de la Centra Komitato.»[121]
La atako entreprenita kontraŭ la volontarmeoj por atingi regulan armeon intensiĝis kaj gajnis terenon ekde Septembro de 1936. La 4-an de tiu sama monato enpotenciĝis la Registaro Largo Caballero,[122] kio signis tre gravan fazon en la rekonstruo de la ŝtato. Efektive la nova

119Prudhommeaux, citita verko, paĝoj 9-10.
120Peirats, citita verko, 1-a volumo, paĝo 187.
121Sama verko, 1-a volumo, paĝo 188.
122Pri la konsistigo de tiu Registaro, vidu la 9-an aneksaĵon.

Registaro, fortigita de la subteno de ampleksa sektoro de la laboristaj, komunistaj kaj socialistaj organizaĵoj kaj, kiu malgraŭ ĉio ĝuis favoran antaŭjuĝon tiel de la anarĥiistoj, kiel de la respublikanoj, entreprenis kaj iom post iom sukcese plenumis tion, kion la Registaro Giral, malgraŭ la subteno de la stalinistoj, ne atingis ĉefe rilate la armeon.
La 10-an de Oktobro oni kreis per dekreto la Popolan Armeon kaj la volontarmeoj estis militistigitaj. La 15-an de tiu sama monato oni kreis la ĝeneralan Komisararon pri la Milito, de kiu dependis la politikaj komisaroj de la armeo (kompreneble jam ekzistis Ministrejo pri la Milito direktita de Largo Caballero mem, kiu kunigis al tiu funkcio tiun de Ĉefministro). La 22-an estis aprobita la kreo de la Internaciaj Brigadoj ktp.
La 4-an de Novembro de 1936, kvar anarĥiistaj gvidantoj ekpartoprenis en la Centra Registaro (vidu 9-an aneksaĵon).

* * *

La kataluna Registaro, en kiu la anarĥiistoj ĵus ekpartoprenis -la 27-an de Septembro-, fidele sekvis la Centran Registaron koncerne la disponojn relativajn al la kreo de Armeo. La 1-an de Oktobro: dekreto pri mobilizo de la oficiroj, suboficiroj kaj superaj oficiroj. La 4-an de Oktobro: mobilizo de ĉiuj milituтilaj viroj de 18 ĝis 40 jaroj. Samtempe la centra Komitato pri Volontarmeoj estis malfondita, kiel ni vidis, la 3-an de Oktobro kaj ĉiuj atribuoj de militista karaktero, kiujn ĝi posedis, estis transdonitaj al la Departemento pri Defendo de la kataluna Registaro. Ĉi tiu Departemento estis direktita de Díaz Sandino, kariera oficiro.
La anarĥiistaj gvidantoj estis entreprenontaj, kiel ni vidos, ekstreme rapidan "teorian" direktoŝanĝon, ne nur koncerne sian propran partoprenon, sed ankaŭ rilate la socian rolon de la Registaroj. La saman tagon, kiam enpotenciĝis la Registaro Largo Caballero, la 4-an de Septembro 1936,

«*Solidaridad Obrera*» publikigis artikolon titolitan: «La senutileco de la Registaro», en kiu oni povis legi tion jenan:

> «La ekzisto de Registaro de Popola Fronto, anstataŭ esti nepraĵo por la kontraŭfaŝisma lukto, fakte respondas al kruda imitaĵo de ĉi tiu sama lukto.
> La milito, kiu efektiviĝas en Hispanujo, estas socia milito. La graveco de la moderiga potenco, bazita sur la ekvilibro kaj la konservado de la klasoj, ne scios trudi difinitan sintenon en ĉi tiu lukto, en kiu ŝanceliĝas la fundamentoj de la ŝtato mem, kiu renkontas nenian sekurecon. Do estas ĝuste diri, ke la Registaro de Popola Fronto en Hispanujo ne estas alia aĵo ol la spegulbildo de kompromiso inter la etburĝaro kaj la internacia kapitalismo.»[123]

Ĉi tiuj malmolaj (sed trafaj) vortoj ne neebligis, ke NKL-IAF nelonge poste partoprenos en la kataluna Registaro - maskita, tio veras, sub la nomo de Konsilantaro de la kataluna Registaro- kaj poste en la centra Registaro. Jam antaŭ ĝia partopreno oni faris interkonsentojn kaj intertraktadojn pri kiuj la aktivuloj sciis preskaŭ nenion. Meze la monato de Septembro, okaze de delegitkunveno de NKL, oni sugestis la kreon de «Nacia Konsilantaro pri Defendo», prezidota de Largo Caballero, kio ne estis pli ol simpla operacio de kaŝmaskado por permesi al ili kunlabori, sub alia nomo, en la Registaro. Tamen la aliaj partioj estis tre interesaj pri tio, ke NKL partoprenu en la centra Registaro kaj fari ĝin kunkulpa pri la neniigo de la laborista aŭtonomeco ĝenerale kaj de la volontarmeoj aparte. Ili sukcesis.

Tuj kiam ekpartoprenis en la Registaro, la anarĥiistoj ŝanĝis sian tonon kaj adoptis la respondecan «lingvaĵon» de la ministroj. Tiel la ekstremista García Oliver, jam ministro pri

123Peirats, citita verko, 1-a volumo, paĝo 198.

Justico, la 4-an de Decembro 1936, dum politika amaskunveno okazigita en Valencio, ekkriis:

> «Ĉu al ni interesas venki la militon? Tial, kiuj ajn estu la ideologioj kaj la "kredoj" de la laboristoj kaj de la organizaĵoj al kiuj apartenas, por venki, ili devas uzi la samajn metodojn, kiujn uzas la malamiko (substrekita de mi, [C.S.-M.]) kaj ĉefe la disciplinon kaj la unuiĝon. Per efikaj disciplino kaj militista organizo, ne estas dubo, ke ni venkos. Disciplino por kiuj luktas en la militfronto kaj en la laborposteno, disciplino en ĉio, tiu estas la bazo de la venko...»[124]

Kiom for estas tiuj paroladoj pri la kreemo de la homamasoj, tiel estimitaj de tiuj anarĥiistaj gvidantoj mem! La lingvaĵo de García Oliver fariĝis identa al tiu de la stalinistoj.

«Ĉi tiu disvolviĝo de la porleĝaj kaj burokrataj sintenoj (en la sino de NKL/IAF), skribas Vernon Richards, okazis samtempe, kiel malseverigo en la organizaj metodoj per kiuj oni kutimis preni la decidojn en NKL. Alivorte, oni kreis direktistaron -konsistigitan ne nur de politikistoj kaj influaj membroj de NKL, sed ankaŭ de multnombraj membroj, kiuj okupis gravajn postenojn en la administrado kaj en la militista komando-, kiu funkciis pere de Komitatoj kaj registaraj sekcioj kaj, kiu malofte konsultis la bazon de la organizaĵo kaj ankaŭ ne tre ofte ilin informis.»[125]

La sekvan tagon de la partopreno de NKL-IAF en la centra Registaro, la itala anarĥiista teoriisto, Camillo Berneri, skribis en la ĵurnalo *Guerra di classe*, kiun li mem publikigis

---

124RICHARDS, Vernon: *Lessons of the Spanish Revolution (1936-1939)* [angle, Lecionoj el la Hispana Revolucio (1936-1939)], Londono, *Freedom Press*, 1953. (Estas hispana tradukado de ĉi tiu libro en la kolekto «*La Hormiga*», Eldonejo *Bélibaste*, Parizo. Ĵus aperis alia en Hispanujo: *Enseñanzas de la Revolución Española* [hispane, Lecionoj el la Hispana Revolucio], *Campo Abierto Ediciones*, Madrido, 1977.)

125Sama verko.

en Barcelono, artikolon titolitan: «Atentu, danĝera ŝanĝiĝo», el kiu ni ĉi tie donas ekstrakton:

> «Krome endas bedaŭri la progreson de la bolŝevikismo en la sino de NKL, karakterizita de la ĉiam pli malgranda eblo, kiun havas la aktivuloj de bazo, povi efektivigi atentan, aktivan kaj rektan kontrolon pri la verko realigita de la reprezentantoj de la organizaĵo en la sino de la komitatoj kaj la registaraj konsilantaroj. Endus krei serion da komisionoj elektitaj de NKL kaj IAF, taskitaj faciligi kaj samtempe korekti tiom da fojoj, kiel estu bezone, la laboron de niaj reprezentantoj en la sino de la Konsilantaroj pri Milito kaj la Konsilantaroj pri Ekonomio.»[126]

Ne temas pri abstrakta polemiko inter partianoj de la tradicia armeo -kaj sekve de forta ŝtato- kaj la partianoj de la laboristaj volontarmeoj -kaj sekve de la revolucia demokratio. Prezentiĝis tre konkretaj kaj gravaj problemoj, ĉar la milita situacio neniel estis brila. Post la unuaj venkoj de la armitaj laboristoj, venkoj atribueblaj al la improvizaĵo kaj la audaĉo, kiuj detruis la militistan ribelon en la ĉefaj urboj kaj industriaj regionoj, la frankista armeo ŝajnis, ke releviĝis: ĝi gajnis terenon en Andaluzio, konkeris Ekstremaduron, tiel renkontiĝante la armeon de la nordo. La 27-an de Septembro Toledo falis en ĝiajn manojn; Madrido, sieĝita, ŝajnis, ke ĝi ne povus longe rezisti -fakte tion faris ĝis la fino-, Iruno falis la 4-an de Septembro, Sankta Sebastiano la 13-an ktp.
Oni atribuis la respondecon de ĉiuj ĉi malvenkoj al la maldisciplino, la malordo kaj la «anarĥio» de la

126Camillo Berneri. Kelkaj artikoloj liaj estas kolektitaj en broŝuro titolita *Guerre de classe en Espagne*, Eldonejo *AIT* [france, Klasmilito en Hispanujo]. *Tusquets Editor*, en ĉi tiu sama kolekto, eldonis ĉiujn skribaĵojn de Berneri pri Hispanujo kaj Katalunujo en *Guerra de clases en España, 1936-1939* [hispane, Klasmilito en Hispanujo, 1936-1939], eldono zorge de Carlos M. Rama.

volontarmeoj. La anarĥiistaj gvidantoj, kiuj komence estis favoraj konservi la volontarmeojn, iom post iom iĝis defendantoj de ties militistigo. Ĉi tiu konvertiĝo estis akcelata, kiel ni vidis, de ilia partopreno en la Registaroj.

Siaflanke de la komenco la komunistoj estis fervoraj partianoj de hierarĥigita armeo, disciplinita kaj kun sola komando. De la 18-a de Aŭgusto ili postulis en manifesto la kreon de «nova armeo, popola, heroa», al kiu endis doni «la bezonajn unuiĝon kaj disciplinon».[127] La 21-an de Aŭgusto ilia ĵurnalo, «*Mundo Obrero*», deklaris, ke endis krei en periodo de tempo kiel eble plej mallonga armeon kun la tuta teknika efikeco, kiun postulas la moderna milito» (...). «Fronte al la frankista armeo, helpata de germanaj kaj italaj trupoj, endas kontraŭstari alian armeon, kiu ne nur estu de la sama tipo (substrekita de mi [C.S.-M.]: ĉu sendube tiel heroa kaj popola, kiel la frankista?), sed ankoraŭ pli moderna se eblas. Sur tio kuŝas la garantio de la venko.»[128]

Ne endas pensi, ke la partianoj de la volontarmeoj rifuzis konstati la militistajn malfacilaĵojn ĝenerale kaj la difektojn de la volontarmeoj aparte.

Ekzemple Kaminski, kiu tamen estis tute favora al la socia revolucio, skribis:

> «Apenaŭ estas bezone indiki, ke tiuj trupoj faris ĉiujn imageblajn erarojn. La dumnoktaj atakoj komenciĝis per revoluciaj vivuoj. Multfoje oni lokis la artilerion sur la sama linio, kiel la infanterio. Kelkfoje okazis interokazaĵoj vere groteskaj. Iutage volontarmeano al mi rakontis, ke post la tagmanĝo la tuta taĉmento iris en la apudan kampon por manĝi vinberojn; kiam ili revenis en sian postenon, ĝi estis okupita de la malamiko.»[129]

---

127Milito kaj Revolucio, paĝo 309.
128Bolloten, citita verko, paĝo 222.
129Kaminski, citita verko, paĝo 244.

Estas multaj atestoj pri tiuspecaj «groteskaj interokazaĵoj». Ekzemple, kiam la militfronto estis proksima al la vilaĝoj de la volontarmeanoj, ne maloftis, ke ĉi tiuj iris «hejmen dormi». Alifoje la volontarmeanoj rifuzis plenumi tian aŭ kian operacion pro motivoj, kiuj okaze estis tre ekstravagancaj. Ne endas pensi, ke la timo estis la ĉefa motivo, ĉar la atestantoj mem insistas pri la kuraĝo kaj la aŭdaco de la volontarmeanoj, kiuj eĉ rifuzis fosi ŝirmfosaĵojn, ĉar «revoluciulo ne sin kaŝas antaŭ la malamika pafado». Krom la ekzemploj de «malbona konduto» de la volontarmeanoj, kiujn la kvazaŭteoriistoj de la moderna armeo kutimis konsideri kiel lernantojn-soldatojn, oni ankaŭ rimarkigis aliajn difektojn, definitive, multe pli gravajn. Fundamente temas pri la rilato de la kolonoj de volontarmeanoj al ties ĉefa organizaĵo, politika kaj sindikata, de kiu ili preskaŭ ĉiam dependis. Tiel, kiam en sama militfronto najbaris kolonoj de volontarmeanoj de malsamaj politikaj -aŭ sindikataj- aliĝoj, kiel okazis en Aragono, se la pli aŭ malpli improvizita «Stabo» -en kiu cetere la militistaj karieraj konsilantoj estis konsideritaj suspektaj- decidis operacion, ĉiuj kolonoj de volontarmeanoj unue konsultis kun sia organizaĵo antaŭ ol aprobi aŭ malakcepti ĝin. Krome estis evidenta rivaleco inter la kolonoj apartenantaj al malsamaj ideologioj, kio kelkfoje pelis ilin ŝteli la armilojn unuj al aliaj -kaj kio kompreneble poste pelis ilin nei la armilojn al la rivala kolono pli malbone ekipita- kaj eĉ, koncerne la gravajn politikajn konfliktojn, ili ekdiskutis per pafoj...
Ankaŭ estis kiuj riproĉis al la sistemo de volontarmeoj la foreston de ĝenerala Stabo, de sola komando de tradicia tipo, por unuj; kaj por aliaj la foresto de naciskala institucio de kunordigo kapabligita por koni la situacion en ĉiuj militfrontoj, realigi entutan planon kaj decidi la provizadon de armiloj, municioj, transportrimedoj ktp.
Ĉar la milito plidaŭriĝis, organiziĝis, kaj la malamika armeo denove superregis kelkajn regionojn, post la improvizo de la

unuaj semajnoj fariĝis bezona nova entuta strategio. Ni tuj diru ke, por mi, tia strategio havis nenian rilaton al la improvizita konstruo de armeo identa al frankista kun la tuta mitologio de la uniformoj, salutoj kaj galonoj, kun oficiroj rajtigitaj mortpafi la soldatojn, la hierarĥioj de la salajroj, la vestoj, la manĝo kaj la loĝejo, takte marŝi kaj la blinda disciplino. Ĉiu ĉi «prusa» ritaro, kiun ili sukcesis altrudi, nur faris malfaciligi tion esencan: la apliko de strategio, kiu estu la kompenson de la socia revolucio efektiviĝanta, tio estas, strategio de revolucia milito de geriloj. Endos ree insisti pri tio.

**LA KOMUNISTOJ KAJ LA NOVA ARMEO**

La komunistoj estis la unuaj, kiuj proponis dissolvi siajn volontarmeojn en regulan armeon. Kaj tio estas kion ili tuj faris, tuj kiam oni proklamis la dekreton pri militistigo de la volontarmeoj. B. Bolloten skribis pri tio:

«Por prediki per la ekzemplo, la Komunista Partio iom post iom malfondis sian propran Kvinan Regimenton, kies batalionoj kune kun aliaj fortoj estis kunfanditaj en la «Mikskonsistaj Brigadoj» de la embria regula armeo; kaj estis enoficigita kiel komandanto de la unua de ĉi tiuj unuoj (asistita de sovetia oficiro) Enrique Líster ĝis tiam estro de la Kvina Regimento. Ĉar ili prenis la iniciaton malfondi siajn proprajn volontarmeojn, la komunistoj al si garantiis la regadon de kvin el la ses unuaj brigadoj de la nova armeo.»

Prenante en siaj manoj la regadon de ĉi tiuj unuaj unuoj de la nova armeo, la komunistoj ne malatentis la superajn komandojn. Efektive Bolloten memorigas ke, dum la unuaj semajnoj, kun Largo Caballero kiel ministro pri la Milito, ili al si garantiis envieblan pozicion: «Ili povis fari ĉi tion, parte ĉar iliaj rilatoj al la Ministro pri la Milito ankoraŭ estis tolereblaj, malgraŭ ĉi tiu havis multajn motivojn de malkontento al ili. Danke al ĉi tio, du el iliaj aktivuloj, Antonio Cordón kaj Alejandro García Val estis destinitaj por la

Sekcio de Operacioj de la centra Stabo; sed ĉefe ili tion atingis, ĉar en la ŝlosilaj postenoj de la Ministrejo pri la Milito estis homoj, kiuj komence estis tute fidelaj al Largo Caballero, kiel la leŭtenanto kolonelo Manuel Arredondo, ties helpanto de kampo, la kapitano Eleuterio Díaz Tendero, estro de la gravega Departamento pri Informado kaj Kontrolo kaj la majoro Manuel Estrada, estro de la Centra Stabo, sed kiuj fakte iĝis aŭ baldaŭ iĝos simpatiantoj de la komunistoj».[130]

Tiel la komunistoj al si garantiis la regadon de multnombraj ŝlosilaj sektoroj de la militista aparato. Per la komisaroj, ili havis plenan influon sur la Ĝenerala Komisararo pri Milito, institucio kreita la 15-an de Oktobro 1936 por garantii la politikan kontrolon de la armitaj fortoj. Ĉar Alvarez del Vayo, Ĝenerala Komisaro (kaj krome Ministro pri Eksteraj Aferoj) tiel, kiel Felipe Pretel, ĝenerala sekretario de la Komisararo, kiuj komence ankaŭ estis partianoj de Largo Caballero kaj ĝuis tutan lian fidon, fakte agadis nome de la Komunista Partio. Aliflanke kelkaj gvidantoj, kiel Antonio Mije, membro de la Politika Buroo kaj José Laín, unu el la gvidantoj de USJ, okupis respektive la postenojn de Komisaro asistanta al la organizaĵo kaj de Direktisto de la Lernejo de Politikaj Komisaroj.

Aliflanke, kiam kunfandiĝis la kolonoj de volontarmeanoj en la nova popola armeo, oni prizorgis, ke en la novaj brigadoj (kaj regimentoj) tiel formitaj estis «miksitaj» volontarmeanoj de diversaj sindikataj kaj politikaj organizaĵoj. Tiel do ĉi tiuj «miksaĵoj» (batalionoj kaj mikskonsistaj brigadoj) kurioze favoris la komunistajn militistestrojn kaj la karierajn oficirojn proksimajn al KPH, al kiuj oni konfidis la altajn postenojn de komando. El la vidpunkto de la unuiĝo de komando, ĉi tiu miksaĵo estis logika, ĉar ĝi celis solan aŭtoritaton, centran Stabon kaj, ĉar ĝi devis nepre fini la relativan aŭtonomecon

130Bolloten, citita verko, paĝo 242.

de la kolonoj kaj la «Staboj» de la partioj kaj sindikatoj. Same ili volis trudi la principon de la ŝtato super la partioj - ĉiu partio senbride luktis samtempe por regadi la ŝtaton. Ŝajnas, ke pri tio ankaŭ la komunistoj plejparte sukcesis en siaj manovroj de «enŝteliĝo». Ĉi tiu «ensteliĝo» nelonge poste estis denuncita de iuj el iliaj malnovaj aliancanoj, ĉefe de Largo Caballero, Luis Araquistain kaj Indalecio Prieto. La graveco, kiun atingis la partio, ne nur estis pro ĝia manobra lerteco kaj la manipulado de la sovetia helpo, ankaŭ estis pro la fakto, ke ĝiaj metodoj kaj ĝia ideologio tre bone konvenis al la nova direkto, kiun estis prenanta la lukto: la revolucio iĝis la «milito de nacia sendependeco».

Efecktive neniu alia socia grupo -ĉar la oficiroj, kiuj restis fidelaj al la Respubliko, estis tiom malmultaj, ke neniu ilin konsideris- estis tiel preta transformiĝi en «korpuson de armeo», kiel KPH. La rigida hierarĥio, la blinda disciplino, la nediskutebla obeado ekzistanta en ĝiaj vicoj, konsistigis la bazon objektive pli favoran por la transformado de la aparato de la partio en la aparaton de la nova armeo. Ĉi tiu disciplina kaj efika strukturo tiel, kiel ĝia konservativa kaj centralizisma politiko, faris, ke KPH vidis kiel pligrandiĝis ties vicoj kaj, kiel pliiĝis ties influo. Tial ĝi sukcesis altiri en siajn vicojn, aŭ en sian orbiton, multajn konservativajn karierajn militistojn. Kiel diris unu el ili al José Martín Blásquez: «Mi aliĝis al la komunistoj, ĉar ili estas disciplinaj kaj faras la aĵojn pli bone ol la aliaj».[131] La kreskantan influon de KPH, kiel partio de ordo, oni konstatas ankoraŭ pli bone en la sekva deklaro farita de juna respublikana ĵurnalisto iĝinta politika komisaro al Frank Borkenau:

> «La komunistoj estis la plej bonaj en la organiza laboro; kaj krome estas, superemezure, <u>la plej konservativa sekcio de la movado</u> (substrekita de mi

---

131MARTÍN BLÁSQUEZ, J.: *I Helped to Build an Army* [angle, Mi helpis konstrui armeon], Londono, *Secker and Warburg*, 1939, paĝo 49.

> [C.S.-M.]). Mi vidas nenian kialon por ke mi ne povu esti komunista; estas probable, ke iutage mi aliĝos al la partio.»[132]

Ankaŭ estas interese analizi la eksterordinaran altiron, kiun plenumis KPH, sur multaj «etburĝaj» intelektuloj (se oni uzas ĝian ĵargonon). Ŝajnas al ni, ke endus serĉi la klarigon en la dueco de KPH: unuflanke ĝi estis la «heredanto» de la «granda bolŝevika revolucio», hispana sekcio de la partio de la tutmonda revolucio, kies gloraj estroj, Lenin hieraŭ, Stalino hodiaŭ, aperis antaŭ iliaj timemaj animoj, kiel la nesuperebluloj de la revolucia ekstremismo. Aparteni al tiu ekstremgrade revolucia partio (aŭ esti en ties servo) por la tiutempa imagaro (kiel povus esti la maŭismo aŭ la guevara-ismo por tiu de 1973), kaj fari politikon, havi konservativan, «demokratian» kaj eĉ reakcian praktikon, evidente estis la ideala solvo, kiu profunde kontentigis samtempe iliajn kompleksojn de homo de «progreso kaj kulturo» kaj ilia kapturna timo al la revolucio.
Certe la revolucia imagaro, ĉefe tiu de la Revolucio de Oktobro, lerte ekspluatata de la hispanaj stalinistoj, havis ampleksan eĥon inter iuj simplaj animoj, kiuj aliĝis al la Partio pli motivitaj de la ledjako de Thapaiev* (oni abunde uzis la sovetian filmon en la propagando) ol de la kontraŭrevolucia politiko de KPH.
Frank Borkenau, en sia antaŭparolo al la libro de José Martín Blásquez: *I Helped to Build an Army*, skribis:

> «Pro la sieĝo de Madrido, en Novembro 1936 kaj poste, la militista komando transiris en manojn de la komunistoj, kiuj, kiel revolucian programon, ĵetis planon de koncentriĝo de la potenco. La fundamentaj ideoj de la militista komunista politiko estis: nenio de revolucio dum daŭras la milito; rigida disciplino, kiu

132BORKENAU, F.: citita verko, paĝo 156 de la hispana eldono.
*NeT. Vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_%C4%88apajev

> inkluzivas la uzon de terorismaj metodoj en la vicoj de la armeo; severa politika regado de la armeo per sistemo de politikaj komisaroj cele krei ideologion adaptitan al tiu politiko, ideologion, fakte, bazitan ĉefe sur la nacia sento.»[133]

Tamen endas rimarkigi, ke por la gvidantoj kaj la stalinistaj kadroj de la hispana KP, tiu «povkoncentriĝo», tiu starigo de forta burokrata-militista ŝtato laŭ kiom ili atingus ĝin estri (kaj ni vidis ĝis kiu ekstremo ili sukcesis), ankaŭ estis preparado por la «revolucio». Laŭ iliaj burokrataj konceptoj, la fakto, ke la partio okupis ŝlosilajn postenojn en la aparato de la ŝtato, ĉefe en la armeo kaj la polico, povis esti la lasta paŝo por la preno de la tuta potenco fare de tiu partio. Kio simboligas, kiel sciate, la superan revolucian celon de la komunistoj. Se ili ne efektivigis tiun burokratan revolucion - aŭ tiun ŝtatrenverson- estis ĉar iliaj propraj interesoj, pri tiu punkto, malakordis kun tiuj de la sovetia burokrataro, kiu volis, ke Hispanujo konservu sian karakteron de burĝa Respubliko. Kun ĉi tiu sola diferenco tio, kion oni skizis en Hispanujo kaj la rolo, kiun en ĝi plenumis la sovetianoj, starigis, kiel indikas G. Munis,[134] provon pri tio, kion ili poste realigis en la Orienta Eŭropo per la «popolaj demokratioj».

## LA ANARĤIISTAJ VOLONTARMEOJ REZISTAS LA MILITISTIGON

Mi jam rimarkigis, ke la anarĥiistaj gvidantoj, ĵus ekpartoprenante en la centra Registaro, iĝis energiaj partianoj de la militistigo kaj tial kunigis siajn kritikojn kun la misfamiga kampanjo kontraŭ la volontarmeoj. Tiel ni vidas kiel Federica Montseny ekkriis en politika amaskunveno:

---

133Fr. Borkenau, en MARTÍN BLÁSQUEZ J.: *I Helped to Build an Army* [angle, Mi helpis konstrui armeon], paĝo 7.
134G. Munis, citita verko, paĝo 348.

> «La komando decidis operacion kaj la volontarmeoj kunvenis por diskuti ĝin. Ili tiel pasigis diskutante kvin, ses aŭ sep horojn kaj, kiam fine oni estis realigonta la operacion, la komando malkovris, ke la malamiko jam ĝin plenumis el sia propra iniciatemo. Estas aferoj, kiuj faras ridi, sed ankaŭ plori.»[135]

Tamen en la vicoj de NKL-IAF estis obstinaj defendantoj de la volontarmeoj. Krom rekonfirmi la liberecanajn principojn, kiuj estis esence malfavoraj al la armeo, la militista disciplino, la militistaj rangoj kaj la blinda obeado al la estroj, kiujn postulis la partianoj de la nomita Popola Armeo, tiuj defendantoj elstaris la kuraĝon, la aŭdacon, la spiriton de sinofero de la volontuloj, kiujn neniu dungsoldata armeo atingus iam egali.
Ekzemple delegito de la Kolono de Fero deklaris en kongreso de NKL en Novembro 1936:

> «Estas kamaradoj pensantaj, ke la militistigo solvos ĉion kaj ni diras, ke ĝi solvas nenion. Kontraŭ la kaporaloj, serĝentoj kaj oficiroj eliritaj el la akademioj, tute nekapablaj por la problemoj de la milito, ni kontraŭstaras nian propran organizon, ni ne akceptas la militistan strukturon.»[136]

Ĉi tiu kolono el 3.000 membroj, kiu operaciis en la militfronto de Teruelo, defendis logikan anarĥiisman sintenon, kiu al ĝi faris kondamni, kune kun la militistigo, la novan porregistaran politikon de NKL-IAF. Tiel ĝia delegito deklaris en la pli supre menciita interveno:

> «...nia tuta agado ne devas emi fortigi la ŝtaton, sed ke kontraŭe ni devas iom post iom detrui ĝin; ni devas fari, ke la Registaro estu tute senutila. Ni akceptas nenion, kio estas kontraŭ niaj konceptoj pri

135«*Solidaridad Obrera*» (1-an de Decembro 1936).
136«*Fragua Social*» (14-an de Novembro 1936).

> la anarĥiismo, konceptoj, kiuj devas iĝi realaĵo, ĉar oni ne povas prediki ion kaj fari tion malan.»[137]

Tamen kun la subteno de la anarĥiistaj ministroj, la centra Registaro, prezidita de Largo Caballero, intensigis sian premon kontraŭ la volontarmeoj. De la monato de Decembro 1936, la kolonoj de volontarmeanoj rifuzantaj la militistigon ĉesis ricevi armilojn, kaj dekreto de la 31-a de tiu sama monato decidis, ke oni nur distribuos la salajron inter la batalionoj de la regula armeo.

Sed kvankam en la militfronto de Madrido -elinter aliaj militfrontoj- la kolonoj de NKL-IAF tiutempe akceptis transformiĝi en diviziojn kaj submeti sin al la rigoraj kaj aŭtoritatemaj reguloj de la armeoj (samtempe ke ili rezistis formi parton de la «mikskonsistaj brigadoj»), kontraŭe, en Katalunujo kaj en «ties» militfronto de Aragono la aferoj estis iom malsamaj. Tie, kiel ni jam diris, NKL-IAF tiutempe estis la plimulto tiel en la militfronto, kiel en la postmilitfonto. Tio signifis, ke «ĉe la bazo» estis pli granda rezisto ol aliloke al la militistigo kaj «ĉe la pinto» la anarĥiistaj gvidantoj -ĉefe la ministroj de la kataluna kaj la centra Registaroj-, kvankam ili akceptis kiel aliloke la militistigon, volis almenaŭ konservi la komandon de siaj kolonoj, kiuj iom post iom transformiĝis en diviziojn, kaj la administradon de la organizo de la militfronto kaj ties nutraĵprovizado. Ĉi tiu «aŭtonomeco» de la militfronto de Aragono estis akceptita de Largo Caballero, kiu zorgita de la intrigoj de la hispanaj kaj rusaj stalinistoj, klopodis por alproksimiĝi al NKL-IAF. Fine de Oktobro 1936, la volontarmeoj atakis en la militfronto de Aragono kaj prenis la poziciojn de *Monte Aragón* kaj *Estrecho Quinto*, tiel superrigardante Oskon. La preno de ĉi tiu urbo povus permesi preterpasi Zaragozon kaj ataki tra la flankon. Sed la volontarmeoj tragike malhavis armilojn por daŭrigi la ofensivon. La burĝa-stalinista koalicio de la centra Registaro

137Sama verko.

al ili ne sendis armilojn pro la simpla kialo, ke ĝi ne volis venkojn de la revoluciaj fortoj. Mi jam citis Krivitsy-on, kiam li rakontis, ke ties komisio estis ĉiakoste neebligi, ke la sovetiaj armiloj falis en manojn de la katalunaj revoluciuloj. Ĉi tiu malabundo de armiloj, detalege priskribita de George Orwell en lia Omaĝo al Katalunujo, neebligis ajnan gravan ofensivon. Kaj la tuta grandega aparato de propagando de KPH ekdemandis: «Kial ili ne atakas en la militfronto de Aragono»? Kaj ĝi pli aŭ malpli malkaŝe ekakuzis la anarĥiistajn volontarmeanojn pri sabotado kaj eĉ perfido. Ankoraŭ nuntempe la tre oficiala historio de la milito redaktita de komisiono de KPH, sub la prezidantado de Dolores Ibarruri, asertas:

> «La militfronto de Aragono iĝis ia “privata zono” de la anarĥiistoj kaj ĉi tiuj estis la ĉefaj respondeculoj de la senaktiveco en ĉi tiu militfronto.
> Ĉi tiu pasiveco estis tre utila al la faŝismaj ribeluloj.»[138]

Unu el la kialoj pli ofte menciita de la anarĥiistaj gvidantoj por pravigi sian partoprenon en la Registaroj ĝuste estis, ke tiel ili povus pli bone prigardi la justan disdonon de la armiloj. Iel ili foroferis sian «honoron de anarĥiistoj» por ke la militfronto de Aragono estu pli bone provizita. Sed ilia «forofero» estis senutila kaj ilia registara partopreno nur favoris la interesojn de la kontraŭrevolucio.
Evidente la ĉantaĝo de la sovetiaj armiloj ankaŭ servis por trudi en la militista kampo -kiel ĝi fariĝis en aliaj kampoj- la stalinistajn ideojn. La usona historiisto David T. Cattell ĉi-rilate skribis:

> «La sovetia militista helpo estis uzata kontraŭ la katalunaj revoluciaj fortoj laŭ diversaj manieroj. El la

138*Guerra y Revolución en España*, [hispane, Milito kaj Revolucio en Hispanujo], 2-a volumo, paĝo 24.

> disvolviĝo de la okazaĵoj ni rajtas dedukti, ke Sovetio garantiis sian helpon al Katalunujo sub la sekvaj kondiĉoj: la komunistoj dizidentoj de LPMU ĉesu havi reprezentantojn en la kataluna Registaro kaj la loka Registaro akceptu la ĝeneralan programon ellaboritan de la centra Registaro. Efektive la helpo al Katalunujo ekvenis en Decembro kaj tuj la reprezentantoj de LPMU estis apartigitaj de la kataluna Registaro, la katalunaj volontarmeoj submetis sin al longa proceso de organizo en la sino de regula armeo kaj la centra Registaro iom post iom komencis certigi al si la administradon de la kataluna industrio.»[139]

La kataluna regula armeo estis kreita de dekreto la 6-an de Decembro kaj la 18-an enpotenciĝis nova kataluna Registaro de kiu estis ekskluzivita LPMU.

Tamen samkiel okazis en la ekonomia kaj politika kampo, la rezisto de la «bazo» al la militistigo de la volontarmeoj en Katalunujo kaj Aragono estis aparte intensa. NKL-IAF estis devigita mobilizi sian «pezan artilerion», la prestiĝon de siaj «naturaj» gvidantoj, ĉiajn premojn, por ke ĝiaj trupoj akceptu ĝuste la malon de tio, kion oni defendadis en ankoraŭ tre freŝa estinteco.

Mariano Vázquez, nacia sekretario de NKL, respondis al la revuo «*Nosotros*», organo de la Kolono de Fero, tion jenan:

> «*Nosotros*: Ĉu malaperos niaj kolonoj? M. Vázquez: Jes, ili devas malaperi. Necesas, ke ili malaperu. Kiam ni estis nomumitaj por la nacia Komitato, oni jam estis farinta antaŭaranĝojn por ke niaj kolonoj, kiel ĉiuj aliaj, transformiĝu en brigadojn -la nomo ne havas gravecon- provizante ilin je ĉio bezona por ke

139T. CATTELL, David: *I Communisti nella Milito civile spagnola* [itale, La komunistoj en la hispana enlanda milito], *Feltrinelli*, Milano, 1962 (traduko de la libro eldonita de *University of California Press*), paĝo 140.

lia laboro efiku. Sed, se oni studas ĝin, ĉi tiu transformado ne signifas fundamentan ŝanĝon, ĉar en la brigadoj la komandon efektivigos la samaj viroj, kiuj ĝin faris en la kolonoj. Sekve oni povas diri, ke la kamaradoj, kiuj sentas korinklinon por la respondeculoj de la operacioj, povas certi, ke oni al ili kaprice ne trudos virojn, kies ideologio kaj persona sinteno ne al ili konvenos. Krome la politikaj komisaroj, kiuj estas la veraj estroj -endas havi ne timon al la vortoj- de la brigadoj, estos enoficigitaj de NKL, antaŭ kiu ili devos ĉiam respondi kvankam ili estas devigitaj fari preparan kurson en la Militista Lernejo kreita ĉi-cele.»[140]

Pro la rezisto de la anarĥiistaj volontarmeanoj, oni realigis militistigon laŭ «du vicoj»: por ke la projekto estu akceptita, oni klopodis por garantii certan kontinuecon; la kolonoj iĝos brigadoj, sed ili estos konsistigitaj de la samaj elementoj kaj komanditaj de la samaj viroj. Ĉi tio havis la avantaĝon, ili diris, garantii la pagojn kaj la armilojn, sed ankaŭ pli grandan disciplinon, kiu estis bezona, kaj pli grandan efikecon. Post kiam ili akceptis ĉi tion, la aŭtonomeco de la kolonoj, jam iĝintaj brigadoj, iom post iom malpliiĝis, ĉar ili estis ĉiam pli submetitaj al la ordonoj de la Stabo de la nova armeo kaj kunfanditaj en la famaj «mikskonsistaj brigadoj». La «superregado» de la anarĥiistoj super la militfronto de Aragono, ekzemple, estis likvidita en Aŭgusto 1937 (vidu la lastan ĉapitron).
Sed momente la plano de militistigo de la volontarmeoj, kiu ŝajne estis decidita pro petoj faritaj de la sovetiaj «konsilantoj» kaj, kiu antaŭvidis, ke la liberecanaj kolonoj estis dissolviĝontaj en la mikskonsistajn brigadojn, komanditajn de fidelaj oficiroj, nome kontraŭrevoluciaj, nomumitaj de la Ministrejo pri la Milito, ne povis aplikiĝi per

140«*Nosotros*» (11-an de Februaro 1937).

unu sola fojo. Tiu periodo de ripozo, de transiro, eblis danke al Largo Caballero, kiu maltrankviligita de la regado de la hispanaj kaj rusaj stalinistoj super la nova militista aparato - kaj konstatante, ke eĉ liaj pli fidelaj partianoj de la Socialista Partio iĝis partianoj de KPH- serĉis nun politikan kontraŭpezon ĉe NKL-IAF. Tiel do li intertraktis kun la gvidantoj de NKL-IAF kompromison per kiu la anarĥiistaj brigadoj daŭre estos homogenaj samtempe, kiel li al ili lasis la direktadon de la militistaj operacioj en Aragono. B. Bolloten ĉi-rilate skribis:

> «La tiel starigitaj novaj rilatoj inter Caballero kaj ties malnovaj kontraŭuloj de NKL-IAF[141] estis grava faktoro por lia ŝanĝo al politiko de repacigo kun la liberecanoj. Ĉi tio specife lin neebligis, kaj malgraŭ la konstanta premo de la stalinistoj, postuli la tutan militistigon de la anarĥiistaj volontarmeoj surbaze de mikskonsistaj brigadoj, kiel paŝo al la kreo de regula armeo, armeo, kiun la anarĥiistoj, kiel li tre bone sciis, konsideros kiel sakrilegion.»[142]

Ni cetere rimarkigu, ke la sakrilegio jam nur estis tia por la okuloj de la volontarmeanoj mem, ĉar iliaj malnovaj gvidantoj tute ŝanĝis sian opinion ĉi-rilate. García Oliver al kiu, danke al la nova sinteno de Largo Caballero, la Supera Konsilantaro pri la Milito koncedis la organizon kaj direktadon de unu el la Militistaj Lernejoj (samtempe, kiel li konservis sian postenon de Ministro pri Justeco, ĉar la

141Largo Caballero estis la prezidanto de ĜUL, la sindikato de socialisma tendenco, rivalo de NKL. Estis multaj kvereloj inter ambaŭ sindikatoj kaj ties respektivaj gvidantoj. Krome la anarĥiistoj estis perforte malamikaj al la registara partopreno de Largo Caballero dum la diktatoreco de Primo de Rivera, kiun li uzis por klopodi por fortigi ĜUL-on malutile al NKL, kiu tiam estis preskaŭ en la kaŝiteco. Poste li estis ministro pri Laboro en la respublikana Registaro de Azaña. Ĉi tiu reformisto, partiano de la registara kunlaborado de la socialistoj kun la burĝaj partioj, subite iĝis «revoluciulo» de post la jaro 1934 kaj lokiĝis cekape de la maldekstra tendenco de la Socialista Partio.

142Bolloten, citita verko, paĝo 259.

amasigo de postenoj jam ne timigis niajn «naturajn» gvidantojn, kiuj antaŭ nelonge malestimis postenojn kaj honorojn), García Oliver do deklaris, alparolante la lernantoj-oficirojn:

> «Vi, oficiroj de la Popola Armeo, devas observi ferdisciplinon kaj altrudi ĝin al viaj viroj, kiuj, iam enarmeigitaj, devas ĉesi esti viaj kamaradoj por iĝi dentaĵoj de la militista maŝino de nia armeo.»[143]

Ĉar estis tute klare, ke kvankam la anarĥiistaj gvidantoj volis konservi «siajn» kolonojn, ankaŭ volis efektivigi ilian tutan militistigon. Eĉ la «estroj» estigitaj de la lukto kontraŭ la faŝistoj estis nun devigitaj respekti la rigoran militistan ortodoksecon. Tiel Cipriano Mera, anarĥiista masonisto, kiu poste estos generalo kaj, de 1937, komandos korpuson de la armeo, faris al la ĵurnalisto de «*Solidaridad Obrera*» la sekvajn deklarojn:

> «Mi estas konvinkita, ke la invado de italoj kaj germanoj donas novan aspekton al la lukto, kiun ni subtenas. Jam ne eblas sin defendi kiel en enlanda milito kontraŭ ribelantaj militistoj. Ni devas fari la militon tiel, kiel ĝin al ni prezentas regula armeo provizita de ĉiuj modernaj batalrimedoj. Kaj tiu vojo ne estas alia ol forlasi ĉiun diferencon inter kiuj luktas. Ĉe mi, mi nur volas luktantojn. En mia Divizio, mi ne scias kiu estas de ĜUL aŭ de NKL, de respublikana aŭ de marksisma partio. Altrudiĝas, kaj mi de nun devas postuli ĝin, ferdisciplino, disciplino, kiu havos la valoron de tio, kion oni propra-vole oferas. Ekde hodiaŭ mi nur interparolos kun la kapitanoj kaj serĝentoj.»[144]

---

143«*L'Espagne Nouvelle*», n-roj 14-15 (31-an de Julio 1937).
144«*Solidaridad Obrera*» (23-an de Marto 1937).

Tamen, malgraŭ ĉiuj tiuj «malfacilaĵoj» kaj ĉiuj premoj (salajroj, armilaroj ktp.), la anarĥiistaj volontarmeanoj daŭre kontraŭstaris intensan reziston al tiu etcerba militismo.

> «Kiam la superaj komitatoj de NKL-IAF elektis la ĝeneralan militistigon de la volontarmeoj, al kio disde la Registaro la ministroj de NKL ilin urĝis, okazis grava konfuzo en ĉiuj militfrontoj, en kiuj partoprenis la konfederaciaj luktantoj. Okazis tumultaj kunvenoj inter la luktantoj kaj la komitataj delegitaroj, kiuj iris ĉe la militfronto kun la supozenda malfacila komisio. Multaj necedemaj volontarmeanoj, kiuj aliĝis al la militfronto, kiel volontuloj, nuligis sian devontigon kaj revenis en la postmilitfronton.»[145]

Elinter tiuj «tumultaj kunvenoj», mi elektis fragmenton de la resumita informo de tiu de la 9-a de Marto 1937, en kiu volontarmeanoj, inter kiuj estis multaj eksterlandanoj (ne ĉiuj eksterlandaj luktantoj estis komunistaj!) diskutis pri la militistigo kun kelkaj gvidantoj de NKL-IAF:
«Georges BOUGARD (volontarmeano) deklaras, ke li prenas la parolon ne kiel delegito, sed en sia propra nomo. Li asertas, ke necesas havi iun disciplinon, ĉar la armeo staranta antaŭ ni estas bonege organizita. La militistigo nur estas bone organizita memdisciplino... Ni troviĝas antaŭ la dilemo: militistigo aŭ tuta malapero de la volontarmeoj...
LOVI (volontarmeano) deklaras, ke endas ne limiĝi al la afero milito, ankaŭ endus iom okupi sin pri la afero Revolucio... Estas du kapitalismoj, kiuj klopodas por neniigi ĉiun revolucian movadon: la interna kapitalismo, kiu estas reprezentita de la kataluna Registaro, kaj la ekstera kapitalismo reprezentita de Blum, Francujo, Anglujo, Usono ktp. Por ni, NKL ne nur estas la direktantoj, la "gvidantoj", ni havas fidon pri la opinio de NKL. La profesio de oficiro ĉiam estis por ni malhonoro. Kaj se mankas militistaj teknikistoj,

145Peirats, citita verko, 2ª volumo, paĝo 25.

necesas, ke ili estu estritaj de politikaj delegitoj de la sindikatoj. Sed ŝajnas, ke oni jam volas apartigi la sindikatojn, kiel okazis en Rusujo. Ili volas detrui la Revolucion kaj, kiel ili ne povas fari tion, faras tion eblan por sufoki ĝin...

Raoul TAROU (volontarmeano) asertas, ke li ne parolos kiel kontraŭfaŝisto, sed nur kiel anarĥiisto. Li kategorie kontraŭstaras ajnan militistan aŭtoritaton. "En *Gelsa*, li diras, de post du monatoj oni al ni donis ultimaton. Tamen ni nur volas teknikajn delegitojn, sen eksteraj signoj de respekto, sen ekzercoj, sen laŭtakta marŝo ktp. Se nia propono konsistigi liberan korpuson ne estas akceptita kaj se ne estas maniero interkompreniĝi, mi estas decidita reveni en Francujon."

Moneck KRSECH (volontarmeano): En ĉi tiu momento ne temas pri la Revolucio ĉe la barikadoj. La hispana popolo ne povas kaj ne devas daŭre ludi kun la heroeco. Ĉi tiu estas reala milito kaj endas venki ĝin kiel ajn. Ili volas ludi kun la teorioj kaj la spirito de la anarĥiistoj por povi senarmigi ilin. Nia militistigo ne konsistas fari militistajn paradojn, kaj ankaŭ ne konsistas militiste saluti. Kion ni bezonas estas bona komando en la militfronto. Ne plu vidi tiel mirindajn aferojn, kiel kiam nia artilerio pafas sur nian propran infanterion! Ni krome havas oficirojn, kiuj estas veraj kamaradoj en la kolonoj Durruti kaj Ascaso. Ankaŭ ne estas motivo por ludi kun la vorto militistigo (...)

Domingo ASCASO (Divizio Ascaso): Ni, la hispanaj anarĥiistoj ne estas malpli sentemaj ol niaj francaj kamaradoj. Ni estas antaŭ tute militistigita malamiko. La kamarado Ascaso deklaras, ke la volontarmeoj ne estis organizitaj por la Arto de la milito (se oni tion povas nomi «arto»). Por anarĥiisto estas tre malagrable akcepti ĉion ĉi kaj, tamen ni kreis militistajn lernejojn por konservi la komandon de la volontarmeoj. La hispanaj anarĥiistoj rekonis, ke ni bezonis disciplinon, respondecon.

Koncerne la teknikistojn (militistajn konsilantojn, [C.S.-M.]), ni elektos la 75 procenton kaj la Registaro de Valencio la 25 procenton kaj ili estos aŭtentike militistaj teknikistoj. Ni venis en aparte krizan situacion. Kelkfoje la malamiko antaŭeniris kiel ĝi volis... Ni akceptis postenojn kaj ministrejojn, sed ni nur akceptas la militistigon kondiĉe ke ni mem povu elekti tiun 75 procenton. Ni devas akcepti ĉi tion por batali; ni krome havos armeon por ni. Ne forgesu, ke vi rajtos "forpeli" viajn leŭtenantojn, kiam vi volas. La momento estas tre kriza. La hispanaj kamaradoj akceptis tion kaj nun ne povas decidi alion. Vi devas kompreni, ke ni estas tiel anarĥiistaj, kiel vi.
Sacha PIETRA: "Mi ne estas volontarmeano, sed mi estis en Rusujo, kie mi travivis la Revolucion kaj, kie mi povis observi la manieron per kiu ili liberigis sin de la anarĥiistoj." Resuminte la makhnovistan movadon, ĉi tiu kamarado memorigas, ke li antaŭ ok monatoj estas en Hispanujo kaj substrekas, ke dum ni havas armilojn la "Revolucio sekvos tie". Ĉi tie ĉiam temas pri la Revolucio, kiu estas la vera vivo. Kio gravas estas la spirito, kiu animas la aferojn. Ni ne estas venkitaj. Ĉi tie oni riskas la kaŭzon de la tutmonda Revolucio. Mi kredas, ke iuj kamaradoj tro facile kritikas. Kio gravas antaŭ ĉio estas garantii la anarĥiisman spiriton. Ankaŭ endas trovi la rimedojn kaj la fortojn.
A. SOUCHY: Kelkaj kamaradoj akceptis la militistigon kaj la disciplinon ĉiakoste. Nia militismo havas nenian rilaton al tiu de la faŝismaj landoj. Ni havis provon de faŝisma ŝtatrenverso kaj la rezultanta revolucio transformiĝis en militon. Sed, se ni volis la revolucion, se ni akceptis ĝin, endas akcepti ĝin kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj. Revolucia forto leviĝis kontraŭ la faŝismo. Militista forto leviĝas kontraŭ ni kaj kontraŭ tiu militista forto ni devas starigi alian forton ankaŭ militistan. Ni bezonas iom pli da disciplino, iom pli da ordo...

BLUMENTHAL (volontarmeano)... Ili klopodas por misorienti nin per la koncepto de "unue venki la militon". En Barcelono mi vidis vere naŭzajn aferojn. Eĉ galonojn kaj stelojn! Ne estas tiel, kiel ni venkos. Kiel anarĥiisto, kiu mi estas, mi ne nur rifuzas iĝi soldato, sed mi ankaŭ ne volas esti lakeo de la kapitalismo.
MAKSIMO (volontarmeano): "Mi ankaŭ estas same kontraŭmilitisma, sed mi petas al la kamaradoj, ke ili iom pripensu kiel ĝin faras mi: nia lukto ne estas nur interhispana lukto, estas internacia lukto. Se ni restas en singarda stato, okazos nenio. La tago, kiam ni ĉesos havi fidon pri niaj kapitanoj, pri niaj leŭtenantoj, ni petegos ilin ke ili eksiĝu. Nia militismo havas nenian rilaton al tiu de la burĝoj. (...)"
FORTIN tiam prenis la parolon. Mi konsideras, ke ni iom malproksimiĝas de la afero. Ne temas pri diskutado -tio nin portus tro malproksime- por scii se la militistigo estas bona aŭ malbona: la militistigo ekzistas, jam estas fakto. Ĉi tiu kunveno estis organizita por scii tion, kio okazos al la kamaradoj, kiuj ĵus revenis de la militfronto kaj, kiuj logike estas tre konfuzitaj. Laŭ li, endas klasifiki tiujn kamaradojn laŭ tri kategorioj: 1) Tiuj, kiuj malakceptas ĉian militistigon kaj nur devas reveni en siajn respektivajn landojn. 2) Tiuj, kiuj estas dizertintoj aŭ fuĝintoj aŭ estas kondamnitaj al malliberejo en sia lando. Evidente ili ne estos redonitaj al la aŭtoritatoj. NKL-IAF al ili serĉos iun laboron en la postmilitfronto. 3) Laste tiuj, kiuj volas batali: ĉu ili akceptos la militistigon kaj ties konsekvencojn, ĉu ili klopodos por starigi "liberan korpuson", se tio eblus.
Ĉi tiun demandon Domingo ASCASO, kiu defendas la sintenon de la direktantaro de NKL-IAF (kaj kiu estas akompanata de Joaquín Cortés de la Regiona Komitato de NKL) tiel respondas, finante la diskutadon: "Tio estus peti al vi neeblaĵon. La hispanaj anarĥiistoj ne faris, la 19-an de Julio, realan revolucion; unufoje estis kontraŭrevolucio tio,

kion ni faris ribelante kontraŭ la ribelintaj faŝistoj (laŭtekste!). NKL kaj IAF komencis akceptante postenojn de respondeco kaj eĉ akceptis la militistigon. Tio ne neebligas, ke ni nin konsideras tiel anarĥiistaj, kiel ĉiu el vi (...) Tiuj, kiuj ne volas plu lukti, retiriĝos, sed la aliaj devos akcepti la militistigon. Sekve ni ne povas akcepti la kreon de iu libera korpuso".»[146]

Malgraŭ la mallerto de la transskribo, ĉi tiu diskutado tre bone montras la konfuzon kaj la koleron de la volontarmeanoj, al kiuj oni altrudis la militistigon (konfuzo kaj kolero, kiuj faris, ke iuj dizertis antaŭ ol iĝi militistoj) tiel, kiel ĝi ankaŭ montras la aŭtoritateman jezuitismon de la gvidantoj.

Inter la anarĥiistaj grupoj, kiuj rezistis dum pli da tempo la militistigon, ni ree renkontas la faman Kolonon de Fero. Ĉi tiu «necedema» kolono longe kontraŭstaris la novan centralizan kaj aŭtoritateman politikon de la gvidantaj rondoj de NKL-IAF. Pro tio ĝi estis la celo de intensa kampanjo de malprestiĝo. Unu el la plej uzataj pretekstoj dum ĉi tiu kampanjo estis, ke la anarĥiistaj aktivuloj, kiuj ĝin fondis en Valencio, malfermis la malliberejojn de la urbo, liberigante tiel la politikajn malliberulojn, kiel tiujn de komuna juro. Iuj el ĉi tiuj lastaj aliĝis kiel voluntuloj al la Kolono de Fero, kiu luktadis dum ĉiu tiu periodo en la militfronto de Teruelo. La ĉeesto de jurkomunaj eksmalliberuloj en la sino de la kolono nepre devis skandali ĉiujn partianojn de la burĝa ordo. Tamen la fakto permesi, ke poŝŝtelistoj, kvartalaj friponoj, kaj tiel plu iĝas revoluciaj luktantoj, ĉu ne estas maniero kiel kiu ajn alia «ŝanĝi la vivon»?

La 1-an de Oktobro 1936 la Kolono de Fero revenis de la militfronto en Valencion por provizi sin per armiloj kaj municioj –je kiuj ili malabundis, kiel preskaŭ ĉiuj volontarmeoj-, senarmigis la tiuurbajn korpusojn de polico,

146Suplemento (en la franca) de la «Bulteno de Informo NKL-IAF» (19-an de Junio 1937).

tiel realigante, sed laŭ revolucia senco, la demagogan frapfrazon de la stalinistoj: «Ĉiuj armiloj por la militfronto!». Santillán rakontas, ke ĉi tiu kolono, kiel respondo al la bojkoto de la centra Registaro, ellaboris projekton por prirabi la Bankon de Hispanujo, sed la gvidantoj de NKL-IAF kontraŭstaris ĝin. Ĉi tiu ago kompreneble provokintus grandegan skandalon kaj ankaŭ la indignon de la konservativuloj, sed ĝi sendube farintus malsukcesi la sabotadon per mono kaj materialo efektivigitan de la centra Registaro sur la volontarmeoj kaj la kolektivigoj. Ĉiel oni povintus intertrakti redonon de la oro kaj la mono kontraŭ pli justa disdono de la helpo (iel ajn la plej granda parto de tiu oro estis enŝipigita cele al USSR la 25-an de tiu sama monato de Oktobro).
Fine la burĝa ŝtato kaj la partioj ĝin subtenantaj -kaj ankaŭ la direktantaro de NKL-IAF- finos tiel la revoluciulojn de la Kolono de Fero, kiel tiujn de la aliaj kolonoj de volontarmeanoj. En Marto 1937, la Komitato pri Milito de la kolono deklaris:

> «Ni scias la malfacilaĵojn, kiuj havas la militistigon. Tiu sistemo ne akordas kun nia temperamento kaj ankaŭ ne kun tiu de ĉiuj, kiuj ĉiam havis bonan koncepton pri la libereco. Sed ankaŭ ni scias la malfacilaĵojn, kiujn ni havos se ni restas ekstere de la orbito de la Ministrejo pri la Milito. Estas malĝoje rekoni ĝin sed nur al ni restas du eliroj: malfondo de la kolono aŭ militistiĝo.»[147]

La 21-an de Marto 1937, dum ĝenerala asembleo de ĝiaj membroj, la Kolono de Fero akceptis militistiĝi kaj iĝis la 83-a Brigado de la regula armeo. Estis la lasta kolono de volontarmeanoj, kiu cedis antaŭ la kaptilo de la militismo.

147«*Nosotros*» (16-an de Marto 1937).

**ĈU MILITO AŬ REVOLUCIO?**

El ĉiu tiu senordaĵaro, el ĉiu tiu konfuzo, elstariĝas kelkaj trajtoj pri kiuj endas paroli, pro la implikaĵoj, kiujn la milito kaj la teorioj pri kiel ĝi devis esti direktata kaj pri kiu estis ĝia rolo, havis pri kio ĉi tie nin interesas, tio estas, pri la socia revolucio en Katalunujo.

La unua elstaraĵo estas la kreskanta rolo de la hispanaj kaj rusaj stalinistoj pri kiu mi nur donis kelkajn ekzemplojn: kompreneble la komunistoj estis partianoj, de la unua momento, de disciplina armeo de klasika tipo, kio respondis al ilia ideologio kaj ilia aŭtoritatema, centraliza kaj hierarĥia agado. Ĉu ne estis ĉio tio la sovetia Armeo, kies ekzemplon ĉiam ili prezentis kiel konstantan punkton de referenco? Kaj ĉu ili ne venkis danke al ĝi? Sed krom tiu principo de ĝenerala ordo, valida por ajna epoko, latitudo kaj situacio, oni defendis kaj starigis tradician armeon, ĉar ĝi perfekte respondis al la politika situacio de Hispanujo tiel, kiel ĝin komprenis la stalinistoj. Respublika, laŭleĝa kaj demokratia ŝtato defendis sin per sia armeo, sia polico ktp, kontraŭ faŝisma ribelo. Sekve necesis, ke la bildo -kaj la realo- de laboristaj bandoj farantaj la revolucion -la anarĥio!- transformiĝis en disciplinan armeon, kiu laŭtakte marŝas malantaŭ siaj ornamitaj oficiroj kaj eĉ luktas kontraŭ tiuj samaj «armitaj bandoj» por la respublika leĝeco. Ĉio tio rezultis perfekte logika kaj la persistemo de la komunistoj sur tiu vojo al ili altiris, kiel ni vidis, sennombrajn simpatiojn inter ĉiaj «etburĝoj».

Ilia militisma sinteno -kaj sendube tiu ne estas la malpli grava aspekto - ankaŭ estis bonega politika manovro, kiu al ili permesis okupi ŝlosilajn postenojn en la aparato de la ŝtato -ĉefe en la militista kaj polica-, postenoj, kiujn eble ili ne atingintus sen ĉio tio. Ĉi tiu sinteno estis ege faciligita de la ĉantaĝo de la rusaj armiloj, de ilia gvidita distribuo tiel, kiel de la rolo de la rusaj konsilantoj, militistoj, diplomatoj kaj aliaj, kiuj reĝis kiel vicreĝoj, donante ordonojn al la

Registaroj, al la Staboj ktp. Antaŭ ol transdoni armilojn al la leĝa Registaro de Katalunujo ili postulis, ke estu forpelita la ministro de LPMU –kion ĝi faris- eĉ pli, ili rekte kaj aktive partoprenis en la faligo de la Registaro Largo Caballero kaj en ties anstataŭigo per Negrín (kiu sendube estis ilia fidindulo pli ol la aliancano de la hispana KP). Oni povus plenigi paĝojn kaj paĝojn per ĉi-tipaj ekzemploj; mi ree parolos pri tio, kiam mi devas ekzameni la elĉeniĝon de la kontraŭrevolucia subpremo post la 1937-aj majaj okazintaĵoj.

La sovetiaj militistaj konsilantoj kun la aŭreolo de sia duobla prestiĝo de «teknikistoj» kaj «revoluciuloj» kompreneble iĝis unu el la fundamentaj aksoj de la starigo de la nova armeo.

Sed la hispanaj komunistoj -konsilitaj de la sovetianoj- ne estis la solaj partianoj de armeo de tradicia strukturo. Ĉiuj konsentis pri tio escepte de ampleksaj sektoroj de la anarĥiista «bazo». Pro la minaco ĉiufoje pli granda de la frankista armeo kaj de la italaj kaj germanaj trupoj de interveno, al neniu venis en la kapon la ideo proponi entutan strategion, kiu ne estis tiu de la identigo kun la malamiko, nome, kiu ne estis la kreo de ankoraŭ pli disciplina armeo, pli efika, pli «prusa» ol tiu de la malamiko. Evidente nur povis esti kaj nur estis fiasko.

Escepte de ĉi tiu interkonsento bazita sur la nekapablo novigi, la diferencoj aŭ nuancoj pri la problemoj de la milito kaj la revolucio kaj pri la rilatoj inter unu kaj alia estis multnombraj. Se oni flanklasas la respublikanojn kaj la socialistojn de dekstro, kiuj ne parolis pri revolucio, sed nur pri demokratio, la «revoluciuloj» dividis sin en du tendencoj: tiuj, kies sinteno povas resumi sin per frazo: «Unue venki la militon» kaj tiuj subtenantaj, ke milito kaj revolucio estis intime ligitaj. «Unue venki la militon» estis la granda frapfrazo de la stalinistoj, kiu perfekte akordis kun la aro de ilia strategio «demokratia» kaj «kontraŭfaŝisma», strategio, kiu siavice pretendis lokiĝi en la kadro de la «granda

tutmonda lukto kontraŭ la faŝismo». Sed ĉi tiu taktiko, kiun ili ĝisekstreme uzis–konforme al ilia kutimo- kaj, kiu samkiel en aliaj tempoj kaj latitudoj, faris el ili la grandan partion de la ordo, al ili ne neebligis, pli ĝuste male, konsiderinde estri la aparaton de ŝtato, kio por ili signifis esti en la antaŭĉambro de la potenco. El la propaganda vidpunkto, KPH prezentis sian ĝeneralan agmanieron: «Unue venki la militon» per malsamaj nuancoj laŭ la publiko, kiun ĝi alparolis. Antaŭ la eksterlandanoj kaj la moderaj respublikanaj fortoj, la reĝimo, kiu estiĝus el respublikana venko, devus esti «demokratie balotita de la hispana popolo». Antaŭ la pli radikalaj fortoj, kiuj aŭ pretendis aŭ volis esti pli revoluciaj, ili prezentis la venkon kontraŭ la faŝismo, kiel unuan paŝon, la nepran fazon, al la socialisma revolucio. Kun kelkaj nuancoj ĉi tiu sinteno ege estis kundividita ekster la vicoj de la hispana KP. Ne nur la socialistoj de maldekstro aliĝis al ĝi, sed ankaŭ la plej grava sektoro de la gvidaj rondoj de NKL-IAF, kiuj kredis, ke oni povis prokrasti la socian revolucion ĝis «post la venko super la faŝismo».

LPMU estis partiano de tradicia armeo, sed ĝi samtempe subtenis, ke milito kaj revolucio estis intime ligitaj. En projekto de «politika Tezo» redaktita por la Kongreso de LPMU fiksita por la 19-a de Junio 1937 kaj, kiu estis neebligita de la subpremo, Andrés Nin deklaris:

> «La formulo “unue venki la militon, poste oni faros la revolucion” estas fundamente falsa. En la lukto nuntempe disvolviĝanta en Hispanujo, milito kaj revolucio estas ne nur du nedisigeblaj vortoj, sed sinonimaj. La enlanda milito, pli aŭ malpli longigita stato de la rekta konflikto inter du aŭ pli da klasoj de la socio, estas unu el la elmontroj, la plej akra, de unuflanke la lukto inter la proletaro, kaj aliflanke la granda burĝaro kaj la bienuloj, kiuj, timigitaj de la

> revolucia progreso de la proletaro, klopodas por starigi reĝimon de sangavida diktatoreco, kiu solidigos iliajn klasprivilegiojn. La lukto en la batalfrontoj ne estas pli ol daŭrigo de la lukto en la postmilitfronto. La milito estas formo de la politiko (...) Temas pri scii ĉu la laboristoj kaj la kamparanoj de la militfrontoj luktas por la burĝa ordo aŭ por socialisma socio. Milito kaj revolucio estas tiel nedisigeblaj en la nuntempa momento en Hispanujo, kiel estis en Francujo en la 18-a jarcento kaj en Rusujo en 1917-1920. Kiel ni povas disigi la militon de la revolucio, kiam la milito ne estas pli ol la perforta apogeo de la revolucia proceso disvolviĝanta nialande de post la jaro 1930 (...)? Kaj la garantio de rapida kaj certa venko en la militfrontoj baziĝas sur revolucia firma politiko en la postmilitfronto, kapabla inspiri al la luktantoj la neprajn kuraĝon kaj fidon por la lukto, kapabla ankaŭ instigi la revolucian solidarecon de la internacia proletaro, la sola kun kiu ni povas kalkuli, krei solidan militindustrion, restarigi sur socialismaj bazoj la ekonomion renversitan pro la enlanda milito, forĝi efikan armeon je la servo de la proleta kaŭzo, kiu estas tiu de la civilizita homaro. La instrumento de ĉi tiu revolucia politiko nur povas esti laborista kaj kamparana Registaro.»[148]

Kvankam LPMU pravis insistante (parafrazante Clausewitz-on, ne citante lin) pri la nedisigebla karaktero de la milito kaj la revolucio, almenaŭ por la pretende revoluciaj fortoj, kontraŭe antaŭ ĉi tiu problemo -kiel antaŭ multaj aliaj- ĝi ne povis senigi sin je la leninisma fetiĉismo. Tiel, samkiel ĝia deziro pri laborista kaj kamparana Registaro (kio rigore volis

148Nin, Andrés: «*La Situación política y las tareas del proletariado*» [hispane, La politika situacio kaj la taskoj de la proletaro], en *Los problemas de la Revolución española* [hispane, La problemoj de la hispana Revolucio], Eldonejo *Ruedo Ibérico*, Parizo, 1971, paĝo 220-221.

signifi nenion krom nostalgia referenco) al ĝi neebligis konsekvence lukti kontraŭ la restarigo de la burokrata-burĝa ŝtato, kiu ĝin eksterleĝigos por komplezi la rusojn, ĝia subteno por disciplina kaj efika armeo, tipo Ruĝa Armeo, tro malfrue komprenigos al ĝi, ke per la reala militistigo KPH solidigis sian influon sur la respublikajn armitajn fortojn.
Camillo Berneri pravis, kiam li kritikis ĝiajn rigore militismajn konceptojn (kiuj estis akompanitaj de klopodo por reakiri la bolŝevikan imagaron, rivalan de tiu de la stalinistoj):

> «La militistan formalismon ni ankaŭ konstatas, ekzemple, en kelkaj kolonoj estritaj de LPMU. Kiam ili asertas, kiel estas enskribita en la normaro de la kolono Urubarri (unu el la kvar kolonoj de LPMU en la militfronto de Aragono [C.S.-M.]), ke "la soldado scipovanta saluti, estas la soldato scipovanta batali", faras la saman stultecon, kiu estis ripetita de Petro la 1-a ĝis la Reĝo Serĝento*.»[149]

Ĉi tiu itala anarĥiisto estas unu el la malmultaj, laŭ mia scio, kiu klopodis por akordigi en siaj skribaĵoj kaj agoj, la «bezonojn de la milito» kun la spirito de la volontarmeoj. Ne limigante sin al simpla mencio de la «eternaj» principoj de la anarĥiismo kaj ankaŭ ne falante en la kaptilon de la superreganta militismo, Berneri proponis specon de sintezo, kiel pruvas la sekva fragmento de la intervjuo pli supre citita:

> «Mi malhavas specialan kompetentecon pri militista tekniko, sed al vi povas komuniki la impresojn, kiujn kolektis ĉe la militfronto de Osko, militfronto, kiu de mi estas tre konata, ĉar ĉe ĝi mi sinsekve plenumis la

*NeT: Frederiko Vilhelmo la 1-a, reĝo en Prusujo.
149Intervjuo koncedita al «*Spain and the World*», reproduktita en la franca en «*L´Espagne Nouvelle*» (Februaro 1937), kaj nun, en la hispana, en la libro *Guerra de clases en España 1936-1937* [hispane, Klasmilito en Hispanujo 1936-1937], de Camillo Berneri, Kolekto «*Acracia*» n-ro 20, *Tusquets Editores*, Barcelono, 1977.

funkciojn de simpla volontarmeano, politika delegito de la “itala sekcio” de la Kolono Ascaso kaj nun delegito de la Konsilantaro pri Defendo. Mi havas la impreson, ke la volontarmeo faris grandajn progresojn. Komence oni povis konstati grandan senspertecon en la lukto kontraŭ la modernaj militistaj maŝinoj: ekzemple oni perdis multan tempon pafante kontraŭ aviadilojn flugantajn ĉe granda alteco; oni malŝatis la aŭtomatajn armilojn favore al la armiloj, kies uzado estis konata al la kamaradoj. Oni ne priatentis la problemon de la komunikoj; mankis municioj, la unuiĝo inter la diversaj korpusoj kaj unuoj estis mankohava kaj kelkfoje tute ne ekzistanta.

»Nuntempe la volontarmeanoj eltiris profiton el la lecionoj de ĉi tiuj lastaj dek monatoj, oni komencas raciigi la transportojn, ripari la ŝoseojn, la materialo estas pli abunda kaj estas pli bone distribuita kaj en la «spiriton de la kolono» enŝoviĝas la sekva ideo: la neceso de komando de kunordigo.

»Oni kreas diviziojn, kio kompletigos la ekonomian planon de la milito, kies defendantoj estas la plej konataj reprezentantoj de NKL kaj IAF. Fakte ĉi tiuj du organizaĵoj estis la unuaj proponi la unuiĝo de komando, cele efektivigi decidan premon sur la malfortajn lokojn de la malamika frontlinio, malpezigi la premon sur la sieĝitaj urboj kaj malhelpi la malamikajn manovrojn kaj koncentriĝojn.

»– Tiam -diris ni (S.a.t.W.)-, ĉu estas bonaĵoj en la militistigo?

»– Certe -respondas Berneri kun konvinko-, sed endas fari distingon: unuflanke estas la militista formalismo, kiu ne nur estas ridinda, sed ankaŭ netaŭga kaj danĝera, kaj aliflanke la memdisciplino. Ĉi tiu lasta povas esti ekstreme rigora, kiel okazas en la Kolono Durruti (...) Miaflanke mi estas partiano de

> ĝusta mezo: oni devas fali nek en la militistan formalismon nek en la superstiĉan kontraŭmilitismon. Akceptinte kaj realiginte la reformojn postulitajn de la aferstato, ni estos en kondiĉoj rezisti la manovrojn de Madrido kaj Moskvo, kiuj klopodas por starigi, per la preteksto de la militistigo, sian militistan hegemonion super la hispana Revolucio, cele transformi ĝin en instrumenton de sia politika hegemonio.
>
> »Miaflanke mi konsideras eraron paroli, kiel faras kelkaj reprezentantoj de NKL-IAF, pri "supera" aŭ sola komando anstataŭ paroli pri unuiĝo de komando (tio estas, pri ĝenerala kunordigo rilate direktadon de la armita lukto [C.S.-M.]).
>
> »(...) Resume la reformoj, kiujn endus fari en la Volontarmeo, el mia vidpunkto, estas la sekvaj: klara distingo inter la militista komando kaj la politika kontrolo ĉe la kampo de la preparo kaj plenumo de militoperacioj; rigora plenumo de la ordonoj ricevitaj, sed kune kun la tenado de kelkaj fundamentaj rajtoj, kiel ekzemple elekti kaj eksigi la oficirojn.»[150]

Kompreneble se la luktantoj povus elekti kaj eksigi siajn estrojn, ruiniĝus la tuta hierarĥia militista spirito, tial tio neniam okazis. Ĉar, kiel Berneri mem indikis en siaj proponoj por atingi sintezon inter, ni diru, la efikecon kaj la liberecon (sintezo iom nesufiĉa), kio intervenis en la militista afero ne nur estis atingi venki la faŝistajn armeojn, sed ankaŭ detrui la revolucion.

El ĉi tiu vidpunkto, milito kaj revolucio ankaŭ estas nedisigeblaj. La granda operacio de militistigo enhavis en si mem politikan operacion, kiu estis same grava kaj, kiu konsistis fini la «revoluciajn armitajn bandojn», tiujn volontarmeojn, kiuj helpis la kamparanojn organizi liberecanajn komunumojn, kiuj kelkfoje senarmigis la

150Sama verko.

policon por povi armi sin mem kaj, kiuj unuvorte starigis la armitan brakon de liberecana socia revolucio, kiu neniel estis dezirita. Tial tio, kio trudiĝis preskaŭ ĉie, estis ege reakcia armeo, en kiu oni senbride efektivigis la politikan-polican terorismon, super kiu superregis la plej blinda disciplino, en kiu oni sanktigis la malnobligan ritaron de la armeo. Nur en kelkaj anarĥiistaj kolonoj, transformitaj en diviziojn, iom konserviĝis «la spirito de la volontarmeoj». Sed tio dependis ekskluzive de la volo de la komandantoj, iuj el kiuj, kiel Ricardo Sanz,[151] protektis siajn homojn kontraŭ la ekscesoj de tiu militista formalismo pri kiu parolis Berneri. Ĉi tiel oni povas diri, ke la politika parto de la operacio militistigo estis granda sukceso (kio neniel ekskluzivas la konfliktojn inter NKL-IAF kaj komunistoj, ekzemple, en la armeo, kiel en aliaj aferoj, sed ne estas pri tio pri kio mi parolas). Ĉio tio evidente estis esenca parto por restarigi la burĝan-burokratan ŝtaton kaj sekve por ke venku la kontraŭrevolucio.
Sed ĉe la militista kampo, tiu armeo kreita el la «prusa» modelo estis tre malbona armeo, kio ankaŭ al mi ŝajnas logika. Kontraŭ tio, kion subtenas la heroa popola tradicio, la respublikanoj ne malvenkis la enlandan militon nur pro la interveno de la germanaj nazioj kaj la italaj faŝistoj (krom la rezisto de la anarĥiistoj kontraŭ la militistigo). Malgraŭ la supereco de la armilaro de la faŝistoj, la malvenko ne estis neevitebla kaj krome la milito daŭris preskaŭ tri jarojn. La stulteco kaj la kontraŭrevolucia politiko estas, laŭ mia opinio, la esencaj kaŭzoj de tia malvenko.
Stulteco kaj kontraŭrevolucia politiko kunligis sin por kiel ajn konstrui regulan armeon junan, virecan kaj disciplinan -modernan, definitive- laŭ la propagando, sed tre malbonan surloke. Sen bezono dediĉi sin al ĝisfunda analizo pri la militistaj problemoj, oni povas simple indiki, ke:

---

151Almenaŭ laŭ la atesto de José Peirats, kiu «servis sub liaj ordonoj» en la militfronto de Aragono (atesto kolektita dum intervjuo koncedita por ĉi tiu libro).

1) Tiu armeo estis malbona, ĉar ties estroj donis pruvon ĝenerale de absoluta manko de imago, de eltrovemo. La nomita nova Popola Armeo multe similis la malamikon ĝis la ekstremo kopii ties «militarton» kaj akcepti la batalojn sur tereno favora al la kontraŭulo, reprenante laŭ lerneja maniero la principojn de la milito de pozicioj kaj la ofensivoj per «ĉirkaŭfermaj movadoj», kiujn oni studis en la militistaj akademioj de la tuta mondo kaj, por tiu tipo de milito la frankista armeo (tio estas, la 90 procento de la hispana armeo) kaj ties naziaj kaj faŝistaj aliancanoj estis senfine pli bone pretaj, pli bone armitaj kaj krome ties supereco estas historie pruvita.
La «brilaj» militestroj, kantataj de la «maldekstraj» poeziaj antologioj, tiuj Líster, Modesto, Campesino ktp, kaj ties «misteraj» militistaj rusaj konsilantoj fakte montris profunde enradikiĝintan kretenismon ĉe la pure militista kampo, stagnante siajn trupojn en etaj Verdun-oj, kie la supereco de la armilaro (kiu aliflanke ankaŭ ne estis nekontestebla[152]) de la kontraŭulo ĉe la paso de la tempo fatale triumfis. Oni povas atribui al ili neniun gravan militan operacion, en kiuj la surprizo, la moveco, la eltrovemo povintus esti elementoj de sukceso.
2) La kontraŭrevolucia aspekto de la militistigo profunde efikis sur la «moralon de la trupoj», malpliigante, kvankam oni neas tion, ilian ofensivan forton. Efektive por atingi bonajn soldatojn, disciplinitajn, kiuj iĝas robotoj, kiuj lasas sin mortigi sen diskuto, eĉ en militistaj operacioj tute nenormalaj -kiel nin abunde instruas la historioj de la militoj ĝenerale kaj tiu de Hispanujo aparte-, necesas trejnado, samkiel por atingi bonajn ĉevalojn de cirko. Certe en «normala tempo» la tuta socio partoprenas en la trejnado, de la familia medio ĝis la fabriko, aŭ la tero, kaj krome la katekismo, la lernejo kaj la militservo -kiu, laŭ la popola

152Tamen pri la armilaro de ambaŭ tendaroj ne estas statistikoj certaj.

lingvaĵo, estas bonega por la junuloj ĝuste ĉar ĝi trejnas ilin. Sed tie ni troviĝas antaŭ laboristoj, kiuj prenis propra-vole la armilojn por detrui la militistan ribelon, konsciaj laboristoj, kiuj partoprenas en socia revolucio kaj kiuj, ĉefe la anarĥiistoj kompreneble, estis profunde kontraŭmilitismaj, samkiel ili estis profunde kontraŭkapitalismaj. La volontuloj de la volontarmeoj estis ĝuste la malo de la soldato-roboto, kaj sekve estis aparte malfacile kaj krome neeble subite transformi ilin en ilian malon. Tiuj viroj ĝuste ribelis kontraŭ la trejnado kaj la ekspluatado de subprema socio, kiun ili malamis kaj kontraŭ kiu komencis ĝismortan lukton. Diri al ili, ke endis rekonstrui la militistan hierarĥiigon de la armeo por venki la militistan hierarĥion de la malamika armeo ŝajnis al ili tiel monstre kvazaŭ oni al ili proponintus, ke ili kreskigus sian propran ekspluatadon de salajruloj por likvidi... la ekspluatadon. Kompreneble pri tio mem temis la afero, sekve ne endas miri pri tio, ke ili rifuzis rekonstrui, nome de oni ne tre bone scias kian efikecon, la hierarĥian socion, kiun ili estis baldaŭ detruonta. Por ili ne ekzistis «bona armeo», kiel ankaŭ ne ekzistis «bona» ekspluatado de la salajrulo. Ili ne rifuzis lukti, sed ili ja neis forlasi tiun porcion de libereco, kiun ili konkeris. Kaj ili pravis. Ilia lukto ne havintus sencon, kiel la postaj okazaĵoj -kaj la ekzemplo de ĉiuj revolucioj konataj ĝis la momento- pruvis.

Enmodiĝis sensence paroli pri la «psikologia milito» ĝenerale pro klopodo por repreni la «psikologion», kiel elementon de «moderna» militista taktiko. Sed ankaŭ ne estas malpli vere, ke tio imaga ne haltas ĉe la pordoj de la kazernoj. Prenante tute kontraŭa ekzemplo, mi simple rimarkigas, ke la formado de la specialaj korpusoj en la klasikaj armeoj (paraŝutsoldatoj, «usona marista infanterio», legianoj ktp) ne estas atingita nur per intensa trejnado, ege moderna kaj taŭga armilaro ktp, ankaŭ estis atingita kaj ĉefe eble pro «spirito de korpuso», pro la ideo aparteni al aparta grupo, al elito supera ne nur al la vulgaraj civiluloj, sed

inkluzive al la ceteraj korpusoj de la armeo. La revo aparteni al tiu speco de supera raso estas unu el la esencaj motoroj de la batalemo de ĉi tiuj specialaj korpusoj (kaj kompreneble tio pruvas la nemezureblan homan stultecon, sed ni ne parolu pri tio...) Demetu tiun revon, rompu tiun fanatikecon de grupo, kaj la batalemo malfortiĝas.
Je la antipodoj de ĉi tiu situacio, militistigu la anarĥiistajn volontarmeanojn kaj ilia batalemo ankaŭ malfortiĝos. Kun la malgranda diferenco, ke la unuaj, la paraŝutsoldatoj kaj ceteraj, tio sola, kion faras, estas mortigi, dum la kolonoj de volontarmeanoj aktive partoprenis en unu el la pli gravaj revoluciaj provoj de la unua duono de la 20-a jarcento.
Ĉio ĉi estas tre bela, diris kaj diros la komunistoj, sed estis milito kaj endis venki ĝin. Ni malvenkis ĝin, sed ni batalis per pli granda efikeco ol la anarĥiistoj, ĝuste danke al tio, ke ni nin organizis militiste pli rapide kaj pli komplete. Kaj ili ĉiam mencias la du samajn ekzemplojn por subteni ĉi tiun tezon: Madrido kaj la militfronto de Aragono. Madrido, kie komenciĝis la militistigo, Madrido, en kies defendo la komunistoj vaste partoprenis, eltenis ĝis la fino, dum la anarĥiistoj, kiuj superregis la militfronton de Aragono, estis nekapablaj preni Zaragozon.
Ĉi tion oni povas anticipe respondi laŭ la sekva maniero: koncerne la militfronton de Aragono, se oni flanklasas la problemon de la armilaro de la volontarmeoj, la anarĥiista «superregado» daŭris ĝis la 1937-a somero. Post la 1937-aj majaj okazintaĵoj kaj danke al la komploto de Prieto kaj la komunistoj (kiel ni vidos poste) la komunistaj trupoj eniris en Aragonon, likvidis la Konsilantaron de Aragono kaj estris la militistan komandon. Kvankam la anarĥiistaj volontarmeoj daŭre estis tre multnombraj en ĉi tiu militfronto, la respondeco de la milito virtuale transiris en la manojn de la komunistoj kaj ties aliancanoj. Tiel do, malgraŭ tio!, Zaragozo ankaŭ ne estis prenita!!! Se ilia ofensivo kontraŭ la «liberecana komunismo» en Aragono havis gravajn

rezultojn (sed pli malgrandaj ol tiuj, kiujn ili atendis), male ilia «ofensivo» kontraŭ la frankistoj havis neniun.
Ni parolu pri Madrido. Veras, ke en la militfronto de Madrido estis kie serioze komenciĝis la militistigo. Ankaŭ veras, ke la komunistoj -kaj ties rusaj konsilantoj- havis tre aktivan partoprenon en la defendo de la urbo. Tio samvaloras diri, ke ili regis la gvidantajn instituciojn, sed neniel estis la ununuraj batalantoj (la pruvo estas, ke dum la «komploto Casado», je la fino de la milito, kiam la komunistoj militiste okupis la urbon kaj prenis la potencon supozeble por kontraŭstari la klopodojn pri intertraktado kun la frankistoj, Cipriano Mera, ĉekape de siaj soldatoj, bezonis nur du tagojn por militiste likvidi ilin.[153])
Sed mi opinias, ke ne estas tie, kie endus serĉi la kialon de la rezisto de Madrido, kiu daŭris ĝis sia fino pro la senordaj bataloj inter komunistoj, unuflanke, kaj anarĥiistoj kaj socialistoj aliflanke, malmultajn tagojn antaŭ la eniro de la frankistaj trupoj en Madridon kaj la militfino. La esenca trajto de la rezisto de Madrido neniel estis ĝia militistigo, sed ĝia popola karaktero. En Madrido sieĝita kaj preskaŭ ĉirkaŭita, okazis fenomeno jam okazinta en aliaj militoj, tiu de kompleta urbo rifuzanta kapitulaci, tiu de kompleta urbo, viroj, virinoj kaj geinfanoj iel tiel partoprenantaj en la rezisto kontraŭ la malamiko. Ĉi tiu popola karaktero de la rezisto estas la esenca trajto de la batalo de Madrido. Krome estis la laboristaj volontarmeoj, la tuta popolo -aŭ preskaŭ-, kiuj unue detruis la ribelajn militistojn kaj, kiuj poste repuŝis la unuajn atakojn de la frankista armeo, kiu volis ĉiakoste kaj de la komenco konkeri la ĉefurbon. La militistigo nur venis post la unuaj venkoj de la «popolo armita».

* * *

153Pri ĉi tiu punkto, vidu la 10-an aneksaĵon

Tamen jam aranĝita la milito, kaj aranĝita kiel volis la malamiko, la volontarmeoj ankaŭ ne sciis disvolvi revolucian militan strategion, kiu permesus ne nur defendi, sed ankaŭ pligrandigi la revoluciajn konkerojn samtempe, ke ili batalis kontraŭ la frankistoj. La «*España antifascista*» pravis kiam ĝi skribis, esprimante la vidpunkton de la liberecanoj «kontraŭmilitismaj»:

> «Ĉiufoje estas pli bezone demandi sin ĉu la militismo de la ribelaj generaloj sukcesos trudi siajn proprajn manierojn de lukto al la hispanaj revoluciuloj aŭ ĉu male niaj kamaradoj sukcesos detrui la militismon kontraŭstarante al ĝi agmetodojn, kiuj fine atingos la likvidon de la militista fronto kaj la etendiĝon de la socia revolucio al la tuta Hispanujo.
>
> La elementoj de sukceso, kiujn disponas la faŝistoj, estas la sekvaj: granda abundo de materialo, severega rigideco en la disciplino, kompleta militista organizo kaj teroro efektivigita sur la loĝantaro per la helpo de la militistaj korpusoj de la faŝismo. Ĉi tiuj elementoj de sukceso estas revalorigitaj de la taktiko de milito de pozicioj, de kontinua militfronto per amasa transporto de fortoj al la lokoj, kiujn oni pretendas aneksi.
>
> La elementoj de sukceso de la popolo estas de tute malsama aspekto: abundo de viroj, pasiaj iniciato kaj agresemo de la individuoj kaj la grupoj, aktiva simpatio de la laboristaj amasoj de la tuta lando, ekonomia armilo de la striko kaj la sabotado en la regionoj okupitaj de la faŝistoj. La kompleta uzo de ĉi tiuj moralaj kaj fizikaj fortoj, en si mem tre superaj al tiu de la kontraŭulo, nur povas realiĝi per ĝeneraligita lukto de neatenditaj atakoj, embuskoj, kaj gerilo etendita al la tuta lando.»[154]

154«*L'Espagne antifasciste*», n-ro 4.

La anonima aŭtoro de ĉi tiuj linioj ŝajnas, ke li perfekte resumis la situacion.
«La etendo al la tuta Hispanujo de la socia revolucio» efektive estis la plej bona strategio, kiun oni povis kontraŭstari al la frankista armeo kaj al ties tradicia kaj kadenca strategio. Kvankam, unuflanke, en la grandaj urboj kaj terkulturaj kaj industriaj regionoj de la «respublika zono» endis organizi popolan defendon en kiu ĉiuj iel tiel partoprenu en la lukto, anstataŭ permesi, ke la milito stagnu en militfronto, aliflanke, endis porti la socian revolucion en la malamikan postmilitfronton, organizi la sabotadon kaj la gerilon, favori la ekribelojn kaj, se tio eblus, la insurekciajn strikojn. Sed por tio kompreneble endis porti pli for kaj etendi sur la tuta «respublikana» teritorio unue, kaj poste sur la frankista teritorio, la socian revolucion. Necesis, ke la laboristoj, submetitaj al la faŝisma diktatoreco, sciu, ke estis en la lando zonoj liberigitaj je la ekspluatado, kie la laboristoj estis mastroj de siaj entreprenoj, de sia laboro kaj de sia vivo. Necesis, ke la eĥoj de la revolucio en la kamparo venu ĝis la andaluzaj regionoj -ekzemple- okupitaj de la faŝistoj ktp. Por efektivigi lukton de ĉi tiu tipo, kiun por simpligi ĝin mi nomas revolucia milito de geriloj (kaj ne endas serĉi historiajn similaĵojn pli ol suspektajn), armeo de tradicia tipo ne nur estis netaŭga, sed kontraŭefika. La socia revolucio devis komenciĝi per la likvido de la armeo kaj de ĉio, kion ĉi tiu havas de reakcia. Evidente endis superi la difektojn de la volontarmeoj, sed ne nur endis konservi, sed ankaŭ kreskigi kaj instigi ilian spiriton de iniciato, ilian aŭdacon, kaj ilian propra-volan alligitecon al la batalo. Ankaŭ endis havigi al ili ofensivan militistan strategion, en kiu la movadoj, la surprizo, la sabotado, la embuskoj ktp, permesintus eviti la kaptilojn de la milito de pozicioj, favora al la malamiko.
Ĉio ĉi evidente postulas la partoprenon de ĉiuj luktantoj en la maniero konduki la militon. Armita forto el gerilanoj -eĉ

provizita per tiel «moderna» armilaro, kiel tiu de la respublikana Armeo- neniel povis kopii sin de la klasikaj armeoj. Malgraŭ la evidentaj limoj trudataj de la milito, la demokratio funkcianta ne nur estas ebla, sed nepra por doni senbridan permeson al la kreemo de la homamasoj. La demokratio, tio estas, unue gvidaj organoj balotitaj kaj eksigeblaj (ne meze de la batalo, memkompreneble!). La revolucia spirito, la konvinko pri tio, ke oni realigas per la armiloj enmane la lukton por la sociaj transformadoj en la tuta socio, konsistigas la «rapidagan forton» de la volontarmeoj, kaj estas ĝuste la malo de la obeo al la hierarĥio kiu, kune kun la malpermeso pensi, estas la bazo de la klasika armeo.
Tamen estas senutile paroli pri kio povintus esti, ĉar tio ne estis, eĉ ne en Aragono, kie -post la unuaj semajnoj- la volontarmeanoj restis stagnitaj en milito de pozicioj antaŭ Osko, Zaragozo kaj Teruelo.
Ĉi tiu revolucia milito nur povis bazi sin sur socia revolucio kiel eble plej radikala kaj etendita. Nu, la komunistoj, multaj socialistoj, la respublikanoj, la anarĥiistaj gvidantoj plejparte, la rusoj, la okcidentaj «demokratiaj» Registaroj (kaj ni ne mencias la faŝistojn!) ne volis socian revolucion, kaj ĉiuj, ĉiu siamaniere, partoprenis en ĝia tuta detruo.
Sekve oni faris armeon. Tiu regula armeo, pro la historiaj, politikaj, materialaj kaj «moralaj» kondiĉoj, nur povis esti malbona armeo. Ĝi akceptis la tipon de milito trudatan de la malamiko kaj estis venkita. Oni malvenkis la militon ĉar oni ne volis fari la Revolucion. Sed kiel la aferoj neniam estas tiel simplaj, la milito daŭris dum du jaroj (1937-1939), ĉar tiu malbona armeo, kiu malgraŭ ĉio konservis ion el la entuziasmo de la volontarmeoj, batalis per granda kuraĝo.

# 6-a ĈAPITRO: LA «1937-aj MAJAJ OKAZINTAĴOJ»

## LA SITUACIO EN KATALUNUJO ANTAŬ LA «MAJAJ OKAZINTAĴOJ»

Post la enpotenciĝo de la Registaro Largo Caballero kaj de tiu de Katalunujo, la Konsilantaro de la kataluna Registaro, en kiu estis reprezentitaj ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj, la restarigo de la ŝtato realigis tre konsiderindajn kaj ĉiam pli akcelitajn progresojn en ĉiuj medioj. La «malluma potenco» de la Komitatoj estis anstataŭita de la «starigitaj institucioj», urbaj Konsilantaroj, guberniestroj, Konsilantaro de la kataluna Registaro, Registaro. En Decembro 1936, ĉiuj policaj fortoj, kiuj estis malfonditaj, estis definitive restarigitaj kelkfoje kun sia malnova nomo (Gvardianoj de Sturmo) kaj aliaj kun nova (la Civilgvardio iĝis Respublika Nacia Gvardio). Juan Negrín, Ministro pri Financoj de la centra Registaro, reorganizis impresan korpuson de karabenistoj*, kiujn poste ni vidos agante. Ĉiuj ĉi fortoj de polico kompreneble estis sub la rektaj ordonoj de la respondaj ministroj. Kaj la stalinistoj procedis samkiel ili agis koncerne la armeon, ĉi-foje por estri la policon. En Barcelono, Rodríguez Sala, membro de USPK, iĝis policestro, kaj Ayguadé, Konsilanto pri Sekureco (ministro pri la Internaj Aferoj). Ĉi tiu lasta, malgraŭ esti membro de RMK, intime kunlaboris kun la stalinistoj kaj kelkaj komentariistoj vidis en li «enŝteliĝintan» membron de USPK.

De finoj 1936, la partianoj de la «respublika ordo» konstatis, ke la situacio estis jam matura por ekataki. Kiel

*NeT: hispana armita institucio, kreita en 1829, kies komisio estis la prigardo de la marbordoj kaj landlimoj, kaj la subpremado de la fiska pagevitado kaj la kontrabando.

dankomontro sendube al la rusaj armiloj, oni prenis la unuajn disponojn pri politika diskriminacio kontraŭ LPMU, tiuj hispanaj «hitlero-trockiistoj». Ni vidis kiel la stalinistoj vetois la partoprenon de ĉi tiu partio en la Estraro pri Defendo de Madrido. «*La Batalla*» protestis kontraŭ ĉi tiu fakto, akuzante Stalinon malinteresi sin pri la sorto de la hispana kaj internacia proletaro kaj nur pensi pri la interesoj de la rusa Regno. Tiu lingvaĵo ne nur estis netolerebla por la stalinistoj, sed ankaŭ por granda nombro de socialistoj, respublikanoj, kaj eĉ por kelkaj anarĥiistaj gvidantoj. Ĉu ne sendadis armilojn USSR? Ĉiam la sama ĉantaĝo, kiu intence ignoris la fakton, ke tiuj armiloj estis pagitaj laŭ prezo de oro. La 28-an de Novembro la ĝenerala Konsulo de USSR en Barcelono, Antonov-Ovsenko publike intervenas, kiel li kutimis fari, en la hispanajn «internajn aferojn», kaj denuncis per noto de gazetaro «*La Batalla*»-on dirante, ke ĝi formis parton de la «gazetaro vendita al la internacia faŝismo». Ankaŭ endas rimarkigi, ke tiutempe «*La Batalla*» protestis kontraŭ la arestoj de la dizidentoj kaj kontraŭ la politikaj procesoj en USSR. Kio estis alia netolerebla skandalo. Premata de la sovetiaj agentoj, USPK meze de Decembro kaŭzis krizon de la kataluna aŭtonoma Registaro postulante la elpelon de la LPMU-ana ministro, Andrés Nin, konsilanto pri Justico. Kompreneble USPK petis la elpelon de Andrés Nin, kiel unua dispono kontraŭ tiuj agentoj de la internacia faŝismo, kiuj estis la aktivuloj de LPMU. Sed la ceteraj organizaĵoj -inkluzive NKL- akceptis la elpelon de Andrés Nin por komplezi la rusojn. La krizo estis solvita laŭ perfekte jezuita maniero: oni decidis konsistigi «Registaron sen partioj», en kiu la solaj organizaĵoj reprezentitaj estis la sindikatoj: NKL, ĜUL kaj Unuiĝo de Farmantoj. Sed la reprezentantoj de ĜUL estis preskaŭ la samaj, kiuj reprezentis la antaŭan tagon USPK-on. Krome estis reprezentanto de RMK, por ke la «kataluna etburĝaro estu reprezentita». Ĉiuj ĉi artifikoj trompis neniun, sed ili

atingis sian celon: la elpelo de LPMU. «*Pravda*» de la 17-a de Decembro 1936 povis skribi: «En Katalunujo, la neniigo de la trockiistoj kaj liberecanoj komenciĝis; realiĝos per egala energio, kiel en USSR».
Siaflanke LPMU protestis kontraŭ sia forigo per publika manifesto laŭ tre moderaj vortoj:

> «Se malgraŭ niaj penadoj kaj niaj oferoj rompiĝus la unuiĝo de ago, la kulpo ne estus nia. Ĝi estus de kiuj ĉion subordigas al siaj "porpartiaj" ambicioj, kaj ni certas, ke post mallonge la faktoj al ni donos la pravon. Bedaŭrinde endas sperti la rezultojn de ĉi tiu manovro, kiu, nun realigita, nur povas favori la komunan malamikon. Sekve ni estas devigitaj denunci ĝin al la laborista klaso de Katalunujo.»[155]

Endas reliefigi la rapidecon per kiu USPK, kiu estis kreita tuj post la frankista ribelo kaj tiam estis ege malplimulta, sukcesis, malmultajn monatojn poste, regi tiel la «bazon» (en kelkaj aspektoj), kiel la «pinton». Sed reale la bazo kaj la pinto pri kiuj ni parolas estas la bazo kaj la pinto de la burokrataro, sindikata aŭ ŝtata, kaj en la lukto por regi la burokratajn postenojn, la stalinistoj ĉiam estis «majstroj». Kaj kvankam la katalunaj stalinistoj estis komencantoj je la afero, tamen ili estis konsilitaj de unuarangaj specialistoj, kiel Antonov-Ovsenko kaj Geröe.
Post kiam LPMU estis eksigita de la kataluna Registaro, Comorera estis enoficigita (kiel reprezentanto de ĜUL) ministro pri Manĝoprovizadoj. Lia unua tasko kompreneble estis ekmiliti kontraŭ la Komitatoj favore al la privata komerco. La 7-an de Januaro 1937 dekretis la malfondon de la komitatoj pri Provizado de la sindikatoj, por ke oni povu plenumi la malfondon de la laboristaj Komitatoj pri provizado.

155Peirats, citita verko, 2-a volumo, paĝo 121.

> «Comorera, bazante sin sur la principoj de la abstrakta liberalismo, kiun neniu administristaro subtenis dum milittempo, sed de kiuj la socialistoj de dekstro estis la lastaj admirantoj, admirantoj poseditaj de religia fervoro, ne anstataŭigis la ĥaosajn Komitatojn pri pano per centraliza administrado. Li pure kaj simple restarigis la komercon de la pano. En Januaro, en Barcelono, eĉ ne ekzistis sistemo de porciumo. La laboristoj devis elturniĝi kiel ili povis por akiri panon kontraŭ ĉiam pli altaj prezoj kaj per salajroj preskaŭ ne variantaj de majo. Praktike ĉi tio volis diri, ke la virinoj devis vicatendi de la kvar matene. La malkontento en la laboristaj kvartaloj kompreneble estis tre alta, ĉar la necesbezono de la pano pligraviĝadis de post la enposteniĝo de Comorera.»[156]

Fakte ne nur estis la pano, ankaŭ ĉiuj aliaj nutraĵaj produktoj, post la reveno al la privata komerco, tuj pliiĝis de prezo kaj malabundis, por grandigi la kaŝkomercon. GEPCI, fondita de la stalinistoj, kiel branĉo de ĜUL (glora iniciato, kiu kunigis en sama sindikato la salajrulojn kaj la mastrojn tiel malgrandajn, kiel mezajn) sukcesis pliigi sian ekonomian kaj politikan rolon.
Comorera, pro la popola malkontento kaŭzita de la prezaltiĝo kaj la malabundeco de produktoj, akuzis sian antaŭulon (la NKL-ano Domènech) kaj denuncis la sabotadon de la Komitatoj pri Provizado de la sindikatoj. Oni ankaŭ aranĝis alian spektakloriĉan agon per la alveno de la unua sovetia ŝipo, Ziryanin, la 20-an de Januaro 1937, kiu alportis 901 tunojn da faruno, 882 tunojn da sukero kaj 568 tunojn da butero. La alveno de la sovetia ŝipo estis akompanita de grandega reklama operacio, por ke la kataluna komuna popolo komprenu, ke dum la anarĥiistoj

156F. Borkenau, citita verko, paĝo 147.

alportis, per sia malordo kaj ĥaoso, la malsaton al la familioj kaj detruis la ekonomion, ili, la rusoj, estis la plej bonaj amikoj de la hispanaj laboristoj kaj al ĉi tiuj malavare alportis kanonojn kaj buteron. La reklamaj agoj de ĉi tiu tipo bone «efikis» kaj la rusoj ĝuis aŭtentikan prestiĝon inter la publika opinio al kiu oni tre zorge kaŝis la altan prezon, kiun Hispanujo pagis kontraŭ tiu neprofitema helpo. Ok tagojn post la alveno de la rusa ŝipo, la 21-an de Januaro 1937, «*Solidaridad Obrera*» publikigis deliran artikolon, el kiu ni eltiras ĉi tie fragmenton:

> «La centoj da miloj da civitanoj, kiuj aliĝis al la impona ago de adiaŭo, nur fiksis la rigardon sur unu lokon: Ziryanin. Estis popolo tute danka al la humana signifo de tiu unua alipopola vizito. La sentemeco estis dankomontro al la solidareco. Kelkajn tunojn de nutraĵaj produktoj transportis de Rusujo al Hispanujo ĉi tiu mesaĝisto de la rusa proletaro, oferdono de ties virinoj al la niaj, afabla kareso de la etuloj de Oriento al la infanoj de Iberujo»[157] (kaj tiel plu).

La ĝeneraligita ofensivo de la aparato de la ŝtato ankaŭ rimarkigis sin je la esprimlibereco. Kiam oni tralegas la tiutempajn ĵurnalojn, estas mirinde vidi la «senliterajn spacojn» ĉiam pli grandajn kaj pli oftajn, kiuj etendiĝas sur la paĝoj de la ĵurnaloj, de komencoj de la jaro 1937. Komence la cenzuro nur enmiksis sin en la informojn de militista karaktero, sed ĉiam pli ĝi efektiviĝis sur la informoj kaj diskutoj de nure politika kaj eĉ teoria karaktero. La 14-an de Marto 1937 ekzemple, «*La Batalla*» estis ĉesigita dum 4 tagoj pro la enhavo de politika ĉefartikolo, kiu ne havis la sorton komplezi la cenzuristojn de la kataluna Registaro.
La limigo de la esprimlibereco ne nur efektiviĝis sur la gazetaro; ankaŭ oni malpermesis politikajn mitingojn kaj kunvenojn. Ekzemple la mitingo NKL-LPMU, kiu estis

157«*Solidaridad Obrera*» (21-an de Januaro 1937).

okazonta la 26-an de Februaro 1937 en Taragono, estis pure kaj simple malpermesita de la kataluna Registaro. Oni timis, ke en ĝi oni defendus tro «ekstremismajn» vidpunktojn, kaj sendube tiu dispono akordiĝis kun la ĝenerala kadro de la kampanjo kontraŭ LPMU organizita de la stalinistoj.

En la sino mem de NKL kaj inter la gvidaj sferoj, ĝermis spirito tre trempita de «demokratia centralizismo». La 28-an de Marto 1937, la Nacia Komitato okazigis kunvenon de delegitoj de la tuta gazetaro de NKL kaj IAF en la sidejo de ambaŭ organizaĵoj en Barcelono. Laŭ Peirats la ĉefa celo de ĉi tiu kunveno estis atingi la submetiĝon de ĉiuj esprimorganoj al la instrukcioj de la Nacia Komitato. Endis forigi ĉian malakordon, ĉefe la liberecon de kritiko, kiun manifestis kelkaj ĵurnaloj kaj revuoj pri la perfido de la liberecanaj principoj fare de la gvidaj organoj ĝenerale kaj de la «kamaradoj ministroj» aparte.

La propono transformi la NKL-an gazetaron en la simplan proparolanton de la gvidaj Komitatoj estis adoptita per plimulto de unu voĉdono. Kaj krome la venkita malplimulto klare esprimis sian intencon akcepti nek tiun decidon nek tiun voĉdonon. Kio pruvas la obstaklojn, kiujn trovis la centraliziga tendenco en la sino de la liberecanaj organizaĵoj, kiuj pro esenco kaj tradicio kontraŭstaris ĉian centralizismon. Nur fine de 1937 kaj komence de 1938 povis esti tute venkita «la maldekstra opozicio» de NKL.

Ĉi tiu nova centralizismo estis objektive bezona por la gvidantoj de NKL kaj ne nur koncerne la esprimliberecon. Ili ne povis trudi la Armeon super la volontarmeoj, la potencon de la ŝtato –tiel, kiel sian partoprenon en ĝi- super tiu de la laboristaj Komitatoj, la politikan kaj ekonomian hierarĥion super la laboristaj aŭtonomeco kaj demokratio, kaj ne renkonti gravajn rezistojn en la sino mem de siaj organizaĵoj. Kiel faras ĉiuj gvidantoj antaŭ similaj konfliktoj, ili klopodis por rompi la opozicion kaj silentigi la kritikojn. Ili

trudis la centralizismon en sia propra organizaĵo, tio estas la neplio!, kaj alifoje forĵetis senkonsidere la tradiciojn, la belegajn kaj florajn paroladojn kaj la liberecanajn principojn, ĉar la burokrata praktiko de la gvidantoj havas siajn proprajn leĝojn kaj siajn proprajn postulojn pri kiuj oni ne scias, ke iu escepto okazis en la historio de la revolucioj.
La specialigita tavolo el gvidantoj, kiun NKL estigis per tiom da rapideco, preskaŭ neniam estis submetita «al la regado de la bazo» dum daŭris la milito. Ĉi tiu estas grava -kaj klasika- elemento de la burokrata fenomeno. De 1936 ĝis 1939 ne estis veraj demokratiaj balotadoj por elekti la respondecajn postenojn de NKL kaj IAF. Veras, ke okazis multaj kunvenoj, konferencoj kaj asembleoj, kaj unu el la plej gravaj estis la pliigita Nacia Ekonomia Delegitkunveno de NKL en Januaro 1938, en Valencio. Sed ĉefe estis asembleoj de kadruloj, en kiuj la bazo ĉu ne estis aŭ estis malmulte reprezentita. Tiel ekzemple Mariano G. Vázquez, regiona sekretario de Katalunujo en Julio 1936, estis elektita nacia sekretario dum kunveno de regionaj Komitatoj, tio estas, dum kunveno de respondeculoj de la regionaj federacioj. La saman fenomenon oni povas observi koncerne IAF-on, io normala, ĉar ambaŭ organizaĵoj, kiuj ĉiam estis intime unuigitaj, preskaŭ tute kunfandiĝis de Julio 1936. Tiel, en Julio 1937, nelonge post la majaj okazintaĵoj, oni okazigis en Valencio Delegitkunvenon de la regionaj Komitatoj de IAF. Mi opinias, ke Vernon Richards pravas kiam reliefigas la klare esprimitan intencon dum ĉi tiu kunveno transformi IAF-on de federacio de anarĥiistaj aŭtonomaj grupoj en specon de politika partio.

> «Dum pli ol kvindek jaroj la grupo de afineco[158] estis la plej efika organo de anarĥiismaj propagando, rilato kaj aktiveco. Per la nova organizo, kiun oni stampas

158 La «grupoj de afineco», unua bazo de IAF, estis konsistigitaj de anarĥiistoj propra-vole grupigitaj pro ĝuste ties teoriaj aŭ eĉ personaj afinecoj.

en IAF, la interna komisio de la grupo de afineco restas nuligita. La Delegitkunveno intencas respekti la grupojn de afineco, sed, pro la decidoj adoptitaj de IAF, ili ne povos havi internan partoprenon, kiel tiaj grupoj.»[159]

La nova organizo de klasika «bolŝevikisma» tipo estiĝis el la ĉeloj -aŭ grupoj- de bazo de kvartalo kaj inkluzivis la lokajn, regionajn Komitatojn, super kiuj lokiĝis la Nacia Komitato, kies rolo fariĝis ankoraŭ pli grava.
Kiel ankaŭ klasika konkludo el la aŭtoritatema hierarĥiigo de la anarĥiistaj organizaĵoj, disvolviĝis nekredebla kulto al la personeco de la gvidantoj. Tute veras, ke tiu kulto al la «elstaraj aktivuloj» antaŭe ekzistis, kiam NKL funkciis tiel demokratie kiel estis eble, sed ĝi ekatingis proporciojn tiel grandajn, kiel groteskajn. Jen sola ekzemplo: en la «Bulteno de Informo NKL-IAF», ni povas legi la sekvajn liniojn dediĉitajn al García Oliver:

> «La viroj, kiel nia kamarado, devas okupi postenojn de la plej graveco kaj respondeco, disde kiuj ili povas enplanti ĉe siaj fratoj sian propran kuraĝon kaj sian propran energion kaj, mi volus ankaŭ aldoni, sian propran strategion. Lia vigleco, kunigita al lia troriskemo, prezentas nevenkeblan baron kontraŭ la faŝismo. Danke al li, ni vidos kiel la luktantoj reakiros tiun oferspiriton, kiu al li faris fronti kontraŭ la danĝero en neegala lukto, kun la brusto malkovrita. La viroj gviditaj de simbolo mortas ridetante; tiel mortis niaj volontarmeanoj kaj tiel mortos la viroj, kiuj hodiaŭ estas soldatoj de la Popola Armeo, forĝitaj en la spirito kaj la ekzemplo de la kamarado García Oliver.»

159Vernon Richards, citita verko, paĝo 249.

Ĉi tiu malluma literatura paĝo dediĉita al la kulto al la estroj finiĝas elvokante la «kreantan genion» de García Oliver, kiun ĝi komparas kun «tiu alia figuro, nia senmorta Durruti, kiu leviĝas de sia tombo kaj krias: Antaŭen!».[160] Kvankam ĝi ne atingas la altajn pintojn de Louis Aragon, kiam li kantas al Thorez kaj Stalino, valoras la penon memorigi ĉi tiujn ekzemplojn de literaturo... «anarĥia».
La printempo de 1937 do estis direktoŝanĝo, en kiu la «milito komencas vori la revolucion». La ŝtatpotenco estis restarigita kaj post la partopreno de la anarĥiistoj en la Registaro, la suvereneco de la ŝtato estis rekonita de ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj. Per la «submetigo» de la Kolono de Fero, ĉiuj kolonoj de volontarmeanoj iĝis tradicia regula armeo; la polico ankaŭ; severa cenzuro falis sur la gazetaron; en Katalunujo, kie la sociaj transformadoj pli progresis, la kolektivigoj restis bremsitaj, bojkotitaj, la privata komerco ree anstataŭis la sistemon de senpera vendo de la produktoj starigitan de la Komitatoj pri Provizado de la sindikatoj ktp. Post la revolucia impeta ondego, kiu balais la malnovan subpreman aparaton de la ŝtato kaj grandan nombron de subpremaj institucioj, por komenci novan formon de socio bazita sur la memdetermino de la laboristoj kaj la memmastrumado de la entreprenoj, la malnova socia piramido -kun kelkaj novaj trajtoj- releviĝis kaj estis ĝuste la politikaj partioj kaj la laboristaj organizaĵoj la ĉefaj agantoj de tiu rekonstruo kaj, kiuj «cedis» sian internan hierarĥion al la tuta socio.
Kiel en ĉiuj samtempaj revoluciaj movadoj, la homoj, kiuj luktis kontraŭ la subprema hierarĥio kaj kontraŭ la privilegioj kaj maljustecoj de klaso propraj al tiu hierarĥio, ĉar ili pensis (kaj tiel estis), ke ilia tasko estis grandega, ili estis devigitaj grupigi sin por esti pli fortaj kaj efikaj, sed ili tion faris ene de organizaĵoj, kiuj reproduktis en sia sino la hierarĥion

160«Bulteno de Informo NKL-IAF», n-ro 34 (27-an de Aŭgusto 1937).

ekzistantan en la socio, kiun ili pretendis ŝanĝi, kaj sekve, kiel renversitan kopion, ili ankaŭ reproduktis la tutan sistemon de principoj de tiu socio: disciplino, spirito de ofero, profitdoneco, efikeco, organizado, produktado, subpremado, socioforigo, fido kaj fanatikeco, kulto al la estroj, kaj ni ne mencios ĉiujn principojn kaj kutimojn de la burĝa mondo, ĉi tiuj ne renversitaj, en kiuj ili daŭre esti enmetitaj. Ĉi-okaze, kiel ĉiam okazas, kiam oni rajtas reale paroli pri revoluciaj movadoj kaj, kiam ĉi tiuj komence estas venkaj, estis la spontanea homamasa ago, kiu kaŭzis la movadon kaj portis ĝin ĝis ĝiaj lastaj konsekvencoj. Poste venas la organizaĵoj por bremsi, deturni -kaj kelkfoje detrui-la rezulton de tiu spontanea ago. Ni ne povas limigi nin diri, ke la partioj prenas la «regadon de la situacio», ĉar temas pri regado, kiu preskaŭ ĉiam estas dezirita de la propraj homamasoj. La hierarĥigitaj partioj rekonstruas la subpreman socian piramidon kaj starigas, gloras kaj ideologiigas, kiel venkan rezulton de la revolucio (vidu USSR-on kaj ĉiujn aliajn «socialismajn» landojn), novajn privilegiojn kaj maljustecojn -kiuj ne ĉesas havi multajn rilatojn al la malnovaj. La originaleco de la kataluna revolucio, krom la fakto, ke ĝi disvolviĝis en la sino de enlanda milito kontraŭ la faŝismo kaj, ke ĝi estis detruita de la «respublikanaj fortoj» mem antaŭ la milita malvenko, konsistas en tio, ke NKL-FAI, plejmulta organizaĵo en Katalunujo -kaj tre forta en la cetero de Hispanujo-, kiu sendube estis la organizaĵo malplej burokrata kaj centraliza de la eŭropa laborista movado, iom post iom iĝis ĉio tio laŭ eksterordinare rapida ritmo. Kaj tio ne okazis pro la fakto, ke la estroj estus «malbonaj» -kvankam veras, ke la potenco koruptas-, sed ke tio ankaŭ okazis pro la malsimpleco de la propra situacio, la postuloj de la milito kaj la revolucio, kiun oni ne sciis transformi en revolucian militon, kaj pro la tradiciaj «mankoj» de NKL -kulto al la gvidantoj kaj sanktigo de la Organizaĵo, inter aliaj. Kiel ajn, oni povas rajte aserti,

ke ĉiu laborista organizaĵo iel tiel estas kondamnita al la burokratiĝo. Kaj ĉi tio prezentas kelkajn teoriajn demandojn, kiuj ankoraŭ en estas solvitaj, ĉar la mito de la organizaĵo revolucia aŭ de avangardo (ĉu de nova tipo?!) daŭre faras la difektojn, kiujn ni jam konas.

* * *

Pro ĉi tiu situacio oni malfacile povas kompreni la aserton de Broué kaj Temime, kiu tekstas: «En la printempo 1937 estis kunigitaj la kondiĉoj de revolucia tajdo. La temoj de la revolucia opozicio renkontis, almenaŭ en Katalunujo, kreskantan eĥon inter la laboristoj sekvantaj NKL-on, kiuj vidis kiel iliaj "konkeroj" estis pridubitaj. En ĜUL, la armeo, la administrado, la partianoj de Largo Caballero reagis kontraŭ la komunistoj. La ekonomiaj malfacilaĵoj, la skandaloj de la "ĉokoj" prezentis favoran kampon al la agitado».[161] Malakorde kun ĉi tiu kontraŭvola optimismo, ni poste vidos kiel Largo Caballero kaj ties partianoj estis forbalaitaj el la politika scenejo ĝuste post la majaj okazintaĵoj. Koncerne la «laboristojn sekvantajn NKL-on», ilia opozicio -tre reala, certe- ankaŭ estis direktita kontraŭ la gvidantoj de NKL, kiujn ili rifuzis sekvi en iliaj kompromisoj kaj «porregistara» agado.

Ni vidu kelkajn ekzemplojn de ĉi tiu opozicio en la vicoj de NKL. La 14-an de Aprilo 1937, Camillo Berneri, itala anarĥiista aktivulo, kiu ĝuis grandan prestiĝon en Katalunujo, sendis «Malfermitan leteron al la kamaradino Federica Montseny» (publikigita en sia ĵurnalo «*Guerra di classe*» samdate kaj komplete reproduktita en la samtitola libro), de kiu mi ĉi tie donas kelkajn fragmentojn:

> «Estas la Civilgvardianoj kaj la Gvardianoj de Sturmo, kiuj konservas la armilojn, ankaŭ estas ili, kiuj en la postmilitfronto devas regi la “neregeblulojn",

161Broué kaj Temime, citita verko, paĝoj 256-257.

alivorte, kiuj devas senarmigi la revoluciajn kernojn, kiuj havas kelkajn fusilojn kaj revolverojn. Ĉi tio okazas kiam la interna militfronto ankoraŭ ne estas likvidita. Ĉi tio okazas dum enlanda milito, en kiu ĉiu ajn surprizo eblas kaj en la regionoj, kie la militfronto, tre proksima, ne estas matematike determinita. Ĉi tio okazas kiam evidentas, ke estas distribuo de la armiloj politika, por havigi nur la ĝuste «bezonajn armilojn» (kiuj, ni esperu, sufiĉos) al la militfronto de Aragono, armita eskorto de la terkultura kolektivigo en Aragono kaj bastiono de Katalunujo, tiu Ibera Ukrainujo. Vi partoprenas en la Registaro, kiu proponis al Francujo kaj Anglujo serion da avantaĝoj en Maroko,[162] kiam endis oficiale proklami la politikan aŭtonomecon de Maroko de post Julio 1936 (...) Mi opinias, ke jam venis la tempo komuniki, ke vi kaj la aliaj anarĥiistaj ministroj ne konsentas pri la naturo kaj la enhavo de tiaj proponoj (...)

La dilemo inter milito aŭ revolucio jam ne havas sencon. La sola dilemo estas ĉi tiu: aŭ la venko super Franco danke al la revolucia milito, aŭ la malvenko. La problemo por vi kaj por la aliaj kamaradoj kuŝas elekti inter la Versalles de Thiers kaj la Parizo de la Komunumo, antaŭ ol Thiers kaj Bismarck realigos la sanktan unuiĝon.»[163]

En Katalunujo, la grupoj de opozicio esprimis sian malkontenton per la ĵurnalo de Ilerdo «*Acracia*», direktita de José Peirats, per la revuo «*Ideas*» kaj per la organo de la Liberecanaj Junularoj «*Ruta*». Ĉi tiuj estis -inter aliaj- la publikigaĵoj, kiujn la NKL-aj gvidantoj volis silentigi.

El inter la grupoj de opozicio ankaŭ oni devas citi «La Amikoj de Durruti». Ĉi tiu grupo estis ĉefe konsistigita de

162Pri la «afero de Maroko», vidu 11-an aneksaĵon.
163Berneri, citita verko.

volontarmeanoj de NKL-IAF, kiuj rifuzis militistigi sin ĝis la ekstremo, ke ili preferis forlasi la militfronton antaŭ ol sur sin surmeti la uniformon de la nomita nova Popola Armeo. Ili disvolvis sian ĉefan aktivecon dum la «majaj okazintaĵoj» kaj la sekvaj monatoj, kiam ili eldonis kaŝan ĵurnalon (kaŝa, ĉar ĝi estis malpermesita de la cenzuro!): «*El Amigo del Pueblo*». En la printempo 1937, la gvidantoj de la grupo, ĉiuj ili membroj de IAF (Careño, Pablo Ruiz, Eleuterio Roig kaj ĉefe Jaime Balius) kunlaboris en la ĵurnaloj de opozicio, ĉefe en «*Ideas*».

La katalunaj Liberecanaj Junularoj konsistigis unu el la ĉefaj fokusoj de opozicio al la politiko de la gvidantoj de NKL-IAF. Certe iuj el iliaj gvidantoj, kiel Fidel Miró, sekretario, kaj Aurelio Fernández, sekretario de la Revolucia Alianco de la Junularo, estis sufiĉe akceptemaj por la argumentoj de la «porregistaraj» gvidantoj. Kaj ili sendube ne volis rompi tro malkaŝe kun la «pliaĝaj» organizaĵoj. En Aŭgusto 1936, sekvante la unuigan **«**ondegon**»**, la Liberecanaj Junularoj subskribis interkonsenton de alianco kun la (stalinistaj) katalunaj USJ -samkiel faris NKL-IAF kun USPK- sed post nelonge jam denuncis la interkonsenton por formi la Aliancon de la Revolucia Junularo kun la Iberaj Komunistaj Junularoj (LPMU) kaj la Sindikatistaj junularoj.

Printempe 1937 la Regiona Komitato de Katalunujo kaj la urba Federacio de Barcelono de la Liberecanaj Junularoj publikigis manifeston, kiu klare montris la opozicion de la liberecanaj junuloj al la evoluo de la politika situacio. Jen kelkaj fragmentoj:

> «Venis la tempo klare kaj firme paroli. Fronte al la malkaŝe kontraŭrevolucia aktiveco de kelkaj kontraŭfaŝismaj sektoroj, kiuj pretendas -kiel ili mem ĉiutage ĝin koncedas - reveni en la demokratia-burĝan Respublikon kaj kies ago, tiel en la nacia kiel en la internacia kampo, parte estas la kaŭzo pro kiu

> plidaŭriĝas ĉi tiu brutala lukto, kiun ni subtenas kontraŭ la faŝismo, lokante nin iom post iom kaj laŭ maniero ĉiam pli urĝa en la alternativo devi forlasi la revolucion aŭ malvenki la militon, ni, la Liberecanaj Junularoj, decidis klare alparoli la popolon -la popolon de la 19-a de Julio- por ke ĝi juĝu kaj decidu pri tio, kion ĝi konsideros oportuna.
> (...) La kontraŭrevolucio al si demetis la maskon kaj agadas sub plena lumo de la tago. USJ revalorigas la rolon de Azaña -kiu tiom senkreditigis sin dum la unuaj tagoj de la Revolucio, kiam li klopodis por eksterlanden fuĝi- kaj petas la unuiĝon de la katolikaj junularoj, kaj eĉ tiun de kiuj "simpatias la faŝismon", dum ili rifuzas starigi la unuiĝon de la revolucia junularo kune kun la junularoj liberecanaj, komunistaj (de LPMU [C.S.-M.]), sindikatistaj, federaciistaj ktp.»

Denuncinte la provokojn de la policistoj kaj la subtenon donitan de la Registaro kaj la politikaj partioj al la projektoj de la franca kaj angla Registaroj por «sufoki la hispanan revolucion», la manifesto deklaris:

> «En Eŭskujo oni enprizonigas niajn Komitatojn kaj persekutas la anarĥiistajn aktivulojn... Ili rifuzas al la militfronto de Aragono la armilojn bezonatajn (...) Ili sendas en la militfronton la filojn de la popolo, dum ili lasas en la postmilitfronto -por tre konate kontraŭrevoluciaj celoj- la armitajn korpusojn kaj la policon...»

Estas senutile daŭre mencii la liston de kontraŭrevoluciaj agoj -pri kiuj ni donas ĉi tie nur malmultajn ekzemplojn- plu diras la manifesto, la aferoj estas tre klaraj, ili volas detrui la revolucion, preparas la subpremon de la revoluciuloj. Sed:

> «Ni estas pretaj, se tio necesus, enigi en la kaŝecon, senkompate lukti kontraŭ ĉiuj falsantoj, kontraŭ la

> tiranoj de la popolo kaj kontraŭ la fikomercistoj de la politiko. Kaj ni hodiaŭ daŭre ripetas: Antaŭ ol rezigni la lukto kontraŭ la faŝismo, ni mortos en la ŝirmfosaĵoj!! Antaŭ ol rezigni la Revolucion, ni scipovos morti ĉe la barikadoj!!!»[164]

Ĉi tiuj gravaj sektoroj de opozicio ene de NKL-IAF mem, kiuj estis ĉiamdaŭra fonto de misfarto kaj «malbona konscienco» por la anarĥiistaj gvidantoj, estis obstaklo por la kompleta restarigo de la ŝtato kaj por disciplini la «neregeblulojn». Sed estis obstaklo, kiun oni devis ĉiakoste detrui kaj al tio ili ĝuste sin dediĉis ekde 1937.

## LA UNUAJ BATALETOJ

De la 23-a de Januaro 1937, ĜUL, superregita de la stalinistoj, organizis la Unuan Kongreson de Terlaboristoj, en kiu 400 delegitoj, kiuj reprezentis, laŭ la oficialaj nombroj, 30.000 aliĝantojn de la kamparanaj organizaĵoj de ĜUL, energie deklaris sin kontraŭ la kolektivigoj. Laŭ Peirats, la tribuno estis ornamita per grandega portebla afiŝo sur kiu oni legis la sekvajn vortojn: «Malpli kolektivigaj provoj kaj pli da produktaĵoj». Víctor Colomé (kiu iĝis komunista gvidanto post sia elpelo el LPMU en Januaro 1936) esprimis sin laŭ la jenaj vortoj:

> «Necesas rapide fini la konfuzigan situacion -en kelkaj regionoj, ĥaosan-, kiu ekzistas hodiaŭ en la kataluna kamparo, kaj ĉi tio nepras por atingi la venkon kontraŭ la faŝismo. Kvankam estas vi, kiuj devas decidi ĉu endas kolektivigi aŭ ne, ni devas diri al vi, ke ni ne estas partianoj de tio, ĉar ni opinias ĝin ne oportuna ĉi-momente.»[165]

164Personaj arkivoj.
165Peirats, citita verko, 2-a volumo, paĝo 127.

La tuta kontraŭkolektiviga kampanjo plenumita de USPK, de la plimulto de la kataluna ĜUL, kiun ĝi regis, kaj de la etburĝaj naciismaj organizaĵoj, renkontis grandan eĥon inter granda nombro de katalunaj kamparanoj, kies terkultura ekonomia strukturo, tradicio kaj pensmaniero ilin pelis defendi la familian ekspluatejon -kaj klopodi por pligrandigi sian terpecon - antaŭ ol fordoni sin al la eksperimentoj de la kolektivigo, pli revoluciaj kaj modernaj. La polemiko inter favoruloj kaj kontraŭuloj de la kolektivigoj kelkfoje eĉ prenis karakterizaĵojn de armita alfronto, kiel en *Fatarella*, vilaĝeto el 600 loĝantoj de la provinco de Taragono.
Sed la okazaĵo de *Fatarella* nur estis unu plia inter la multnombraj epizodoj de la lukto, kiun efektivigis en Katalunujo favoruloj kaj kontraŭuloj de la socia revolucio kaj, kiu atingis sian apogeon en la «sanga semajno» de la monato de majo 1937. Alia signifa okazaĵo, pri kiu oni multe skribis tiutempe, estis la afero de la «ŝtelo de 12 tankoj».
Ĉi tiuj estis la faktoj: la komunistaj volontarmeanoj de la kazerno Vorochilov de Barcelono prezentiĝis kun falsa ordono de konfisko en magazeno de milita materialo administrita de NKL kaj ili sukcesis, ke oni al ili transdonis dek du tankojn. Kvankam iliaj dokumentoj estis subskribitaj de Eugenio Vallejo, la metalurgiisto de NKL, kiu iĝis la «mastro» de la militindustrio en Barcelono, io en la sinteno de la komunistaj volontarmeanoj ŝajnis suspekta al la gvardistoj de la magazeno. Ili postsekvis kaj vidis eniri ilin en la kazernon Vorochilov. Informinte sin, ili malkovris, ke Vallejo subskribis nenion. Ŝtelo! NKL prezentiĝis antaŭ la kataluna Registaro. La Unua konsilanto Tarradellas kaj Vallejo prezentiĝis en la kazerno Vorochilov, kiu intertempe estis ĉirkaŭita de la patroloj pri kontrolo. Neinte ĉion, la leŭtenanto kolonelo finis konfesante, sed li deklaris, ke li ne faris alia aĵo ol obei ordonojn de la Alta Komando de la Divizio Karolo Markso, de kiu li dependis. Sed kompreneble

ĉi tiu ĝin malkonfirmis. La 9-an de Marto 1937, «*Solidaridad Obrera*» publikigis la sekvan telegramon:

> «Komisaro de Milito Divizio "Karolo Markso" al la direktisto de "*Solidaridad Obrera*". Eksciita de la gazetaro afero ŝtelo tankoj, mi petegas vin, ke vi publikigu, ke la Stabo de ĉi tiu Divizio estas tute fremda al ĉi tiu afero, eĉ ignorante la ekziston de tankoj en Katalunujo. Ni do senkreditigas la deklarojn de la supozita implikito en ĉi tiu afero, Manuel Trueba.»[166]

Ene de la interna logiko de la hierarĥio, la malsuperaj kadruloj devas protekti la superajn kaj ĉi tiuj, se tio necesas por la «bono de la Partio», devas senkreditigi la malsuperajn kadrulojn. La leŭtenanto kolonelo komandanta la kazernon nenial devis ĵeti la kulpon de ĉi tiu afero sur siajn superulojn, ankaŭ implikante tiel USPK-on.
Ĉi tiu afero de la «ŝtelo de tankoj» atingis grandajn proporciojn kaj longe poste multaj komentariistoj, ĉefe la anarĥiistaj, vidis en ĝi ekzemplon de la komunista antaŭpenso por la preparado de la komploto, kiu atingis sian apogeon en la 1937-aj majaj okazintaĵoj. Estu kiel ajn, la «gerilo» de neatenditaj atakoj kaj provokoj inter organizaĵoj, de perfortaj polemikoj sekvataj de korskuaj deklaroj pri la «proleta unuiĝo» fronte al la faŝismo, plimalboniĝadis ĝis la okazo de nova krizo de la aŭtonoma kataluna Registaro. La krizo daŭris ĝuste monato: de la 26-a de Marto ĝis la 26-a de Aprilo 1937.

## LA «AKVERO», KIU KAŬZIS ĈI TIUN KRIZON ESTIS, LAŬ PEIRATS:

> «Dekreto de la konsilanto pri Publika Ordo, datita la 4-an de Marto, per kiu li deklaris malfonditaj la

166«*Solidaridad Obrera*» (7-an de Marto 1937).

> Patrolojn pri Kontrolo por realigi postan reorganizon de la diversaj armitaj korpusoj, kiuj svarmis en la kataluna postmilitfronto. Ĝi malpermesis al la gvardianoj la eblon aliĝi al la partioj kaj organizaĵoj, kaj efektivigis la forigon de la Komitatoj pri Kontrolo de tiuj armitaj korpusoj per la preteksto, ke la elpurigo jam estis farita. Krome efektiviĝis la plano de “senarmigo de la postmilitfronto". Ĉiu civilulo portanta armilon sen la deviga permeso aŭ rajtigilo estos senarmigita kaj laŭleĝe akuzita. Ĉi tiu dekreto signifis tion jenan: redukti al la senpoveco la popolon kaj, sekve, senarmigi la revolucion. La armiloj transiris en manojn de la polico, kaj ĉi tiu restis sub la absoluta dependeco de la Konsilantaro pri Publika Ordo, al kiu, neniigitaj la popolaj Patroloj kaj la Komitatoj pri Kontrolo de la armitaj korpusoj, estis donitaj ĉiuj klasikaj privilegioj propraj de la Registaro.»[167]

Evidente la aferoj ne okazis tiel. La Patroloj pri Kontrolo ne nur ne transdonis la armilojn, sed kontraŭe amase surstraten eliris kaj senarmigis la «regulajn» policajn fortojn, kiam ili havis la okazon kaj ĉi tiuj lastaj same agadis kiam la unuaj estis en nombra malsupereco. Estis kelkaj pafoj kaj, kvankam oni ne havas ĝustan informon pri la nombro de mortintoj kaŭzitaj en ĉi tiuj operacioj de reciproka senarmigo, estas tre eble, ke estus iuj. La urba Federacio de la liberecanaj junularoj de Barcelono publikigis fajran pamfleton kun la titolo de: «Provoko plia», pamfleto en kiu oni povas legi tion jenan:

> «Ni hodiaŭ firme deklaras, ke ni estis armitaj, estas kaj estos armitaj, kaj des pli malbone por Rodríguez Sala. Por ni, ĉi tiu dispono havas neniun valoron.
> Ni ripetas ĝin por ke restu nenia dubo, ni daŭre estos armitaj, kvankam kun ĉiuj niaj paperoj en ordo kaj ĉiu,

167Peirats, citita verko, 2-a volumo, paĝoj 130-131.

kiu malgraŭ tio volos senarmigi nin, unue devos mortigi nin. Sed ni vidos, kiu venkas kiun.»[168]

Tamen kiel la dispono estis registara dispono, kiu komence estis decidita kun la interkonsento de la anarĥiistaj konsilantoj de la kataluna Registaro, ĉi tiuj vidis sin malmilde mallaŭditaj de la «bazo» de la liberecanaj organizaĵoj kaj devis retiri sian subtenon al la Dekreto pri malfondo de la patroloj pri kontrolo, tiel kaŭzante la menciitan krizon.
Dum la monato daŭranta la krizon, la organizaĵoj senbride realigis ĉiajn polemikojn kaj akuzojn, sed ĉio restis «solvita» per la enponteciĝo de nova Registaro, kiu similis la antaŭan, kiel ĝemela frato. Tarradellas daŭre estis Unua konsilanto kaj Ayguadé (ambaŭ membroj de RMK) konservis la «Internan Sekurecon». Kaj malgraŭ la perforta komunista kampanjo de gazetaro kontraŭ li, la NKL-ano Isgleas konservis sian postenon, kiel konsilanto pri Defendo.
Dum la registara krizo daŭre estis armitaj alfrontoj kaj ĉiaj konfliktoj. Unu el la plej gravaj estis tiu kaŭzita de la decido de Juan Negrín, tiama ministro pri Financoj de la centra Registaro, anstataŭigi en la franca landlimo la armitajn grupojn de NKL-IAF per karabenistoj (kiuj dependis de lia ministrejo). La 17-an de Aprilo la karabenistoj kaj aliaj policaj fortoj alvenis la landliman doganejon de *Puigcerdá* kaj poste *Figueras*-on kaj okupis la tutan landliman regionon. Ree la anarĥiistaj grupoj ne cedis kaj komenciĝis batalo inter la policaj fortoj kaj la armitaj grupoj de NKL-IAF.
La policaj fortoj ĉirkaŭis la urbon de *Puigcerdá*, kiu estis en manoj de la liberecanoj de Julio de 1936. Anarĥiistaj armitaj grupoj, kiuj alvenis por helpi siajn kamaradojn, siavice ĉirkaŭis la policajn fortojn neebligante, ke ĉi tiuj kontaktis kun la registaraj aŭtoritatoj de Ilerdo aŭ Barcelono. Sed la respondeculoj de NKL de Katalunujo rapide iris en la lokon

168Personaj arkivoj.

de la konflikto por intertrakti kompromison. Tia «kompromiso» nur estis la retiriĝo de la anarĥiistaj armitaj grupoj kaj la okupado de *Puigcerdá* fare de la policistoj.
Dume la 25-an de Aprilo, Roldán Cortada, gvidanto de ĜUL kaj USPK estis mistere mortigita en *Molina de Llobregat*. «USPK perforte reagis, denuncis la ”neregelublojn” kaj la ”faŝistajn agentojn kaŝitajn" (en NKL kaj IAF). NKL formale kondamnis la mortigon kaj postulis esploron, kiu laŭ ĝi ĝin eksterigos el ĉiu suspekto.»[169] Du tagojn poste, en la ĉirkaŭaĵoj de *Puigcerdá*, tri anarĥiistaj aktivuloj estis siavice mortigitaj. Inter ili estis Antonio Martín, loka anarĥiista gvidanto, kiu estis la urbestro de tiu urbo. En noto de la paĝo 259 de sia libro Broué kaj Temime skribas: «Antonio Martín, eksŝakristo, estis, post Julio 1936, efika doganistestro». Laŭ Santillán tio estis, kio al li faris gajni tiel solidajn malamikecojn. Tamen respublikanoj, socialistoj kaj komunistoj lin aliigis en la ekzekutiston de *Puigcerdá* kaj la respondeculon de longtempa periodo de teroro. Manuel D. Benavides, en sia libro Milito kaj Revolucio en Katalunujo, ellaboris ampleksan akuzon kontraŭ tiu, kiun li nomis «la lamulo el Malago»[170].
Per la ĉiama lerteco en la uzo de siaj mortintoj, la komunistoj tiom reliefigis la mortigon de Roldán Cortada, ke tiu de Antonio Martín estis preskaŭ nerimarkata. Inter aliaj arestoj ili kaŭzis tiun de Luis Cano, anarĥiista urba konsilanto de *Hospitalet de Llobregat*, akuzita mortigi la komunistestron, sed la Tribunalo de Barcelono lin malkondamnis pro manko de pruvoj la 2-an de majo 1937.
La entombigo de la gvidanto de ĜUL estis elmontro de forto de USPK. Dum tri kaj duono da horoj paradis kun siaj armiloj la policistoj kaj la soldatoj de la fortoj regitaj de tiu partio. Laŭ Broué kaj Temime, la reprezentantoj de LPMU

169Broué Kaj Temime, citita verko, paĝo 259.
170BENAVIDES, M. D.: Guerra y Revolución en Cataluña [hispane, Milito kaj Revolucio en Katalunujo], paĝo 426.

kaj NKL ĉeestantaj en la entombigo komprenis, ke la situacio estis pli grava ol tio, kion ili supozis: fakte, estis elmontro de forto direktita kontraŭ ili. «*La Batalla*» skribis ĉi-rilate:

> «Kontraŭrevolucia manifestacio de tiuj, kies celo estas krei inter la etburĝaj amasoj kaj la plej malprogresintaj tavoloj de la laborista klaso medion de pogromo kontraŭ la avangardo de la kataluna proletaro: NKL, IAF kaj LPMU.»

Kaj efektive tiel estis: «Oni atribuis al USPK la sekvan frazon: "Antaŭ ol preni Zaragozon, endas preni Barcelonon". Ĝi tute precize reflektis la situacion kaj fidele esprimis la aspiron de la lando, kiu depostulis, ke oni redonu al la kataluna Registaro la potencon neleĝe poseditan de la anarĥiistoj», poste skribis Manuel D. Benavides, proparolanto de Comorera kaj de USPK, en sia libro Milito kaj Revolucio en Katalunujo.[171] La fakto, ke la anarĥiistoj estis reprezentitaj en la kataluna Registaro[172] ŝajne tute ne koncernas nian aŭtoron. Ni komprenas ĝin. «Redoni la potencon al la kataluna Registaro» signifas likvidi «la laboristan potencon», la laboristan demokration kaj restarigi la burĝan ŝtaton. Dum estus anarĥiistoj, kiuj neintence agadas profite de ili -kiel cetere ili ĝin faris ne sen malfacilaĵoj-, oni povis toleri ilian ĉeeston en la kataluna Registaro, almenaŭ momente. Por la komunistoj, tio esenca -kaj ĉi tio tiel en Katalunujo, kiel en la tuta «respublikana zono»- estis atingi kiel eble plej frue la ŝtatan centralizon, la fortan potencon, kiun ili esperis, ne sen kialo, regi per la

171M. D. Benavides, citita verko.

172Laŭ ilia opinio, ili estis subreprezentitaj. Oni ne povas foliumi la ĉi-tempan anarĥiistan gazetaron aŭ la oficialajn komunikaĵojn ktp, kaj ne renkonti la sekvan argumenton: NKL, plejmulta organizaĵo en Katalunujo, havis la saman nombron de reprezentantoj en la potencorganoj, ke ĜUL, malplimulta organizaĵo. Tamen ili akceptas ĉi tiun situacion, tiun oferon nome de la kontraŭfaŝisma unuiĝo, kiel ateston de sia bona fido.

apogo de USSR kaj de ties «sindonema helpo». Kiel du geologiaj tavoloj supermetitaj, sed intime kunligitaj, la jakobena burĝa tradicio kaj ties varianto, la «bolŝevikisma» tradicio, konsistigis la ideologian fundamenton de la naciismaj katalunaj partioj kaj de la stalinistoj en ilia komuna lukto por la restarigo de la ŝtato.

En ĉi tiu streĉa situacio kaŭzata de ĉiuj armitaj konfliktoj, la mortigoj kaj arestoj (ĉi tie mi nur citis kelkajn, sed estis multaj pliaj), la aŭtonoma kataluna Registaro decidis, ke la Unua de Majo, tradicia festo de la laboristoj, ne estu feria. Por tio ĝi alvokis la bezonojn de la militproduktado kaj la militfronto. Sed ankaŭ ĝi malpermesis la manifestaciojn, mitingojn kaj kunvenojn (kiuj kompreneble povintus okazi post la laborhoroj).

La Unua de Majo estis sabato. Sekve ĉiuj laboris. La gvidantaj komitatoj de la kontraŭfaŝismaj organizaĵoj publikigis siajn ritajn, kaj pro tio mem teruraj, komunikaĵojn pri la lukto de la internacia laborista klaso simboligita de tiu dato.

La 2-an de majo estis dimanĉo. La barcelonanoj promenis sur la *Ramblas*. Sed kelkaj aktivuloj estis zorgoplenaj. Malmultajn tagojn antaŭe, Camillo Berneri skribis en sia ĵurnalo «Guerra di classe».

> «La ombro de Noske* ekaperas. La monarka-katolika-tradiciisma faŝismo ne estas pli ol sektoro de la kontraŭrevolucio. Endas memorigi ĝin. Endas diri ĝin. Ne endas alkonformiĝi al la manovroj de tiu granda "Kvina Kolono", kiu pruvis sian persistan viglecon kaj sian timindan mimetismon dum ses jaroj de hispana Respubliko.

*NeT: germana socialdemokrata politikisto, ministro pri Defendo de Germanujo inter 1919 kaj 1920, kiu ordonis la mortigon de elstaraj anarkiistaj aktivuloj de Bavarujo.

> La hispana enlanda milito fariĝas en du politika-sociaj frontoj. La Revolucio devas venki en ambaŭ. Ĝi venkos.»

La lundon 3-an de majo komenciĝis la bataloj de la «sanga Semajno» de Barcelono, dum kiu Berneri mem estis mortigita de la stalinistoj.

**LA PROVOKO**

La 3-an de majo, je la 14.45 horoj, pluraj kamionoj de Gvardianoj de Sturmo, komanditaj de Rodríguez Sala, komisaro pri Publika Ordo de Barcelono kaj membro de USPK, ĵus lokiĝis antaŭ la konstruaĵo de la Telefonkompanio sur la placo de Katalunujo.

Ili intence elektis tiun horon, ĉar tiumomente eliris por manĝi multaj oficistoj kaj gardodeĵorantaj volontarmeanoj.

De la unuaj tagoj de la Revolucio, la Telefonkompanio de Barcelono, kiel ĉiuj de Katalunujo, estis administrita de la du sindikatoj NKL kaj ĜUL plus reprezentantaro de la Konsilantaro de la kataluna Registaro, sed samkiel aliloke preskaŭ ĉiuj dungitoj estis membroj de NKL.

La policistoj rapide iris internen de la konstruaĵo kriante: «Supren la manojn!» al la gardodeĵorantaj volontarmeanoj, kiuj surprizitaj estis senarmigitaj. La policistoj supreniris la aliajn etaĝojn por ekataki ilin sed, alarmitaj de la nekutima bruado, la dungitoj kaj volontarmeanoj, kiuj troviĝis en ili, prenis siajn armilojn kaj kontraŭstaris perfortan reziston al la policistoj. Ĉi tiuj lastaj rapide devis reveni en la teretaĝon.

La plano de la stalinistoj estis malsukcesinta. Ili volis preni la Centralon per «aŭdaca» neatendita atako kaj meti NKL-on antaŭ la plenumita fakto. Sed malgraŭ la horo kaj la surprizo, la atakantoj ne atingis siajn celojn. La Centralo ankoraŭ estis en manoj de la sindikataj fortoj, escepte de la teretaĝo, kie restis kelkaj Gvardianoj de Sturmo, dum la ceteraj lokis sin sur la tegmentoj de la najbaraj domoj.

«La novaĵo de la neatendita atako rapide diskoniĝis. Informita pri tio okazinta, la Regiona Komitato de NKL petis telefone klarigojn al la Kancelierejo pri la Interna Sekureco. Kiu donis la ordonon pri okupado? Ĝi ne devenis de la Konsilantaro de la kataluna Registaro, kiu ne pridiskutis tion. Pridemandita la konsilanto de Interna Sekureco, la respublikano Ayguadé, diris scii nenion. Fakte la ordono pri okupado, kiun montris Rodríguez Sala, estis subskribita de li (...)
La provoko estis tiom evidenta, ke ĝi tuj kaŭzis ondegon el indigno. Ankaŭ ne sin atendigis la reago. Eĉ ne pasis horo, kiam aperis la volontarmeanoj de IAF kaj la membroj de la Patroloj pri Kontrolo. Tuj ekaŭdiĝis la unuaj pafoj. La efiko estis tuja. Malmultajn minutojn poste neniu estis surstrate, la komercistoj riglis siajn vendejojn kaj nur vidiĝis kelkaj piedirantoj, kiuj rapidis al siaj domoj, tuŝetante la murojn por eviti la kuglojn, kiuj jam komencis fajfi ĉie. "Kio okazas?" Oni sciis nenion. Sed endis atingi sekuran lokon.
Dume la fabrikoj estis avertitaj. Laŭ komuna interkonsento, laboristoj de NKL kaj ĜUL decidis interrompi sian laboron. La armiloj eliris el siajn kaŝejojn kaj, kvazaŭ oni obeus instrukcion, ĉie ekaperis barikadoj.
La reago estis tiel granda, ke ĝi preskaŭ detruas ĉion. Ne estis tio, kion antaŭvidis la aŭtoroj de la provoko. Ankoraŭ ne noktiĝis, kiam jam la tuta urbo estis plena de barikadoj kaj ili estis eĉ ĉirkaŭ la kataluna registarejo, kie la Registaro fakte troviĝis sieĝita de la popola forto. La Gvardianoj de Sturmo anticipe lokitaj en ĉiuj strategiaj lokoj sentis sin dronintaj pro tiu grandega homa ondego, kiu ilin havis ĉirkaŭitaj, kiaj insuletoj perditaj meze de la ŝtorma oceano. La

> vendejoj estis fermitaj, la tramoj kaj la busoj revenis en siajn garaĝojn, la taksioj malaperis el la trafiko, la urbo enprofundiĝis en tragikan silenton, iam interrompitan de la bruo de la pafoj, kiuj aŭdiĝis en la nokto, aŭ de la subita bruego de la mitraloj.
> La nokto tiel pasis, okupita unuflanke kaj aliflanke de la preparoj de la lukto, kies tujeco estis antaŭsentita de ĉiuj. La Registaro, klare superita de ĉi tiu neatendita rezisto, silentis.»[173]

Laŭ Julián Gorkin tiun nokton mem de la 3-a al la 4-a de majo:

> «La Plenuma Komitato de LPMU kunvenis kun la regionaj Komitatoj de NKL kaj IAF kaj la Liberecanaj Junularoj. Ni elmetis la situacion laŭ ĝiaj veraj cirkonstancoj: "Neniu el ni ĵetis la homamasojn de Barcelono, tio estas spontanea respondo al stalinista provoko. Ĉi tiu estas decida momento por la revolucio. Aŭ ni nin metas ĉekape de ĉi tiu movado por detrui la internan malamikon aŭ la movado malsukcesos kaj la malamiko nin detruos. Endas elekti: la revolucio aŭ la kontraŭrevolucio".»[174]

Ili decidis nenion. Ilia maksimuma depostulo estis... ke oni eksigu la provokanta komisaro!!

> «La antagonistoj (skribas Peirats) dividis sin en du tendaroj. Unuflanke la publika forto (Gvardianoj de Sturmo, Respublika Nacia Gvardio, Gvardianoj de Sekureco kaj *Mossos d'Esquadra* – aŭtonoma polico

---

173Marcel Ollivier, *Les journées sanglantes de Barcelone* [france, La sangaj tagoj de Barcelono], «*Spartacus*», paĝoj 13-14. Mi ege inspiris min el la raporto de Marcel Ollivier, kiu al mi ŝajnas la plej kompleta el ĉiuj, kiujn mi legis. La atesto de Georges Orwell ankaŭ estas bonega, sed ĉar lia libro (Omaĝo al Katalunujo) estas aĉetebla en ĉiuj bonaj librejoj, mi preferas utiligi la okazon por sincere rekomendi ĝian legadon.
174Julián Gorkin, citita verko, paĝo 69.

> de Katalunujo) kaj la partioj USPK kaj Kataluna Ŝtato (komunistoj kaj separistoj); aliflanke la popolaj fortoj konsistigitaj de la anarĥiistoj (NKL, IAF kaj Liberecanaj Junularoj), la Laborista Partio de Marksisma Unuiĝo kaj la Patroloj pri Kontrolo. La Komitatoj pri Konfederacia Defendo (NKL-IAF), kutime organizitaj laŭ kvartaloj, estis la grandaj strategiistoj de la popola kontraŭofensivo.
> Oni ĉie starigis la ne malpli tradiciajn barikadojn; kaj la lukto, tiom aŭ pli senkompata ol tiu de la 19-a de Julio, estiĝis por la superregado de la strato.»[175]

**MARDON 4-an DE MAJO**

«Matene la tuta urbo, escepte de kelkaj kvartaloj de la centro, estis en manoj de la laboristoj», skribas Marcel Ollivier.

La tagiĝo estis trankvila. Eĉ ne unu pafo. La dommastrinoj eliris el siaj hejmoj kaj tuŝetante la murojn iris aĉeti provizojn. Ĉar «la vivo daŭras», endas manĝi, la infanoj devas manĝi, inkluzive la edzo, kiu hodiaŭ ne iros al la fabriko, sed al la barikadoj...

Poste rekomenciĝis la pafado kaj la dommastrinoj kaj la rigardemuloj kuris por atingi sekuran lokon.

> «Oni luktis straton post strato, domon post domo, per fusiloj, per mitraloj, per mangrenadoj.»[176]

Dum la tuta tago la batalo estis de ekstrema perforto. Sieĝatoj kaj sieĝantoj, ambaŭ tendaroj sange luktis en preskaŭ la tuta urbo. La «fortoj de la ordo», policistoj, stalinistoj, ekstremaj naciistoj de Kataluna Ŝtato sieĝis la Telefonan Centralon, la sidejojn de kelkaj organizaĵoj, kiel tiu de LPMU, kaj siavice estis sieĝitaj de la volontarmeanoj de NKL kaj LPMU en la grandaj hoteloj de la centro de

175Peirats, citita verko, 2ª volumo, paĝo 144.
176Marcel Ollivier, citita verko.

Barcelono, kiujn ili okupis, en siaj kazernoj kaj siaj sidejoj. Dum la tago, pluraj centoj da Civilgvardianoj, barikaditaj en la parko, estis ĉirkaŭitaj kaj preskaŭ neniigitaj de anarĥiistaj volontarmeanoj. Ĉi tiuj volontarmeanoj mem sukcesis senarmigi kaj malliberigi 400 Gvardianojn de Sturmo en la popolaj kvartaloj de Barcelono. Sed la situacio restis konfuza sen tio, ke estis ia klara avantaĝo por iu el la tendaroj dum la tuta tago.

> «Sub la printempa suno, ili luktis, sin mortigis sen paŭzo. Sur la stratoj, kiuj estis tute senhomaj, nur cirkulis la blenditaj aŭtoj de IAF, la aŭtoj de la organizaĵoj, kiuj rapide pasis, salutitaj de pafŝprucoj kaj la ambulancoj, kiuj venis ĉe la barikadoj por preni la mortintojn kaj la vunditojn kaj poste transporti ilin en la hospitalon, kie tre baldaŭ ilia nombro imprese altiĝis. La kuracistoj estis superŝarĝitaj de laboro. Oni devis turni sin al la ekstera helpo.»[177]

Povas surprizi la rapideco kaj la decido per kiuj la volontarmeanoj de NKL kaj IAF kaj la volontarmeanoj de LPMU –almenaŭ unufoje unuiĝintaj, aŭ preskaŭ- ĵetis sin kontraŭ la fortoj de polico kaj la kruelego per kiu ĉi tiuj lastaj klopodis por submeti ilin. Se ni lokiĝas en la kampo de la «kontraŭfaŝisma milito» aŭ eĉ en tiu de la «respublika leĝeco», ĉi tio povas ŝajni absurda aŭ kriminala. Sed ĝuste tiu rapideco kaj tiu decido ŝajnas la palpebla pruvo de ĉio, kion ni ĵus diras: ene de la milito kaj la respublikana kampo, disvolviĝis akra konflikto de antaŭ monatoj, «milito de klasoj», kiu jam kaŭzis nekalkuleblajn bataletojn kaj kiu, dum tiuj tagoj de majo 1937, eksplodis per ĝia tuta krudeco. La sorto de la socia revolucio estis en danĝero kaj tial la laboristoj ĵetis sin en la barikadojn per tiom da firmeco kaj ne perdante minuton en «intertraktadoj» nek misprezentoj. Ĉar ne estis minuto perdota.

177Sama verko.

La Staboj, la gvidaj burokrataroj sin okupis fari tiujn intertraktadojn. Noktiĝis kaj ŝajnis, ke la kataluna Registaro vekiĝis de sia letargio. Kunvenintaj ĝiaj membroj, ili decidis, ke jam ne estis Registaro, ke ĉi tiu estis trenita de la ŝtormo. Endis formi novan Registaron.

> «Dume urĝis haltigi la amasbuĉadon. Vidiella, en nomo de ĜUL, Vázquez, en nomo de la Nacia Komitato de NKL, ĵetis per radioelsendo kortuŝajn alvokojn petegante al la luktantoj, ke ili ĉesu kun la pafado, dum oni klopodis por atingi interkonsenton. La anarĥiistaj ministroj de la centra Registaro, García Oliver kaj Federica Montseny, kiuj tute rapide venis de Valencio, apogis tiun alvokon per ĉiuj siaj fortoj.»[178]

Tiel do, dum la aktivuloj de ambaŭ tendaroj dediĉis sin al spontanea perforta batalo, iliaj estroj plu interdiskutis, tiel klopodante por veni en interkonsenton, kiel por eltiri profiton el la situacio. Companys postulis, antaŭ ol atingi iun interkonsenton, la retiriĝon de la armitaj laboristoj. Tarradellas (Unua Konsilanto) apogita de Companys rifuzis eksigi "Rodríguez Sala"-on kaj Ayguadé-on, kiel postulis la anarĥiistoj.
De la mikrofonoj instalitaj en la Palaco de la kataluna Registaro, la parlamentanoj de la partioj kaj organizaĵoj faris je la mardo 4-a senesperan alvokon al la luktantoj por ke ili haltigu la batalon. Rafael Vidiella, gvidanto de USPK kaj membro de la kataluna Registaro deklaris:

> «Nepras, ke ĉiuj laboristoj ŝanĝu sian sintenon. Nepras, ke ili demetu la armilojn, ke ĉesu la pafado. Ke ĉiu konservu siajn poziciojn, tamen pafante eĉ ne solan pafon. Ni havas la certecon, ke ni trovos definitivan solvon ĉi tiun nokton mem. Laboristoj: ni

178Sama verko.

> havas fortojn pli ol sufiĉajn por venki la nacian kaj internacian faŝismon, sed per fratomortiga sinteno, kiel tiu okazanta, ni ne povas atingi la definitivan venkon.
> Endas ĉesigi la pafadon. Ni serĉos ĉi tiun solvon hodiaŭ mem. Katalunoj, laboristoj, kontraŭfaŝistoj ĉiuj: Vivu la unuiĝo de ĉiuj laboristoj por definitive venki la nacian kaj internacian faŝismon! Vivu Katalunujo! Vivu la Respubliko! »[179]

García Oliver, la anarĥiista gvidanto, ministro de la centra Registaro kaj unua sendito de ĉi tiu por solvi la konflikton, deklaris siaflanke:

> «Kamaradoj: por la kontraŭfaŝisma unuiĝo, por la proleta unuiĝo, por kiuj falis dum la lukto, vi ne prenu en konsidero la provokojn. Ne praktiku ĉi-momente la kulton al la mortintoj. Ke ne estu la mortintoj, la pasio al la mortintoj, al viaj falintaj fratoj, kio vin neebligas ĉi-momente ĉesi kun la pafado. Ne faru kulton al la mortintoj. En ĉiu enlanda milito, kiel tiu, kiun ni travivas, ĉiam estas mortintoj. Ĉiuj mortintoj de la kontraŭfaŝisma familio havos la saman gloron, havos la saman honoron. Tiel, kiel mi ĝin al vi diras, mi ĝin pensas. Vi komprenu min, vi sufiĉe konas min por pensi, ke ĉi-momente mi nur agas pro impulso de mia tute libera volo, ĉar vi sufiĉe konas min por esti konvinkitaj, ke neniam, nek antaŭe nek nun, nek estontece, iu sukcesos eltiri el miaj lipoj deklaron, kiu ne estas sentita. Jes, dirinte ĉi tion mi devas aldoni: ĉiuj, kiuj mortis hodiaŭ estas miaj fratoj; mi klinas antaŭ ili kaj ilin kisas. Ili estas viktimoj de la kontraŭfaŝisma lukto kaj mi kisas ĉiujn egale. Sano, kamaradoj, laboristoj de Katalunujo!»[180]

179Peirats, citita verko, 2ª volumo, paĝo 146.
180Sama verko, paĝo 146.

Kiel ne! Anstataŭ marĉandi pri kisoj, García Oliver ilin destinas al ĉiuj mortintoj, policistoj aŭ armitaj laboristoj! Kial? Unuj kaj aliaj mortis defendante aŭ kredante defendi, kion? Tio ŝajnas, ke al li interesis nek malmulte nek multe. Koncerne lian insiston paroli pri lia sincereco, tio klariĝas pro la famo, kiu cirkulis inter la aktivuloj de NKL-FAI, laŭ kiu li praktike estis malliberigita de la fortoj de la kataluna Registaro kaj sekve ne libere parolis.
Sed ne estis tiel. García Oliver, ministro de la centra Registaro, uzis la saman demagogian lingvaĵon, ke Rafael Vidiella, instigante, ke ĉesu la pafado, nur ke ĉesu la pafado, kvazaŭ la sanga batalo ne havus celon, kvazaŭ iel estus frenezo, kiu endanĝerigus la supozitan kontraŭfaŝisman unuiĝon kaj malfortigus ĝin fronte al la frankistoj. Kio estis vera. Sendube tiu «fratomortiga» batalo neniel plifortigis la «respublikanan kampon». Sed tio, kio interesas, estas scii kiel kaj kial oni venis al tia ekstremo kaj kio estis, kio vere intervenis en ĉi tiu «enlanda milito ene de la enlanda milito».
Dum la tuta nokto de la 4-a ĝis la 5-a de majo, dum la luktantoj restis vizaĝ-al-vizaĝe, en la Palaco de la kataluna Registaro sin sekvis la intertraktadoj karakterizitaj de la alvokoj al la trankvileco, kiujn la gvidantoj ĵetis per radioelsendo. Kiaj sorĉolernantoj, la stalinistoj kaj ties aliancanoj, kiuj per simpla polica operacio volis eltiri iom pli da potenco el la laboristaj komitatoj, troviĝis fronte al la armitaj laboristoj. Nun endis atingi la celon: definitive detrui la revolucion. Siaflanke la anarĥiistaj gvidantoj ŝajnis esti tute superitaj de la okazaĵoj. Unu post alia, krom la jam cititaj Vidiella kaj García Oliver, Federica Montseny, Toryho, direktisto de «*Solidaridad obrera*», la komisaro pri Propagando de Esquerra, Miravitlles, kaj la prezidanto Companys mem, sin sekvis tiun nokton en la radioondoj. Companys, en sia parolado, kiu estis diskonigita de radioelsendo, malkonfirmis la operacion kontraŭ la Telefona

Centralo efektivigita de sia policestro, la stalinisto Rodríguez Sala. Sed en la intertraktadoj de tiu nokto, kiu okazis en la sidejo de la kataluna Registaro, Companys postulis kiel antaŭa dispono al ajna interkonsento, ke la armita popolo retiriĝu de la strato. Siaflanke la anarĥiistoj nur petis, ke oni al ilin certigu la eksigon de Rodríguez Sala kaj Ayguadé. Ili atingis interkonsenti neniun punkton.

**MERKREDO 5-AN DE MAJO**

«...Obeante la ricevitajn instrukciojn, la laboristoj restis en siaj postenoj atendante la rezulton de la registaraj interkonsiliĝoj.»[181] Ĉar ĉi tiuj atingis nenian rezulton, la batalo plu daŭris.

Same kiel la antaŭa tago, la dommastrinoj matene eliris per granda singardeco por realigi siajn aĉetojn kaj la komercistoj, kiuj momente malfermis siajn vendejojn, rapidis riglis ilin tuj kiam aŭdiĝis la unuaj pafoj.

Ŝajne la lukto estis eĉ pli perforta ol tiu de la antaŭa tago. Furiozigitaj de la suferitaj perdoj, la kontraŭuloj kruelege luktis en la kvartaloj de Barcelono. Ĉie patroloj el knaboj (kaj ankaŭ el knabinoj) iris en siajn barikadojn aŭ partoprenis en la neatenditaj atakoj kontraŭ la konstruaĵoj okupitaj de la stalinistoj kaj la policaj fortoj.

Tamen dum tiu tago la revoluciaj fortoj suferis du malvenkojn: la Civilgvardio prenis la Stacidomon de *Francia* okupita de la anarĥiistoj, kaj la dungitoj de la Telefona Centralo, post du tagoj de sieĝo, kapitulacis al la Gvardianoj de Sturmo.

> «(...) La divizioj de la militfronto, sciinte tion okazantan, proponis iri al Barcelono. La Regiona Komitato de NKL deklaris, ke ĝi momente ne ilin

181Marcel Ollivier, citita verko.

bezonis, sed ke se ilia interveno necesus, ĝi ilin avizus.»[182]

Fakte -ĉiuj atestantoj ĝin konfirmas-, la anarĥiistaj gvidantoj kaj LPMU jam estis decidintaj la retiriĝon. Tiun saman nokton la politikaj kaj sindikataj organizaĵoj ĵetis aliajn alvokojn petante al la laboristoj, ke ili forlasu la barikadojn kaj revenu en siajn hejmojn.
Oni komprenas, ke ĉi tiuj ripetataj alvokoj konfuzis la revoluciajn luktantojn. Ili, kiuj de la unua tago praktike ĉirkaŭis la policajn fortojn en la urbocentro, hezitis ĵeti sin en la finan sturmon. Kiel ili, ekzemple, estis atakontaj kaj prenontaj la Palacon de la kataluna Registaro, kiam iliaj propraj gvidantoj estis interne, dialogante kun la gvidantoj de iliaj kontraŭuloj?
La sinteno de la anarĥiistaj aktivuloj dum tiuj dramaj momentoj estas ĝuste la sama, kiun mi jam rimarkigis, kiam mi parolis pri la kolektivigoj. Ili ĵetis sin en la batalon fervore kaj spontanee. Ili alpropigis al si la tri kvaronajn partojn de la urbo. Sed ili atendis instrukciojn, atendis ordonojn de siaj respektegitaj estroj! Kiam ĉi tiuj al ili ordonis, ke ili forlasu la barikadojn, ili rifuzis tion! Ili neniam lasos la barikadojn, nek tiun tagon, nek la alian, malgraŭ ĉiuj alvokoj de siaj estroj. Tamen tiu seniluziiga atendo de revoluciaj instrukcioj kaŭzis iun heziton, iun necertecon, kiun la malamikoj utiligis por preni la Stacidomon kaj la Telefonan Centralon. Kompreneble tiu hezito okazis kune kun nenegebla fervoro en la batalo, sed ankaŭ ĉi-okaze tiu fervoro estis defenda. Ili atendis, ke iliaj estroj al ili donos entutan planon de atako, ĝeneralan kaj ofensivan strategion (ni povis vidi ke, kiam la «entuta plano» estis la pura kaj simpla retiriĝo, ili malakceptis ĝin) kaj, ĉar ili ricevis nenion similan, rezignaciis subtenante siajn barikadojn kaj siajn sidejojn, ne komencante la ĝeneralan kaj kunordigitan ofensivon. Ĉar la

182Sama verko.

multnombraj neatenditaj atakoj kaj la partaj venkoj de la antaŭa tago jam ne sufiĉis en tiu momento de la batalo.
Je la merkredo mem 5-a de majo, la kataluna aŭtonoma Registaro ope eksiĝis. Eblas demandi kion alian ĝi povintus fari. Posttagmeze la Regiona Komitato de NKL faris novajn proponojn:

> «Ĉesado de la atakoj. Ĉiu parto retenas siajn poziciojn. La polico kaj la civiluloj batalantaj ĉe ĝia flanko estas invititaj fari batalpaŭzon. Se ne plenumiĝas ĉi tiuj interkonsentoj, oni tuj avizos la respondecajn komitatojn. Oni ne prenos en konsidero la solajn pafojn. La defendantoj de la sindikatoj tenos sin trankvilaj, atendante novajn informojn.»[183]

Ĉi tiuj proponoj komence estis akceptitaj, sed praktike la registaraj fortoj ne ĉesis pafi. La Regiona Komitato mem de NKL-IAF, kunveninta en la sidejo de ambaŭ organizaĵoj, iam devis interrompi la kunsidon por partopreni en la defendo de la konstruaĵo, atakita de la registaraj fortoj. La situacio estis tre konfuza. En la vicoj de NKL-IAF iom post iom kreskis la malkontenton kontraŭ la respondecaj komitatoj, kiuj ne ĉesis ĵeti alvokojn por la trankvileco kaj ĉeso de la atakoj, kaj ne donis la plej malgrandan revolucian instrukcion, kiu estu iom logika. La ribelo kontraŭ tiu mallongatempe akordiĝema sinteno–ĉeso de la pafado kaj nenio pli- estis subtenita de la maldekstra opozicio de NKL, de ĉiuj tiuj, kiuj jam de antaŭ pluraj semajnoj, mallaŭdis la registaran «kunlaborecon» de la gvidantoj de NKL. En ĉi tiu opozicio lokiĝis grava sektoro de la Liberecanaj Junularoj, multnombraj komitatoj kaj grupoj de bazo en la entreprenoj kaj la kvartaloj tiel, kiel la «Amikoj de Durruti» (la sekvontaj okazaĵoj tamen pruvis, ke la plimulto de la aktivuloj de NKL-IAF hezitos malkaŝe kontraŭstari la «akordiĝemajn» instrukciojn de siaj gvidantoj)

183Peirats, citita verko, 2-a volumo, paĝo 147.

«La Amikoj de Durruti» ĵetis meze de la batalo la ideon formi Revolucian Estraron, kies ekzisto ŝajne estis nur simple teoria. Por ili tiu Estraro devis anstataŭi la katalunan Registaron, ĉar ili estis partianoj porti la lukton ĝis la fino, ĝis la preno de la potenco fare de la revoluciaj organizaĵoj. Ili postulis, ke «ĉiuj respondeculoj de la renversema provo manovrantaj sub la protekto de la Registaro estu pafmortigitaj. En la Revolucia Estraro endas akcepti LPMU-on, ĉar ĝi lokiĝis ĉe la laboristoj.»[184]

Batalante ĉe la barikadoj, ili sin dediĉis al intensa propagando por ke daŭru la lukto. Jen unu el iliaj plej diskonigitaj alvokoj:

> NKL - GRUPO DE LA AMIKOJ DE DURRUTI - IAF.
> »Laboristoj, postulu ĉi tion kune kun ni: revolucia direktantaro. La puno por la kulpuloj. La senarmigo de ĉiuj armitaj korpusoj partoprenintaj en la neatendita atako. La socialigo de la ekonomio. La malfondo de la politikaj partioj ribelintaj kontraŭ la laborista klaso! Ni ne cedu la straton! La revolucio antaŭ ĉio! Ni salutas niajn kamaradojn de LPMU, kiuj interfratiĝis kun ni surstrate. Vivu la socia revolucio! For la kontraŭrevolucio! »[185]

Ĉi tiuj alvokoj kaj la tuta aktiveco de la grupo de la «Amikoj de Durruti» estis denuncitaj de la Regiona Komitato de NKL, kiel provokoj. La grupo poste estis forpelita el NKL. Laŭ Peirats, tiu grupo neniam havis la gravecon, kiun kelkaj eksterlandaj komentariistoj volis doni al ĝi. «La kaŭzo de la malforta influo de la "Amikoj de Durruti" (skribas Peirats) eble estas la malmulta graveco de ĝiaj komponantoj, la interveno de LPMU en ĝia sino kaj la marksisma inklino, kiun havis kelkaj el ĝiaj frapfrazoj.»[186] Sendube, por la anarĥiistoj, tiu «marksisma inklino» konsistis en la insisto

184«*L'Espagne Nouvell*e», n-ro 5 (22-an de majo 1937).
185Sama verko.

per kiu ili postulis la agunuiĝon kun LPMU, kaj ĝia frapfrazo pri «revolucia direktantaro», obseda temo de la hieraŭaj kaj hodiaŭaj trockiistoj. Krome la trockiistoj parolis per granda entuziasmo pri tiu grupo, kio povas pruvi, ke ĉu ili efektivigis la «enŝteliĝon» en tiun grupon aŭ havis bonajn rilatojn al ĝi. Tamen José Balius, gvidanto de la «Amikoj de Durruti», pledis kontraŭ ĉi tiuj «akuzoj» pri marksismo. La eta trockiista grupo de Barcelono (Bolŝevikisma Leninisma Sekcio de Hispanujo por la 4-a Internacio) disdonis ĉe la barikadoj, la 4-an kaj 5-an de majo, pamfleton ne tro malsaman al tiu de la «Amikoj de Durruti».

> «Vivu la revolucia ofensivo! Ne estu kompromisoj! La Respublika Nacia Gvardio (eks Civilgvardio) kaj la reakciaj Gvardianoj de Sturmo estu senarmigitaj. Ĉi tiu estas la decida momento. La proksima fojo estos tro malfrue. Ĝenerala striko en ĉiuj industrioj escepte de tiuj por milito ĝis la falo de la reakcia Registaro. La proleta potenco estas la sola, kiu povas atingi la militan venkon.
> Endas plene armi la laboristan klason. Vivu la agunueco NKL-IAF-LPMU. Vivu la revolucia fronto de la proletaro!
> Revoluciaj komitatoj de memdefendo en la vendejoj, fabrikoj, kvartaloj.»[187]

Kompreneble la ĝenerala striko spontanee komenciĝis ekde la 3-a de majo en Barcelono kaj multaj aliaj katalunaj urboj, tuj kiam oni konis la novaĵon de la sturmo al la Telefonkostruaĵo.
La sinteno de LPMU ree estis necerta. Samtempe ke ĝi ĵetis sin, per ĉiuj siaj fortoj, en la batalon –fortoj, kiuj estis konsiderinde pli malgrandaj ol la anarĥiistaj-, ŝajnas, ke ilin

186PEIRATS, J.: *Los anarquistas en la crisis política española* [hispane, La anarĥiistoj en la hispana politika krizo], Bonaero, Eldonejo *Alfa*, paĝo 249.
187Citita en Morrow, citita verko, paĝo 91.

timigis la situacio kaj ties eblaj konsekvencoj. Katalunujo, ili pensis, ne estas Hispanujo. Ili tre bone sciis, ke se la revoluciaj fortoj sukcesus preni la potencon en Katalunujo, la cetero de respublika Hispanujo ne ilin sekvus: el tio rezultus «triangula» situacio malfacila por la kontraŭfaŝisma kampo ĝenerale kaj, kiu nur profitos al la faŝistoj. Iel ajn ĉi tiuj estis la argumentoj, kiujn uzis Andrés Nin por bremsi la fervoron de la LPMU-aj luktantoj, kiuj kune kun la anarĥiistoj prave pensis, ke ili povis tute forbalai la policajn fortojn kaj la stalinistojn kaj iĝi la absolutaj mastroj de Barcelono, unue, kaj de Katalunujo, poste. Kaj tiel, laŭ la atesto de Wilebaldo Solano tiama sekretario de la Ibera Komunista Junularo (junularoj de LPMU), la fortoj de LPMU, anstataŭ ataki la centron de Barcelono, kiel ili pensis, konformiĝis defendi siajn poziciojn, kio samvaloris propra-vole lokiĝi en situacio de malvenkoto. La sekva alvoko de LPMU, se oni ĝin atente legas, tre bone reflektas tiun necertecon:

> «LPMU AL LA LABORISTA KLASO.
>
> Kamaradoj:
>
> Per la lukto de ĉi tiuj tagoj, la proletaro de Barcelono pruvis sian nerompeblan volon ne toleri la plej malgrandan kontraŭrevolucian provokon. Kiam ni liberigos nin de la malamiko, danke al la superba reago de la laborista klaso, endos “retiriĝi". Sed la retiriĝo nur povas efektiviĝi laŭ la sekvaj kondiĉoj:
>
> Retiriĝo de la publika forto el la stratoj
>
> La laborista klaso konservu siajn armilojn.
>
> La plenumo de ĉi tiuj kondiĉoj, kiuj estas facile akcepteblaj, povas fini la lukton kaj eviti senutilan sangoverŝadon kaj doni, al la kamaradoj luktantaj en la militfronto, la moralon kaj la fidon, kiujn ili tiom bezonas por lukti kontraŭ nia ĝismorta malamiko: la faŝismo.
>
> La Plenuma Komitato.»

Stranga strategio ĉi tiu, kiu konsistas en tio, ke «kiam ni liberigos nin de la malamiko» komenciĝos la «retiriĝo»! Ĉiuj hezitoj de LPMU ĉi tie restas reflektitaj.

* * *

Ĉi tiu tago de la 5-a de majo sendube estis la ĉefa punkto de la batalo. Kiel ni vidis, la kataluna Registaro matene abdikis, tiun vesperon mem la ĵurnalo «*La Noche*» publikigis la liston de la nova Registaro: aperis en ĝi Valerio Mas, sekretario de la Regiona Komitato de NKL, Antonio Sesé, ĝenerala sekretario de ĜUL de Katalunujo, Joaquín Pons, de la Unuiĝo de Farmantoj, Martí Feced, de RMK, taskito de la Publika Ordo. Sed en la lasta paĝo de la ĵurnalo, konciza noto komunikis la morton de Antonio Sesé.
La novaĵo estis diskonigita de radioaparato kaj la komentoj atingis la nedudeblan konkludon, ke la sekretario de ĜUL estis mortigita. Tuj USPK kompreneble akuzis la anarĥiistojn pri la mortigo. Ĉi tiuj lastaj ĝin rifuzis kaj «*Solidaridad Obrera*» (de la dimanĉo 9-a de majo) publikigis skemon de la irvojo sekvita de la du aŭtoj per kiuj veturis Sesé kaj la kamaradoj lin akompanintaj, laŭ kiu, la kugloj, kiuj mortigis Sesé-on, ne povis deveni de la anarĥiistaj barikadoj. Kompreneble tio ne estis definitiva pruvo. Estu kiel ajn, la «venĝoj», kiuj estis tre uzataj de kiam komenciĝis la bataloj, pliiĝis kaj multaj anarĥiistaj gvidantoj, kiel Domingo Ascaso kaj Camilo Berneri, tiel renkontis sian morton.
Tamen la morto de Antonio Sesé ŝajnas, ke estis, kiu kaŭzis pli politikajn agitadojn. Ĝia unua konsekvenco estis la malfondo de la nova Registaro antaŭ ol ĝi ekzistintus. La komunistoj komencis la ofensivon ne nur en Barcelono, sed ankaŭ en pluraj urboj kaj vilaĝoj de Katalunujo.
Tiun saman tagon, la radioaparato diskonigis manifeston subskribitan kune de la lokaj federacioj de la sindikatoj NKL kaj ĜUL, kiu diris:

> «La tragikaj okazaĵoj okazintaj en nia urbo dum la lastaj kvardek ok horoj neebligis, ke la tuto de la laboristoj de Barcelono ĉeestis en la laborposteno. La konflikto, kiu motivis ĉi tiun situacion eksternorman kaj malutilan por la kaŭzo de la proletaro, kontentige estis solvita de la reprezentantoj de la partioj kaj organizaĵoj kontraŭfaŝismaj kunvenintaj en la Palaco de la kataluna Registaro. Sekve la urbaj Federacioj de NKL kaj ĜUL prenis la interkonsenton alparoli ĉiujn siajn membrojn ordonante al ili, ke ili tuj reokupu siajn kutimajn laborpostenojn. Necesas reveni en la normalecon. Persisti en la industria senaktiveco samvaloras, en ĉi tiuj momentoj de kontraŭfaŝisma milito, kunlabori kun la komuna malamiko kaj malfortigi nin mem. Tiel do, oni ordonas al la laboristoj de NKL kaj ĜUL, sen ia escepto, ke ili reokupu la laborpostenon...»

Ĉi tiu stranga komunikaĵo, vaste diskonigita, havis la efikon dubigi la luktantojn de NKL. Ĝi parolis pri interkonsentoj, estis subskribita de organizaĵoj, kies aliĝantoj estis en sia plej granda parto malantaŭ la malamikaj barikadoj. Kaj ĉu eble estis vero? Kiuj estis tiuj interkonsentoj? Fakte ne estis alia interkonsento ol tiu efektivigita por la enpotenciĝo de Registaro, kiu naskiĝis morta.
«La policaj fortoj ree utiligis la impreson kaŭzitan de tiu noto por okupi novajn poziciojn. La ministro pri la Mararmeo, kiu estis akre mallaŭdita pro la senaktiveco de la militŝiparo, rapidis sendi al Barcelono plurajn militunuojn inter kiuj estis la destrojeroj Sánchez Barcáiztegui kaj Lepanto. Aliflanke oni ricevis novaĵojn pri la konfisko de la Publika Ordo fare de la centra Registaro kaj pri la sendo al Katalunujo de grandaj kvantoj de Gvardianoj de Sturmo de la militfronto de la rivero *Jarama*.

»Malsukcesintaj la pacigaj klopodoj fare de García Oliver kaj Mariano R. Vázquez, Ministro pri la Justeco kaj ĝenerala Sekretario de NKL respektive, Federica Montseny proponis al la centra Registaro sian personan intervenon antaŭ ol sendi la ekspediciajn fortojn. Endis ne sendi ĉi tiujn fortojn ĝis la momento kiam la ministrino pri Sanservo tion juĝos oportuna. Krome ŝi rifuzis esti eskortita dum sia vojaĝo al Barcelono per ŝoseo. Alveninte al la konfederacia sidejo de Katalunujo, ŝi tuj telefone kontaktis kun la kataluna Registaro, indikante ke, kiel reprezentanto de la centra Registaro, devis esti al ŝi garantiita la aliro al la prezidanta Palaco. Sed dum la vojiro, kiu estis semita de malamikaj barikadoj, kaj malgraŭ tiom da garantioj, kiuj al ŝi estis donitaj, estis blokita la paso al la ministrino kaj ties du solaj akompanantoj, kiuj mirakle savis sin de tute regula pafmortigo.
»La unuaj klopodoj de Federica Montseny, jam en ĉeesto de Companys, estis senigi ĉi tiun je lia posteno -dum daŭris ŝiaj klopodoj- en nomo de la Registaro de Valencio. Companys estis adoptanta sintenon de suspektema neŭtraleco.»[188]

* * *

Tiun saman tagon estis mortigitaj la italaj anarĥiistoj Camillo Berneri kaj Barbieri. La 11-an de majo, «*Solidaridad Obrera*» informis pri tiu mortigo - unu plia inter tiom aliaj!

> «Tiu sekreta kaj neregebla agado, kiu de antaŭ mallonge okazas en nia kontraŭfaŝisma zono, estis la kaŭzanto de tragedio plia: la morto de nia kamarado, la profesoro Camillo Berneri (...) Hieraŭ estis Mark Rein, la ĵurnalisto redaktisto de la "*Socia Democratic Kraten*", kiu malaperis de la Hotelo *Continental* de ĉi tiu urbo ricevinte du telefonvokojn. Hodiaŭ estis la kamarado Berneri, kies kadavro estis trovita la

188Peirats, citita verko, 2-a volumo, paĝo 151.

ĵaŭdon, distruita de kugloj, en la Hospitalo *Clínico* de Barcelono.»[189]

Farinte mallongan biografian resumon de Berneri, la ĵurnalo klarigas, kion oni sciis pri la detaloj de la mortigo.
Laŭ ĉi tiu artikolo, «du viroj kun ruĝaj brakbendoj» prezentis sin en la n-ro 2 de la Placo de la Anĝelo, kie loĝis Berneri, ties edzino, Barbieri kaj aliaj italaj anarĥiistoj. Post mistera pridemandado (ankoraŭ pli mistera pro la linioj cenzuritaj por neebligi, ke oni povus politike identigi la «virojn de la ruĝa brakbendo»), ambaŭ viroj deiris, por reveni posttagmeze kun ordono de priserĉo. La italaj anarĥiistoj al ili permesis, ke ili priserĉis. Ili prenis kelkajn paperojn kaj ordonis al la italoj tie ĉeestantaj, ke ili ne eliru «ĉar kontraŭe oni ilin akceptus surstrate per pafoj». Sekvatage (!!!) 5-an de majo, multnombra grupo de armitaj viroj prezentis sin en la domo kaj komunikis al Berneri kaj Barbieri, ke ili estis arestitaj. Ambaŭ protestis. «Ŝajnas, ke vi estas kontraŭrevoluciuloj» oni al ili diris, kaj forportis ilin. La 6-an matene la polico revenis en la domon kaj sciigis, ke la du anarĥiistoj estis liberigitaj kaj, ke ili revenos en iu ajn momento. Sed ili ne ĝin faris. «Tiun saman tagon, la familioj de la du malaperintoj sciis, per la slipo de la Hospitalo *Clínico*, ke iliaj du korpoj, distruitaj de kugloj, estis prenitaj de la Ruĝa Kruco en la ĉirkaŭaĵoj de la sidejo de la kataluna Registaro, dum la nokto de la 5-a al la 6-a de majo.» Ili estis mortigintaj de malantaŭe, per pafo en la nukon. La «*Révolution Prolétarienne*» de la 10-a de Junio 1937 skribis ĉi-rilate:

«Li ricevis unuan avizon post la publikigo de sia malfermita letero al Federica Montseny. Antonov-Ovsenko estis kiu lin avertis pere de la kataluna

189«*Solidaridad Obrera*» (11-an de Majo 1937).

Registaro. Berneri komunikis ĉi tiun fakton al siaj amikoj de Parizo.»[190]

Ĉi tiu ne estas pli ol unu el la multnombraj krimoj faritaj en Katalunujo de la rusaj sekretaj servoj, kiuj virtuale superregis tiun «sekretan kaj neregeblan aktivecon» pri kiu tiel modeste parolis «*Solidaridad Obrera*». Ĉar Berneri estis unu el la plej elstaraj figuroj de la anarĥiista revolucia opozicio, iel estis normale, ke li estis unu el la celoj de la stalinista politika subpremado direktita de Antonov-Ovsenko (la malnova militista respondeculo de la Soveto de Petrogrado iĝinta policisto), kaj ĉefe de Geröe. Iliaj gravaj viroj, membroj de USPK, kelkfoje konsistigis aŭtentikajn paralelajn policojn kun ties privataj malliberejoj, la «ĉokoj», kaj kelkfoje formis parton de la oficiala polico de la kataluna Registaro, kiu estis forte regita de la stalinista partio kaj, kiu krome estis direktita de unu el ĝiaj membroj: Rodríguez Sala. Berneri sciis ĉion ĉi, devis scii ĝin, tial ne ĉesas ŝajni al ni tre mirinde, ke li restis kune kun ties amikoj en tiu domo de la Placo de la Anĝelo post la unua vizito de la viroj kun ruĝaj brakbendoj, kiam preskaŭ duono de la urbo estis plenplena de barikadoj kaj en manoj de la anarĥiistaj volontarmeoj. Ĉu ili estis ĉirkaŭitaj? Ĉu estis neniu eblo de fuĝo? Tio ne tre bone kompreniĝas.

## ĴAŬDON 6-an KAJ VENDREDON 7-an DE MAJO

«Dum la mateno de la tria tago estis iu hezito. Parto de la luktantoj, lacaj kaj seniluziigitaj, revenis hejmen. Sub la protekto de la aktiveco ekzistanta dum la unuaj horoj de la mateno, kelkaj tramoj aŭdacis eliri el siaj garaĝoj. Ili glate veturis sur la strato *Salmerón* ĝis la Promenado de *Gracia*, sed tie ili estis akceptitaj de pluvo el kugloj, kiu ilin devigis malantaŭeniri.

190«*La Révolution Prolétarienne*» (10-an de Junio 1937).

»Kio okazis? Tio jena: La “Amikoj de Durruti”, kontraŭ la ordonoj de la Regiona Komitato de NKL, deklaris sin favore al la daŭrigo de la lukto. Ĉi tiu instrukcio nedubeble respondis al la deziro de la homamasoj. La barikadoj, momente forlasitaj, ree estis okupitaj, la fusiloj ree elstaris super la ŝirmiloj. La malforteco de la Registaro estis tia, ke ĝi ne sciis utiligi la momenton de trankvileco por preni novajn poziciojn. Informita pri la situacio LPMU, kiu, sekvante la instrukcion de NKL, urĝis la laboristojn, ke ili ĉesu la lukton kaj revenu en siajn laborpostenojn, sendis kontraŭordonojn telefone. La Registaro, ĉiam sieĝita en sia palaco, pruvis sian absolutan senpovecon.
»Kaj la pafado rekomenciĝis. Sed oni jam ne sciis kial oni luktis. Por reakiri la Telefonkonstruaĵo, kiu estis en manoj de la Gvardianoj de Sturmo, endus uzi la pezan artilerion kaj apenaŭ ĝi ja estis en la militfronto. Koncerne la prenon de la potenco, kiel petis la “Amikoj de Durrutí” por postuli la enpotenciĝon de Revolucia estraro kaj la senarmigon de la Gvardianoj de Sturmo, tio ne povis fariĝi sen la subteno de NKL. Kaj ĉi tiu, anstataŭ deziri intensigon de la lukto, multigis la alvokojn al la trankvileco. Post horoj la silento, kiu reĝis sur la Placo de Katalunujo, tre baldaŭ etendiĝis ĝis la urborandoj. En la Hospitalo *Clínico* estis jam pli ol 500 mortintoj kaj miloj da vunditoj, kaj oni ne nombras tiujn, kiuj jam bandaĝitaj, revenis en siajn hejmojn.[191]
»Dume la radioaparato anoncis, ke la Registaro de Valencio, pro la graveco de la situacio, decidis okupi sin pri la restarigo de la publika ordo en Katalunujo (...).
»La lukto estis finita. Kaj tamen, kontraŭ ĉiu espero, neniu revenis en la laborpostenon. La luktantoj restis en siaj postenoj. Kion ili atendis? Ke finiĝos la limtempo fiksita de la “Amikoj de Durruti” por ke la Registaro akceptu ultimaton. Se ĉi tiu ne cedis, ili minacis sturmi la sidejon de la kataluna

191Pri la politikaj mortigoj, vidu 12-an aneksaĵon.

Registaro. La tuta ĵaŭdo tiel pasis, oni atendis revenon en la lukton. Sed nenio okazis.[192]»

Tiun saman tagon, por respondi la kolerigitajn akuzojn de la stalinistoj kaj de ties multnombraj partianoj pri la «kontraŭrevolucia puĉo manipulita de la frankista Kvina Kolono», NKL-IAF publikigis ampleksan komunikaĵon al la «tutmonda konscienco». Jen fragmento de ĝi:

> «Ĉiuj homoj ŝajnas esti konvinkitaj pri tio, ke la anarĥiistoj kaj la sindikatistoj estas la kulpuloj de la tragikaj okazaĵoj de Barcelono. Nenio estas pli falsa ol ĉi tiu opinio. NKL kaj IAF ĉiam estis pretaj, samkiel ili estas nun, ne nur subteni la publikan ordon, sed ankaŭ la necesan unuiĝon inter la amikoj de la libereco, inter ĉiuj demokratiaj fortoj de la hispana popolo» (...).
> «Ni estis kaj estas konvinkitaj, ke nia celo -la liberecana komunismo en la Libera Ibera Federacio, kaj la detruo de la kapitalismo ne povas realiĝi tuje...»

Akuzinte, sed ne menciinte ĝin, KPH-on voli starigi diktatorecon de partio, ĉi tiu alvoko, destinita pli ekstere ol interne, rakontis la faktojn, kiuj komenciĝis kun la sturmo al la Telefonkonstruaĵo. Ili ne volis tion, ili, honestaj kontraŭfaŝistoj kaj servantoj inklinaj al la porrespublika kaŭzo, ne faris pli ol defendi sin:

> «La Regiona Komitato de NKL kaj IAF ĉiam publike deklaris kaj ripetis ĝin en siaj instrukcioj, ke la laboristoj ne atakas la publikan forton kaj ankaŭ ne atakas la Katalunan Registaron, ĉar ili mem formas parton de ĝi kaj estas unu el iliaj pli fortaj plejmultoj.

192Marcel Ollivier, citita verko.

»Oni povus doni dekduojn da pruvoj, kiuj pruvas nur la pasivan deziron defendi sin. Sed por nenio utilis ĉio ĉi.»[193]

Dum la nokto de la 6-a, NKL kaj IAF faris novajn proponojn, tre similajn al la antaŭaj: la luktantoj de ambaŭ tendaroj retiriĝus el la barikadoj. Ĉiuj malliberuloj kaj ostaĝoj devus esti liberigitaj. Oni adoptus neniun subpreman disponon kontraŭ iu. Ili proponis al la kataluna Registaro kaj ties aliancanoj limtempon de tri horoj por konigi ilian vidpunkton. Sed ĉi tiuj lastaj prokrastis la respondon dum pluraj horoj, sendube ĉar ili atendis la helpotrupojn senditajn de la centra Registaro. La kolono de helpotrupoj alproksimiĝis al Barcelono, sed ĝi malfruiĝis «restarigante la ordon» survoje, ĉefe en la zono de *Tortosa*, kie ĝi efektivigis sangan subpremon kontraŭ la lokaj anarĥiistoj, malgraŭ ĉio, kion oni promesis al Federica Montseny. La gvidantoj de NKL-IAF de Barcelono minacis neebligi la pason al la kolono se ĝi ne respektis la interkonsenton kaj se daŭrigis siajn subpremajn aktivecojn. Fine, je la 4 h. 45 matene de la vendredo 7-a, la kataluna Registaro akceptis la proponojn de pafadĉeso.

Tuj NKL komunikis per radioaparato al siaj aliĝantoj, ke oni atingis interkonsenton kaj, ke endis ne «cedi al la eblaj provokoj». Tamen, estis novaj bataletoj dum la mateniĝo, ĉar neniu el la fortoj en konflikto volis esti la unua forlasi siajn barikadojn. Fine, post la naŭ matene de la vendredo 7-a, la anarĥiistoj, laŭ Peirats, donis la ekzemplon kaj forlasis siajn barikadojn kun «armiloj kaj ekipaĵoj». Krome la loĝantoj de Barcelono, aŭdinte per la radioaparato la novaĵon pri la interkonsento, amase eliris surstraten, tiel akcelante la malmobilizon kaj la forlason de la barikadoj. Malgraŭ ĉio aŭdiĝis kelkaj solaj pafoj dum tiu tago.
Je la 20.30 horoj de la vespero de la 7-a, la kolono de gvardianoj kaj policistoj sendita de la centra Registaro,

193Peirats, citita verko, 2-a volumo, paĝo 153.

eniris en Barcelonon kriante: U.P.F. (Unuiĝu Proletaj Fratoj). «Ili konsistigis karavanon de 120 kamionoj plenplenaj de heterogenaj uloj (5.000 gvardianoj). Pruvo de tio estas, ke kiam ili paradis antaŭ la konstruaĵo de la Regiona Komitato, direkte al la Ĉefpolicejo, estis pafoj al tiu konstruaĵo kaj samtempe krioj de «Vivu IAF!»[194].

Cetere la anarĥiistoj al si faris multajn iluziojn pri la objektiveco de tiuj helpotrupoj, ĉar ties komandanto, la leŭtenanto kolonelo Emilio Torre Iglesias, estis la militista konsilanto de la kolono de NKL «*Tierra y Libertad*». Li venis tiun saman tagon en Barcelonon per aviadilo kaj okupis sin je la Direktantaro pri la publika Ordo, anstataŭante "Rodríguez Sala"-on, sed en nomo de la centra Registaro.

Ĉi tiu ofendo al la kataluna aŭtonomeco rilate la Publikan Ordon estis akompanita de simila dispono rilate la militistajn operaciojn. Efektive la Registaro de Valencio enoficigis la Generalon Pozas superan estron de la katalunaj armitaj fortoj kaj de la militfronto de Aragono. Pozas, malnova estro de la Civilgvardio, alianciĝis al KPH, kiel multaj aliaj militistoj.

> «Tiel finis, skribas Marcel Ollivier, la sangaj majaj okazintaĵoj. Ili montris la forton de la anarĥiistoj kaj la heroecon de ties trupoj. Sed ankaŭ la hezitemon de iliaj estroj, ilian malmultan respondecon, ilian plenan nekomprenon pri la politikaj problemoj. Kvankam la komploto sekrete farita de Antonov-Ovsenko, kun la kunpartopreno de la Prezidanto Companys kaj de la respublikanaj partioj por detrui NKL-IAF malsukcesis, almenaŭ havis la efikon plifortigi la aŭtoritaton de la Registaro de Valencio fronte al la revolucia Katalunujo. Endis urĝi sin por utiligi tiun situacion. Tuj kiam eniris en Barcelonon la trupoj de Valencio, la stalinistoj, kiuj dum la lukto limiĝis resti ene de siaj

194Sama verko, paĝo 155.

konstruaĵoj kuraĝe kaŝante sin malantaŭ la Gvardianoj de Sturmo, laŭte petis, ke oni eksterleĝigi LPMU-on, tiun senvalorulon, tiun senmoralulon, de kiu devenis ĉiuj malbonoj...[195]»

**LA MAJAJ OKAZINTAĴOJ EN LA KATALUNA REGIONO**

Kvankam la plej gravaj okazaĵoj de la «enlanda milito ene de la enlanda milito» okazis ene de Barcelono mem, ankaŭ okazis grandaj interokazaĵoj en pluraj katalunaj urboj. Ni memorigu, ke en Marto kaj Aprilo jam estis kelkaj sangaj kvereloj, ĉefe en *Puigcerdá* kaj *La Fatarella*. Ankaŭ povas surprizi la ne-interveno observita de la kolonoj de eksvolontarmeanoj transformitaj en Diviziojn de la Nova Armeo plejparte anarĥiistaj, kiuj regis la militfronton de Aragono aŭ, kiuj estis enkazernigitaj en pluraj lokoj de Aragono kaj Katalunujo. Fakte tiu ne-interveno klariĝis pro la sinteno de la gvidantoj de NKL kaj LPMU.

Efektive de la 5-a de majo, «anoj de NKL de la 26-a divizio kaj la anoj de la 29-a divizio de LPMU, kiuj koncentriĝis en *Barbastro* por iri al Barcelono, koninte la okazaĵojn, ne transiris *Binefar*-on: la delegitoj de la Regiona Komitato de NKL sukcesis persvadi la estron de la 26-a divizio, Gregorio Jover, pri tio, ke endis eviti ajnan agresan agon. Post kelkaj hezitoj estis alia gvidanto de NKL, Juan Manuel Molina, subsekretario pri Defendo de la kataluna Registaro, kiu sukcesis persvadi la anarĥiistan oficiron, Máximo Franco, por ke li haltigu siajn virojn en *Binefar*»[196].

Siaflanke LPMU same faris kun siaj trupoj de la 29-a divizio. Dum la radioelsendoj de la kataluna Registaro ĉiuhore kriegis akuzojn kontraŭ la «reakcia puĉo stimulita de la frankista Kvina Kolono» por klarigi la surstratajn batalojn, la anarĥiistaj gvidantoj, implikiĝintaj en la intertraktado, ne volis aperi kiel kulpaj «malplenigi» la militfronton kaj saboti

195Marcel Ollivier, citita verko.
196Broué kaj Temime, citita verko, paĝoj 261-262.

la daŭrigon de la milito. Koncerne LPMU-on, ĝi estis tro malforta kaj vundebla por preni tian respondecon per si mem. Sekve kiam la anarĥiistaj soldatoj akceptis interrompi sian marŝon al Barcelono, ili ilin imitis. La rezulto de la surstrataj bataloj estintus tre malsama se neniu el la du obeintus...

La sangaj luktoj de Taragono kaj *Tortosa* havis la saman komencon, ke tiuj de Barcelono. La 5-an de majo, je la 8-a matene la polico sin prezentis en la konstruaĵoj de la Telefonkompanio de ambaŭ urboj, kiuj, samkiel tiu de Barcelono, estis direktitaj de Komitato pri Kontrolo NKL-ĜUL. La okupo de la konstruaĵoj de la Telefonkompanio fare de la polico donis la signalon de la batalo.

En Taragono, la policistoj «jam posedante la konstruaĵon surprenis la administradon de la internaj kaj eksteraj komunikoj, malkonektante la telefonojn de la konfederacia kaj anarĥiista organizaĵo».

«Kvar horojn poste, okazis en la Militista Komandantarejo intervidiĝo inter la kamarado Casanovas, reprezentanto de la kamaradoj de Telefonoj, kaj la leŭtenanto kolonelo, estro de la fortoj de la marbordo.»[197]

Ĉi tiu intervidiĝo estigis strangan kompromison pro kiu la policistoj retiriĝos de la etaĝoj, kie troviĝis la getelefonistoj, sed ili konservos la vestiblon. Tamen la delegito pri Publika Ordo de Taragono malakceptis la interkonsenton pro la rigoraj ordonoj ricevitaj de Barcelono. Dum rekomenciĝis la intertraktadoj, la aktivuloj de NKL konstatis -ĉiam laŭ «*Solidaridad Obrera*»-, ke multaj personoj eniris en la sidejon de RMK kaj eliris armitaj. Tio sama okazis, kvankam pli diskrete, en la sidejo de USPK kaj en la Domo de la Popolo.

Sekvatage la sidejo de la Liberecanaj Junularoj estis atakita. Sed iliaj defendantoj plene rezistis kaj repuŝis la

197«*Solidaridad Obrera*» (14-an de majo 1937).

atakantojn. La lokaj gvidantoj de NKL petis kunvenon de ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj kaj la reprezentantoj de la polico kaj la armeo. USPK kaj ĜUL rifuzis diskuti kun la anarĥiistoj.

Posttagmeze de la 6-a, la sidejo de la Liberecanaj Junularoj estis ree atakita, ĉi-foje, de pli multnombraj fortoj. La atako triumfis. Du delegitoj de NKL, Castelló kaj Rueda, kiuj ĵus alvenis al Taragono, ree petis kunvenon de la kontraŭfaŝismaj organizaĵoj. Ĉi-foje kompreneble ĝi povis okazi, ĉar la liberecanaj fortoj militiste estis en malbona pozicio.

La delegito de la centra Registaro, la kapitano Barbetá, kiu komandis la respublikan aviadilaron de la flughaveno de *Reus*, deklaris, ke li ricevis ordonojn de Valencio por ke li uzu ĉiujn armilojn, eĉ la aviadilaron, por submeti kaj senarmigi la aktivulojn de NKL-IAF. Ĉi tiuj lastaj, ĉiam laŭ la raportaĵo publikigita de «*Solidaridad Obrera*», akceptis transdoni siajn armilojn ĉiam, kiam la aliaj organizaĵoj faris tion saman. Sed la kapitano Barbetá rifuzis tion, ĉar la aliaj organizaĵoj defendis la Registaron dum la anarĥiistoj ribelis kontraŭ ĝi. Post longaj diskutadoj, la NKL-anoj tute cedis: ili transdonis ĉiujn siajn armilojn nur petante kontraŭ tio la liberigon de la arestitoj apartenantaj al sia tendaro kaj la libero uzi siajn ejojn.

«La cetero de la tago, kiam okazis ĉi tiuj kunvenoj, pasis trankvila, sed je la sekvataga tagiĝo, ĉirkaŭ la 3-a matene, neatendite, Gvardianoj de Sturmo kaj polico perforte okupis la Konsilantarejon de Interna Defendo, laŭ ili pro superaj ordonoj ricevitaj. Kaj kvazaŭ tia sturmo estus konvenita signalo, tiam komenciĝis la plej malmolaj reprezalioj kontraŭ la aktivuloj de NKL kaj IAF, tiel rompante la parolon donitan de la aŭtoritatoj. Baldaŭ la ĉirkaŭaĵoj de la loĝloko restis

semitaj de kadavroj de elstaraj aktivuloj de nia organizaĵo. Jen kelkaj el la trovitoj...»[198]

Sekvas listo de dekkvin nomoj de respondeculoj, en sia plej granda parto, lokaj. Evidente la raportaĵo finiĝas per 22 linioj forstrekitaj de la cenzuro...

* * *

En *Tortosa* la skemo preskaŭ estas la sama. La polico okupis la konstruaĵon de la Telefonkompanio donante tiel la signalon de la batalo. Surstrata batalo interrompita de la intertraktadoj. Tamen, en *Tortosa*, NKL atingis venki la surstratajn batalojn, arestis la policistojn kaj prenis en sia mano la administradon de la urbo. Sed la kolono de Gvardianoj de Sturmo sendita de Valencio por ke regu la ordo en Barcelono trapasis ĝin kaj ĝuste haltis la bezonan tempon por restarigi la ordon. La aktivuloj de NKL kaj IAF estis arestitaj kaj ties ejoj prirabitaj.

La anarĥiistaj gvidantoj de la urbo estis portitaj, kun piedoj kaj manoj ŝnurligitaj, al «nekonata celo». Iliaj kadavroj aperis en la ĉirkaŭaĵoj de Taragono, ĉerande de la vojoj...

> «Similaj okazaĵoj okazis en pluraj vilaĝoj de la distrikto de *Vich*. Ĉi tiu distrikto estas unu el la pli reakciaj de Katalunujo pro la tradicia influo de la klerikalismo. NKL estis la sola liberala organizaĵo ekzistanta en tiu tradiciisma fokuso. Ĝiaj malamikoj trovis la plej bonan manieron lukti kontraŭ la popolo kuniĝante kun la unuoj de Gvardianoj de Sturmo kaj karabenistoj, kiuj portis al *Vich, Manlleu, Bisura de Ter, Montesquiu, La Farga de la Llosas* kaj aliaj vilaĝoj la konsekvencajn kaj precizajn instrukciojn de provoko. La rezulto estis unusola fronto el policistoj kaj karlistaj soldatoj kontraŭ NKL kaj ties aktivuloj. La ejoj de ĉi tiu organizaĵo estis kure atakitaj kaj

198Sama verko.

frakasitaj ties uzaĵoj. Troviĝintaj inter du fajroj, la konfederacianoj devis amase forlasi la distrikton post senespera lukto...»[199]

## LA VIDPUNKTO DE KRIVITSKI PRI LA «MAJAJ OKAZINTAĴOJ»

Jen kion diras Walter Krivitski en sia libro Agento de Stalino pri la rolo de la sovetiaj sekretaj servoj en la majaj okazintaĵoj de Barcelono.[200]

> «En Aprilo 1937, Stachevski venis al Moskvo por informi Stalinon pri la situacio de Hispanujo. Kvankam stalinisto firma kaj de rigora ortodokseco, li konsideris, ke la konduto de KSŜ en respublikana teritorio estis malĝusta. Stachevski, samkiel la generalo Berzini, malaprobis la brutalajn koloniajn metodojn uzatajn de la rusoj en Hispanujo. Li aprobis la manieron de KSŜ[*] procedi koncerne la "trockiistajn" disidentojn en USSR, sed li opiniis, ke KSŜ devis respekti la regulajn politikajn partiojn de Hispanujo. Li prudente komprenigis al Stalino la neceson de ŝanĝo en la politiko de KSŜ en Hispanujo. La "granda mastro" ŝajnigis kundividi lian opinion kaj Stachevski eliris el Kremlo tre kontenta.
> »Poste, dum intervidiĝo kun la marŝalo Tujachevski, li riproĉis al ĉi tiu la hontindan sintenon de la sovetiaj agentoj en Hispanujo. Ĉi tiu intervidiĝo faris multan bruon en niaj medioj, sed la pozicio de Tujachevski estis jam tre malforta.

199Peirats, citita verko, 2-a volumo, paĝo 161.
200Estas interese rimarkigi, ke Elisabeth K. Poretski, vidvino de Ignaco Reiss, alia «agento de Stalino» mortigita de la rusoj en Svislando en 1937, en sia libro *Les Nôtres* [france, La niaj] (*Denoël-Lettres Nouvelles*), kvankam ŝi pridubas kelkajn malĉefajn detalojn de la libro de Krivitski, male nekontesteble konfirmas ĉion, kion ĉi tiu skribis pri Hispanujo.
*NeT: Комитет государственной безопасности, ruse, Komitato pri la Sekureco de la Ŝtato.

»La marŝalo konsentis bremsi tiujn, kiuj kondutis sin en Hispanujo, kiel en konkerita lando, sed li malhavis la sufiĉan aŭtoritaton por obeigi sin.

»Mi tiam tenis multajn konversaciojn kun Tujachevski. Ĉi tiu atendis la falon de Largo Caballero kaj la enpotenciĝon de Negrín, viro, kiun li mem reliefigis. La marŝalo ofte diris:

»Ni estas en la antaŭaj tagoj de grandaj bataloj en Hispanujo.

»La afero estis klara por kiuj, kiel ni, komprenis la politikon de Stalino. Ĉi tiu solidigis siajn sukcesojn esperante loki Hispanujon sub la dependeco de Kremlo kaj estis preta por nova sturmo. Kominterno tute malaperis de la sceno. Berzini havis en sia mano la direktadon de la respublika armeo.[201] Stachevski sukcesis transloki al Moskvo la plej grandan parton de la oro de la Banko de Hispanujo. La maŝino de KSŜ tute funkciis. La entrepreno disvolviĝis laŭ la instrukcioj de Stalino: "Teni sin ekster la atingo de la artilerio". Niaflanke ni evitis la riskojn de internacia milito kaj Stalino ŝajnis esti proksima atingi siajn celojn.

»La sola serioza obstaklo estis Katalunujo. La katalunoj estis kontraŭstalinistoj kaj samtempe la ĉefaj subtenantoj de Largo Caballero. Por superregi la situacion, Stalino devis submeti Katalunujon al sia leĝo kaj faligi Caballero-n. Estis tio, kion oni deduktis el la informo de unu el la estroj de la anarĥiista grupo de Parizo, kiu estis sekreta agento de KSŜ. Ĉi tiu estis sendita en Barcelonon kie, kiel elstara anarĥiisto, ĝuis la fidon de la liberecanoj de la

201«Kiel Luis de Araquistain, ambasadoro de la hispana Respubliko en Francujo, pruvas laŭ decida maniero la naŭdek procento de la plej gravaj postenoj de la respublika Ministrejo pri la Milito fine estis okupitaj de la lakeoj de Stalino» (Agento de Stalino, paĝo 120).

aŭtonoma Registaro. Li havis kiel komision konduti sin kiel provokanto kaj instigi la katalunojn al neprudentaj aktivecoj, kiuj pravigos la intervenon de la armeo por subpremi la ribelon (...).
»Ankaŭ mi legis alian informon devenantan de José Díaz, estro de la hispana Komunista Partio, direktita al Dimitrov, prezidanto de la Kominterno. Dimitrov tuj sendis ĝin al la ĝenerala kazerno de KSŜ, ĉar li antaŭ longe sciis, ke ĝi estis lia vera mastro. Díaz prezentis Caballero-n, kiel revemulon ŝatantan la frazojn, kiu neniam estos sincera aliancano de la stalinistoj. Li laŭdis Negrín-on. Li priskribis la laboron, kiun la komunistoj efektivigis en la socialistaj kaj anarĥisindikatistaj vicoj por subfosi ties internan potencon. Ĉi tiuj informoj tute komprenigis, ke KSŜ konspiris por detrui la "neflekseblulojn" de Barcelono, cele trudi la aŭtoritaton de Stalino.»
«La novaĵoj de Barcelono kaŭzis sensacion en la tuta mondo. La ĵurnaloj aperis kun enormaj titoloj: "Anarĥiista ribelo en Barcelono!". La korespondantoj parolis pri konspiro kontraŭ Stalino en la ĉefurbo de Katalunujo, pri batalo por kapti la Telefonan Centralon, pri surstrataj bataloj, pri barikadoj, pri ekzekutoj.
»Ĝis tiam la majaj okazintaĵoj en Barcelono pli ĝuste ŝajnis fratomortiga lukto inter kontraŭfaŝistoj, utiligita de Franco por ataki. Laŭ la oficiala versio, la katalunaj revoluciuloj perfide klopodis por preni la potencon en la momento, kiam ĉiuj energioj estis bezonaj por rezisti la faŝismon. Alia versio de la tragedio de Barcelono, donita al la gazetaro kaj diskonigita tra la tuta mondo, estis diri, ke temis pri "ribelo" de la nefleksebluloj unuigitaj al la ekstremistoj de la anarĥiista movado por kaŭzi malordojn profite de la malamikoj de la Respubliko.

»La fakto estas, ke en Katalunujo la granda plimulto de la laboristoj estis firmaj kontraŭstalinistoj. Stalino sciis, ke konflikto estis neevitebla, sed li ankaŭ sciis, ke la fortoj de la opozicio estis dividitaj kaj povis esti detruitaj per rapida kaj energia ago. KSŜ ekscitis la fajron kaj ĵetis, unujn kontraŭ aliajn, sindikatistojn, anarĥiistojn kaj socialistojn.

»Post kvin tagoj de amasbuĉado, dum kiuj pereis kvincent personoj kaj estis ĉirkaŭ milo da vunditoj, Katalunujo iĝis la ŝaktabulo, kie oni ludis la sorton de Largo Caballero. La hispanaj komunistoj, gvidataj de Díaz, postulis la forigon de ĉiuj kontraŭstalinistaj partioj kaj sindikatoj de Katalunujo; la regadon de KSŜ super la radioelsendoj, la kunvenejoj; la kompletan forigon de ĉiuj kontraŭstalinistaj grupigoj el la teritorio de la Respubliko. Largo Caballero kontraŭstaris ĉi tiujn postulojn kaj estis devigita prezenti sian abdikon la 15-an de majo. La kuracisto Juan Negrín iĝis la nova Registarestro, konsente kun la antaŭviditaj decidoj de Stachevski.»[202]

Pro profesia misinfluo, W. Krivitski emas troigi la gravecon de la rolo de la sovetiaj sekretaj agentoj. Ĉio, kion li diras, veras, sed samkiel M. Ollivier, kiam li parolis pri la komploto de Antonov-Ovsenko, Krivitski donas la impreson, ke li pensas, ke la historio fariĝas en la oficejoj de la Staboj de la sekretaj servoj kaj de la politika polico; la lukto de klasoj similas ŝaktabulon, kie sufiĉas meti peono-agenton en la ĝustan lokon por gajni la ludon. Sed evidente la lukto de klasoj ne limiĝas al ĉi tio. En Katalunujo, kie efektiviĝis socia revolucio de granda graveco, revolucio kiu ampleksis samtempe -kaj en plena enlanda milito- ĉiujn aspektojn de la socia vivo por transformi ilin laŭ liberecana senco, la partioj de la ordo, la gvidaj burokrataroj, unuvorte, la

202Krivitski, citita verko, paĝoj 134 kaj 139.

kontraŭrevoluciuloj, volis ĉiakoste rompi tiun socian revolucion kaj, ke la revolucia Katalunujo enigis en la «respublikan ordon». Post multaj bataletoj, la majaj okazintaĵoj estis la plej malmola batalo, la plej sanga kontraŭrevolucia batalo, kiu kvankam ne sukcesis tute likvidi la revolucion, almenaŭ ja sukcesis limigi ĝin.
Kio pli altiras la atenton, kiam oni legas ĉi tiujn atestojn pri tiuj ĥaosaj tagoj, estas la nemezurebla cinismo de la politikistoj. La homamasoj, sentante, ke la provoko de la Telefonkonstruaĵo estis la signalo de la neniigo de la revolucia demokratio kaj la komenco de la definitiva restarigo de la potenco de la totalisma ŝtato, ĵetis sin en la batalon, kaj la lukto inter la fortoj de la ordo kaj la laboristoj estis sanga. Sed dum ĉiu tiu tempo la politikistoj daŭrigis siajn intertraktadojn, farante kaj malfarante ministrajn kombinaĵojn, subtenante sin sur la strato por eltiri postenon plian, pecon plian de potenco por sia propra burokrata klano. Domaĝe, ke ni ne havas registritaj sur magnetofona bendo tiujn intertraktadojn kun la sona fono de la pafŝprucoj de mitraloj kaj la pistolpafoj en la nukon!
Socio, ĉio estas restarigita...

> Noto por la gazetaro
> «La kataluna Registaro submetis la ribelon per siaj propraj rimedoj... La estro de la kabineto de Gazetaro de la Prezidantado, Joaquín Vila, transdonis al la gazetaro dum kunveno de la Konsilantaro de la kataluna Registaro la sekvan noton:
> »La merkredon 12-an de ĉi tiu monato, je la 18.30, kunvenis la Kataluna Registaro.[203] La kunveno finiĝis je la 21 horoj. Dum ĉi tiu kunveno oni aprobis diversajn dekretojn el la Prezidantado, Justico, ManĝoProvizado, Publika Instruado kaj Financoj.

---

203Por la konsistigo de ĉi tiu nova Registaro, vidu la 13-an aneksaĵon

»La Registaro interŝanĝis opiniojn pri la freŝaj okazaĵoj. La Registaro, kiu PER SIAJ PROPRAJ RIMEDOJ, SUBMETIS LA RIBELON, kaj realigis, helpita de la bona juĝo de nia popolo, la restarigon de la normala vivo, kiu estas kompleta en ĉi tiuj momentoj, firme kaj unuanimece kondamnas la okazintajn faktojn kaj opinias, ke per la novaj rimedoj, kiujn disponas Publika Ordo, aplikiĝos la antaŭaj dekretoj, kiuj estas ankaŭ publikigataj en ĉi tiu momento mem de la Registaro de la Respubliko, rilate la efikecon de la sola komando per la metodoj kaj la disciplino de la milito, la forigon de la kontrolejoj de ŝoseo kaj landlimaj, la senarmigon de la postmilitfronto, ĉar se ne, ne povos esti normala vivo en ĝi kaj, ĉar la leciono de la pasintaj okazaĵoj utilos por nenio se oni ne metas finon al la motivoj ilin kaŭzintaj.

»La kataluna Registaro esperas, ke ĉi tiuj disponoj meritos ne nur la aliĝon sed ankaŭ la lojalan kunlaboradon de ĉiuj partioj kaj organizaĵoj, kiuj kunlaboras en ĝia sino, ĉar por la membroj de la Konsilantaro, la efektivigo de la disponoj adoptitaj de ĝi estas la nepra kondiĉo por la tenado de la registara prestiĝo, kiu estis serioze kompromitita de la perfortoj, la luktoj aŭ la timoj, aĵoj ĉiuj ili kiuj, post la suferita sperto, povas esti nek nutritaj nek toleritaj.

»La Konsilantaro de la kataluna Registaro fidas, ke ĉiuj katalunaj kontraŭfaŝistoj unuiĝu sub sia egido, por teni firmaj la aŭtoritaton kaj la prestiĝon de la kataluna Registaro kaj de la Registaro de la Respubliko.»

(Kataluna Registaro. Prezidantado.
Komisararo pri Propagando.
Komunikaĵo al la Gazetaro.
Barcelono, 12-an de majo 1937.)

Socio, ĉio estas restarigita... Por la (ĉiufoje malpli aŭtonoma) kataluna Registaro, la aferoj estis klaraj: la fino de la bataloj tuj permesos per unu fojo kaj por ĉiam la restarigon de la ordo en Katalunujo.
Ĉiuj membroj de tiu limigita Konsilantaro montris sin unuanimaj pri la malakcepto de la «ribelo». Komunistoj, anarĥiistoj, respublikanoj, membroj de la politika burokrataro kaj sekve, samtempe solidaraj kaj malamikaj, ĵetis la «kulpojn», la «perfortojn» sur oni ne scias tre bone kiun eksterteranan invadinton, sur oni ne scias tre bone kion, frenezulojn fuĝintajn el la frenezulejo, kiuj ekpafis surstrate. Ili detruis la ribelon «per siaj propraj rimedoj» kaj intencis– ĉar kompreneble nenio estis okazinta- kune daŭre regi ene de la granda kontraŭfaŝisma frateco.
Por la Potenco estas tute netolerebla, ke ĝia aŭtoritato estas pridubita**.** Tiel do, en Katalunujo la Potenco estis dispecigita. Pluraj laboristaj «organizaĵoj» posedis pecon de ĝi, kiun ili klopodis por pligrandigi per ĉiuj rimedoj kaj, kiun, kontraŭe al la hipokritaj deklaroj, ili nur parte transdonis al la aŭtonoma Registaro, kiu teorie estis ilia komuna reprezentanto. Ĉi tiu lasta, kiel reprezentanto ankaŭ de la kataluna naciisma burĝaro -kies estro estis la Prezidanto Companys, kiu almenaŭ havis la avantaĝon esti tio, kion li pretendis: liberala burĝo-, teorie havis pli ampleksajn potencojn ol la sociaj fortoj, kiujn ĝi reprezentis.
Ĉiuj politikaj kaj ŝtataj burokrataroj luktis kontraŭ tiu «malordo» por ke la potenco estu Unu, por ke realiĝu la unuiĝo de komando kaj de tendenco. Sed samtempe ĉiuj luktis por ke tiu unuiga kaj centraliziga proceso disvolviĝu por propra profito. Tial ĉiuj burokrataroj havis komunan projekton: la restarigo de la ununura povo de la ŝtato, la restrukturado de socia hierarĥio pli burokrata ol «burĝa»; kaj samtempe ili fordonis sin al akrega lukto por loki sin en la postenoj de komando, en la pinto de la socia piramido.

Tiel la lukto inter burokrataroj por pligrandigi sian parton de potenco aldoniĝis al la lukto de la homamasoj, kiuj spontanee ĵetis sin surstraten por defendi sian sovaĝan demokration, la kolektivigojn, unuvorte, por defendi la revolucion kontraŭ la subpremaj fortoj de la kontraŭrevolucio. Tamen, kvankam ambaŭ estis interligitaj, endas ne konfuzi ilin.
Dum ĉi tiu tuta malsimpla revolucia kverelo, NKL estis samtempe surstrate, ĉe la kontraŭregistaraj barikadoj, kaj ĉe la Registaro, intertraktante la batalpaŭzon, ĝi samtempe estis akceptita, kiel intertraktanto kaj membro de la Registaro, de tiuj mem, kiuj surstrate luktis «kontraŭ ĝi», mortigante ĝiajn aktivulojn kaj akuzante ilin ribeli kontraŭ la leĝa Registaro. NKL estis instigo de «malordo» kaj instigo de «ordo», estis por kaj kontraŭ la laborista aŭtonomeco, por kaj kontraŭ la senarmigo de siaj armitaj grupoj, por kaj kontraŭ la «kontraŭfaŝisma unuiĝo», tiu politika preteksto por fini la socian revolucion. Kiel burokrataro, ĝi ne povis tute disiĝi de sia «bazo» nek permesi, ke oni senarmigis ĝiajn homojn kaj ĉefe ĝi neniel povis toleri, ke la restarigo de la ŝtato fariĝos je ĝia kosto. Tuta ĝia sinteno dum la «majaj okazintaĵoj» povas resumi sin en frazo: ni donas al niaj trupoj la ordonon ĉesi la pafadon, retiriĝi el la barikadoj, kondiĉe ke ni konservu, kaj se eblas, plifortigu nian lokon en la sino de la Potenco.
Evidente ĉi tie oni devas fari distingon inter la gvida burokrataro de NKL kaj la amaso de aktivuloj. La gvidantoj renkontiĝis antaŭ la plenumita fakto de la amasa kaj spontanea respondo de la homamasoj -plejparte anarĥiistaj- kaj devis manovri por haltigi la batalojn perdante nenion. La aktivuloj siaflanke ree donis pruvon de sia kuraĝo, de sia spirito de iniciato kaj definitive de sia submetiĝo. Ili spontanee ĵetis sin surstraten, sovaĝe luktis, ĉar ili sentis, ke ilia revolucio estis en morta danĝero, ili ne obeis la unuajn alvokojn de siaj gvidantoj favore al la pafadĉeso,

sed, kvazaŭ ili atendus instrukcion, entutan planon, kiu ne venis, ili perdis energion, hezitis kaj fine submetis sin al la instrukcioj de pafadĉeso. Iuj, la plej necedemaj, kiel la grupo de la «Amikoj de Durruti» aŭ la Liberecanaj Junularoj, volis daŭrigi la lukton, faligi la katalunan Registaron, «preni la potencon», sed estis tro malmultaj.
La 8-an de majo, per komunikaĵo, la Regiona Komitato de NKL deklaris la «okazaĵon fermita».

> «NKL AL LA KATALUNA POPOLO:
> Finita la tragika okazaĵo, kiu plenigis per funebro Barcelonon, kaj por ke ĉiuj sciu kiel statas la afero, la Regiona Komitato de NKL kaj la loka Federacio de Ununuraj Sindikatoj manifestas sian unuaniman volon kunlabori per la plej grandaj efikeco kaj lojaleco en la starigo de la publika ordo en Katalunujo, ĉesante kun la fazo de partia agado, kiu ĝuste kondukis al la neeltenebla situacio, kiu kaŭzis la tragedion. Ni havas plezuron, sekve, ripeti nian helpon al la Kataluna Registaro kaj al la nova delegito de la Publika Ordo sendita de la centra Registaro, leŭtenanto kolonelo Torres, pri kiu ni povis konstati la bonegan animstaton per kiu li venas plenumi tiel delikatan komision en Katalunujo. ( ... )

La Regiona Komitato de NKL.
La loka Federacio de Ununuraj Sindikatoj.»

Endas rekoni, ke la situacio de LPMU dum tiu monato de majo neniel estis facila. Elpelita el la sekretaj kunvenoj kaj de la intertraktadoj pri la potenco, ĝi klopodis por enkonduki sin en ĝin, traktante kun NKL-FAI. Kvankam la gvidantoj de LPMU estis parole «pli proksimaj al la strato» ol tiuj de NKL, ŝajnis esti same superitaj de la okazaĵoj, timante, ke ili estis pagontaj la konsekvencojn de la batalo pli ol kiu ajn alia, pri kio ili ne eraris. Iliaj duboj restas reflektitaj en ĉi tiu deklaro

de ilia Centra Komitato, publikigita en «*La Batalla*», la 13-an de majo 1937:

> «La pliigita Centra Komitato de LPMU, kunveninta en Barcelono, la 11-an kaj 12-an de majo, analizinte la revoluciajn faktojn okazintajn en Barcelono kaj studinte la nuntempan situacion kaj la perspektivojn kaj spertojn, kiuj el ili eltiras sin, unuanime prenis la sekvan rezolucion:
>
> 1) La konstantaj provokoj de la kontraŭrevolucio personigita de la reformismaj partioj de USPK kaj de la etburĝaro, provokoj kiuj en la kampo de la ekonomio, de la milito kaj de la publika ordo emis likvidi la revoluciajn konkerojn gajnitajn de la laborista klaso je la 19-a de Julio per la armiloj enmane kaj, kiuj atingis sian apogeon la 3-an de majo per la provo de sturmo al la konstruaĵo de la Telefonkompanio, kaŭzis la armitan proteston de la proletaro.
>
> 2) La politika pozicio de LPMU ne povis esti alia ol la aktiva solidareco kun la laboristoj, kiuj spontanee deklaris la ĝeneralan strikon, starigis barikadojn sur la stratoj de Barcelono kaj sciis defendi, per ekzempla heroeco, la minacitajn konkerojn de la revolucio.
>
> 3) Mankaj la surstrate luktantaj laboristoj je konkretaj celoj kaj respondeca direktantaro, LPMU ne povis fari alion ol ordoni kaj organizi strategian retiriĝon, konvinkante pri tio la revolucian laboristan klason kaj evitante senesperan agon, kiu povus degeneri en «puĉon» kaj havus kiel konsekvenco la tutan detruon de la plej progresema parto de la proletaro.
>
> 4) La sperto de la “majaj okazintaĵoj” nedudeble pruvas, ke la sola iom-post-ioma eliro el la nuntempa situacio estas la preno de la Potenco fare de la laborista klaso, kaj por tio nepras kunordigi la

> revolucian agadon de la laboristaj amasoj per la starigo de Revolucia Laborista Fronto, kiu grupigos ĉiujn organizaĵojn, kiuj estas pretaj lukti por la tuta detruo de la faŝismo, kion oni povas atingi nur per la militista venko en la militfrontoj kaj per la triumfo de la revolucio en la postmilitfronto. La pliigita Centra Komitato konsideras, ke estis tute ĝusta la politiko farita de la Partio dum la okazaĵoj kaj tute solidariĝas kun la Plenuma Komitato, konvinkita, ke ĝi sciis defendi la interesojn de la revolucio kaj de la grandaj laboristaj amasoj.»[204]

Tiel do, kiam la homamasoj estis surstrate, kiam ŝajnis, ke Barcelono kaj la tuta Katalunujo volis inklini al la tendaro de la revoluciaj fortoj, LPMU misprezentis, ŝanceliĝis, «organizis strategian retiriĝon!». Jam realigita tia retiriĝo, kies konsekvencoj estos dramaj, LPMU, finfine tutcerta pri si mem, sugestis la magian solvon, kiu anstataŭigis la realan lukton per la politika formulo: la kreo de Revolucia Laborista Fronto por la preno de la Potenco fare de la laborista klaso (tio estas, de LPMU kaj ties eventualaj aliancanoj). Ĉu ne ekzistis tiu fronto «en la bazo», en la surstrataj bataloj? Sed la burokrata-leninisma spirito de LPMU ĝin pelis trotaksi la kombinaĵojn kaj intertraktadojn nivele de Staboj, subtaksante (kaj eĉ timante) la realan lukton, kiu estis efektiviĝanta ekster la interkonsentoj inter gvidantoj.
La relativa malforteco de LPMU ne pravigas per si mem tiujn hezitojn. Tiu malforteco, veras, ĝin pelis «protekti sin» malantaŭ NKL-on, sed ĉefe tio, kion ili volis, estis trovi tiun protekton per «interkonsento en la pinto» (kion la gvidantoj de NKL ne deziris). La gvidantoj de LPMU uzis pli revolucian lingvaĵon kaj serĉis interligon kun la anarĥiistaj amasoj, kiu estis la solaj, kiuj povis protekti ilin kontraŭ la

204Personaj arkivoj.

ĉiam pli minaca stalinista ondego. Sed ili insistis pri tio, ke tiu alianco estu garantiita en la pinto kaj proponis nenion konkretan al la plej «ekstremismaj» anarĥiistaj uloj, kiuj ankaŭ estis -kio cetere estas logika- la plej kontraŭstalinistaj. Ŝajnis, ke ili malfidis ilin, ĉar ĉe iliaj okuloj ili ne estis sufiĉe «politike respondecaj». Sed ripetante la bezonon de la «strategia retiriĝo» pro «foresto de konkretaj celoj kaj de respondeca direktantaro» inter la luktantaj laboristoj, ne nur cetere ili neis sin mem, kiel tian «revolucian direktantaron», kio ene de la leninisma tradicio estas kio ili pretendis esti, sed ke ili ĉefe klopodis por teoriigi kaj projekcii sur aliajn sian propran mankon de konkretaj celoj.
Dum tiuj majaj okazintaĵoj, ne estis tridek ses solvoj: ĉu la revoluciaj fortoj daŭre estis la mastroj de la tereno farante, ke la socia transformado donu novan salton antaŭen -ĉefe pro la forigo de la burokrata kaj subprema aparato de la kataluna Registaro-, kio havintus gravajn resonojn inter la laboristoj de la cetero de Hispanujo (ĉar Katalunujo el tiu vidpunkto ne estis tiel malsama, kiel oni povus kredi), kaj ili intertraktis, de pozicio de forto, kun la centra Registaro interkonsentojn por la daŭrigo de la milito, kiuj ne nur rilatis al pli bona distribuo de la armiloj, sed ankaŭ al nova tipo de milito; aŭ la revoluciaj fortoj malprogresis kaj la subpremado elĉeniĝis. Sed neeblis malantaŭeniri gardante la konkeritan terenon... kiel pretendis LPMU.
Aperas al ni demando -kaj de kia graveco!-: kiel klarigi la sintenon de la homamasoj antaŭ iliaj gvidantoj? Ĉar la rolo de la burokrataroj estis defendi siajn specifajn interesojn dum la konflikto, la «perfido» aŭ la nedecidemo de la gvidantoj ne devas surprizi nin, sed kial la homamasoj ne sciis liberigis sin de ili? Kial, ekzemple, la revoluciaj aktivuloj de NKL-IAF ne senrajtigis la «kamaradojn ministrojn» kaj la ceterajn «estrojn» post ties larmigaj alvokoj por ke ili forlasu la lukton? Ĉu iutage povos la homamasoj senigi sin je la

mitologio de la herooj kaj de la estroj kaj de la dusenca rilato, kiun en la sino mem de la ribelo ili ĉiam subtenas al alia aŭtoritato, «bona», al kiu ili delegas sian propran forton kaj al kiu submetas sin propra-vole? Almenaŭ ne en Katalunujo.
Male, por la kontraŭrevoluciaj fortoj, la celo estis tre klara kaj la rezulto estis profitdona. Temis pri tio, ke la ŝtato reakirus ne nur siajn tradiciajn potencojn, sed ankaŭ -por la stalinistoj almenaŭ- la pligrandigo de la potencoj de la ŝtato super ĉiuj medioj. La ŝtato devis direkti la ekonomion, neniigante la laboristan memmastrumadon, reenkondukante la socian kaj salajran hierarĥion, la rigorajn ideojn pri profitdoneco kaj produktopoveco. La ŝtato devis preni en siaj manoj la direktadon de la milito, laŭ la senco, kiun ni rimarkigis antaŭe. La ŝtato devis okupi sin pri la ordo en la postmilitfronto, likvidante la patrolojn pri kontrolo. Kaj tiel plu. Por la hispanaj komunistoj, ni jam ĝin diris, ankaŭ temis prepari sin por la revolucio. Ilia «revolucio» konsistis en la preno de la potenco kaj la starigo de burokrata diktatoreco kaj regi la potencorganojn estis bonega «deirpunkto» por atingi tiun celon. Kaj por tio necesis centraliza kaj totalisma ŝtato.
En ilia jakobena kaj centraliza impulso, la komunistoj kaj ties «objektivaj» aliancanoj, pere de la centra Registaro, utiligis la «majajn okazintaĵojn» por limigi la aŭtonomecon de Katalunujo, ne nur ĉar ĝi estis pli revolucia, sed ankaŭ ĉar ĝi estis aŭtonoma. Forta ŝtato nur povas esti Unu sur la tuta «nacia» teritorio. La centra Registaro rekte okupis sin pri la tenado de la publika ordo en Katalunujo kaj pri la «industriaj branĉoj» koncernantaj la Nacian Defendon kaj ankaŭ pri la militaj operacioj, likvidante samtempe, kiel ni vidos, la relativan aŭtonomecon de la militfronto de Aragono.
Ili ankaŭ atingis alian celon: la neniigo de LPMU. Laŭ la imperativoj de la stalinista teroro, kiu ne permesis, ke la

disidentaj komunistoj postvivu, tiu malgranda partio suferis ĉiujn rigorecojn de senkompata subpremo.

Por fini, jen la vidpunkto de la katalunaj stalinistoj pri la majaj okazintaĵoj:

> «La Regiona Komitato de ĜUL, kunveninta la 17-an de majo en Barcelono, havigis la sekvan noton:
>
> 1) Karakterizi la movadon komencitan la 4-an de majo (?), kiel kontraŭrevolucian movadon, celantan pliigi la malorganizon kaj maldisciplinon de la postmilitfronto kaj rompi la militfronton de Aragono. Konsideri, ke necesas rapida kaj energia politiko de publika ordo en la tuta Katalunujo, restarigante la normalecon, kiu hodiaŭ nur estas ŝajna, finante la agadon de la neregebluloj kaj la trockiistaj provokantoj, kiuj ankoraŭ postvivas kaj, kiuj tenas sendifektaj siajn kadrulojn kaj siajn armilojn.
>
> 2) Montri sin pretaj obei la Dekreton de la Ministrejo pri Internaj Aferoj pri la senarmigo de la postmilitfronto, sed certigante la ĝustajn garantiojn de senarmigo de ĉiuj organizaĵoj kaj ĉefe de la ĉies konataj grupoj de neregebluloj, kaj de la anoj de LPMU, asertante, ke ĉiuj armiloj, kiujn la Sindikatoj de ĜUL povas posedi, estos transdonitaj al la reprezentantoj de la Registaro de la Respubliko kaj de la libereco; sed certigante, ke la fortoj de Publika Ordo ĉiakoste prenu la armilarejojn, kiuj forprenitaj el la militfrontoj estis uzitaj surstrate kontraŭ la Popola Fronto, ĉar agi alimaniere estus lasi sendefenda al ĜUL kaj sekve en manoj de ĝiaj kontraŭuloj.
>
> 3) Aserti, ke oni ne povas doni trakton de egaleco al la homoj aŭ organizaĵoj, kiuj ribelis kontraŭ la Registaro kaj al tiuj, kiuj ĝin subtenis defendante la kaŭzon de la kontraŭfaŝismo, tial samtempe, kiel ĝi ratifikas sian interkonsenton forpeli el ĜUL la

membrojn de LPMU, postulas la malfondon de tiu partio kaj ties deklaron de kontraŭleĝeco, la ĉesigon de la ĵurnalo «*La Batalla*» kaj de ĉiu ĝia gazetaro kaj la konfiskon de ĝiaj presejoj, radiostacioj ktp agante ĝuste egale kontraŭ organizaĵoj de la tipo de la Amikoj de Durruti, senrajtigita de la Regiona Komitato de NKL.

4) Ellabori novan programon de unuiĝo de komuna agado inter la Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj kaj la Nacia Konfederacio de la Laboro kaj proponi la starigon de konstanta Komitato de agunuiĝo ĜUL-NKL, kun plenuma karaktero, kiu kompletigu la laboron realigitan de la nuntempa Komitato pri Interrilato.

5) Klopodi por la urĝa organizo de la Komisiono pri Militindustrio kun partopreno de ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj, kiuj formas parton de la Kataluna Registaro kaj, kiu, sub la rekta regado de la Registaro de la Respubliko, klasifiku la produktadon, distribuu la krudmaterialojn kaj prigardu la sabotadon kaj spionadon de la malamiko, metante la militindustriojn sub la zorgado de la fortoj de la Armeo.

6) Mobilizado de la publikaj servoj.

7) Militistigo de la servoj de transportoj kaj komunikoj.

8) Tuja renovigo de la konsistigo de la Urbodomoj.»[205]

205Díaz-Plaja, citita verko, paĝo 429-431.

# 7-a ĈAPITRO:TRIUMFAS LA KONTRAŬREVOLUCIO

## LA FALO DE LARGO CABALLERO

Unu el la unuaj konsekvencoj de la «majaj okazintaĵoj» de Barcelono estis la ministra krizo de la centra Registaro kaj la falo de Largo Caballero.

De antaŭ iom da tempo, la stalinistoj estis efektivigantaj kampanjon kontraŭ la malnova ĉefo de la maldekstra tendenco de la Socialista Partio, akuzita esti tro komplezema kun la anarĥiistoj kaj LPMU kaj tro sendependa koncerne la rusojn. La rusaj kaj hispanaj stalinistoj malkaŝe akuzis "Largo Caballero"-n (kiu, ni memorigu ĝin, estis samtempe Ĉefministro kaj Ministro pri la Milito) esti respondeca pri la militaj malvenkoj suferitaj de la respublikanaj trupoj. Largo Caballero kaj ties subsekretario de ŝtato en la Ministrejo pri la Milito, la generalo Asensio, ŝajne kontraŭstaris certan reziston (endas pli ĝuste diri, ke ili ne estis sufiĉe «obeemaj») al la regado efektivigita de la stalinistoj super la militista aparato. Marcel Rosenberg, sovetia ambasadoro, dum unu el siaj periodaj intervidiĝoj kun Largo Caballero, dum kiuj li kutimis dikti al li la dezirojn de Moskvo, insistis al la Ĉefministro pri tio, ke li eksigu Asensio-n, kiu estis ege malakceptita de la komunistoj. Sed la kolerema Largo Caballero forpelis la sovetian ambasadoron el sia oficejo. Evidente tiel granda skandalo estis netolerebla kaj Rosenberg minacis interrompi la sovetian helpon se Asensio ne estos eksigita el siaj funkcioj.

Jesús Hernández, en sia libro,[206] rakontas kunvenon de la Politika Buroo de la hispana KP -en Marto 1937- en kiu ĉeestis Togliatti, Marty, Codovilla, Stapanov, la taskito pri sovetiaj aferoj, Gaikin kaj Orlov mem. En ĉi tiu kunveno, kiu, laŭ la aŭtoro, estis tumulta, la eksterlandaj delegitoj altrudis al la hispanaj gvidantoj la neceson ŝanĝi “Largo Caballero”-n kaj anstataŭigi lin per iu alia socialista gvidanto, pli manipulebla.

> «Koncerne la anstataŭigon de Caballero, diris Togliatti, estas praktika problemo, kiun mi invitas pripensi al la kamaradoj. Ni procedu per forigo. Ĉu Prieto?... Ĉu Vayo? Ĉu Negrín? El la tri, Negrín ŝajnas al mi la plej taŭga por ĉi tiu afero. Li ne estas kontraŭkomunista, kiel Prieto, nek stulta, kiel del Vayo.»[207]

La konflikto inter komunistoj kaj maldekstraj socialistoj preteriris la militistajn aferojn, ĉar ili ankaŭ malkonsentis pri problemoj de ekonomia kaj politika kampo. La detala analizo de tiu konflikto superas la kadron de ĉi tiu studaĵo pri Katalunujo, ĉar la Socialista Partio apenaŭ ekzistis en Katalunujo kaj la kataluna ĜUL tuj estis regita de la stalinistoj.

Oni resume povas diri, ke la maldekstraj socialistoj riproĉis al la komunistoj ties dekstrisman politikon pri preskaŭ ĉiuj kampoj, tiel sociaj kiel ekonomiaj kaj ĉefe pri tiu de la terkulturo, kies ministro, Vicente Uribe, elstariĝis pro sia defendo de la privata propraĵo. Kvankam en la terkultura medio, kiel en ĉiuj aliaj, la realigoj de la aktivuloj de ĜUL estis multe pli moderaj ol tiuj de la anarĥiistoj, tamen ili ankaŭ estis tro aŭdacaj por la komunistoj.

206Jesús Hernández, citita verko, paĝoj 54-58.
207Sama verko

Sed la kverelo «en la pinto» inter maldekstraj socialistoj kaj komunistoj atingis la klasikan aspekton de la lukto por la potenco inter du politikaj burokrataroj.
Tamen dum la monatoj, kiuj antaŭis al la militista ribelo, kaj kelkajn monatojn poste, la «flirtado» inter komunistoj kaj maldekstraj socialistoj estis tiom progresintaj, ke ili jam komencis intertraktadojn cele al la kunfandiĝo de ambaŭ partioj kaj la kreo de «sola partio de la proletaro». Ambaŭ partioj konsideris la kunfandiĝon de la Junularoj, kiel unua paŝo al tiu celo. Largo Caballero aktive partoprenis en tio malgraŭ la malfavora opinio de la dekstra tendenco de la Socialista Partio. Sed Largo Caballero kaj ties partianoj -almenaŭ kiuj daŭre estis al li fidelaj- sentis sin tre zorgoplenaj pro la ĉiam pli granda regado fare de la komunistoj super la aparato de la ŝtato tiel, kiel pro la koloniismaj metodoj de la rusoj. La «Caballero-anoj» forlasis ĉiun projekton de kunfandiĝo kaj ekdefendis sian zonon kaj ekklopodis por bremsi la malrapidan ensorbon de la aparato de la ŝtato fare de la komunistoj. En ĉi tiu situacio, unu el la du tendaroj devis cedi.
Indalecio Prieto, kiu, kiel bona dekstra socialisto, teorie estis tre kontraŭsovetia kaj tre kontraŭkomunista, sed kies kontraŭrevolucia politiko multege koincidis kun tiu de la Komunista Partio, lerte ekspluatis ĉi tiun situacion. Prieto kaj la komunistoj konsentis pri la neceso ĉiakoste likvidi la revoluciajn spertojn de Katalunujo, Aragono kaj aliloke. Ili konsentis pri la neceso krei regulan armeon kaj pri preskaŭ ĉiuj gravaj politikaj demandoj, ĉefe pri la politika neniigo de Largo Caballero. Kompreneble la dekstraj socialistoj rigardis Londonon kaj Parizon dume la komunistoj obeis Moskvon, sed tio ne neebligis Prieto-n flirti kun la sovetianoj kaj repreni, konsultante neniun -nun kiam ĝin jam forlasis la «Caballero-anoj»-, la ideon pri fandado inter ambaŭ partioj. Inter Prieto kaj la komunistoj okazis tuta serio da sekretaj interkonsentoj kaj kunvenoj por elpeli “Largo Caballero”-n

kaj ties partianojn, kiuj estis konsideritaj tro toleremaj kun la anarĥiistaj spertoj. Ĉi tiuj sekretaj kunvenoj konkretiĝis en la kreo de Komitato de Interrilato inter ambaŭ partioj, prezidita de la du ĝeneralaj sekretarioj, Ramón Lamoneda, de «Prieto-ana» tendenco kaj José Díaz. Malgraŭ la persona malamo, kiu ekzistis inter ambaŭ, Prieto apogis la kandidatecon de Negrín, preparita kaj sugestita de la komunistoj por anstataŭi “Largo Caballero”-n ĉekape de la respublika Registaro. Kompreneble laŭ la tradiciaj reguloj de la politika ludo, komunistoj kaj dekstraj socialistoj volis reciproke sin uzi por elpeli “Largo Caballero”-n, kiu estis sufiĉe populara en la lando aŭ, kiun oni almenaŭ konsideris kiel pli malgrandan malbonon, ĉefe la anarĥiistoj. Kiam ili sukcesis, la malkonkordoj inter Prieto kaj la komunistoj baldaŭ aperis.

La 15-an de majo, la centra Registaro kunvenis en Valencio por studi la situacion post la «majaj okazintaĵoj» de Barcelono. Jesús Hernández (Nacia Instruado) kaj Vicente Uribe (Terkulturo), ambaŭ komunistoj, postulis, ke oni prenu rigorajn disponojn kontraŭ la «respondeculoj». Por ili, la respondeculoj estis unue LPMU, sed ankaŭ la anarĥiistaj grupoj «ekstremismaj». Largo Caballero rifuzis malfondi LPMU-on, kiu, laŭ lia opinio, estis laborista organizaĵo kaj li, malnova laborista aktivulo, neniam malfondos laboristan organizaĵon. Li konsentis puni la kulpulojn sed, laŭ li, oni devis malfermi esploron kaj la tribunaloj estis kiuj devis montri kaj puni la kulpulojn. Pro la rifuzo de Largo Caballero likvidi LPMU-on, Hernández kaj Uribe, plenumante la komedion-baleton, kiu estis planita, leviĝis kaj forlasis la salonon. Caballero limiĝis diri: «La konsilio de Ministroj plu daŭras»:

> «Estis tiam, kiam okazis tio nekredebla. Malrapide leviĝis la plimulto de la ministroj, inter ili, Prieto, Negrín, Alvarez del Vayo, Giral, Irujo. Restis en siaj

> postenoj, la prezidanto de la konsilantaro, Anastasio de Gracia, Ángel Galarza kaj la kvar konfederaciaj ministroj.»[208]

«La krizo restas malfermita» diris Caballero. Sekvatage li prezentis sian abdikon al la Prezidanto de la Respubliko, Manuel Azaña. Okazis serio da sekretaj kunvenoj kaj intertraktadoj por starigi novan Registaron. Ŝajnas, ke oni unue pensis pri Registaro sen la komunistoj, kaj Caballero proponis al la anarĥiistaj gvidantoj, ke ili starigu «sindikatistan» Registaron, tio estas, ke ĝi estu regita de la reprezentantoj de NKL kaj ĜUL. La anarĥiistaj gvidantoj, kiuj dum la krizo solidariĝis kun Largo Caballero laŭdante lin en sia Gazetaro, komence akceptis. Sed Negrín, Prieto kaj Alvarez del Vayo firme deklaris al Manuel Azaña (kiu ŝajnis partiano de Registaro sen komunistoj) kaj al Largo Caballero, ke oni ne povis regi sen la komunistoj ĉar tio tre ĝenus la rusojn, kies helpo estis nemalhavebla. Ĉiam la sama ĉantaĝo. Ĉi-okaze, kiel en ĉiuj aliaj, la komunistoj, Prieto kaj Negrín, antaŭe interkonsentis inter ili. Koncerne "Alvarez del Vayo"-n, kvankam teorie estis maldekstra kaj «Caballero-ana» socialisto, jam de antaŭ iom da tempo li lasis sin manipuli fare de la komunistoj eble eĉ ne konstatinte tion, ĉar neniam li estis ĝenata de tro vigla inteligenteco.
Fine Largo Caballero cedis kaj la nova Registaro, prezidita de Negrín, enpotenciĝis laŭ la plano starigitaj de la rusoj kaj la hispanaj komunistoj. Jen la listo de tiu Registaro, kiu tuj estis nomita de la stalinistoj la «Registaro de la venko»: Prezidanto, Financoj kaj Ekonomio, Juan Negrín (socialisto). Nacia defendo: Indalecio Prieto (socialisto). Eksterlandaj aferoj: José Giral (Respublikana Maldekstro).

208Peirats, citita verko, 2-a volumo, paĝo 182. Broué, Bolloten, Hernández, Thomas ktp, rakontas per similaj vortoj ĉi tiun krizon de la centra Registaro, kiu kaŭzis la falon de Largo Caballero kaj la enpotenciĝon de la Registaro Negrín.

Justico: Manuel Irujo (eŭska naciisto). Internaj Aferoj: J. Zugazagoitia (Socialisto). Instruado kaj Sanservo: Jesús Hernández (komunisto). Terkulturo: Vicente Uribe (komunisto). Publikaj verkoj kaj Transportoj: Giner de los Ríos (Respublikana Unuiĝo). Laboro kaj Sociala Asistado: Jaime Ayguadé (Respublikana Maldekstro de Katalunujo) (frato de kiu estis respondeca pri Publika Ordo en la kataluna Registaro ĝis la majaj okazintaĵoj).
La anarĥiistoj, kiuj daŭre solidariĝis kun Largo Caballero, rifuzis partopreni en la Registaro.[209]

**LA SUBPREMO KONTRAŬ LPMU**

Jam disfaligita la lasta «barilo», la kontraŭrevolucio ĝisfunde penis. Fakte nur la stalinistoj kaj ties ĉi-momentaj aliancanoj konsideris, ke la maldekstraj socialistoj kaj inkluzive Largo Caballero, kiel ĉefministro, reale estis apogo al la revolucia movado, ĉar fakte ĉefe estis danke al la Caballero-anoj kaj al la prestiĝo, kiu ĝuis la «hispanan Leninon» inter la laboristoj, ke la burĝa ŝtato povis komenci restarigi sian potencon. La graveco de la revolucia movado en la respublikana zono estis tiel grandega post la laborista reago al la militista ribelo, ke nur Maldekstra Registaro, eĉ tre kolorigita de «ekstrema maldekstro», povis ekefektivigi la verkon de ŝtatrestarigo. Necesis transirfazo por pasi de la periodo, kiam la ŝtato estis detruita, la periodo de «malluma potenco de la Komitatoj», de la industriaj kaj terkulturaj kolektivigoj, de la Volontarmeoj kaj la Patroloj pri Kontrolo, de la periodo de la revolucia entuziasmo kaj de la libereco, al la periodo de la restarigo de la potenco de la ŝtato, de la starigo de tradiciaj armeo kaj polico, de la provo de ŝtata regado super la ekonomio, de la neniigo de la spertoj de la revoluciaj Komitatoj profite de forta kaj centralizita potenco,

209Ili ree formis parton de la Registaro pro reorganizo de la Registaro Negrín: Segundo Blanco surprenis la ministrejojn pri Instruado kaj Sanservo anstataŭante “J. Hernández”-on.

unuvorte, paso al la periodo de la kontraŭrevolucio.
La Registaro Largo Caballero estis tiu necesa Registaro de transiro, kiu petis al la laboristoj, ke ili foroferu siajn revoluciajn konkerojn NOME DE LA REVOLUCIO kaj de la militista venko super la faŝismo.
Por ke la operacio triumfu, la Staboj de la laboristaj organizaĵoj devis partopreni en la Registaro kaj apogi ĝin tiel, kiel peti al siaj aktivuloj, ke ili akceptu la bezonajn oferojn. Jam fortigita la ŝtato kaj, kiam ĝi jam reakiris gravan parton de siaj privilegioj, endis pasi al la malkaŝa subpremo, al la neniigo de la «frenezaj entreprenoj» kolektivigaj kaj aliaj, submeti per la forto tiujn -ankoraŭ tre multnombrajn-, kiuj pridubis aŭ eĉ neis la Aŭtoritaton. Largo Caballero, ekzemple, ne estis entuziasma partiano de la liberecanaj kolonoj de Aragono kaj se subtenis sintenon akordiĝeman kun NKL-IAF, permesante al ili, ke ili konservis sian «privatan zonon» en Aragono, simple estis pro politika oportunismo, por atingi eblajn aliancanojn kaj politikan ekvilibron fronte al la komunistaj manovroj, kiuj endanĝerigis liajn proprajn burokratajn interesojn kaj, kiuj pretendis malpliigi lian «parton de potenco». Kaj la anarĥiistaj gvidantoj nevole agadis profite de Largo Caballero, kiel de ĉiuj aliaj; dum iliaj propraj burokrataj interesoj estis protektitaj, nenio gravis al ili «foroferi la liberecanan revolucion» nome de la kontraŭfaŝisma unuiĝo kaj la militista venko. Sed por la stalinistoj ĉio ĉi estis klare nesufiĉa, ĉar tio, kion endis likvidi, estis la revolucio mem, parte «protektita» de la kontraŭdiroj de la Potenco. Ĉar ili konsideris –prave malprave-, ke Largo Caballero estis obstaklo por iliaj celoj, ili liberigis sin de li kaj, kun ties kunpartoprenantoj, la dekstraj socialistoj kaj la respublikanoj, komencis ampleksan kaj sangavidan periodo de «ĉasado de sorĉistinoj».
Ene de ĉi tiu ĝenerala projekto de «reveno en la ordon», la hispanaj stalinistoj, instigitaj laŭ speciala maniero de la

rusoj, volis profiti la okazon por fini LPMU-on. La furioza malamo de la stalinistoj al LPMU en Hispanujo estis parto de ilia malamo al la trockiismo (malamo «satigita» per longa ĉeno de mortigoj). Kvankam LPMU, kiel mi jam indikis en aliaj okazoj, ne estis vere trockiisma, la stalinistoj ĉiam identigis ĝin kun la «trocki-faŝismo». Akuzi la aktivulojn de LPMU pri faŝistaj spionoj, simboligis por Stalino kaj ties partianoj politikan operacion de ampleksaj internaciaj resonoj: estis pruvo plia aldonota al la «dosiero» de la subpremado por pruvi la tutmondan konspiron de la trockiismo kontraŭ la laborista movado, la demokratio kaj la paco. Konspiro, kiu estis direktita de Berlino, Romo kaj Tokio. Kaj samtempe la procesoj de Moskvo trovis en Hispanujo novan pravigon, novan «pruvon» pri tiu internacia konspiro, kiu devigis la sovetiajn juĝistojn sendi al la morto aŭ al la koncentrejoj, ne membrojn de la bolŝevika «malnova gvardio» (kiel diris la trockiistoj), sed naziajn spionojn kaj sabotantajn agentojn. Pro la malmodera inklino de la stalinistoj (kiel ĉiuj totalismaj reĝimoj) al la ritaro, la proceso de LPMU devis tute simili la procesojn de Moskvo kaj, se eblus, oni devas formuli kontraŭ tiu frakcio disidenta de la komunisma movado la samajn akuzojn pri spionado akompanitajn de la samaj punoj. Sed kiel la situacio en Hispanujo ne estis, malgraŭ ĉio, identa al tiu ekzistanta en USSR, tiu projekto nur duone sukcesis (kio jam estas multege kaj pruvas ĝis kiu ekstremo la rusoj povis al si permesi preskaŭ ĉion en la respublika zono).
En parolado eldirita la 9-an de majo en Valencio, José Díaz deklaris:

> «Nia ĉefa malamiko estas la faŝismo... Sed la faŝismo havas siajn agentojn por labori. Kompreneble se la agentoj, kiuj laboras kun ili, dirus: "ni estas faŝistoj kaj volas labori kun vi por krei malfacilaĵojn", ili tuj estus forigitaj de ni. Tial ili devas

doni al si alian nomon... unuj nomiĝas trockiistoj (...) kaj mi diras: Se ĉiuj ĉi tion scias kaj la Registaro scias ĝin, kion faras la Registaro ne traktante ilin, kiel tiajn faŝistojn kaj ekstermas ilin sen konsidero (…)

Ĉiuj laboristoj devas koni la proceson disvolviĝintan en USSR kontraŭ la trockiistoj. Estas Trockij mem, kiu direktis ĉi tiun bandon el banditoj, kiuj elreliĝas la trajnojn en USSR, efektivigas la sabotadon en la grandaj fabrikoj kaj faras ĉion eblan por malkovri la militistajn sekretojn por transdoni ilin al Hitlero kaj la imperiistoj de Japanujo. Kaj kiam ĉi tio estis malkovrita dum la proceso kaj la trockiistoj deklaris, ke ili faris ĝin interkonsente kun Hitlero, kun la imperiistoj de Japanujo, sub la direktado de Trockij, mi demandas: ĉu ne estas tute klare, ke tio ne estas politika aŭ socia organizaĵo kun certa tendenco, kiel la anarĥiistoj, la socialistoj aŭ la respublikanoj, sed bando el spionoj kaj provokantoj serve de la internacia faŝismo? Oni devas forbalai la trockiistajn provokantojn!»[210]

La resto de la parolado estas laŭ sama maniero. Iel ajn ĝi bone reliefigas la internacian karakteron de la «trockiisma provoko».

Tuj kiam enpotenciĝis la Registaro Negrín, la sovetiaj agentoj kun la kompliceco de la kolonelo Ortega, komunisto, ĝenerala direktisto pri Sekureco en la centra Registaro, sendis serion da taĉmentoj da policistoj al Barcelono por aresti la gvidantojn de LPMU ne avizante la respublikan Registaron.

---

210DÍAZ, José: *Tres años de lucha* [hispane, Tri jaroj da lukto], Eldonejo *Nuestro Pueblo*, Toulouse, 1947, paĝoj 357-358. Estas alia eldono en la kolekto *Ebro*, Parizo, 1970, paĝoj 431-432.

Iu mateno de la monato de Junio 1937, Hernández estis kunvokita de Orlov, la KPIA-estro en Hispanujo, kiu komunikis al li:

> «De antaŭ iom da tempo ni luktas kontraŭ reto de falangista spionado. La anoj de LPMU partoprenis en ĝi. El inter centoj da individuoj enprizonigitaj, inĝeniero nomita Golfin konfesis ĉion. Nin estas tre implikita tiel, kiel la tuta trockiista bando: Gorkin, Andrade, Gironella, Arquer. Certa Roko servis kiel interrilato inter LPMU kaj la falangistoj en Perpinjano. En Ĝirono oni trovis, en manoj de certa Riera, dokumentujon plenplenan de dokumentoj. La posedanto de hotelo, Dalma, ankaŭ konfesis. Ĉio jam estis aranĝita por fari grandan ŝtatrenverson, kiun ni sukcesis neebligi ne informante la Registaron nek la ministron.»[211]

Ĉar Hernández diris, ke eble estintus pli bone tion sciigi al la Registaro, Orlov kontraŭargumentis lin: «La malamikoj estas ĉie». Sed «ĉu kaj la Ministro pri Internaj Aferoj?», kuraĝis sugesti Hernández. «Zugazagoitia estas persona amiko de iuj el tiuj, kiujn endas aresti», respondis Orlov.[212] Hernández, kiu kiam skribis ĉi tiun libron estis rompinta kun la stalinismo, detale raportas sian «krizon de konscienco» tiuokaze (kaj inkluzive siajn provojn de protesto ne pri la esenco: ke oni arestis la membrojn de LPMU, sed pri la uzataj procedoj), sed lia atesto, kiel ĉiuj ceteraj atestoj, ege pruvas kaj sen ia dubo la komplicecon ekzistantan en ĉi tiu afero inter la hispanaj stalinistoj kaj la sovetiaj agentoj.

> «Ĉi tiuj estas la faktoj laŭ ilia tuta vero -skribas Victor Serge, en *La Révolution Prolétarienne*: Fine de majo (ĝuste la 28-an [C.S.-M.]), la bonega

211Jesús Hernández, citita verko, paĝo 75. Vidu ankaŭ GORKIN, Julían: *Canibales políticos* [hispane, Politikaj kanibaloj]
212Sama verko.

ĵurnalo de LPMU, «*La Batalla*», estis ĉesigita nedifinite. La Registaro neis al la partio la rajtigon por eldoni iun alian ĵurnalon tute malestimante la gazetarliberon. Pro artikolo de la 1-a de majo, en kiu oni invitis la laboristojn teni sin viglaj kun la armiloj pretaj kaj krei revolucian fronton, Julián Gorkin estis akuzita pri instigo al la ribelo, sed li restas en provizora libereco. Ĉirkaŭ la 15-an de Junio, ni havis novaĵon pri la suspekta dramo de la morto de Bob Smilie, korespondanto de la «*Independant Labour Party*», afina al LPMU, kiu estis arestita de la hispanaj aŭtoritatoj, kiam li estis transironta la francan landlimon kun siaj paperoj en ordo por reveni en Anglujon; li estis portita, ne al Barcelono, sed al Valencio, kie li mortis en la malliberejo pro neklarigebla apendicito. Kompatinda kaj kuraĝa kamarado! Estas en via forpaso oni-ne-scias-kion rusa.

La 16-an de Junio, de Valencio oni ordonis kvardek arestojn de la ĉefaj aktivuloj de LPMU (Plenuma kaj Centra Komitato) en Barcelono. Andrés Nin kaj multaj aliaj aktivuloj, kiuj partoprenis en ĉiuj revoluciaj momentoj de Hispanujo, estis arestitaj. Kiel ili ne trovis Gorkin-on nek "Juan Andrade"-on, arestis siajn edzinojn, kiel ostaĝojn, kruelaĵo de faŝisma tipo kaj samtempe de la stilo de la specife stalinistaj operacioj.

Ili prenis la radiostacion de LPMU. La Partio restis preskaŭ ekster la leĝo. Kio restas de la hispana demokratio por la laboristoj? [213](...).»

La komploto de KPIA ekfunkciis. La «pruvo», kiu servis por pravigi la areston, estis la mapo «N», mapo de Madrido farita sur kvadratita papero, malkovrita en la falangisto

213«*La Révolution Prolétarienne*», n-ro 249 (25-an de Junio 1937).

Golfin kaj, sur kiu la polico deĉifris mesaĝon skribitan per sekreta inko, en kiu oni parolis pri N, kiel fidinda agento. Kompreneble «N» estis Nin kaj, kompreneble ankaŭ, ĉio estis falsaĵo kaj tiel kruda, ke oni devis ĝin forlasi antaŭ la proceso. La 29-an de Julio, noto de Irujo, Ministro pri Justico, anoncis, ke oni kondukis al la Tribunaloj pri Spionado kaj Alta Perfido Gorkin-on, Andrade-on, Bonet-on, Arquer-on kaj aliajn gvidantojn de LPMU kune kun la falangisto Golfin (kiu deklaris en la proceso, ke li havis neniun rilaton al LPMU).

Inter la 16-a de Junio kaj la 29-a de Julio okazis multaj aferoj. Unue la mortigo de Andrés Nin, poste la ridinda agitado de la ministroj, kiam ili troviĝis antaŭ la plenumita fakto. Ĉiuj, de la socialistoj Negrín, Prieto kaj Zugazagoitia (Ministro pri Internaj Aferoj!) ĝis la tre katolika Irujo (Ministro de Justico!) malkuraĝe cedis al la volo de la rusoj kaj de ties komplicoj de KPH. Ĉiuj povas esti konsideritaj kunpartoprenantoj de ĉi tiu politika krimo. Tamen endas mencii la intensan kampanjon de protestoj faritan en Hispanujo kaj eĉ eksterlande de grupoj, movadoj kaj personoj de maldekstro aŭ de ne stalinista ekstrema maldekstro kontraŭ la ondego de la stalinista subpremo kaj, kiu ŝajnas, ke iom sukcesis limigi ĝin. La stalinistoj en Hispanujo kaj ĉie respondis per ankoraŭ pli intensa kampanjo kontraŭ la «trocki-faŝista komploto». Unu el la plej kuriozaj specimenoj el ĉi tiu kampanjo estas sendube la «blanka libro» eldonita de KPH -pri tiu «komploto»-, kies antaŭparolo estas de la katolika kaj respublikana verkisto José Bergamín.

## LA MORTIGO DE NIN

Nin estis arestita la 16-an de Junio kune kun siaj kamaradoj. Sed li tre rapide estis disigita de ili. Neniu sciis kie li estis, nek la Registaro, nek iliaj kamaradoj, neniu, krom la gvidantoj de HPK, kiuj sciis, ke li estis en «la manoj de la

rusaj kamaradoj». Ĉie, ĵurnaloj, muroj de la grandaj urboj, senlace demando sin ripetis: Kie estas Nin? Kion la komandoj de agitiĝo-propagando de KPH respondis: en Salamanko aŭ en Berlin'.

La 4-an de Aŭgusto, la respublika Registaro, instigita doni klarigojn, ĉefe de la anarĥiistoj, publikigis noton, kiu tekstis: «El la kolektitaj informoj, oni povas konkludi, ke Nin estis arestita de la polico pri ĝenerala Sekureco samtempe, kiel la aliaj gvidantoj de LPMU, ke li estis translokita al Madrido en preventan malliberejon ĉi-cele aranĝitan kaj, ke de tie li malaperis[214]». Tiutempe cirkulis pluraj versioj pri la malapero de Nin. La stalinistoj cirkuligis la onidiron, ke komando de Gestapo eltiris lin el la «preventa malliberejo, kiun oni al li aranĝis» por meti lin en sekuran lokon: sendube en Salamanko aŭ Berlino. Ankaŭ cirkulis la onidiro (pri kiu fariĝis eĥo «New York Times»), ke oni trovis lian kadavron en la ĉirkaŭaĵoj de Madrido. Sed estas senutile perdi tempon en supozoj. Tio, kion ni scias, estas sufiĉe klara. Laŭ la atestoj de Jesús Hernández, membro de la tiama Politika Buroo de KPH, laŭ la kaŝaj konfidencoj de malnovaj stalinistoj kaj la konstatoj de la politikaj amikoj de Nin, ĉi tiu estis arestita kaj torturita en unu el la multnombraj «ĉokoj» de la rusaj sekretaj servoj, probable en *Alcalá de Henares*, proksime de Madrido. Li estis torturita pro tre simplaj kaj evidentaj motivoj: en la ritaro de la procesoj de Moskvo, kiuj ripetiĝis en Hispanujo, kvankam multaj aĵoj estis identaj -politika amalgamo: Golfin, la falangisto kaj LPMU; akuzo pri spionado ktp. - mankis nepra peco: la konfesoj. Nin estis torturita por devigi lin subskribi konfeson per kiu estus konfirmitaj ĉiuj stalinistaj tezoj, laŭ la kutima proceduro, kiu tiom da sukceso -se oni povas diri tion- havis en Moskvo (kaj kiun oni daŭre uzas en la nomita socialista mondo, kiel oni vidis antaŭ nelonge en Kubo). Tamen Nin

214Citita de Broué kaj Temine, citita verko, paĝo 276.

ne subskribis kaj mortis pro torturo. Kial Nin? Tio ankaŭ estas logika, ĉar li estis (J. Maurin estis enprizonigita en frankista zono) la tiama LPMU-estro kaj krome «al KSŜ multe interesis Andrés Nin. Intimulo de la grandaj homoj de la Revolucio de Oktobro en Rusujo, li laboris kun ili ekde la fondo de la Ruĝa Sindikata Internacio, de kiu li estis unu el la sekretarioj. Post la morto de Lenino, li ne kaŝis sian amikecon kun Trockij. La stalinista politiko ne konvinkis lin kaj li publike esprimis sian malakordon. Nelonge post la fiasko de la opozicio en la Bolŝevika Partio, Nin, konsiderita kiel malfidela, estis forpelita el USSR. Li revenis en Hispanujon, kiam proklamiĝis la Respubliko, kaj, kune kun la ekskomunistoj, kiuj organizis la Laboristan kaj Kamparanan Blokon, kreis LPMU-on»[215]. Per Nin, oni batis ne nur LPMU-on, sed ankaŭ la internacian trockiismon kaj Trockij-on mem.

Laŭ J. Hernández, estas la «plej demona» el la kunlaborantoj de Orlov, la «majoro Carlos» (Vittorio Vidali, itala stalinisto, kiu poste estis sekretario de KP en Triesto), kiu partoprenis dum la tuta operacio kaj al kiu venis en la kapon simuli la atakon de la komando de Gestapo por ke malaperu por ĉiam la torturita korpo de Andrés Nin[216].

## LA PROCESO DE LPMU

En Barcelono la 29-an de Oktobro 1938 malfermiĝis en la Centra Tribunalo pri Spionado kaj Alta Perfido la proceso kontraŭ la plenuma Komitato de LPMU. Kompreneble la

215Jesús Hernández, citita verko, pág. 91. Sobre las torturas infligidas a Andrés Nin, véase en el mismo libro las págs. 103-107

216En: NIN, Andrés: *Los Problemas de la Revolución Española*, [hispane, La Problemoj de la Hispana Revolucio], *Ruedo Ibérico*, Parizo, 1971 (kolekto de tekstoj elektitaj kaj prezentitaj de Juan Andrade) estas publikigita unu el la deklaroj, kiun faris Nin al la stalinista polico, en Madrido aŭ en *Alcalá de Henares*, la 21-an de Junio 1937. Ĉi tiu deklaro estas de biografia karaktero. Ĉar ĝi formis parton de la dosiero pri la proceso de la Plenuma Komitato de LPMU, la advokato de la Partio sciis ĝian ekziston kaj permesis al la vidvino de Nin kopii ĝin.

akuzitoj estis dum la tuta tempo en la malliberejo kaj krome estis centoj da membroj de LPMU tiel, kiel anarĥiistoj, enprizonigitaj en la tuta respublika Hispanujo. La proceso malfermiĝis sen konfesoj. Kaj la akuzitoj, krom intensega kampanjo de solidareco, ricevis dum la proceso atestojn siafavore de la eksĉefministro Largo Caballero[217] kaj de la gvidantoj de NKL-IAF inter aliaj (la Nacia Komitato de NKL energie protestis ekde la 28-a de Junio 1937 per publika dokumento subskribita de la nacia sekretario Mariano R. Vázquez, kontraŭ la subpremo, kiu suferis LPMU-on ekde Decembro 1936.)

La pruvoj pri spionado fabrikitaj de la rusaj sekretaj servoj estis de tiel «malbonega kvalito», ke la juĝistoj devis forlasi tiun akuzon kaj nur restis al ili tiu pri «ribelo» (!). Ne estis mortkondamnitoj, kiel deziris la stalinistoj, sed ĉiel oni kondamnis ilin al multaj jaroj de malliberejo. Jen kelkaj fragmentoj de la juĝa decido:

> «(...) Ili ĉiam pretendis konservi la direktadon de tiaj militistigitaj unuoj (la volontarmeoj de LPMU [C.S.-M.]) kaj etendi sian influon de Partio sur ĉiujn eblajn unuojn cele havi solidan apogon por konkeri la politikan potencon, se okazos la bezonaj objektivaj kondiĉoj, kiujn ili mem strebos krei por anstataŭigi la laŭleĝan Registaron per alia Registaro rimarkeble laborista kaj kamparana, preta revolucie starigi la doktrinojn, kiuj estas al ili propraj kaj por tio ili teorie kontraŭstaris, en la ĵurnalo de sia partio, "*La Batalla*",

217Nelonge post la forpelo el la Registaro, Largo Caballero estis forpelita el ĜUL kaj enfermita en sia loĝejo de Valencio. Ĉiuj liaj partianoj estis forpelitaj el la postenoj de respondeco de ĜUL en la redaktejoj de la ĵurnaloj «*Claridad*», «*Adelante*», «*La Correspondencia de Valencia*» ktp. Tiu «komploto» efektiviĝis danke al la transira alianco de la komunistoj kaj dekstraj socialistoj. Sed preskaŭ ĉiam estis la Registaro Negrín, kiu okupis sin decidi, laŭ aŭtoritatema maniero, la policajn disponojn kaj aliajn de alia tipo por fini la maldekstran opozicion en la socialismaj vicoj. (Vidu, ekzemple, Broué kaj Témime, citita verko, paĝoj 281-284.)

la starigon de regula armeo, kiel volis la Registaro, kaj la malaperon de la volontarmeoj.

»(…) Perforta opozicio al la Registaro kaj akra kritiko pri la disponoj adoptitaj de ĉi tiu lasta tiel, kiel pri la institucioj de la Respubliko kaj pri la partioj kaj organizaĵoj subtenantaj ĝin, por malfortigi la nuntempan reĝimon kaj krei la bezonajn eksterajn kondiĉojn por preni la potencon, kion ili unue estus farintaj en Katalunujo kaj poste en la cetero de la lojala Hispanujo kaj tiel starigi komunisman reĝimon organizitan laŭ la doktrino de sia partio (...) La akuzitoj sube menciitaj kontribuis subteni staton de agitiĝo kaj ribelo de la laborista klaso, rompis la kolektivan disciplinon tiel necesan en la gravaj momentoj, kiujn trairis la Respubliko, ili endanĝerigis la prestiĝon de ĉi tiu lasta antaŭ la internacia opinio, kies favoraj reagoj al la kaŭzo de la popolo fortigis la Registaron, per kio ili ĉi-sence favoris nerekte, kaj kvankam ĉi tio ne estis ilia intenco, la projektojn de la ribeluloj (...).

»La akuzitoj, kiujn ni tie mencias, estis realigantaj ĉi tiujn agojn, kiam la 3-an de majo 1937 okazis en Barcelono renkonto inter grupo de laboristoj kaj la publika forto... (la akuzitoj) opiniis, ke venis la tempo doni konkretajn enhavon kaj celon al la perfortaj kaj spontaneaj agoj (substrekita de mi [C. S.-M.]) de la laboristaj amasoj kaj klopodis por profiti ilin por plenumi siajn ideojn pri konkero de la potenco...

»El tio, kio antaŭas oni ne povas dedukti la pruvon, ke la akuzitoj faciligis al la faŝistoj iajn novaĵojn pri la situacio de la batalfrontoj aŭ pri la organizo de la postmilitfronto; ankaŭ ne, ke ili subtenis nerektajn kaj rektajn rilatojn al ili aŭ al policaj aŭ militistaj institucioj de la invadantaj landoj; ankaŭ ne, ke ili estis en kontakto aŭ helpis grupojn aŭ falangistajn

> organizaĵojn de la lando; ankaŭ ne, ke ili pretendis apogi la ribelajn batalantojn aŭ, ke ili ricevis ekonomian helpon de la malamikoj de la ŝtato por sia politika propagando. (Kontraŭe, oni deduktas el tio, kio antaŭas, ke ĉiuj ili ĝuas grandan kaj malnovan kontraŭfaŝisman prestiĝon; ke ili kontribuis per sia penado al la lukto kontraŭ la militista ribelo kaj, ke la pozicio, kiun ili defendas, nur respondas la celon neniigi la demokratian Respublikon por starigi reĝimon laŭ iliaj propraj sociaj konceptoj.) (…)
>
> »Tria konsidero: Ke la Dekreto-leĝo de la 13-a de Februaro 1937 ne povas aplikiĝi en ĉi tiu kazo, ĉar ĝi difinas kaj punas laŭ ekskluziva maniero la agojn de spionado, kaj el la faktoj, kiujn oni deklaris pruvitaj, oni ne deduktas, ke ili povas esti inkluzivitaj en la numeroj 2, 3, 4, de la 1-a artikolo de la menciita dispono, sur kio la prokuroro de la Respubliko apogas sian akuzon, ĉar ne temas pri agoj realigitaj kun diskreta aŭ sekreta karaktero, ĉar ekzistas nenia helpo al organizaĵoj aŭ sociaj grupoj submetitaj al la influo de fremdaj ŝtatoj favorantaj la militon kontraŭ la laŭleĝa Registaro, ĉar la agoj, kiuj estas objekto de la sankcioj, ne estis faritaj intence apogi la ideojn de la frankistoj nek de la eksterlandanoj militantaj kontraŭ la Respubliko.»

Ĉi tiuj estis la kondamnoj:

> «Ni deklaras: ke ni devas kondamni kaj kondamnas la akuzitojn Julián Gómez García (Gorkin), Juan Andrade Rodríguez, Enrique Androher Pascual (Gironella) kaj Pedro Bonet Quito, al 15 jaroj de disigo de la socia komunumo por ĉiu el ili, kiel akuzitoj pri delikto de ribelo antaŭe difinita kaj al Jorge Arquer Saltó al tiu de dekunu jaroj de disigo de la socia komunumo (Arquer ne estis en Barcelono

> dum la "majaj okazintaĵoj", cirkonstanco, kiun oni konsideris malpligraviga [C.S.-M.]), kiel kunkulpulo de la sama delikto kaj, ke ili devu plenumi ĝin en laborkampoj kaj krome la ĉesigo de balotrajto dum la tempo daŭranta la kondamno…»

Du akuzitoj estis malkondamnitaj.[218]

La Tribunalo ankaŭ dekretis la malfondon de la Asocioj de la Laborista Partio de Marksisma Unuiĝo kaj Ibera Komunisma Junularo.

Malkondamnitaj pro spionoj, ili estis kondamnitaj pro revoluciuloj! Evidente, laŭ tio kaj pro pli granda motivo, oni povintus akuzi pri la samaj «krimoj» NKL-IAF-on, sed NKL-IAF tiutempe nombris pli ol du milionojn da membroj kaj LPMU ĉirkaŭ 50.000. Sur tio baziĝis la tuta afero.

LPMU kaj la Junularoj estis oficiale malfonditaj de la tribunalo, situacio en kiu ili fakte troviĝis de antaŭ pluraj monatoj, kio ne neebligis ilin daŭre efektivigi sian aktivecon (malpliigita, kompreneble) en la kaŝiteco kaj ĉefe daŭre eldoni, ankaŭ kaŝe, sian gazetaron.

Konvenas ripeti, ke krom ĉi tiu proceso kontraŭ la estraro de la LPMU, centoj da aktivuloj de ĉi tiu organizaĵo estis arestitaj -kun aŭ sen proceso-. En la momento de la falo de Katalunujo, multaj sukcesis, ofte kun la kompliceco de siaj provosoj, eskapi el siaj malliberejoj kaj pasi al Francujo.

Kvankam kion ili volis estis forte bati LPMU-on, pro la politikaj motivoj jam indikitaj, kaj kvankam ili ne kuraĝis fari tion saman al NKL-IAF, kompreneble la subpremo ankaŭ amplekse efikis ekster la vicoj de LPMU. Jen kelkaj ekzemploj: en *Tortosa* okazis proceso kontraŭ 128 laboristoj akuzitaj preni la armilojn dum la «majaj okazintaĵoj». La Tribunalo petis 4 mortpunojn kaj plurajn punojn de

218La traduko de la kopio de ĉi tiu juĝa decido estis al ni ĝentile cedita de W. Solano.

malliberejo, de 6 ĝis 20 jaroj.[219] R. Louzon, membro de internacia delegitaro de esploro pri la subpremo kontraŭ la revoluciuloj, aŭdis diri al Mariano Vázquez kaj Federica Montseny, ke «NKL nuntempe havas 800 membrojn enprizonigitajn kaj 60 "malaperintojn"».[220] Ĉar kvankam la malliberejoj -«privataj» aŭ ne- estis plenaj de revoluciaj aktivuloj kondamnitaj de la Tribunaloj pri Publika Ordo, reorganizitaj de Dekreto de la 23-a de Junio 1937 (tri civilaj kaj du militistaj juĝistoj, nomumitaj de la Registaro, ĉar la malnovaj Popolaj Tribunaloj estis malfonditaj), la plej uzata metodo por likvidi la «trockiistan» aŭ anarĥiistan «popolaĉon» estis la «malapero», tio estas, la torturo aŭ la pafo en la nukon. Krom Nin, Berneri, A. Martínez, Marc Rhein, Bob Smilie kaj ĉiuj, kiujn mi menciis, aliaj konataj aktivuloj malaperis en Hispanujo senspure: «Kurt Landau, aŭstra aktivulo, malnova sekretario de la Opozicio de Internacia Maldekstro, solidara kun LPMU kontraŭ Trockij (...) la pola trockiisto Freund, nomita Moulin, la ĉeĥa trockiisto Erwin Wolff, ekssekretario de Trockij, José Robles, eksinstruisto de la Universitato John Hopkins...[221]» kaj la sennombraj anonimuloj mortpafitaj dum aŭ post la «majaj okazintaĵoj» aŭ pro «militista malobeo» en la militfronto.

«La Komisiono pri Esploro direktita de Félicien Challaye kaj la angla McGovern restis mirigita, kiam ĝi estis akceptita en la Malliberejo *Modelo* de Barcelono, en Novembro 1937, de la Internacio, kantita de kvincent arestitoj.»[222]

## SMI (Servo pri Militista Informo)

Kreita la 15-an de Aŭgusto 1937 de Dekreto de la Ministro pri Defendo, Indalecio Prieto, ĉi tiu servo pretendis esti

219Vidu «*La Révolution Prolétarienne*», n-ro 250 (10-an de Julio 1937).
220Sama verko.
221Broué kaj Temime, citita verko, paĝo 278.
222Sama verko.

klasika servo de kontraŭspionado, kiun ŝajne ĉiu «moderna» armeo devas posedi. Tamen pro la specifaj kondiĉoj de la enlanda milito en Hispanujo, ĝia triangula karaktero: lukto inter revolucio kaj kontraŭrevolucio kaj milito kontraŭ la faŝismo fare de ĉi tiuj du tendencoj, SMI tuj iĝis la granda elpuriganto, la servo, kiu efektivigis la «ĉasadon de sorĉistinoj» ene de la respublikanaj trupoj (kaj ne nur en la armeo). «Post la respublikano Sayagües, (SMI) estis direktita unue de la socialisto Uribarri, eksoficiro de la Civilgvardio, kiu rekte interkompreniĝis kun la rusoj de la "specialaj servoj" kaj post sia fuĝo al Francujo (kun kapitalo el ŝtelitaj juveloj), de Santiago Garcés, kiu estis konsiderita unu el la mortigistoj de Nin. Prieto, kreinto de SMI, detale rakontis kiel li konstatis, ke la Servo eskapis de liaj manoj. La majoro Duran, komunisto, estro de SMI de Madrido, nomumis komunistajn aktivulojn por ĉiuj gravaj postenoj kaj la «rusaj teknikistoj» protestis, kiam Prieto volis ilin resendi en la armeon. Kelkaj monatoj post sia kreo, SMI, kiu tute estis ekster la aŭtoritato de la ministro pri la Nacia Defendo, nombris pli ol 6.000 agentojn kaj direktis malliberejojn kaj koncentrejojn.»[223]

Tiel do, en siaj originoj, SMI estis servo de militista kontraŭspionado, sed post kiam ĝin regis la komunistoj, de proksime konsilitaj de la specialistoj de KPIA, ĝi iĝis politika superpolico, farita el la modelo de tiu rusa servo, kiu siavice estis tre inspirita de la Gestapo. Ĝi estis dividita en serio da sekcioj, kiuj kovris ĉiujn militistajn, ekonomiajn kaj politikajn aktivecojn («viglado» de la partioj kaj organizaĵoj) kaj havis la nepran specialan Brigadon komisiitan por la torturoj kaj ekzekutoj. La reto de malliberejoj «privataj» kaj koncentrejoj tiel, kiel ĝenerale la plimulto de la policaj aktivecoj de SMI, estis ekster la regado de la respublikaj aŭtoritatoj kaj estis sekretaj, escepte kiam endis aresti faŝistojn, pri kio ili fieris,

223Peirats, citita verko, 3-a volumo, paĝoj 277 ĝis 291.

por povi trankvile daŭrigi siajn kontraŭrevoluciajn terorismajn aktivecojn.
José Peirats reproduktis en sia libro tutan serion da donitaĵoj eltiritaj de la konfidencaj informoj de NKL kaj IAF pri la aktivecoj kaj la metodoj de ĉi tiu politika superpolico.[224]
Laŭ tiuj informoj, la SMI-estro estis rusa, kies nomon oni ne mencias. Inter la hispanaj stalinistoj enoficigitaj en postenoj de respondeco de la Sekureco, kiuj intime kunlaboris kun SMI oni citas la nomojn de: Ortega, Burilo, Rodríguez Sala, José Cazorla, Santiago Carrillo.[225] Koncerne la metodojn, ili estis tiuj de ĉiuj politikaj superpolicoj, stalinistaj aŭ faŝistaj. Legante la atestojn publikigitajn de Peirats oni ne povas ĉesi pensi pri la teknikoj de la pridemandadoj de la nazioj sub la okupo (aŭ en Germanujo mem), aŭ pri la gajaj proletaj festoj en la keloj de la Lubianka!
La akso kompreneble estis la torturo. Ĉiu suspektato, ĉiu disidento, devis fini konfesante, ke li estis faŝista spiono. La instrumentoj de torturo estis tiel variitaj, kiel tiuj de kiu ajn alia loko: krom la batoj, pendi de la piedoj aŭ la manoj, la nadloj inter la ungoj ktp, estis elektraj seĝoj «similaj al tiuj uzataj en Usono», escepte ke ili ne estis destinitaj rapide mortigi, sed kontraŭe, ke daŭru la torturo. Ankaŭ por premplatigi la korpojn de la pridemanditoj estis premilo, kies supera parto kurioze (¿?) havis formon de hokokruco... Ankaŭ estis etaj ĉeloj; en kelkaj, la arestito nur povis resti stare kaj la planko estis farita de akraj kaheloj, kiuj vundis la piedplandon; aliaj, kiujn oni nomis «ŝrankoj», estis de du

224Sama verko, paĝo 286.
225Santiago Carrillo, ĝenerala sekretario de la hispana KP, estis dum la enlanda milito ĝenerala sekretario de USJ -kaj unu el la aŭtoroj de ĝia «stalinismigo»- kaj «respondeculo pri la Sekureco» en la Estraro pri Defendo de Madrido ĝis la monato de Februaro de 1937, kiam li estis anstataŭita de Cazorla. Sekve li ne kunlaboris kun SMI, kiu estis kreita poste, sed kun KPIA, kaj laŭ tre rekta kaj... efika maniero dum la monatoj, kiam li estis respondeca de la Sekureco en Madrido. Tio donas al li, kompreneble, plenan aŭtoritaton por hodiaŭ babili pri «socialismo kaj libereco».

klasoj: la grandaj, kie la arestito povis stari, sed li apenaŭ povis movi sin, kaj la malgrandaj, kie oni nur povis esti kaŭre; ankaŭ estis skatoloj, kie la korpo de la malliberulo restis mallarĝe enfermita kaj el kiu nur elstaris la kapo. En ĉiuj ĉi «politikaj izolejoj», kiel oni ilin nomis en USSR, la malliberuloj povis resti semajnojn aŭ la tutan tempon, kiu plaĉis al iliaj torturistoj, dum ili ne konfesos, ke ili estis faŝistaj spionoj. En la atestoj kolektitaj de Peirats, oni parolas ĉefe pri unu el tiuj ĉokoj de SMI, lokita en Valencio, en la malnova monaĥejo de Sankta Ursula. Sed, samkiel en kiu ajn alia publika servo bone centralizita, ĉiuj ĉokoj estis de la sama modelo.[226]

## LA MALFONDO DE LA KONSILANTARO DE ARAGONO

Ĉar la lukto inter revolucio kaj kontraŭrevolucio en Katalunujo tiel rekte koncernas Aragonon, mi opinias, ke utilas ĉi tie nelonge resumi kiel ĉi tiu regiono estis trafita de la kontraŭrevolucia ondego, kiu estiĝis sur Katalunujo.
Kiam, ĵus detruita la militista ribelo en Katalunujo, la kolonoj de volontarmeanoj eniris en Aragonon kaj, kiam la aragonaj laboristoj grupiĝis en «liberecanaj komunumoj», ĉi tiu regiono iamaniere iĝis la avangardo de la revolucia Katalunujo tiel en la militista kampo, kiel en la politika, ekonomia kaj sociala. La «potenco», kiun havis en ĝi la anarĥiistoj, evidentis, sed tio ne okazis, ĉar ili uzis la teroron, kiel diris kaj diras ankoraŭ la stalinistoj[227], sed simple ĉar ili estis plimultaj en la militfronto kaj en la

226Pro tio kaŭzas timtremojn ke, post ol esti informintaj pri la torturoj kaj la hororoj de SMI (pri kiuj mi ne donis pli ol iun ekzemplon), la gvidantoj de NKL-IAF diskutas inter si por decidi ĉu ili devis akcepti la postenon, kiun proponas al ili la komunistoj en tiu politika superpolico, kaj fine ne akceptas ĝin, ĉar la koncerna posteno ne havas... realan potencon! (Vidu Peirats, citita verko, 3-a volumo, paĝo 289. Ni indiku, ke Peirats tre forte mallaŭdas la agojn de SMI, partoprenas aŭ ne en ĝi NKL-IAF)
227Vidu la jam antaŭe cititajn librojn de Dolores Ibarruri, Arthur London, la «oficiala» historio de la milito de KPH, la memoraĵoj de Líster ktp.

postmilitfronto. En Oktobro 1936, la anarĥiistoj organizis la konsilantaron pri Regiona Defendo de Aragono preziditan de Joaquín Ascaso (frato de Francisco, mortinto dum la bataloj de Barcelono, la 20-an de Julio, kaj de Domingo, kiu komandis la divizion Ascaso) kaj, kiu estis konsistigita nur de membroj de NKL-IAF. Tiu konsilantaro pretendis esti la kunordigejo inter la postmilitfronto kaj la militfronto, inter la kolonoj kaj la «liberecanaj komunumoj» -aŭ aliaj-, inter la socia revolucio kaj la militbezonoj ktp. Ekzemple en ĝia unua oficiala proklamo oni povas legi tion sekvan:

> «Unue: Ke ĉiuj petoj de varoj de unua neceso, brutaro, uzaĵoj kaj aliaj materialoj, estu rekte petitaj al ĉi tiu konsilantaro, kiu racie plenumos ilin laŭ la ebloj de la regiono, sekve malrajtigante energie la okazajn faktojn realigitajn de kiu ajn pri ĉi tiu afero, escepte de okazo de ekstrema urĝo, kiu neebligas ĉi-rilate la naturan proceduron, kiun ĉi tiu konsilantaro postulas de ĉiuj; kaj »Due: Ke la kontraŭfaŝismaj kolonoj ne devas nek povas enmiksiĝi en la politikan-socian vivon de popolo, kiu estas libera pro esenco kaj pro propra personeco.»[228]

La du ĉefaj zorgoj de la konsilantaro restas resumitaj en la supre menciitaj punktoj: la evidenta neceso de kunordigo ne nur ekonomia, sed ankaŭ militista (armilaro, provizado de la kolonoj, ekzemple, kiujn aludas aliaj «konsideroj» de la proklamo) kaj la ne malpli evidenta neceso de la aŭtonomeco, de la libereco de ĉiu liberecana komunumo -kaj pli ĝenerale de ĉiu vilaĝo-, kiu memorganizas sin en la ĝenerala -kaj malsimpla- kadro de la revolucio kaj la milito. Kaj ĉar mi al mi permesis tiel severajn kritikojn al la anarĥiistaj gvidantoj, ankaŭ povas rekoni nun, ke la konsilantaro de Aragono respektis la aŭtonomecon de la komunumoj kaj la diversecon de ties revoluciaj spertoj.

228Peirats, citita verko, 1-a volumo, paĝo 213.

Neniam Joaquín Ascaso montriĝis kiel la regiona vicreĝo, la despoto kaj la ŝtelisto prezentita de la komunista propagando. Koncerne la problemojn de kunordigo kaj la postulojn de la milito, la kontrastigitaj tezoj estas ĝis tia ekstremo partiaj, ke estas malfacile formi al si objektivan opinion pri ili. La liberecanaj komunumoj abundis en Aragono kaj profunde transformis la vivon de la malriĉaj laboristoj kaj kamparanoj, de la komercistoj kaj de la metiistoj (kvankam ili kelkfoje daŭre konservis kaj solidigis kelkajn reakciajn strukturojn; ekzemple mi jam komentariis la dusencon, almenaŭ, de la familia salajro kaj la salajra diskriminacio koncerne la virinlaboron), sed estas malfacile diri kiom la konsilantaro de Aragono kunlaboris en ĉi tiuj transformadoj aŭ ĉu ĝi estis esenca faktoro en la socia revolucio en Aragono aŭ ĉu, male, havigante servojn por la kunordigo inter komunumoj, ĝi estis speco de simbola ŝildo de la spertoj, kiujn ĝi aprobis ne plenumante en ili gravan rolon.
Estu kiel ajn, jam enpotenciĝinta la konsilantaro, Ascaso iris al Madrido, por ke ĝin rekonu la centra Registaro. Malgraŭ la opinio de la komunistoj, kiuj volis reveni en la «laŭleĝan» politikan administrantaron -civila reganto kaj urbaj konsilantaroj, kiuj estis anstataŭitaj de la konsilantaro kaj la lokaj revoluciaj Komitatoj-, Largo Caballero, tiam Ĉefministro, akceptis rekoni la konsilantaron kondiĉe, ke estu reprezentitaj en ĝi ĉiuj partioj de la Popola Fronto. Ascaso akceptis kaj la konsilantaro, reorganizita en Decembro, konsistis el 7 membroj de NKL-IAF kaj 7 membroj de aliaj organizaĵoj (KPH, ĜUL, respublikanoj kaj unu membro de Sindikatista Partio). Sed la anarĥiistoj, plimultaj en la regiono, daŭre «superregis» la konsilantaron.
Post la «majaj okazintaĵoj», ene de la impeto de la granda ofensivo por la reveno en la burĝan ordon, la komunistoj kaj la dekstraj socialistoj decidis likvidi la konsilantaron de

Aragono, la liberecanajn komunumojn (kiuj estis la ĉefa celo) kaj la relativan aŭtonomecon de tiu regiono.
«La moralaj kaj materialaj bezonoj de la milito postulas laŭ urĝa maniero iom post iom koncentri la aŭtoritaton de la ŝtato por ke ĝi povu esti efektivigita per unueco de kriterio kaj intenco (...). La aragona regiono, kapabla pro la harditeco de siaj homoj por la plej altaj homaj kaj ekonomiaj kontribuoj al la kaŭzo de la Respubliko, suferas kun pli granda rigoro ol kiu ajn alia la efikojn de la disdividiĝo de la aŭtoritato, pro kio estiĝas difekto al la ĝeneralaj kaj ideologiaj interesoj.»[229] Ĉi tiuj rivelantaj linioj estis eltiritaj el la Dekreto pri malfondo de la Konsilantaro de Aragono, kiu estis anstataŭita de civila Guberniestro, la respublikano Mancetón, aliancano de KPH; la Revoluciaj Komitatoj estis anstataŭitaj ĉi tie, kiel en Katalunujo, de la Urbaj Konsilantaroj, kiuj kompreneble ne estis balote elektitaj.
Sed la Registaro neniam kuraĝintus rapidage nuligi la konsilantaron. Por fari ĝin necesis nova kontraŭrevolucia konspiro, kiu konsistis militiste invadi Aragonon per tre falsaj pretekstoj (ripozo de la trupoj, militistaj manovroj ktp.) por ke, kiam aperos la Dekreto en la Oficiala Ĵurnalo (la 10-an de Aŭgusto 1937 -aŭ la 11-an, la historiistoj ne interkonsentas pri la dato), tiuj «fidelaj» trupoj jam estu aplikanta ĝin.
Enrique Líster, unu el la militestroj respondecaj de ĉi tiu operacio, per tiu trankvila cinikeco, kiun donas la stulteco, rivelis kelkajn detalojn de tiu konspiro en siaj Memoraĵoj.228 Indalecio Prieto, Ministro pri defendo, kunvokis lin en sia oficejo la 5-an de Aŭgusto matene.

> «Li klarigis al mi, ke la Registaro decidis malfondi la Konsilantaron de Aragono, sed ke li timis, ke la anarĥiistoj rifuzos obei tiun ordonon kaj, kiel, krom la fortoj de polico de la konsilantaro, ili havis ankaŭ tri

229Citita verko, 2-a volumo, paĝo 277.

Diviziojn de la Armeo, li proponis al la Konsilantaro de Ministroj, kaj ĉi tiu lasta akceptis ĝin, tien sendi militistan forton kapablan permesi la plenumon de tiu registara decido (...). Li deklaris min, ke estos neniu skribita ordono por la komisio, kiun ili komisiis min, nek komunikaĵoj pri ĝia plenumo, ke temis pri sekreto inter la Registaro kaj mi, ke mi devis likvidi senhezite kaj sen ia burokrata aŭ laŭleĝa proceduro ĉiujn tiujn, kiujn mi konsideris necese likvidi (substrekita de mi [C.S.-M.]) kaj, ke min subtenis la tuta Registaro.»[230]

Kelkajn paĝojn poste, Líster ŝajnigas koleriĝi pro la sinteno de Prieto, kiu publike lin riproĉis lian sovaĝecon dum tiu operacio de pureco. Kial li indigniĝis? Ĉu eble Prieto ne tre klare klarigis al li la kondiĉojn de la sekreta interkonsento: «Faru kion vi volu, ni protektas vin, tamen ni oficiale scias nenion...»? (Ni cetere rimarkigu, ke E. Líster estas unu el la gvidantoj de disiĝo de la Komunista Partio, kiu riproĉis al la direktantaro D. Ibarruri-Carrillo ties «kontraŭsovetiajn» kritikojn koncerne la intervenon en Ĉeĥoslovakio. Líster kaj ties partianoj formis duan komunistan partion: PCOE*)
Líster kaj la ceteraj «lojalaj» komandantoj ĝoje ĵetis sin en la subpremon.

> «Tuj la 11-a divizio de la komunista komandanto Líster (...) ekagis kontraŭ la Komitatoj kaj la Kolektivigoj, kies malfondon unuanime postulis la gazetaro de la Popola Fronto. La ĵurnalo de la konsilantaro, "*Nuevo Aragón*", estis ĉesigita kaj anstataŭita de la komunista "*El día*". La lokaj Komitatoj estis anstataŭitaj de Urbaj konsilantaroj, instalitaj de la trupoj de Líster. La ejoj de NKL kaj de

230LÍSTER, E: *Nuestra guerra* [hispane, Nia Milito], *Ediciones Ebro*, Parizo, Paĝo 152.
*Net: Partido Comunista Obrero Español, hispane Hispana Laborista Komunista Partio

> la liberecanaj organizaĵoj estis militiste okupitaj kaj poste fermitaj. Multnombraj gvidantoj estis arestitaj kaj inter ili Joaquín Ascaso, la 12-an de Aŭgusto, akuzita pri «kontrabando» kaj «ŝtelo de juveloj». La 18-an de Septembro, pro fino de la leĝa proceso sen verdikto, li ree estis liberigita. Ĉirkaŭ tiu dato, la celo estis atingita, la lasta revolucia potenco estis definitive likvidita.[231]»

César M. Lorenzo rimarkas:

> «Ĉu estis falontaj sur la komunistajn trupojn la konfederaciaj divizioj lokitaj en la militfronto de Aragono (la divizioj 25-a, 26-a kaj 28-a, kaj oni ne kalkulis la restojn de la 29-a Divizio, eksLPMU-ista, kiu estis metitaj sub la ordonoj de la liberecano Miguel García Vivancos)? La soldatoj arde deziris ĝin, sed la Nacia Komitato de NKL kaj la Duoninsula Komitato de IAF intervenis por neebligi, ke ili kaŭzos novan enlandan militon; ili petis ilin, ke ili daŭre havu paciencon kaj, ke ili faru nenion sen la konsento de la Organizaĵo, ĉar ago de malespero povus rapide transdoni la respublikan zonon al Franco. Sekve la konfederaciaj trupoj ne movis sin.»[232]

«Koncerne la Nacian Komitaton de NKL kaj la Duoninsulan Komitaton de IAF, ilian pasivan sintenon oni klarigis pro tio, ke ili ĉesis interesiĝi pri organizaĵo, kiu stariĝis sen ilia rajtigo kaj spite al la interna disciplino; ankaŭ oni klarigis ĝin, ĉar ili deziris rekunlabori kun Negrín, kaj sekve ili volis kaŭzi neniun gravan konflikton, kiu povus veneni la rilatojn.»[233]
Ne konscie Lorenzo (kies libro inklinas pruvi, ke la hispanaj anarĥiistoj estis tiel kompetentaj, kiel kiu ajn por iĝi

231Broué kaj Temime, citita verko, paĝo 280.
232Lorenzo, citita verko, paĝo 306.
233Sama verko, paĝo 207.

«respondeca» politika burokrataro) ĉi tie faras kritikon kontraŭ la estraro NKL-IAF.
Evidente tiel en Aragono, kiel en Katalunujo aŭ en kiu ajn alia loko, ĉiuj revoluciaj disponoj realigitaj de la anarĥiistaj amasoj fariĝis sen «ilia» rajtigo kaj spite al la interna disciplino.
Surprizitaj kaj «perfiditaj» de iliaj naciaj gvidantoj (ĉar la aliaj estis arestitaj), la homamasoj ne kontraŭstaris veran reziston al la militista «puĉo», kiu senigis ilin je sia aŭtonomeco. Sanga subpremo surfalis sur la okupitan Aragonon kaj tio sola, kion oni povas diri favore al la gvidantoj de NKL-IAF estas, ke danke al sia interveno ĉe la Registaro ili evitis, ke multaj anarĥiistaj lokaj gvidantoj estis mortpafitaj. Estis tamen centoj da enkarcerigitoj kaj nova amaso da «malaperintoj».

> «Sed la ago de la komunistaj militistaj fortoj baldaŭ evidentigis la atingon de la katastrofo. Aragono restis ekonomie ruinigita de la paso de la armeo; la kamparanoj jam ne sciis kiun fidi; la senposedigitaj kolektivistoj rifuzis labori kiel antaŭe por la posedantoj, la konfederaciaj trupoj estis senkuraĝigitaj, miloj da homoj rifuĝis en Katalunujo. La komunista ministro pri Terkulturo, Vicente Uribe, devis decidi alion kaj ree toleri la kolektivigojn, ĉar endis savi la rikolton. Kaj, kiel impresa atesto pri la forto de la terkultura aragona kolektivismo, la kamparanoj rekonstruis preskaŭ ĉiujn Kolektivigojn kaj la anarĥiistoj estis liberigitaj kaj komencis releviĝi. Post ol esti ĉerande de enlanda milito, post ol ruinigi Aragonon, kolerigi (?) la konfederaciajn diviziojn, mortigi centojn da homoj, la Registaro, submetita al la komunista regado, liberigis sin je problemoj.»[234]

234Sama verko, paĝo 309-310. Vidu ankaŭ GUÉRIN, Daniel: *l'Anarchisme* [france, la Anarĥiismo], kaj MUNIS, G.: *Jalones de Derrota* [hispane, Spertaĵoj

* * *

Ĉio finita. La ordo restis restarigita. La nova respublikana ordo fariĝis ĉiam pli aŭtoritatema. La «demokratia» fasado estis disfalinta, forportante kun si la revojn de ĉiuj, kiuj revis por Hispanujo reĝimon de «justeco kaj libereco», parlamentan Respublikon, tolereman, sed efikan. La nova ŝtato havis evidentan totalisman inklinon, ekstreme centralizan, subpreman. La sola fendeto en la stukturo de ĉi tiu bela konstruaĵo estis la lukto inter la diversaj burokrataj frakcioj, ĉar neniu sukcesis tute trudi sin al la aliaj.

En Katalunujo, post la grandega kvanto da dekretoj, kiuj ĝis tiam estis «vanaĵoj», la polico fine realigis la «senarmigon de la postmilitfronto», tio estas, senarmigi la laboristojn. En Katalunujo -kiel mi jam diris- la Publika Ordo jam estis sub la «respondeco» de la centra Registaro. La demokratiaj liberoj pri parolo, gazetaro kaj kunveno estis brutale likviditaj; jam ne nur estis LPMU kaj la «ekstremismaj» grupoj de NKL-IAF, kiuj devis agadi en la kaŝiteco, la tuta politika aktiveco estis submetita al rigora regado: la sindikataj kunvenoj devis esti rajtigitaj de la delegito pri Publika Ordo, post ol esti al li petitaj almenaŭ tri tagoj antaŭe. Nova leĝaro (kreita de la sama Dekreto de la 23-an de Junio 1937, kiu «reorganizis» la tribunalojn) starigis ampleksan serion de politikaj deliktoj, kiuj permesis persekuti preskaŭ ĉiujn:

«La difino de la delikto de "spionado kaj alta perfido" estis tiel sufiĉe ampleksa, kiel por permesi la uzon de ĉi tiu terura armilo kontraŭ ĉiu oponanto, eĉ kontraŭ kiuj ne estis faŝistoj...» (Ĉefe, mi dirus, kontraŭ la revoluciuloj. [C.S.-M.]). Efektive estis konsideritaj kiel deliktoj la fakto «realigi agojn malfavorajn al la Respubliko en aŭ ekster la nacia teritorio», «defendi aŭ diskonigi novaĵojn, esprimi malfavorajn juĝojn pri la irado de la militoperacioj kaj la aŭtoritato de la

pri Malvenko].

Respubliko», la «agoj aŭ manifestoj, kiuj emas malfortigi la publikan moralon, senkuraĝigi la armeon aŭ malpliigi la kolektivan disciplinon». La punoj antaŭviditaj variis de ses jaroj de malliberejo ĝis la mortpuno. Kaj, kio estas pligraviga cirkonstanco, estis la samaj punoj tiel por la plenumita delikto, kiel por «la provo kaj la sensukcesa delikto, por la konspiro kaj la instigo, tiel, kiel por la kompliceco kaj la protektado». La dekreto permesis ĉiujn provokojn kaj donis al la polico laŭvolajn povojn, ĉar ĝi specifis, ke «restis senpunaj tiuj, kiuj, doninte sian konsenton por plenumi tiujn deliktojn, denuncus ilin antaŭ ol esti realigitaj».[235]

Danke al ĉi tiu leĝaro tiel respublika, kiel ekzemple tiu de la grekaj koloneloj, pleniĝis la malliberejoj de membroj de LPMU kaj anarĥiistoj.

Ĉi tiu ega limigo de la demokratiaj liberecoj ankaŭ manifestiĝis per la intensigo de la cenzuro pri gazetaro kaj publikaĵoj. Oni konstatis, ke la cenzuro, kvankam teorie estis limigita je la informoj de militista karaktero, fakte, faris difektojn de pluraj monatoj antaŭe, por atingi, sub la Registaro Negrín, la delirajn karakterizaĵojn de la totalismaj reĝimoj. Mi nur donas ekzemplon: «La 14-an de Aŭgusto, cirkulero malpermesis ĉian kritikon al la rusa Registaro: “Per insisto, kiu permesas diveni precizan planon destinitan ofendi eksterordinare amikan nacion, tiel kreante malfacilaĵojn al la Registaro, diversaj ĵurnaloj okupiĝis pri USSR laŭ neakceptebla maniero... Ĉi tiu absolute riproĉinda trolibereco ne devas esti akceptita de la konsilantaro de Cenzuristoj. La ĵurnalo, kiu ne submetiĝas, estos nedifinite ĉesigita, eĉ se ĝi estis cenzurita; ĉi-okaze ĝi prezentiĝos antaŭ la Speciala Tribunalo respondeca de la krimoj pri sabotado (!)”».[236]

De la 18-a de Junio 1937, la centra Registaro donis al si la monopolon de la radioelsendoj kaj forprenis la radiostaciojn

235Broué kaj Temime, citita verko, paĝoj 284-285.
236Sama verko, paĝoj 285-286.

ĝis tiam uzitajn de la sindikataj centraloj kaj la politikaj partioj.
Paralele al ĉi tiu operacio, kiu sukcesis disciplini la opinion, reduktante al nenio kiun ajn eblon de kritiko (sed kiu ne neebligis, ke la diversaj burokrataj frakcioj dediĉis sin al lukto, kiu multfoje estis sanga ĝis la momento mem de la militista malvenko), la propraj organizaĵoj elpurigis siajn vicojn. Largo Caballero kaj la maldekstraj socialistoj, kiuj ne grupiĝis sub la flagoj de la «kora alianco» de la Registaro Negrín, estis apartigitaj de la postenoj de respondeco. La malmultaj provoj de ribelo fare de kelkaj sektoroj de USJ (influitaj de la «Caballero-anoj») estis detruitaj.[237] NKL-IAF ne nur forpelis el sia sino la «Amikojn de Durruti», sed ke ankaŭ kelkaj gvidantoj, kiel "Abad de Santillán", kiuj postulis «direktoŝanĝon maldekstren» de la organizaĵo, estis apartigitaj de ĉia respondecposteno. La plej granda parto de la kontestemaj Komitatoj de «bazo» estis disciplinitaj, ĉefe inter la Liberecanaj Junularoj.
Ene de la logiko de la forta ŝtato, de la «unuiĝo de komando», la centra Registaro finis la aŭtonomecon, kiun ĝuis Katalunujo. Tiel en la kampo militista, de la Publika Ordo, kiel en la financa aŭ industria kampo, la kataluna Registaro estis iom post iom senigita je ĉiu efektiva potenco.
La kataluna kaj eŭska ministroj de la centra Registaro (Ayguadé kaj Irujo) eksiĝis en Aŭgusto 1938, kiel protesto kontraŭ la efektiva likvido de la ibera nacia plurismo, kiu estis prezentita, kiel unu el la demokratiaj konkeroj de la Respubliko kaj la Popola Fronto. Ekzameninte ĉiujn ĉi centralizigajn kaj aŭtoritatemajn disponojn, oni povus pensi, ke la «identigo kun la malamiko» superis en la realo la rigore militistan kadron, kvazaŭ la mistiko de la forta ŝtato

237Pri USJ, vidu la 14-an aneksaĵon.

iom post iom trempintus la «defendantojn de la demokratio».
Koncerne la kolektivigojn, la ofensivo de la nova ŝtato kreskis paralele kun ĉiuj aŭtoritatemaj disponoj pri kiuj mi ĵus parolis. La kolektivigoj (vidu la ĉapitron pri ili), malgraŭ esti deklaritaj de la Registaro Negrín neleĝaj tuj post la «majaj okazintaĵoj», ne malaperis. Pro ĉi tiu rezisto, kelkfoje pasiva sed ĉiam sanga, la Registaro multigis la minacojn, la dekretojn kaj la disponojn de ektimigo, por fini la skandalon el la skandaloj por kia ajn Potenco: la laboristaj aŭtonomeco kaj memmastrumado. Ĉiuj dekretoj (tiu de la 11-an de Aŭgusto 1938 estis la plej severega el ĉiuj) emis militistigi la industrion. La preteksto estis tiu ĉiama: la militbezonoj. Por tio, la centra Registaro rekte okupis sin de la direktado de la metalurgia industrio, la minoj, transportoj ktp., de Katalunujo. Ĉi tiu laboro estis realigita de armeo el burokratoj preskaŭ ĉiam tute sensciaj pri la problemoj teknikaj kaj aliaj de la produktado, sed ili estis nomumitaj por tiuj regadpostenoj pro sia politika fideleco al la Registaro Negrín. Por ne ripeti kion mi jam diris en la ĉapitro pri la kolektivigoj, mi limiĝas memorigi la obstinan reziston de la laboristoj al ĉiuj tiuj burokrataj disponoj. Aliflanke tiu rezisto ne manifestiĝis per la fakto, ke ili rifuzis fabriki la armilojn, la tankojn, la aviadilojn, taskitajn de la Registaro, kontraŭe, la laboristoj mallaŭdis la nekompetentecon de la aŭtoritatoj kaj ties malrapidecon havigi la nemalhaveblajn krudmaterialojn por pliigi la produktadon de la militmaterialo. Ĉi tiu nekompetenteco estis tia, ke kelkaj fabrikoj devis haltigi sian laboron dum semajnoj pro foresto de krudmaterialoj, kiuj perdiĝis en la labirinto de la burokrata troo da formalaĵoj. Ilia rezisto ĉefe manifestiĝis per ilia rifuzo iĝi simplaj plenumantoj de produktanta proceso, kiu estis burokrate direktita de la ŝtataj aŭtoritatoj. NKL, kiu daŭre estis tre forta en Katalunujo, vidinte sin siavice senigita je sia gvida papero, multokaze unuigis sin kun la laboristoj, sed en aliaj

ĝi stariĝis kiel interpretisto de la registaraj decidoj antaŭ la laboristoj.
La terkulturaj kolektivigoj de Katalunujo ankaŭ devis elteni, kiel tiuj de Aragono, plenan ofensivon. La malnovaj posedantoj, kuraĝigitaj de la nova registara politiko, uzis la tribunalojn por ke oni redonu al ili la terojn «kontraŭleĝe» konfiskitajn de la kamparanoj. Kaj kelkfoje ili sukcesis. Tiel en la terkulturo, kiel en la industrio, estis la korelativeco de fortoj, kiu ĉiam decidis la tutan aplikon de la registaraj kontraŭkolektivigaj disponoj. Se en certa vilaĝo la kolektivigo ĝuis la apogon de la plejmulto de la loĝantaro kaj estis ĉirkaŭita de aliaj terkulturaj kolektivigoj same bone enradikiĝintaj kaj defenditaj de NKL, la registaraj aŭtoritatoj hezitis fari pruvon de forto kaj tiuokaze la riproĉoj de la malnovaj posedantoj restis senefikaj. Sed ankaŭ okazis la malo. En la industrio okazis same; la rezisto de la laboristoj devigis la novan direktiston kaj la kuratorajn instituciojn realigi gravajn koncesiojn. Ĉi tiu senbrua lukto daŭris ĝis la militista malvenko. Se la respublikanoj venkintus la militon, la konflikto neeviteble reaperintus: se estis la milito, kiu supozeble postulis la centralizon, la disciplinon kaj la fortan ŝtaton, jam finita, la laboristoj postulintus ne nur reveni en la memmastrumadon, sed krome instigi kaj etendi ĝin. Sed, ĉar kompreneble ne estis la milito la sola motivo pro kio la burokrataro malakceptis la memmastrumadon, sekve ĝi devintus klopodi por detrui per la forto unu el la plej eksterordinaraj niatempaj aventuroj.

* * *

La ridinda elemento, kiu estas en ĉiuj aferoj, aperas laŭ miriga maniero en la nuntempa historio de Hispanujo, ĉar la frankismo estis tiu, kiu realigis la komunistan programon: tio estas, la «burĝa revolucio». Sendube kia malsanema filo de maljunaj gesifilisuloj, ĉi tiu burĝa revolucio, malfrue naskiĝinta, ne havas kiel siaj eksterlandaj fratoj, la brilon de

kultura kaj socia renaskiĝo, la pliigon de la demokratiaj liberecoj (rilate la pasintecon), la malprogreson de la praaj antaŭjuĝoj (ĉefe la religiaj) ktp. Estas «dekstra» burĝa revolucio, kiu plenumis la industriigon de la lando, la kreskon de la produktado kaj la vivnivelo, la malprogreson de la pezo de la agrikulturo ene de la ekonomio, ne preterpasante la relative amasan konsumadon de televidiloj, aŭtoj ktp., sub la aŭtoritato de forta ŝtato, kaj la grandan pezon de la tabuoj kaj mitoj de la naciisma morala naturo. Se ni uzas la ĵargonon de la marksismaj adeptoj, oni kreis la ekonomian bazon de la burĝa revolucio kvankam la politikaj superstrukturoj ne ŝajnas «akordi» kun ĝia trosimpliga vidado. Estas ĝuste pro ĉi tio pro kio la hispanaj «marksistoj» daŭre rifuzas la gravecon de la ekonomia disvolviĝo realigita en Hispanujo sub la faŝismo. Kiam oni ne povas solvi problemon, ĉiam eblas nei ĝin.
La hodiaŭa Hispanujo diferencas de tiu de 1936. Diferencaj la ekonomia kaj socia pejzaĝo kaj la pensmaniero de granda parto de la gvidaj klasoj. Diferencaj estas ankaŭ la industrio kaj la terkulturo, la Universitato kaj ties problemoj, la Familio kaj la ĝiaj (eĉ la eklezio mem, ŝajne, havas la siajn) ktp.
La partioj kaj la politikaj organizaĵoj de opozicio tre malbone rezistis la eluziĝon kaŭzatan de la ekzilo; ĉiuj ili estas skuataj de la krizoj, sed ne estas krizoj pro renoviĝo, sed pro stagnado. La «nova opozicio de la interno» preskaŭ malaperis aŭ aliĝis al la malnova, ne renovigante ĝin.
La proletaro, kiu estis vere -kaj ne ideologie- la ĉefrolulo de la revoluciaj spertoj, kiujn ni analizis, ankaŭ ŝanĝiĝis. La terkultura proletaro, tiel grava en tiu tempo, estas nun «survoje al malapero», kio ne okazas sen dramoj, kiel oni scias. Kaj la laborista klaso estas survoje al integriĝo, kiel en la tuta Eŭropo, kio ne volas diri, ke ne estas strikoj -kiel en la tuta Eŭropo- aŭ, ke oni ne luktas por «liberaj sindikatoj» (sindikatoj, kiuj estas instrumentoj de integriĝo

pli bone adaptitaj al tiu nova fazo de «demokratiigo», pri kiu multaj homoj revas por la postfrankismo). Ĉi-sence la hispana revolucio sendube estis la lasta ekzemplo de specife proleta, aŭtonoma kaj revolucia aktiveco (vidu la 2-an aneksaĵon).

Ĉi tiu «pesimisma» opinio neniel volas diri, ke la hispana socio estas senkonflikta socio. Ne estas socio sen konfliktoj kaj Hispanujo ne estas escepto el ĉi tiu evidenteco. Ĝi simple volas diri, ke la konfliktoj lokiĝas kaj aperas laŭ malsama maniero multsence. La hispana socio iom post iom iĝas ne senpene -kiel cetere okazis aŭ okazas ĉie- tio, kio nomiĝas «industria socio» kaj la konfliktoj, kiujn ĝi devos alfronti, estos la modernaj konfliktoj de la industriaj socioj. Kio ne ekskluzivas, sed tute male, ke reaperas, kaj kelkfoje laŭ perforta maniero, la arkaikaj konfliktoj.

Kaj ĉu la «revoluciaj perspektivoj»? Ĉar la analizo de revolucio tiel profunda, kiel ĉi tiu, kiu estis detruita de la «objektive» unuiĝintaj fortoj de la malnova mondo, atentigas nin pri la koncepto mem de revolucio, kiel oni komprenas ĝin nuntempe. Mi ne faras al mi iluziojn: por unuj, la rakonto de ĉi tiu «malvenko» plifortigos ilin en ilia kritiko pri la «spontaneismo», dum aliaj stagnos sin en la simbola marĉo de la ripeto.

Tamen ĉiuj «triumfantaj» revolucioj, kiuj al si diras devenantajn -antaŭ, dum, aŭ post la marksismo-leninismo-, produktis monstrojn, diktatorecojn el la stulteco kaj la polico, pezajn maŝinarojn el ekspluatado kaj alienigo de la individuoj, en kiuj eĉ la ekonomiaj problemoj -kiujn ĝis antaŭ nelonge oni citis kiel la ŝlosilon de la sukceso de la nomitaj socialismaj landoj- estis mise aŭ tute ne solvitaj, en kiuj la produktado de la kvalita vidpunkto estas tiel absurda, kiel alilande, kaj de la kvanta vidpunkto estas pli malgranda. Tamen ĉiuj tiuj, kiuj volas fari ion, ekzemple, en Hispanujo por liberigi la socion de la enorma pezo de la naciisma kaj klerikala ordo, estos malhelpitaj de la ruinoj de la

marksismo-leninismo -kiu daŭre makulas la organizaĵojn kaj la cerbojn. Ankaŭ endas precizigi, ke ĉiuj revolucioj de liberecana tendenco, kiel tiu pri kiu ni raportis ĉi tie, estis detruitaj. Ĉi tio ĉiel prezentas kelkajn malgrandajn problemojn koncerne la grandan ideon de la 19-a jarcento, laŭ kiu la revolucio per granda entuziasma movado finos en malmultaj tagoj -aŭ en malmultaj monatoj- la maljustecon kaj la kapitalisman ekspluatadon por estigi la «bonan socion» sen klasoj.
Tamen -multe antaŭ la 1936-a Katalunujo kaj multe poste: Majo 1968, ekzemple-, la ruĝa fadeno de la liberecana revolucio, kontraŭhierarĥia, memmastruma, eksplodas ĉi tie aŭ tie, estas hodiaŭ, kiel hieraŭ, detruita, renaskiĝas el siaj cindroj, kaj ĉi tiu profunda movado, nereutiligebla, nevenkebla, nefleksebla, kvankam ĝi kelkfoje ŝanĝas la trajtojn -aŭ maniojn- de sia aspekto, koncerne tion esencan -la rajto de la individuoj disponi je si mem-, restas identa laŭlonge de la tuta nuntempa historio. Ĉi tiu movado estas por mi la sola vere revolucia, kiun neniu potenco aŭ supera estro -«maldekstra» aŭ «dekstra»- iam atingos definitive superregi. Se veras, ke endas reelpensi la revolucion -kiel mi opinias-, tio nur povos fariĝi el tiu movado, aŭ pli bone, estos tiu movado -sen estroj kaj partioj kaj flagoj-, kiu eble reelpensos ĝin.

# ANEKSAĴOJ

## 1. PRI LA RIBELOJ DE OKTOBRO 1934

En Oktobro 1934, serio da ribeloj kontraŭ la reakcia Registaro de la radikala Lerroux kaj de HKAD - kies ĉefa gravulo estis Gil Robles, kvankam li nur estis ministro pri la Milito- eksplodis aŭ fiaskis en Hispanujo. La plej grava el ĉiuj estis tiu de Asturio, kie la armitaj laboristoj rezistis 15 tagojn kontraŭ la armeo, kiu fine detruis ilin. Instigita de Dencàs, estro de Kataluna Ŝtato (katalunnaciisma organizaĵo, multe influita de la mussolini-a faŝismo kaj, kiun ni vidos age kontraŭ la liberecanoj en 1937), Companys klopodis por utiligi la ribelan projekton, iniciato de la maldekstra tendenco de la Socialista Partio, kiu malsukcesis ĉie, escepte de Asturio. La 5-an de Oktobro, de la balkono de la Palaco de la kataluna Registaro kaj ŝajne kun nenia konvinkiĝo, li proklamis la sendependecon de la kataluna regno en la sino de hispana federacia Respubliko (¿?). Madrido sendis siajn trupojn por fini tiun apartiĝon. Companys volintus peti la kunlaboradon de NKL (kiu aliflanke malfavoris tiun naciisman puĉon, kies gvidantoj kontraŭstaris ĝin tiel, kiel la centra Registaro de Madrido), sed la ĉefaj inspirintoj de la komploto, Dencàs kaj Badía, la policestro, kategorie rifuzis. La polico eĉ utiligis la puĉon por aresti kelkajn anarĥiistajn aktivulojn. Ĉio tre rapide finiĝis, la armeo ĉirkaŭis la sidejon de la kataluna Registaro kaj poste ĝin prenis sturme arestante Companys-on, sen tio, ke estu vera rezisto. La *escamots*[*], la milita organizaĵo de faŝisma tipo de Dencàs, eĉ ne partoprenis en la lukto. Dencàs mem fuĝis en la faŝisman Italujon. Laŭ Brenan (*El Laberinto español* – hispane, La hispana Labirinto, Eldonejo *Ruedo*

*NeT: taĉmentoj en la kataluna

*Ibérico*, Parizo, 1962, paĝoj 214-215), la puĉo estis ago aranĝita de HKAD kaj la monarkistoj por fini la katalunan aŭtonomecon, kaj Dencàs kaj Badía, la policestro, agadis kiel provokaj agentoj. Krome Gil Robles fieris pri tio en la tribuno de la Ĉambro de Deputitoj.
Oni riproĉis al NKL-IAF sian pasivecon dum tiuj okazaĵoj de Barcelono. Ĝi devintus agi, ne favore al la faŝisto Dencàs, eĉ ne favore al la respublikano Companys -manipulita de la unua-, sed por helpi la asturiajn ministojn organizitajn ene de la Laborista Alianco NKL-ĜUL kaj, kiuj estis sieĝitaj en Oviedo. La anarĥiistoj pledas sin (kvankam iuj akceptas la fundamenton de ĉi tiu kritiko) dirante, ke estis absurde pretendi elekti inter la kataluna reakciularo kaj la «madrida» reakciularo, sed ankaŭ pledante, ke NKL estis ruinigita post la ribeloj de Januaro 1932, Januaro 1933 kaj Decembro 1933; ĝi suferis kruelan subpremon kaj miloj da aktivuloj estis malliberigitaj (César M. Lorenco, *Los Anarquistas españoles y el Poder* – hispane, La hispanaj Anarĥiistoj kaj la Potenco. *Eldonejo du Seuil*, paĝo 85.) Ili pretendas, ke ĉi tiu argumento validas por Barcelono, Madrido, Zaragozo ktp.

## 2. PRI LA LABORISTOJ, LA PROLETARO KAJ LA «LABORISTA MOVADO»

Por eviti konfuzojn, mi konsideras utile precizigi tion jenan: kiam mi parolas pri laboristoj kaj proletaro, mi donas neniun ideologian ŝarĝon al ĉi tiuj vortoj. La proletaro estas la metalurgiistoj, la teksaj laboristoj, la fervojistoj, la terkulturaj laboristoj ktp. Mi tute ne kredas je la karisma rolo, kiun la marksismo atribuas al la proletaro: klaso portanta la socialisman revolucion, kiu, liberigante sin mem, liberigas ĉiujn klasojn kaj starigas la senklasan bonan socion. Ankoraŭ malpli mi konsentas kun la diversaj nuancoj kaj kontraŭdiraj aldonaĵoj fare de la adeptoj: la laborista klaso, samtempe ke ĝi esence estas, kiu estas liberigonta la

homaron, ne povas per si mem superi la praktikon kaj la teorion de la sindikatoj (Lenino). La partio estas kiu ĝin rivelas al ĝi mem kaj, kiu al ĝi evidentigas ĝian historian komision, la partio iĝas la nepra instrumento por la konkero de la politika potenco (kiun ili konfuzas kun la revolucio). Tiel iom post iom la partio anstataŭis la laboristan klason en la marksisma ortodokseco kaj «laboristo» kaj «proleto» estas tio, kio estas ene de la doktrino de la partio (aŭ de la ŝtato) marksisma-leninisma, kaj nur tio.

Tiel do ni ekzemple vidos, ke en Katalunujo estas metalurgiistoj, kiuj povas ne esti «laboristoj», kaj komisaroj de polico, kiuj ja estas tio. Ĉar la unuaj plenumantaj la memmastrumadon disvolvas «etburĝan aktivecon», dum la duaj estas en pozicioj de klaso ĉar estas en la partio. Ĉi tiu jezuita insulto daŭre estas gravega regulo de la partioj -aŭ grupoj aŭ grupetoj- de diversa marksisma-leninisma tendenco. Ĉio ĉi estas falsa, samkiel estas pensi, ke la klasoj estas unusencaj.

Dirinte ĉi tion, mi ankoraŭ devas precizigi punkton: ne konfuzante proletaron kaj «laboristan movadon» (partioj, sindikatoj, Sinjoroj Profesoroj, ideologiaj tendencoj, publikigaĵoj, rondoj, Domoj de la Popolo ktp.), mi devas konstati, ke estintece ili kune starigis sufiĉe konsiderindan ĝeneralan forton de protesto de la socio kaj, ke hodiaŭ ili jam ne ĝin starigas. La partioj kaj la sindikatoj, pro la paso de la tagoj, de la luktoj kaj de la evoluado de la modernaj socioj, iĝis instrumentoj de integriĝo de la laboristoj en la socion. Kompreneble de la komenco ili tion portis ene de si, kvankam nur estu pro la rekonstruo en ilia sino de la hierarĥio de principoj kaj de postenoj ekzistanta en la burĝa socio, kelkfoje adaptitaj, kelkfoje ne. Sed tio, kio komence nur estis tendenco, iĝis ĝia superreganta trajto.

Siaflanke la proletaro, kiu kelkfoje estis «reprezentita» kaj aliaj «perfidita» de la laborista movado, kelkfoje agis kiel ĉefrolulo en la historio de la sociaj luktoj, laŭ aŭtonoma

maniero, rekte prenante en siaj manoj siajn specifajn interesojn sen -aŭ kontraŭ- la perado de la organizaĵoj, kiuj diris esti ĝiaj reprezentantoj. Ĉiam, kiam la proletaro tiel agis, ĝin faris laŭ liberecana aŭ kontraŭaŭtoritatema senco, kiel oni diras hodiaŭ.
Estis la rusaj laboristoj, kiuj kreis la sovetojn en 1905. La socialdemokrata Partio de Lenino kaj Trockij ne faris pli ol ordoni al ili, ke ili adoptu ĝian programon aŭ, ke ili malfondiĝu. Ĉio jam estas tie. Tiel do estis la proletoj (laŭ la senco ĉi tie difinita), kiuj realigis la memmastrumadon, preskaŭ ĝeneralan, en Katalunujo, kaj ĉiujn aliajn revoluciajn spertojn, kiuj konsistigas la temon de ĉi tiu libro. Tamen endas same konstati, ke se oni flanklasas kelkajn ĵusajn spertojn okazintajn en la «popolaj demokratioj», la proletaro ĉiam pli agadas laŭ malpli aŭtonoma kaj revolucia maniero, kaj endas demandi sin ĉu la kataluna Revolucio iamaniere ne estis la lasta granda elmontrado de ĉi tiu revolucia specifeco de la proletaro, kiu al ĝi iĝis la vera ĉefrolulo de multnombraj socialaj luktoj de la estinteco.
Ĉi tiu revolucia specifeco havas malmultan rilaton al la karisma rolo, al la historia destino, kiun Markso atribuis al la proletaro, kaj ĉi tio pro tuta serio da kialoj, kiuj estas tre longaj ĉi tie klarigi kaj el kiuj, unu estas ĝuste ĝia propra evoluado, kiu kondukis ampleksajn sektorojn de la laborista klaso integriĝi en la nomitajn sociojn de konsumado, kiu al ili iĝis unu el la plej solidaj kaj konservativaj subtenoj de la «silenta plimulto», dum aliaj sektoroj ĵetas sin en la «sovaĝajn strikojn» kaj en aliajn agojn, kiuj pli-malpli enskribas sin en la modernan kontraŭaŭtoritateman movadon. Se alitempe oni povis senpripense paroli pri proletaro, mi opinias, ke hodiaŭ estus pli trafe paroli pri la proletoj.

## 3. PRI LA MANĜOPROVIZADO KAJ LA NOVAJ LERNEJOJ

«La Centra Komitato pri Manĝoprovizado (kies origino devenis de la responda fako en la Komitato pri Volontarmeoj) estis taskita reguligi, plani ĉion, kio koncernis la nutraĵan produktadon kaj la konsumadon (impostoj, prezoj, administrado de la grandaj magazenoj, deponejoj, pograndaj kaj podetalaj vendejoj, kooperativoj, bakejoj, fabrikoj de manĝaĵo, rikoltado de tritiko en Aragono kaj en la provinco de Ilerdo, distribuo de la varoj, nutraĵoj, vestoj, la eksterlandaj aĉetoj) kaj provizi la volontarmeojn, kiuj ankoraŭ ne havis intendantaron, la patrolojn pri kontrolo kaj la loĝantaron (restoracioj, popolaj domoj, malsanulejoj ktp.). Ĝi estis konsistigita de delegitoj de la diversaj partioj kaj sindikatoj (3 de NKL: Valerio Mas, Facundo Roca kaj José Juan Domènech; 2 de IAF: Juanel kaj Manuel Villar; 3 de ĜUL; 1 de POUM; 3 de RMK; 1 de la Unuiĝo de Farmantoj; 1 teknikisto)» (César M. Lorenco, citita verko, paĝo 114). Mi nur plu diros, ke inter ĉi tiu planiga projekto kaj la realo multfoje oni devis uzi la improvizon, la imagon kaj la personan lertecon, kiel endis fari en multaj aliaj aspektoj. Estis multnombraj rektaj interŝanĝoj inter Kolektivigoj (terkulturaj kaj industriaj aŭ terkulturaj inter ili ktp.), kiuj ne ĉiam estis traktitaj de tiu Komitato.

Koncerne la Unuigitan Novan Lernejon, la *Livre d'Or de la Révolution espagnole**, rimarkigas ke, en Julio 1936 nur estis 34.431 infanoj ĉeestantaj en la lernejoj de Barcelono kaj en Julio 1937, estis 116.846 lokitaj en 151 novaj lernejaj instalaĵoj (la nombro de 102, kiun mi donis, rilatas la unuajn semajnojn post la militista ribelo).

*NeT: france, La Libro de Oro de la Hispana Revolucio

## 4. PRI LA KONFLIKTOJ DE NKL

La historio de NKL ankaŭ estas la historio de ĝiaj konfliktoj kaj disiĝoj. Kiam ili ne konsentis pri la tendenco de certa Kongreso, kompletaj Federacioj de sindikatoj de NKL deklaris sin aŭtonomaj dum pli aŭ malpli longaj periodoj. Unu el la pli daŭraj disiĝoj estis tiu de Angel Pestaña, kiu fondis en Aprilo 1933 la Sindikatista Partio (¿?). Pestaña estis sufiĉe konata gvidanto de NKL -plurfoje estis nacia Sekretario-, membro de la «modera» tendenco, kiu volis bremsi la «aventurojn» kaj la «terorismon» de kelkaj anarĥiistaj sektoroj kaj starigi «solidan», «respondecan» ktp, laboristan movadon..., dividitan laŭ klasika maniero: sindikato kaj politika partio, kiuj disdonis al si la «taskojn». Pestaña deklaris, ke li rompis kun la anarĥiismo ne pro tio iĝinte marksista. Iamaniere li deziris «sintezon» aŭ «superon» de la du tendencoj de la laborista movado. NKL montris sin tre malfavora al la Sindikatista Partio, konsiderita kiel «elemento de divido» (kiam en la dokumentoj ĉi tie cititaj oni diras «sindikatistan», tio rilatas membrojn de la partio kaj de la sindikatistaj junularoj). La Sindikatista Partio, ĉiam tre malplimulta rilate NKL-IAF-on, malaperis dum la enlanda milito kaj iuj el ĝiaj membroj, inter kiuj estis Pestaña mem, revenis en la sinon de NKL.

## 5. PRI LA POTENCO

Sufiĉas rigardi ĉirkaŭ ni por kontroli la situacion de malbone pagita roboto al kiu estas reduktita la laboristo en la «laborismaj» ŝtatoj (samkiel preskaŭ ĉiuj civitanoj, aliflanke). Sed li ne povas protesti, ĉar se li tion faras, li aperos kiel difekto de la kapitalismo aŭ falos en la furiozan frenezon, ĉar estas li mem, kiu ekspluatas sin per la ŝtato, kiu al li apartenas! Mirindaĵoj de kazuistiko! Por niaj fanatikuloj de la diktatoreco de la proletaro, pri kio temis, ne estas la neniigo de la ŝtato, «tiu supernatura fusaĵo de la socio», sed male ĝia daŭra plifortigo kaj en ĉiuj kampoj, kondiĉe ke,

kompreneble, tiu ŝtato deklaru «defendi la historiajn interesojn de la laborista klaso». Oni tre bone vidas kien kondukis ĉi tio kaj kiom devis suferi pro ĉi tiu historia defendo la laboristoj, la kamparanoj kaj la aliaj civitanoj en la nomitaj «socialismaj» landoj. Leginte, aŭskultinte kaj vidinte agadi la plej grandan parton de kiuj nomas al si mem «revoluciuloj», oni dirus, ke la homoj eterne devos konfidi al plenmano de fakuloj, saĝuloj kaj estroj, la tuton de siaj deziroj kaj la realigon de siaj revoj, kaj ke ne nur neeblas, sed ankoraŭ plej malbone estas «objektive reakcie», lukti kontraŭ Potenco, kies maljustecojn, alienecojn, privilegiojn, ekspluatadon -kaj ofte ties teroron- oni denuncas, ne luktante samtempe por alia Potenco, kiu deklaras sin bona, justa kaj ene de la senco de la historio (kvazaŭ la historio havus tiun sencon!) El ĉi tiu ideologia postulato, oni postulos la plej tutan submetiĝon kaj la plej necedeman fidon pri tiu nova Potenco kaj ĉio tio malgraŭ ties maljustecoj, alienecoj, ekspluatado, krimoj kaj teroro.
Ne temas pri tio, ke la naturo de la potenco indiferentas al ni -kaj cetere ju malpli totalisma ĝi estu, des pli bone- sed en Katalunujo, kiel aliloke, estis homoj, kiuj prave rifuzis lasi enfermi sin en la falsa dilemo, kiu volas finfine redukti ĉiujn sociajn luktojn al la starigo de «bona potenco». Ĉar ne ekzistas bona potenco. Ĉiu ĥierarĥigita socio portas en si mem -kun pli aŭ malpli granda rigoreco- la ekspluatadon, la alienecon kaj la malestimon. Se ne, kial ĝi estas ĥierarĥigita? Endas malsanktigi per unu fojo por ĉiam la ideon de la «proleta potenco» -ĉar la proletoj ĝuste estas kiuj ne estas en la potenco kaj, kiujn oni ĉiam volas limigi je rolo de simplaj plenumantoj. La prezentita demando -kaj finfine ne solvita (ĉu ĝi iam estos tia?)- en Katalunujo estas la sekva: ĉu la revolucio konsistas rompi la «kapitalisman» hierarĥion por anstataŭigi ĝin per alia, kiun oni daŭre konsideras, malgraŭ multnombraj spertoj, pli justa, kaj tio ĉar esence oni pensas, ke ĝi estas pli bona adaptita al la

modernaj postuloj de la produktado -kaj tiam ni renkontiĝas kun la kapitalismaj celoj apenaŭ renversitaj?- Ĉu aŭ la homoj fine povos liberigi sin je la tabuoj kaj la mitoj kaj rifuzi daŭre delegi en la Potenco -ia monstra Patro- la realigon de sia vivo, por povi memorganizi sin en nek aŭtoritatema, nek hierarĥia demokratio? Ĉi tio, almenaŭ, estis tio, por kio oni klopodis en Katalunujo kaj tiu provo, finfine, ŝajnas al mi fundamenta, ĉar ĝi faris, ke centoj da miloj da homoj travivis dum monatoj kaj monatoj situacion de preskaŭ kompletaj malobeo kaj kreemo. Kvankam la nehierarĥia demokratio ne estis instituciigita -ĉu ĝi povas esti tia?-, tamen ĝi estis tre reala kaj estis en malkaŝa lukto kontraŭ la nova burokrata potenco.

## 6. PRI LA ABDIKO DE PRIETO (MARTO 1938)

César M. Lorenco parolas laŭ sufiĉe preciza kaj klara maniero pri «tiu komploto», kiu neniam estis oficiale konfesita de NKL-IAF, kvankam multaj personoj konis ĝin. Jen, resumite, pri kio temis. En Marto 1938, kuris famoj pri ebla abdiko de Indalecio Prieto, ministro pri Defendo. NKL sendis al la ministro delegitaron konsistigitan de Galo Díez, Segundo Blanco kaj Horacio Prieto, por peti al li, ke li restu en sia posteno. Sed Prieto konfirmis sian decidon eksiĝi pro du fundamentaj motivoj: unue, ĉar la regado de la komunistoj super lia propra ministrejo estis tiel granda, ke li estis ilia «malliberulo»; Negrín, prezidanto de la Konsilantaro, apogis la komunistojn kontraŭ li. Kaj krome, ĉar li opiniis, ke la milito estis perdita kaj, ke oni devis atingi pacon de kompromiso. Ŝajnas, ke la delegitaro de NKL konsentis kun la analizo de la ministro, sed opiniis, ke, se li eksiĝus, la komunisma regado fariĝus pli granda. La NKL-anoj proponis, ke oni realigos «agon per la forto» por likvidi la komunistan influon sur la Potenco. Ŝajnas, ke la anarĥiistaj trupoj ricevis la ordonon (Lorenco ne parolas pri tio) prepari tiun agon per la forto por apartigi la komunistojn.

Prieto deklaris sin «profunde kortuŝita», sed li ne akceptis. Tamen nelonge poste oni diskutis tiun agon per la forto en nacia delegitkunveno de NKL kunvokita en Barcelono. La delegitoj kategorie malakceptis ajnan «pacon de kompromiso», sed ili hezitis pri la adoptotaj disponoj por rebonigi la situacion. Finfine ili elektis... ree partopreni en la Registaro (Lorenco rapide flanklasas ĉi tiun konkludon, tiel aŭdacan!). Prieto eksiĝis, Negrín samtempe surprenis la prezidadon de la Konsilantaro kaj la Ministrejo pri Defendo kaj Segundo Blanco iĝis ministro (NKL) pri publika Instruado kaj Sanservo.

## 7. PRI LA EKZEKUTOJ DE ARAGONO

Jen kion diras Gabriel Jackson en sia libro (*La República española y la guerra civil* – hispane, La hispana Respubliko kaj la enlanda milito, Eldonejo *Grijalbo*, Meksikurbo, paĝoj 247-248) pri la ekzekutoj (ni cetere rimarkigu, ke ĉi tiu aŭtoro, brile kritikita de N. Chomsky en ties jam citita eseo, montriĝas tre malfidanta pri la anarĥiistaj spertoj): «En kelkaj vilaĝoj oni mortpafis la pastron, la Civilgvardianojn, la ĉefajn bienulojn kaj kelkajn membrojn de la liberalaj profesioj, partianojn de la malnova ordo aŭ tiujn, pri kiuj oni opiniis, ke ili estis tia. En kelkaj komunumoj de plurmilaj loĝantoj, la mezumo de mortigoj estis de 4/5 ĝis 35/40, ĝenerale pli gravaj en Andaluzio kaj la sud-oriento ol en Oriento kaj Katalunujo... (Sendube ne estas hazardo, ke la sociala revolucio, kontraŭe, progresis multe pli en Katalunujo kaj en Oriento [C.S.-M.]) (...) Aliflanke estas multnombraj atestoj pri la persona interveno de Durruti por neebligi la mortigon de bienuloj, kiuj ne kunlaboris kun la militista ribelo, sed kiuj estis kondamnitaj simple, ĉar ili estis katolikoj, monarkistoj aŭ partianoj de Lerroux». El ĉi tiuj atestoj Jackson citas la jenan: «En privata konversacio, kiun mi subtenis kun du monarkistaj bienuloj, unu profesoro de Universitato kaj la alia advokato, mi aŭdis energian

defendon pri la aktiva opozicio de Durruti al la mortigoj». (Temas pri la okazaĵoj de Aragono.)
Jen la terura bilanco de mortintoj, kiun donas Jackson en sia libro (paĝo 446).
100.000 mortintoj sur la batalkampoj.
10.000 mortintoj pro la bombardoj.
50.000 mortintoj pro subnutrado kaj malsano (dum la enlanda milito).
20.000 mortintoj pro politikaj reprezalioj en respublika zono.
200.000 mortintoj pro la samaj motivoj en frankista zono dum la milito.
200.000 mortintoj, «ruĝaj» malliberuloj ekzekutitaj aŭ mortaj en malliberejo pro malsano kaj malbonaj traktadoj inter 1939 kaj 1943.
Kvankam aliaj komentariistoj donas nombrojn ankoraŭ pli altajn (1.000.000 da mortintoj), tamen, ĉiuj konsentas indiki, ke la frankista subpremado dum kaj post la milito, estis sendube kiu kaŭzis pli da mortintoj.

## 8. PRI LA MORTO DE B. DURRUTI (20-an DE NOVEMBRO 1936)

Buenaventura Durruti mortis «ĉe la militfronto» de Madrido, sed oni ne ĝuste scias kiu lin mortigis. Iuj diras, ke li estis pafita de malamika kuglo, aliaj, ke lin mortigis liaj propraj trupoj, kiam Durruti klopodis por neebligi, ke ili malantaŭeniru. Oni ankaŭ pensis pri la politika mortigo, la komunistoj disvastigis la hipotezon de krimo realigita de la ekstremismaj anarĥiistoj, ĉar Durruti alproksimiĝis al la politikaj sintenoj de la Partio. Nenio, absolute nenio, permesas subteni tiun teorion. Kontraŭe kelkaj anarĥiistoj akuzas la komunistojn pri la krimo: ili volintus liberigi sin je tro populara rivalo. Estu kiel ajn, ĵus mortinta Durruti, preskaŭ ĉiuj kruele pridisputis lian kadavron. La komunistoj nur substrekis frazeton («ni rezignas ĉion escepte de la venko») por pravigi sian tezon pri Durruti alproksimiĝanta al

la Partio. La anarĥiistaj «porregistaraj» gvidantoj uzis Durruti-on, kiu akceptis la militistigon de sia kolono, kio, laŭ ili, signifis, ke li anticipe apogis ilian politikon de kompromisoj. Koncerne la necedemajn anarĥiistojn, ili uzis lin ankoraŭ per pli da pasio pro lia eksterordinara revolucia pasinteco, liaj aktivecoj en Barcelono kaj Aragono ktp. Iuj eĉ kreis en la sino de NKL grupon (pri kiu ni jam parolis), kiun ili nomis la «amikoj de Durruti». Tio bona, kion havas kadavro, estas, ke oni al ĝi povas dirigi kion oni volas.

## 9. KONSISTIGO DE LA REGISTARO CABALLERO (5-an DE SEPTEMBRO 1936)

Jen la listo de la unua Registaro Largo Caballero (5-an de Septembro 1936): Prezidanto de la Konsilantaro kaj ministro pri la Milito: F. Largo Caballero (socialisto). - Ministro pri Eksterlandaj Aferoj: Julio Alvarez del Vayo (socialisto). - Ministro pri la Justico: Mariano Ruiz-Funés (Respublikana Maldekstro). - Ministro pri Belaj Artoj kaj Publika Instruado: Jesús Hernández (komunisto). - Ministro pri Laboro, Sanservo kaj Sociala Sekureco: José Tomás Piera (RMK). - Ministro pri Terkulturo: Vicente Uribe (komunisto). - Ministro pri Industrio kaj Komerco: Anastasio de Gracia (socialisto). - Ministro pri Transportoj kaj la Komerca Ŝiparo: Bernardo Giner de la Ríos (Respublikana Unuiĝo). – Senpostena Ministro: José Giral (Respublikana Maldekstro).

La 4-an de Novembro 1936, pro la partopreno de la anarĥiistoj, la Registaro estis reorganizita laŭ la sekva maniero: Prezidanto kaj Milito: Largo Caballero. - Eksterlandaj aferoj: Alvarez del Vayo. - Ŝiparo kaj Aviadilaro: Prieto. - Financoj: Negrín. - Publika instrado: Hernández. - Justico: García Oliver (NKL). – Internaj aferoj: Galarza. - Laboro: De Gracia. - Terkulturo: Uribe. - Publikaj Verkoj: Julio Just. - Transportoj: Giner de los Ríos. - Industrio: Juan Peiró (NKL). - Komerco: Juan López (NKL). - Sanservo: Federica Montseny (NKL). - Propagando:

Carlos Esplà. - Senpostena: José Giral, Manuel de Irujo y Jaime Ayguadé.

## 10. PRI LA ALFRONTO CASADO-KPH (MADRIDO, MARTON 1939)

Jam militiste perdita la milito, la monato de Marto 1939 vidis kiel la frakcioj de la respublikana kampo mortigis inter si per nekredebla ardo. La 5-an, Negrín enoficigis komunistojn por ĉiuj militistaj komandoj de graveco. Supozeble tio estis por organizi la reziston ĝis la fino. Sed tiu «rezisto» nur daŭris tagojn. Fakte pri kio temis por KPH estis organizi la malokupadon, kaj estas tio, kion ili faris. Sed en Madrido, la kolonelo Casado formis estraron, en kiu estis reprezentitaj ĉiuj kontraŭfaŝismaj organizaĵoj (escepte de KPH) kaj ribelis kontraŭ la Registaro Negrín. La Estraro Casado (kiu pere de la angloj kontaktis kun la malamiko) deklaris, ke ĝi volis intertrakti «honorindan pacon». Ne estos «honorinda paco», ankaŭ ne estis rezisto ĝismorte. Sed ĉie estis alfrontoj inter favoruloj kaj kontraŭuloj de la Registaro Negrín-KPH. La luktoj de Madrido kaŭzis 2.000 mortintojn. Poste KPH, kies trupoj estis venkitaj de tiuj de Cipriano Mera, kun la Estraro Casado intertraktis kompromison, kiu estis akceptita. La frankistoj «konsentigis ĉiujn» prenante Madridon. Poste okazis la senorda diskuro, la lukto por enŝipiĝi, kaj la politika subpremo, kiu falis dum jaroj sur Hispanujon.

## 11. PRI LA AFERO DE MAROKO

«La Afero de Maroko» estas tre ilustra ekzemplo pri la senlogikaĵoj de la mallongatempa oportunismo de la respublikaj aŭtoritatoj. Malgraŭ la provoj de Berneri mem, Santillán kaj aliaj revoluciuloj por ke la Respublika Registaro deklaru sin favore al la sendependeco de Maroko (laŭ Santillán, la Komitato pri Volontarmeoj ĉi-sence kontaktis marokajn naciistojn), la Respublika Registaro, eĉ kiam estis prezidita de Largo Caballero, ĉiam rifuzis tion por (kiel ne!)

ne ĉagreni Britujon nek Francujon, koloniismajn potencojn. Anstataŭ fari tion, ĝi proponis al la angloj kaj francoj cedi al ili ĉion aŭ parton de la hispanaj kolonioj en Afriko kontraŭ ilia helpo al la hispana Respubliko. Laŭ Jesús Hernández, la Respublika Registaro, tiam prezidita de Largo Caballero, kaj la Registaroj de Britujo kaj Francujo ankaŭ studis la eblon cedi al Italujo kaj Germanujo teritoriojn en Afriko kontraŭ ilia neŭtraleco en Hispanujo. Neniu el ĉi tiuj sekretaj kunvenoj sukcesis kiel ĉiuj ni scias.
La deklaro de la sendependeco de la «hispana» Maroko ne nur estintus «konforme al la principoj» de la laborista hispana movado (kiu antaŭ longe luktis kontraŭ la koloniisma milito de Maroko), sed krome ĝi kreintus tre malfacilan situacion por la frankistoj en Maroko, kie ili superregis kaj de kie deiris la militista ribelo. Unufoje la «principoj» kaj la «taktiko» akordiĝis kaj rekomendis energian kontraŭkoloniisman agadon. Sed la respublikanaj Staboj ree elektis la taktikon serĉi aliancon kun Francujo kaj Britujo, alianco, kiun ĉi tiuj ne deziris. Por malplibonigi la aferon, ekis tute rasisma propagando kontraŭ la marokaj trupoj, kiuj estis karakterizitaj kiel barbaraj, sovaĝaj kaj tiel plu. Por ĉi tiu afero, vidu la jam cititajn librojn de Broué kaj Temime (paĝoj 240-241), B. Bolloten (135-143) kaj Jesús Hernández (paĝoj 61-64).

## 12. PRI LA POLITIKAJ MORTIGOJ DE BARCELONO

Kompreneble el la 500 mortintoj (kelkaj komentariistoj parolas pri la duoblo) ne ĉiuj mortis en la surstrataj luktoj. La kruelego de la luktoj estis akompanita de impresa listo, sed malmulte konata, de politikaj mortigoj. Efektive estis tre facile kaŝmaski mortigon, se oni lasis la kadavrojn surstrate en la lokoj, kie estis pafoj.
Krom la kazo de Berneri kaj Barbieri, estas aliaj, pri kiuj la mortigo ankaŭ estas evidenta: Alfredo Martínez, gvidanto de la regiona Komitato de la Liberecanaj Junularoj kaj

sekretario de la Revolucia Fronto de la Junularo (Liberecanaj Junularoj, junularoj de LPMU kaj «sindikatistaj»), kiu iris al la sidejo de USJ (stalinista) por intertrakti kaj malaperis... Oni trovis lian kadavron malmultajn tagojn poste.
Aŭ Juan Rúa, juna urugvaja intelektulo, ankaŭ membro de la Regiona Komitato de Liberecanaj Junularoj, respondeculo de la interrilato kun la militfronto de Aragono, arestita en *Tortosa*, estis portita al «nekonata destino» kaj mortpafita kun aliaj anarĥiistoj. «*Solidaridad Obrera*» de la 11-a de majo denuncis la mortigojn de dekdu aktivuloj de NKL de la kvartalo de *San Andrés* arestitaj de la polico kaj kies kadavroj estis lokitaj en la tombejo de *Sardañola* de «mistera ambulanco», de aliaj kvin anarĥiistoj, kiuj estis mortpafitaj en *Eroles*, kaj poste tuta serio da senjuĝaj ekzekutoj en provincoj, ĉefe en Taragono kaj *Tortosa*.
Kompreneble ne ĉiuj viktimoj de ĉi tiuj senjuĝaj ekzekutoj estis membroj de NKL.

## 13. KONSISTIGO DE LA KATALUNA REGISTARO POST LA «MAJAJ OKAZINTAĴOJ»

Jen la listo de la nova kataluna Registaro:
Prezidanto: Lluís Companys. De NKL: Valerio Mas. De ĜUL: Rafael Vidiella. De RMK: Martí Faced. De la Unuiĝo de Farmantoj: J. Pons. Estas la sama Registaro, kiu enpotenciĝis dum la luktoj escepte de Rafael Vidiella anstataŭanta Antonio Sesé, kiu estis mortigita.
La noveco konsistas en la nova rolo plenumita de la centra Registaro en la sino de la kataluna Registaro: la centra Registaro senpere okupis sin pri la Publika Ordo, tiel malpliigante la katalunan aŭtonomecon. José Echevarría Novoa estis la delegito de la centra Registaro pri la Publika Ordo en Katalunujo. Emilio Torres Iglesias (ankaŭ sendita de Valencio), la Supera Policestro, kaj J. M. Díaz Ceballos, la ĝenerala Komisaro pri Sekureco en Barcelono.

## 14. PRI LA EVOLUADO DE USJ

La Unuigita Socialista Junularo (USJ) estis kreita iom antaŭ la enlanda milito, post la kunfandiĝo de la Komunistaj kaj Socialistaj Junularoj. Sed ĝi estis rapide «stalinismigita» kaj la interna demokratio restis sufokita. Ĝi iĝis obeema satelito de KPH kun ties dekstra kaj oportunisma politiko. Santiago Carrillo deklaris en Valencio, la 15-an de Januaro 1937: «Ni ne luktas por socia revolucio. Nia organizaĵo estas nek socialisma, nek komunisma. USJ ne estas marksisma junularo». (Vidu Broué kaj Temime, citita verko, paĝo 256, noto 30.) Tamen estis forta maldekstra opozicio en la sino de USJ. Ĝi mallaŭdis la burokratan diktatorecon fare de la direktantaro kaj postulis revolucian tendencon. Ĉi tiu opozicio -de socialista origino- superregis en la Federacioj de Asturio kaj Oriento. Oni povas diri, ke ĝi estis la ekstrema maldekstro de la maldekstra socialisma tendenco (kelkaj Federacioj de ĜUL kaj la «Caballero-anoj» de HLSP). Rafael Fernández kaj José Gregori -sekretarioj de la Federacioj de Asturio kaj Oriento respektive- abdikis la Nacian Komitaton de USJ por protesti kontraŭ la konduto de Carrillo. Ĉi tiu lasta ilin kalumniis kiel trockiistojn kaj partianojn de Hitlero kaj Franco. Sed la maldekstra opozicio de USJ suferis la saman sorton, ke la «Caballero-anoj» post la enpotenciĝo de la Registaro Negrín.

Ĉar la preno de Asturio fare de la frankistoj ilin senigis je ilia ĉefa bazo, ili estis sisteme reduktitaj je la senpoveco sub la kombinita agado de la registara interligo, komunistoj, dekstraj socialistoj kaj respublikanoj, kaj la burokrataj manovroj de la stalinista direktantaro de USJ: Santiago Carrillo, Ignacio Gallego, Fernando Claudín, Federico Melchor kaj aliaj.

# Enhavtabelo


ENKONDUKO DE LA TRADUKINTO...........................................................3
ANTAŬPAROLO AL LA HISPANA ELDONO................................................6
1-a ĈAPITRO: LA MILITISTA RIBELO KAJ LA REVOLUCIA REAGO…14
2-a ĈAPITRO: LA ŜTATO DISPECIGITA.......................................................36
3-a ĈAPITRO: USSR KAJ LA HISPANA REVOLUCIO................................72
4-a ĈAPITRO: LA KOLEKTIVIGOJ EN KATALUNUJO..............................94
5-a ĈAPITRO: VOLONTARMEANOJ, JES!, SOLDATOJ, NENIAM!.......176
6-a ĈAPITRO: LA «1937-aj MAJAJ OKAZINTAĴOJ».................................222
7-a ĈAPITRO:TRIUMFAS LA KONTRAŬREVOLUCIO...........................286
ANEKSAĴOJ...................................................................................................322

Organiziĝu

Kleriĝu

Biblioteko
Mateo Morral

Agu

www.bmmorral.org
info@bmmorral.org